

Interlingvistikaj Studoj

István Szerdahelyi  
Elektitaj artikoloj





**István Szerdahelyi**  
**Elektitaj artikoloj**







**Universitato Adam Mickiewicz – Uniwersytet im. Adama Mickiewicza**  
**Interlingvistikaj Studoj – Studia Interlingwistyki**

# **István Szerdahelyi**

## **Elektitaj artikoloj**

**Elektis, prilaboris kaj enkondukis**  
**Ilona Koutny**



**Poznań 2024**

## **INTERLINGVISTIKAJ STUDIOJ 4**

Redaktanto de la serio – Redaktor serii: Ilona Koutny

Bildo sur la titolpaĝo – Obraz na okładce: Andrzej Kołpanowicz: Biblioteka – Archiwum  
Plano de titolpaĝo – Projekt okładki: Ilona Koutny

© Bildo sur la titolpaĝo – Obraz na okładce: Marcin Kołpanowicz  
© Enpaĝigo – Edycja: Wydawnictwo Rys

Wydanie I

Poznań 2024

**ISBN 978-83-68006-44-5**

**DOI 10.48226/ 978-83-68006-44-5**

Wydanie:



Wydawnictwo Rys  
Dąbrówka, ul. Kolejowa 41  
62-070 Dąbrówka  
tel. 600 44 55 80  
e-mail: [tomasz.paluszynski@wydawnictworys.com](mailto:tomasz.paluszynski@wydawnictworys.com)  
[www.wydawnictworys.com](http://www.wydawnictworys.com)

## **Enhavtabelo**

Antaŭparolo.....7

### **Enkonduko**

Enkonduko al Esperantologiaj kajeroj 1.....13

Pri la lingvistika priskribo de esperanto.....21

Centjara lingvo, dudekjara fako: Esperanto en la universitato ELTE.....25

### **Interlingvistiko**

Enkonduko en la interlingvistikon.....31

La historio kaj nuna stato de interlingvistika kaj esperantologia universitata instruado kaj scienca esploro en Hungario .....89

### **Esperantologio**

Vorto kaj vortelemento en Esperanto.....93

La artikolo.....105

CI: ĉu mortnaskita?.....113

Onomastiko en Esperanto .....115

La enhava (semantika) aspekto de la morfemaro .....119

Signo, signifo, signifo-integrado.....131

La leksikografiaj problemoj de la terminologio.....139

Principoj de esperanta etimologio (Enkonduka skizo) .....151

### **Instruado de Esperanto**

Pedagogiaj valoroj de instruado de esperanto.....183



## Antaŭparolo

István Szerdahelyi (1924-87) naskiĝis antaŭ 100 jaroj. Tio donas la okazon rememori pri li. Li estas grava persono de la historio de interlingvistiko kaj esperantologio. Li dediĉis sian vivon al la esplorado de tiuj ĉi terenoj kaj instituciigis ilian sciencon esploradon kadre de la universitataj studoj pri esperantologio en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (ELTE). Fine de lia vivo li iĝis prezidanto de ILEI, membro de AdE kaj honora membro de UEA. Oni povas trovi lin inter la 200 eminentaj esperantistoj en *Nia diligenta kolegaro* (Gorecka & Korĵenkov 2018).

Profesoro Szerdahelyi multe verkis, plenumis enorman laboron, traserĉante bibliotekojn, tralegante diverslingvajn librojn kaj skribante ĉion per tajpilo. Tio estis antaŭ la reta epoko, pro tio lia verkaro ne estas tiom konata kiel ĝi meritus. Tio instigis min kunmeti tiun ĉi modestan libron el liaj artikoloj. Liaj tuta bibliografio kaj biografio troviĝas en la memorlibro dediĉita al li, *Abunda fonto* (red. Koutny 2009) kie aperas rememoroj de samtempuloj, disĉiploj kaj kolegoj, kaj sciencaj artikoloj pri la terenoj pri kiuj ankaŭ li okupiĝis.

Li estis multflanka sciencisto, preciza filologo kun vasta horizonto kaj praktika mobilizanto, organizanto de instruado de Esperanto en diversaj niveloj kaj aldone tre agrabla persono kiu trovis vojon al ĉiuj, ankaŭ pri siaj gestudentoj zorgis kvazaŭ patro.

Szerdahelyi lokis esperantologion en interlingvistikon kaj difinis la lokon de **interlingvistiko kadre de la aplikata lingvistiko**, tiel li ligis ĝin al la lingvistika mondo. Trakti interlingvistikon en rilato kun lingvopolitiko kaj -planado estis tiam nova aliro (vd poste la libron de Blanke en 1985, tiun de Barandovská-Frank 2020). Li eĉ verkis universitatan lernolibron pri aplikata lingvistiko (1985). Li ofte emfazis ke Esperanto estas ne nur „amuzajo de ĝiaj adeptoj”, sed ĝi devas solvi gravan komunikan problemon, por tio necesas ĝin prezenti en fakaj rondoj, krei ĝian sciencon priskribon (vd ĉi tie *Pri la lingvistika priskribo de Esperanto* 1979). Li batalis dum sia tuta vivo por akceptigi Esperanton en lingvistikaj rondoj kaj por akceptigi ĝian sciencon traktadon inter esperantistoj.

Li esploris diversajn planlingvojn, inter ili ankaŭ la hungarajn lingvoplanojn. Ĉi tie reaperas lia ampleksa artikolo *Enkonduko en interlingvistikon* kun abunda bibliografio (1979). Li verkis multe pli ampleksan universitatan lernolibron pri interlingvistiko en la hungara lingvo (1980). Li formulis la problemaron de interlingvistiko kaj prezentis la historiajn interlingvojn etnajn kaj planitajn en sia hungarlingva sciencopopulariga verko *De Babelo ĝis la mondlingvo* (1977). Tiu verko aŭ iu eĉ pli ampleksa devis ekzisti en esperanta versio, kiu malaperis ĉe iu esperantista eldonejo, mi ne sukcesis ĝin retrovi en la 90-aj jaroj. Li mencias la antaŭmendeblan duvoluman verkon (po 500 paĝoj!) *Interlingvistiko historia kaj kompara* en IPR (1979/3: 70). D-ro Szerdahelyi laboris ankaŭ pri disertaĵo pri interlingvistiko kiun li ne povis fini pro pli urĝaj konkretaj taskoj kiel la Hungara-Esperanta vortaro.

Koncerne **esperantologion** li reprezentis novan aliron el pluraj vidpunktoj. La **morfema sistemo de Esperanto kaj la vortfarado**, la fifama karaktero de radikoj delonge estas centra problemo de esperanta gramatiko (en 2022 aperis la libro de Rokicki: *Enkonduko en la morfologion de Esperanto* kaj en 2024 tiu de Jansen: *Vortfarado en Esperanto*). Li kontraŭis la tiaman oficialan opinion de la Akademio de Esperanto pri la *gramatika* karaktero de la radikoj per argumentoj (la baza artikolo *Vorto kaj vortelementoj* 1976 legeblas ĉi tie, pri ĝi referencas ankaŭ la du menciitaj aŭtoroj). Szerdahelyi ne neis la diferencon de radikoj en la vortformado, sed konsideris ĝin semantika diferenco. Li montris ke Zamenhof transprenis ne radikojn, sed vortojn el la fontolingvoj de Esperanto kun iliaj karakterizoj kaj poste ekstraktis la radikojn. Li defiis la konflikton kun AdE kaj la tiama korifeo Kalocsay. Malgraŭ la evidentaj problemoj, kritikoj ankaŭ de aliaj esperantologoj, AdE ĝis hodiaŭ ne reviziis sian aliron.

En la *Unua libro* aperis nur vortlisto (radikaro!) kun alilingvaj tradukoj, same en la *Fundamento*, kaj longe neniu okupiĝis pri la signifo de la vortoj. Szerdahelyi trafte konstatis ke nur tiam ni povas paroli pri aŭtonoma lingva sistemo se la vortoj pluvivas sian vivon en la nova sistemo, manifestas propran mondbildon. Li analizas la **signifojn** de diversaj esperantaj vortoj kaj komparas ilin kun la signifoj en aliaj lingvoj (ĉi-tie en la *Semantika aspekto de la morfemaro*, 1976). Sed tio gvidas lin al la **etimologio de la esperantaj vortoj**, kiuj estas preskaŭ ĉiuj pruntvortoj. Li prezentas sisteman analizon de la radikoj (*Principoj de Esperanta etimologio*, 1987 – reproduktita en la libro fotokopie). Li prezentas la verŝajne nekonsciajn procedojn de Zamenhof en la elekto de la esperanta leksiko kaj montras ankaŭ la nekonsekvencajn elektojn. Li konstatas ankaŭ la slavan influon en la signifoj de latinid- kaj ĝermandevenaj vortoj surbaze de konkretaj analizoj, li ja estis ankaŭ slavisto.

Szerdahelyi traktas diversajn partojn de la **Esperanta gramatiko** en kelkaj pli mallongaj artikoloj kiel la uzon de la pronomo *ci*, de la artikolo aŭ de la personaj kaj geografiaj nomoj (*Onomastiko en Esperanto* 1971) kie krom la sistemeco gravas ankaŭ la pragmatiko de la uzado.

Li planis verki sciencan gramatikon de Esperanto kies partoj estus: a) grafiko kaj foniko; b) morfemiko; c) sintagmatiko; d) sintakso kaj e) tekst-gramatiko kaj stilistiko. Por tio li bonvenigas la kunlaboron de kolegoj kaj studentoj. La *Esperantologiaj kajeroj* devis servi tiun celon. La unua (1976, la Enkonduko estas legeble ĉi-tie) efektive plenumas tiun celon, ĝi entenas artikolojn pri fonologio, leksikologio, formologio kaj singtagmatiko de diversaj aŭtoroj, i.a. lian *La Esperanta Morfemaro*, el kiuj nur la semantika-etimologia parto troviĝas ĉi-tie. En IPR 1979/3 li mencias ankaŭ la aperontan *Skizon pri morfemiko de Esperanto*, sed tio ne aperis. Laŭ mia scio, li verkis la volumon grafemiko en la fino de sia vivo, sed ankaŭ ĝi perdiĝis.

Li iĝis ankaŭ **leksikografo**, ja en 1983 ekestis la ebleco eldoni Hungaran-Esperantan vortaron ĉe la tiama Akademia Eldonejo respondeca pri vortaroj. Tiu granda defio postulis multe da laboro kaj kunlaboro kun esperantistaj fakuloj. Pri tiu temo li skribas en la artikolo *Leksikografiaj problemoj de terminologio* (1983). La aperon de la vortaro li ne ĝisvivis (post mia finredakto ĝi aperis nur en 1996).

Szerdahelyi estis ĝisosta **pedagogo**. Li komencis sian karieron kiel instruisto de la rusa lingvo kiun li lernis dum la militkaptiteco. Li verkis ankaŭ gimnaziajn lernolibrojn el kiuj mi mem lernis la rusan lingvon. Nelonge post la lerno de Esperanto en 1949 li komencis instrui ĝin. Li kontribuis al la akcepto de Esperanto kiel instruebla lingvo en hungaraj lernejoj kaj ebleco trapasi ŝtatan ekzamenon pri ĝi. Li verkis plurajn lernolibrojn pri Esperanto (por junuloj, studmaterialon ankaŭ por la gimnazianoj kaj koncizan lernolibron por ĉies uzo en Hungario). Por la Esperanto-ekzamenoj de la Hungara Esperanto-Asocio li verkis la metodikan parton de la *Gvidlibro por superaj ekzamenoj* (1979). Ĉi-tie aperas lia *Pedagogiaj valoroj de Esperanto* (1975).

La plej grava paŝo estis la fondo de la **Esperanto-fako de ELTE** kun la helpo de prof. Bárczy, rekonata hungara lingvisto-esperantisto. Tie li devis ellabori ne nur la instruprogramon, sed ankaŭ la lernolibrojn. La lernolibro pri Esperanto por universitata uzo (1972) krom la leksika enhavo entenas la gramatikan strukturon de Esperanto laŭ strukturisma maniero. Tie li vortumas ankaŭ tion ke Esperanto estas *minimuma hindeŭropa lingva modelo*. Por nehindeŭroplingvanoj kiel la hungaroj tio certe tiel funkcias.

Li verkis plurajn artikolojn pri instruado kiuj aperis en IPR kiu nun estas rete atingebla en la retejo de ILEI (<https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php>). Lia **Metodologio** (1975) aperis kiel universitata lernolibro tiel ĝi ne atingis multajn legantojn, kvankam ĝi estis baza faka verko siatempe. Li gvidis ankaŭ la 5-landan eksperimenton (kun la partopreno de lernejoj el Hungario, Bulgario, Italio, Aŭstrio, Jugoslavio) por pruvi la facilan lerneblecon de Esperanto kaj ĝian lernfaciligan rolon por la sekva fremda lingvo. La rezultojn prilaboris liaj studentoj kiel Márta Kovács, kaj libron aperigis Sonnabend (1979: *Esperanto: Lerneja eksperimento*).

En la nuna libro estas subjektiva kolekto de kelkaj verkoj de István Szerdahelyi, temas pri pli longaj kaj gravaj studoj kaj mallongaj artikoloj, skizoj. Videblas ankaŭ ŝanĝoj en la lingvouzo de Szerdahelyi (ekz. aplikita lingvistiko iĝis aplikata lingvistiko), diversaj uzoj de mallongigoj de lingvoj (H signifas foje hungara, foje hispana) kaj la malsama grupigo de lingva priskribo (komence leksikologio entenis morfologion kaj semantikon). La fina rezulto dependis ankaŭ de la disponebleco de la verkoj kaj de ilia teknika kvalito. Ekzemple la *Semantikan modelon* aperintan en la Zagreba volumo malgraŭ la planoj per karaktrolejlo ne eblis reprodukti en uzebla formo, necesis rezigni pri ĝi. La korekto kaj ĝusta reprodukto de diverslingvaj vortoj, formuloj kaj figuroj postulas tre multe da malfacila laboro. La *Etimologio de gramatikaj elementoj* jam ne plu eniris la volumon pro tempomanko. Ni planas disponigi tiujn artikolojn en la futuro – kiel kompletigo al la nuna libro – en la retejo de la Interlingvistikaj Studoj de AMU, parte en Edukado.net.

En la retejo de ILEI troviĝas ankaŭ sonmaterialoj de Szerdahelyi, en youtube miaj prelegoj pri li ĉi-jare.

Esperante ke la legantoj ekhavos iun imagon pri la multflanka rolo de profesoro Szerdahelyi en esperantologio kaj interlingvistiko kaj en la instruado de Esperanto, ke ili serĉos ankaŭ en aliaj fontoj kaj konstatos ke pluraj problemoj pri kiuj li

okupiĝis ankoraŭ estas aktualaj. Necesas lia engaĝiĝo, laboremo kaj persisto por ke esperantologio kaj interlingvistiko atingu sian meritan pozicion en la mondo.

Poznano, aŭgusto 2024

Ilona Koutny

Iama disĉiplo, posteulo en la Esperanto-fako de ELTE, Budapeŝto  
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj en AMU, Poznano

## Dankesprimoj

Ĉi tie mi dankas Stefanon Keller pro la helpo en skanado kaj enkomputiligo de arkivaj materialoj de CDELI en La Chaux-de-Fonds, kaj en la provlegado, Elzbieta Malik pro la enkomputiligo de kelkaj artikoloj.

Specialan dankon meritas mia eldonisto, d-ro Tomasz Paluszyński kiu helpis en la tekstorekonado de malnovaj artikoloj kaj la rapida pretigo de la volumo por ke ĝi povu esti prezentata dum la Interlingvistika sekcio de la 21-a Internacia Lingvistica Kongreso en Poznano (septembro 2024).



István Szerdahelyi kun du koleginoj en 1987: Ilona Koutny kaj Zsuzsa Barcsay



# Enkonduko



István Szerdahelyi dum laboro



# Enkonduko al Esperantologiaj kajeroj 1.<sup>1</sup>

## §1 Lingvo kaj parolo

La teksto (grafika aŭ akustika) laŭ la malnova lingvistika koncepto estis konsiderata kiel parto aŭ ero de la koncerna lingvo, sekve, laŭ tiu koncepto, la sumo de ĉiuj tekstoj formis la lingvon mem. Laŭ la moderna koncepto la teksto estas la produkto de la lingvo: la lingvo estas rimedo, per kiu oni kreas (=generas) tekstojn.

La lingvostudado konsistas el du komponantoj: a) la lingvo (t.e. leksiko kaj gramatiko) – fenomeno socia kaj b) la parolo – fenomeno individua: la individuo uzas la lingvan signalaron (kodon) en informacia celo kaj psikologie objektivigas ĉi-kombinaĵojn. En la naciaj lingvoj la akto (parolo) – en historia plano – kronologie antaŭas la sistemon (lingvo): en etnika medio naskiĝas la parolo el kiu konstruiĝas poste la lingvo. (FdS)

En E tiu fenomeno okazis inverse: unue estis kreita la lingvo kiu poste generis la tekstojn. Tiu inversa fenomeno rezultis en E la senkondiĉan realigon de bazaj normoj (Fundamento) kaj certigis la regulecon, konsekvencon kaj logikecon de la lingvo. El la sama kaŭzo la historia evoluo de la lingvo (diakronio) estas multe pli simpla, pli klara kaj pli diafana ol en naciaj lingvoj: la kelkdekjara evoluvojo estas precize observebla kaj ekzakte mezurebla.<sup>2</sup> La sinkronia studo de E okazas laŭ la plej ekzaktaj esplormetodoj, la en si mem formaligita lingvo ebligas la aplikon de matematikaj rimedoj kaj per tio la E-studo servas modele al la ekzaktigo de ĝeneralaj kaj specialaj lingvo-esploroj.

Kiel ĉiu lingvo, ankaŭ E konsistas el du komponantoj: leksiko kaj gramatiko. La leksiko estas la inventaro de la lingvoelementoj, la gramatiko estas aŭtomato, taŭga konstrui el tiuj elementoj senfinan nombron da tekstoj en la koncerna lingvo. E teksto konstruiĝas nur el E leksiko laŭ la normoj de E gramatiko. Alproprigi la internacian lingvon E signifas alproprigi kiel eble plej grandan kvanton el ĝia leksiko kaj alproprigi kiel eble plej perfekte ĝian gramatikon.

La kerno de la internacia lingvo konsistas el: a) Fundamenta leksiko, b) Fundamenta gramatiko kaj el generigitaj el ili teksto, c) Fundamenta ekzercaro, nomitaj kune: **Fundamento de Esperanto** kaj deklaritaj netuŝeblaj.

---

<sup>1</sup> La teksto aperis en: Szerdahelyi István (red.) 1976: *Esperantologiaj kajeroj 1*. Budapeŝto: Universitato Eötvös Loránd

<sup>2</sup> Oni ne tro eraras deklarante ke E estas eslorebla ankaŭ *akronie!*

## §2 La Fundamenta gramatiko

### Plena gramatiko de Esperanto

#### A. Alfabeto

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ,  
Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv Zz.

Rimarko. Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.

#### B Reguloj

1. Artikolo nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (la), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.  
Rimarko. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.
2. La substantivoj havas la finiĝon **o**. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon **j**. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo **n**. La ceteraj kazoj estas esprimitaj per helpo de prepozicioj (la genitivo per *de*, la dativo per *al*, la ablativo per *per* aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).
3. La adjektivo finiĝas per **a**. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. La komparativo estas farata per la vorto pli, la superlativo per plej; ĉe la komparativo oni uzas la konjunkcion ol.
4. La numeraloj fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: *unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil*. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la signado de la numeraloj ordaj oni aldonas la finiĝon de la adjektivo; por la multoblaj – la sufikson obl, por la nombroj – on, por la kolektaj – op, por la disdividaj – la vorton po. Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj.
5. Pronomoj personaj: *mi, vi, li, ŝi, ĝi* (pri objekto kaj besto), *si, ni, vi, ili, oni*; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.
6. La verbo ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon -as; la tempo estinta -is; la tempo estonta -os; la modo kondiĉa -us; la modo ordona -u; la modo sendifina -i. Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba): aktiva estanta -ant; aktiva estinta -int; aktiva estonta -ont; pasiva estanta -at; pasiva estinta -it; pasiva estonta -ot. Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo esti kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas de.
7. La adverboj finiĝas per **e**; gradoj de komparo kiel ĉe la adjektivoj.
8. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon.
9. Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

10. La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.
11. Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.
12. Ĉe alia nea vorto la vorto ne estas forlasata.
13. Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.
14. Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion *je*, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio *je* oni povas uzi la akuzativon sen prepozicio.
15. La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝa nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.
16. La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭata de apostrofo.

### §3 Analizo kaj sintezo – produktiveco kaj receptiveco; la segmentado

La lingva mekanismo funkcias en du direktoj: a) se la individuo intencas komuniki informaĵon, li konstruas la koncernan tekston el la E leksiko per la normoj de E gramatiko. Ekz. se li volas komuniki kio estas E, li diros: *Esperanto estas internacia lingvo*. Sed li ne povas diri: *Espiranti astes eternaciu longv.* – ĉar tiu frazo ne estas generita laŭ E gramatiko, sekve neniun informaĵon ĝi komunikas. Konstrui ĝustan tekston signifas sintezigi la elementojn laŭ la normoj. b) Ĉiu komunikacia akto antaŭkondiĉas du polusojn. Ne sufiĉas nur la informanto: la informaĵon oni devas transpreni kaj kompreni. La informato analizas la ricevitan tekston, diserigas ĝin je diversnivelaĵ segmentoj kaj perceptas ilin (receptiveco).

La formo de komunikado povas esti akustika (parolo) aŭ grafika (skribo). Jen ekzemplo de E teksto:

“Dank’ al la lingvo ni tiel altiĝis super la bestoj, kaj ju pli alte staras la lingvo, des pli rapide progresas la popolo. La diferenco de la lingvoj prezentas la esencon de la diferenco kaj reciproka malamikeco de la nacioj.” (Z)

Analizante tiun tekston ni tuj rimarkas, ke ĝi konsistas el diversnivelaĵ segmentoj.

1. La punkto kaj la sekvanta ĝin majusklo signas, ke en la teksto troviĝas du frazoj. La unua frazo estas diserigebla plu je 3 propozicioj. Tiu parto de la gramatiko, kiu studas la frazon kaj la propozicion nomiĝas sintakso.
2. Ni analizu nun la unuan propozicion de la unua frazo: *Dank’ al la lingvo ni tiel altiĝis super la bestoj*. En ĝi ni povas apartigi blokojn, vortrilatojn apartenantaj

fikse unuj al aliaj: *dank' al la lingvo; ni altiĝis; ni tiel altiĝis; super la bestoj*. Tiuj fiksjaj blokoj nomiĝas sintagmoj kaj la ĉapitro de la gramatiko, studanta la sintagmojn nomiĝas sintagmatiko.

3. Ni prenu nun la lastan sintagmon de la dua frazo: *malamikceco de la nacioj*. En ĝi grafike estas apartigitaj per intervaloj 4 elementoj: kvar vortoj respektive vortformoj. La parto de la gramatiko, kiu studas la vortformojn nomiĝas morfologio. Daŭrigante la analizon, ni prenu la unuan vorton: *malamikceco*. Ĝin ni povas segmenti jene:
  4. mal – amik – ec – o.  
Tiamaniere ni apartigis 4 vortelementojn (morfemojn). La parto de la gramatiko, kiu okupiĝas pri la valoro kaj rolo de la morfemoj kaj pri ilia kombiniĝo nomiĝas leksikologio. (La leksiko estas nur inventaro de la morfemoj!)
5. Fine: la lasta segmento, plue ne dividebla estos la litero (grafemo) al kiu respondas adekvate iu sono (fonemo). La parto de la gramatiko, kiu studas la literosistemon de la lingvo nomiĝas Grafiko, kaj tiu, kiu studas la sonsistemon nomiĝas Fonetiko respektive Fonemiko.  
Rimarko. La niveloj de la opaj segmentoj estas dividaj ne kvanta sed kvalita.  
Ekz. en la latina dialogo:
  - *Eo rus*. ‘Mi iras vilaĝon.’
  - *I*. ‘Iru.’

En la dua frazo la sama segmento (I) reprezentas kvar nivelojn:

1. ordona frazo; 2. volitivo; 3. morfemo; 4. sono (litero).

Ni analizis la tekston “a maiore ad minus” – elirante el la plej altnivela segmento al la plej elementa. La lingvon ni studos inverse: “a minore ad maius”. Ni komencos per grafiko kaj finos per la sintakso.

## §4 La koncepto de Zamenhof

La lingvistikan koncepton de Zamenhof montras klare la sekva fragmento el “Antaŭparolo al la “Unua Libro” (1887): (...)

La plej ĉefaj problemoj, kiujn estis necese solvi, estis la sekvantaj:

- I. Ke la lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante.
- II. Ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la komprenigado kun homoj de diversaj nacioj, tute egale ĉu tiu ĉi lingvo estos akceptita de la mondo kaj trovos multe da adeptoj aŭ ne, – t. e. ke la lingvo jam de la komenco mem kaj dank’ al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikadoj.
- III. Trovi rimedojn por venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivan, – ne kun ŝlosilo en la manoj kaj en okazoj de ekstrema bezono. (...)

La unuan problemon mi solvis en la sekvanta maniero:

a) Mi simpligis ĝis nekredebleco la gramatikon, kaj al tio de unu flanko en la spirito de ekzistantaj vivaj lingvoj, por ke ĝi povu facile eniri en la memoron, kaj de la dua flanko – neniom deprenante per tio ĉi de la lingvo la klarecon, precizecon kaj flekseblecon...

## §5 Rimarko pri la opaj ĉapitroj de la lingvopriskribo

Konsiderante la specifecon de E-o, kiel planita, formaligita lingvo, ekzistas propono konstrui ĝian lingvopriskribon laŭ la sekva skemo:

- I. GRAFIKO
  - 1. Grafemiko
  - 2. Ortografio
- II. FONOLOGIO
  - 1. Fonetiko
  - 2. Fonemiko
- III. LEKSIKOLOGIO
  - 1. Morfemiko
    - a) Etimologio
    - b) Semantiko
  - 2, Kombinologio
    - a) Derivado
    - b) Kunmetado
- IV. FORMOLOGIO
- V. SINTAGMATIKO
- VI. SINTAKSO

\*\*\*\*\*

Ni aldonas la studplanon de la studobjekto Esperanta gramatiko en la Esperanto-fako de ELTE por montri kiel Szerdahelyi planis la instruadon de gramatiko (El: La programoj de filologia fakultato, fako Esperanto lingvo kaj literaturo. En: IPR 1970 (1)/1: 26-28.

## SISTEMA GRAMATIKO DE ESPERANTO

### Enkonduko:

La proprecoj de formaligita lingvo kaj ĝiaj bazaj diferencoj kompare al naturaj lingvoj.

La bazaj karakteriziloj de Esperanto.

La unua varianto de la Intemacia lingvo, la elformado de la fina formo: la 16 reguloj.

### **Fonetiko:**

- La fonetika segmentado de la parolfluo. La artikulaciaj parametroj de Esperanto-sonoj.
- La signifo de artikulacia bazo rilate al la sonsistemo de Internacia Lingvo.
- La Esperanta vokalismo: klasifiko kaj formado de vokaloj. Paralelo inter la hungara kaj Esperanto-vokalsistemo.
- La konsonantoj de Esperanto: klasifiko kaj formado de vokaloj. La hungara kaj Esperanto-vokalismo (paralelo).
- Eksperimenta fonetiko: la akustikaj parametroj de Esperanto-sonoj kaj ilia mezurado.

### **Fonemiko:**

- La fonemosistemo de Esperanto. La son-distordoj en la fonemoj de Esperanto sur diversaj artikulaciaj bazoj. La diftongoj en Esperanto.
- La silabo. Tipaj silabmodeloj kaj sonorilatoj surbaze de statistikaj indikoj. La silabstrukturoj de Esperanto-vortelementoj.
- La akcento. La karakteriziloj de Esperanto-vortakcento. La influo de elizio. La kvanta kaj kvalita sangiĝo de sonoj en akcenta situacio.
- La intonacio – la elformiĝintaj intonaciaj strukturoj en Esperanto.
- Ortoepio: la elformiĝinta normativo de la «bela prononco». La tipaj eraroj de hungaroj kaj la metodo de ilia evito.
- La grafiko de Esperanto: grafemoj, literoj, supersignoj, interpunkcio. Fonemikeco kaj fonetikeco de Esperanto-grafiko.
- Ortografio: la uzo de interpunkciaj signoj. Majusklo – minusklo. Transliterigo kaj transskribo.

### **Leksiko:**

- la inventaro de Esperanto-vortelementoj. Ilia valoro.
- La origino de Esperanto-vortelementoj: la etimoj. La proporcio de la opaj elementoj laŭ ilia origino.
- La interkombino de elementoj: la libereco de la kombino kaj ĝiaj limoj. La principo de neceso kaj sufiĉo (de Saussure). La strukturo de Esperanto-leksemoj. Generatoroj kaj generativaj modeloj.
- La semantika kaj morfologia valoroj de leksemoj: la principo de vortefiko (Kalocsay).
- Vortigaj operacioj: finajŝanĝo, derivado, kunmeto. Pseŭdoafiksoj kaj amorfaj elementoj.
- La statistiko de vortelementoj: ilia frekvenco kaj kombinitiva valento.

### **Morfologio (formologio):**

- La formologiaj kategorioj en Esperanto. La parolpartoj (vortspecoj).
- La substantivo: komunaj – propraj; nombro: genro; deklinacio.
- La adjektivo: ĝia formado kaj ĝiaj specoj. Deklinacio kaj komparado. Adjektivoj substantive uzataj.
- La artikolo. Opozicio: difiniteco – nedifiniteco.
- La pronomoj: klasifiko laŭforme kaj laŭfunkcie. Originalaj, derivitaj kaj tabel-pronomoj. Persona, senpersona, refleksiva pronomoj. La poseda pronomo. Demandaj, rilataj kaj montraj pronomoj. Ĝeneraligaj, neaj pronomoj. La emfaza kaj reciproka pronomoj.
- La numeralo: baza, orda, multiplika, frakciiga, kolektiviga kaj divida numeraloj. Matematikaj operacioj kaj numeralaj sintagmoj.



La adverbo: klasifiko laŭforme kaj laŭfunkcie. Originalaj, -aŭ-adverboj, tabel-adverboj, e-ad-verboj. La gradigo de adverboj.

La verbo: voĉoj, modaloj, modoj. Simplaj kaj kompleksaj verboformoj.

Verbonomoj: infinitivo, participoj. Aktivaj kaj pasivaj strukturoj.

La prepozicioj: simplaj kaj kunmetitaj.

La partikuloj: subjunkcioj, konjunkcioj.

La interjekcioj kaj onomatopeoj.

### **Sintagmatiko:**

La tipoj de vortrilatoj en Esperanto. La sistemo de sintagmoj.

La senperaj komponentoj. Transformaciaj modeloj.

### **Sintakso:**

La fraztipoj laŭ konstruo kaj paroltono. Tipaj frazmodeloj. Elipsaj frazoj.

Frazelementoj: La subjekto.

La predikato: simpla kaj kompleksa. La kopulo kaj la predikativo.

La objekto: rekta kaj nereкта, infinitiva objekto,

La adjekto: ĝia modelo kaj specoj.

Epiteto.

La kompleksa frazo. La suborditaj propozicioj kaj iliaj specoj.

La vortordo.



# Pri la lingvistika priskribo de esperanto<sup>1</sup>

1. Konsiderante gramatikon kiel la teorion esplorantan la funkciadon de la lingva mekanismo oni distingas inter la *lingvistika* kaj *metodika* gramatikoj.

1.1. *La lingvistika gramatiko* studas la mekanismon laŭ diversaj vidpunktoj, diversecele kaj diversmaniere,

1.1.1. La vidpunktoj povas esti:

- a) **diakrona** – kies rezulto estos la historia gramatiko – studas la gramatikon vertikale: ekde ĝia ekesto ĝis la nuno;
- b) **diakrona-kompara** – kies rezulto estas la kompara gramatiko – kiu studas la kongruecon de la gramatikoj, apartenantaj al la sama lingvofamilio el la aspekto de komuna origino;
- c) **sinkrona** – kies rezulto estos la priskriba gramatiko – studas la mekanisman sistemon de la lingvo laŭ la nuntempa stato.

La **priskriba gramatiko** havas diversajn konceptojn:

- c1 tradicia aŭ klasika gramatiko** – priskribas laŭ la modelo de la Greka-Latina gramatiko; la gramatiko dividiĝas je fonetiko, morfologio kaj sintakso; la centran lokon okupas la morfologio.
- c2 strukturisma gramatiko** – studas la mekanismon laŭ la formalaj komponantoj (fonemo, morfemo, leksemo, sintagmo, frazo) ne distingante la morfologian kaj sintaksan studon.
- c3 la genera-transforma gramatiko** laŭ kiu «la gramatiko estas la mekanismo de la fraz-generado» (N. CHOMSKY) – studas la frazojn laŭ ilia profunda kaj surfaca strukturoj, la frazo mem studatas laŭ la sintaksaj, fonologiaj kaj semantikaj komponantoj.

1.1.2. Laŭ celo la gramatikoj povas esti *teoriaj* kaj *aplikataj*;

1.1.3. Laŭ ilia karaktero oni distingas *normativan* (preskriban) kaj *taksativan* (priskriban) gramatikojn;

1.1.4. fine: laŭ metodo oni distingas: *induktan* – la observado kaj esplorado de la lingvouzaj faktoj kaj la konstruo de la gramatiko sur tiu materialo; *deduktan* – intuicia konstruado de modelo, laŭ kiu oni povas klarigi kaj dedukti ĉiujn lingvajn faktojn.

1.2. La **metodika** (aŭ **pedagogia**) **gramatiko** – prezentas la lingvan materialon, organizatan je la celo de ia lernado-instruado, alproprigo, uzante dum la organizado ankaŭ elementojn el limdisciplinoj (didaktiko, psikologio k.a.).

<sup>1</sup> Aperis en: Blanke, Detlev (red.) 1979: *Esperanto – La internacia lingvo – sciencaj aspektoj*. Berlin: Kulturlogo de GDR – Centra Laborrondo Esperanto. 111-116.

**1.3.** Inter la **lingvistika** (sciencia-teoria) kaj **metodika** (praktika-didaktika) gramatikoj estas esencaj diferencoj:

**1.3.1.** La celo de la lingvistika gramatiko estas la sciencia esploro de *la lingvo*. En la metodika gramatiko la studo de la lingvo estas nur rimedo cele de la alproprigo de *la parolo* (praktika lingvouzo).

**1.3.2.** La sciencaj gramatikoj (lingvistikaj) strebas al la *pleneco*, konsideras la tutan sistemon; la metodikaj gramatikoj priskribas nur la *bazan* (minimuman) gramatikon, bezonatan por la praktika uzado de la lingvo.

**1.3.3.** La lingvistikaj gramatikoj priskribas proporcie ĉiujn nivelojn de la lingvo, sendepende de ilia uzofrekvenco kaj uzvaloro. La metodika gramatiko diferencigas la materialon laŭ la praktika valoro. Por la lingvistika gramatiko la maloftaj kaj esceptaj fenomenoj estas ofte pli gravaj ol la kutimaj, frekvencaj.

**1.3.4.** Estas diferenco inter la du gramatikoj ankaŭ en la hierarkio de la lingvaj niveloj. La sciencaj (lingvistikaj) gramatikoj prezentas sian materialon laŭ certa logika sistemo (ekz. la tradiciaj laŭ la sinsekvo de la sekvaj ĉapitroj:

fonetiko, morfologio, sintakso; la strukturismaj aŭ de sube supren: de la fonema al la sintakso, aŭ de supre suben: de la frazo al la fonema; la genera-transforma en la komplekseco de bazaj (kernaj) frazoj kaj generataj k.t.p.). En la metodikaj gramatikoj la prezentado estas ne linia sed koncentra, ne diferencigas strikte la gramatikon disde la leksiko, interplektiĝas la morfologio kaj sintakso, priatentas la principojn didaktikajn: de la simpla al la komplika, de la facila al la malfacila; priobservas la interferadon kaj aliajn psikologiajn fenomenojn k.t.p.

**2.** Resumante la diritajn oni povas konstati (konsiderante la situacion en E-o) ke konklude eblas paroli fakte ne pri du, sed pri tri gramatikoj:

**2.1. Instru-lerna gramatiko** por tiuj, kiuj instruas, resp. lernas la lingvon. Tio ĉi adekvatas en la supra skemo kun la metodika-pedagogia gramatiko. Tiaj gramatikoj abundas en E-o en la multcentaj lernolibroj. Ili uzatas ĉe la lingvo parol-alproprigo.

**2.2. Sistemaj-praktikaj gramatikoj** – kiuj sistemigas la gramatikan materialon (la certa koncepto) kaj servas al tiuj, kiuj jam alproprigis la bazojn de la lingvo kaj disponas pri baza parolkapablo. Ĝia celo estas praktike demonstri la regulojn de la ĝusta lingvouzo, kompletigi la lingvajjn konojn. Tiaj estas ekz. la *Plena Gramatiko de E-o* kaj diversaj sistemaj gramatikoj, aperintaj en la naciaj lingvoj.

**2.3. Teoria-sciencia gramatiko** kongruas kun la supra *lingvistika gramatiko*. Ĝin bezonas la lingvistoj-fakuloj kiuj volas ekkoni E-on, ian lingvan karakteron (sed ne volas ĝin alproprigi). Tia gramatiko en E-o mankas.

**3.** Kia estas la kaŭzo, ke dum 90 jaroj neniu entreprenis verki sciencan priskribon de la lingvo? Por tion kompreni oni trarigardu la konceptojn de diverstipaj E-istoj.

### 3.1. Interne de la E-a mondo nuntempe konfrontas tri konceptoj:

**La unua:** la arkaika, *retrograda, sekteca koncepto*, vivanta en la nebulo de la „interna ideo”, celanta strikte izoliĝi de la establita mondo kaj klopodante fari el E-o grupan lingvon de iu mistika verda komunumo kun la fina revo: E-igi la tutan homaron kaj fari el la tuta mondo integran E-ujon. Tiu ĉi koncepto vivas ankoraŭ sufiĉe vigle, eĉ regas en kelkaj E-istaj organizadoj.

**La dua:** same *endogena* kiel la antaŭa, sed jam sen *mistikaj trajtoj*. Laŭ tiu koncepto E-o estas la lingvo de tiuj, kiuj ĝin uzas. La celo estas: multobligi la nombron de ĝiaj uzantoj, plivastigi la medion kie E-o funkcias, sed tute ne ellasi E-on el siaj manoj kaj ne transdoni ĝin al la vasta publiko (en tiu kazo perdiĝus la absoluta kompetenteco de la t.n. «elstaraj E-istaj spertuloj»).

Ŝajnas, ke en la E-ista organizata mondo tiu ĉi koncepto estas la plej populara. La Zamenhofa diraĵo: «Konsiliĝu neniam kun lingvistoj» estas tiom plaĉa, ke ĝi estas plurfoje citita en PIV: pp. 554, 641 kaj 975.

**La tria** koncepto (multe pli populara ekster la E-ista movado, ol interne de ĝi), la *ekzogena koncepto*, laŭ kiu: la destino de E-o ne estas nur servi kiel amuzaĵo al limigita nombro de ĝiaj adeptoj, nek kiel rimedo por famiĝi pere de ĝi. E-o devas solvi gravan socian problemon kaj iom-post-iom transpreni la interlingvan funkcion de la nuntempe interlingve uzataj naciaj lingvoj. Ĝi bezonas konstantan uzadon, ĉar nur pere de uzado ĝi vivas kaj evoluas. Sed tio ne sufiĉas. Oni devas konstante, serioze kaj objektivite informi la socion, la politikajn, kulturajn kaj sciencajn rondojn pri ĝi, laŭ-etape akceptigi kaj oficialigi ĝin, enigi kaj disipi ĝin en la establitan socion, tie, kie ĝi devos plenumi sian destinon.

**3.2.** Laŭ la opinio de la unua koncepto sufiĉas la 16-regula *Fundamenta Gramatiko* (oni rememoru la skandalojn ĉirkaŭ la aperigo de la *Plena Vortaro* kaj *Plena Gramatiko!*); laŭ la opinio de la dua koncepto – sufiĉas la ĝis nun ekzistantaj (kp. la reeldonon de la *Plena Gramatiko!*); nur la tria koncepto estas preta akcepti la koncepton pri la scienca gramatiko de E-o kaj (ni tuj aldonu) nur ĝi estas kapabla tion efektiviigi. Nome, por verki scienca gramatikon ne sufiĉas esti “sperta E-isto”.

**3.3.** En la lastaj dudek jaroj oni povas konstati ke jam aperadas monografioj, studaĵoj kiuj estas jam konsidereblaj kiel sciencaj priskriboj de iu aŭ alia fenomeno de la lingvo. La taskoj estontaj estas daŭrigi kaj plioftigi tiajn studaĵojn en la fakaj nacilingvaj periodaĵoj – unuflanke kaj se aperas iu tia studaĵo oni tuj verku pri ĝi prezenton kaj recenzon en sialanda scienca faka periodaĵo. Tiaj recenzoj havas eksterordinare gravan informan kaj propagandan valoron.

**3.3.1.** Tiucele: estas urĝe verkenda la bibliografio de la ĝis nun nacilingve aperintaj sciencnivelaĵoj, monografioj, eble verkoj pri iu teritorio de la E-a gramatiko;

**3.3.2.** La lingvistoj-esperantologoj estas petataj urĝe verki recenzojn kaj prezentojn de tiuj verkoj kaj aperigi ilin en la hejmaj periodaĵoj;

**3.3.3.** Estas urĝe verkenda la tematiko de tiuj specialaj gramatikaj temoj, kiuj pleje interesas la lingvistikan mondon (ekz. la fonema sistemo de E-o; la rolo de gepatralingva substrato en la verkaro de diversaj E-o verkistoj; la rilato inter signo kaj signifo en E-o; la problemo de lingva kompetenteco en E-o; la stilrimedoj en E-o; ĉu E-o evoluis dum 90 jaroj kaj kiel? simetrieco kaj proporcieco sur lingva kaj parola niveloj; la problemo de la manko de etna medio k.s.)

**3.3.4.** La profesoroj, instruantoj en universitatoj, instigu siajn studentojn elekti kiel temon de faklaboraĵo, diplomlaboraĵo aŭ pridoktoreca disertaĵo tian temon;

**3.4.** En la faka Universitata instruado ĝis nun mankas taŭga lernilo pri la sistema E-o gramatiko. Ĝi devas esti nepre scienca-lingvistika, eĉ se ĝi servus kiel lernilo.

Ĉi-jare ni komencis ĝian verkadon: ĝi aperos unue en formo de kajeroj. La unua kajero enhavos la grafikon kaj fonikon de E-o. La dua: morfemikon. Estas serĉataj kunlaborantoj por la temoj:

- a) morfologio (3-a kajero);
- b) sintagmatiko (4-a kajero);
- c) sintakso (5-a kajero);
- d) tekst-gramatiko kaj stilistiko (6-a kajero).

La E-o-fakaj studentoj de la Universitato ELTE verkas siajn E-logiajn faklaboraĵojn el la subaj gramatikaj temoj:

Intonacio – STAND László

Artikolo – Ali BOHAREV

Prepozicio – Alicja MICHIEWECZ

Sintakso: Tipologio de frazstrukturoj: GERENCSÉR Attila

Frazeologio: RÉVÉSZ Sándor

Interesiĝantoj pri la temoj (eble kontribuantoj, helpantoj, kunlaborantoj) serĉataj!

**3.5.** Post la apero de opaj kajeroj, resp. studaĵoj estas konsilinde traduki ilin nacilingven kaj aperigi ilin en fakrevuoj.

**3.6.** La *Internacia Interlingvistika Kongreso*, okazonta inter la 24a kaj 29a de julio 1978 en Budapeŝto estas bona okazo por pridiskuti ankaŭ la problemojn de la scienca esplorado de la Internacia Lingvo Esperanto.

## Centjara lingvo, dudekjara fako: Esperanto en la universitato ELTE<sup>1</sup>

*Nia interparolo aktualas pro du datrevenoj: la dudeka de la Esperanto-fako en la Universitato ELTE, kaj la centa naskiĝtago de la Internacia Lingvo mem. Kiel lingvo, kiel fako, Esperanto estas do same juna.*

I.SZ. – Sendube, en la vivo de lingvoj cent jaroj ne estas longa tempo. Se ni tamen konsideras, ke Esperanto estas la sola artefarita lingvo, kiu ĝisvivis sian centan datrevenon, ni devas diri, ke tiu juneco ne estas io hontinda. Eĉ, la juneca dinamismo de Esperanto ebligis (male al aliaj lingvoj, kiuj kreiĝis dank’al iu komunumo), ke ĝi kreu per siaj propraj fortoj kaj kulturon kaj komunumon da parolantoj – «mikrosocion» – kiu etendiĝas, eĉ se nur diaspore, sur la tuta mondo. Malgraŭ tio, ni en la universitato konsideras Esperanton kiel lingvon en eksperimenta fazo. Sed tiu ĉi eksperimento estas eksterordinare grandskala, kaj Esperanto meritas el ĉiuj aspektoj, ke la lingvoscienco okupiĝu pri ĝi serioze.

*Ĉu ankŭ aliaj lingvistoj samopinias?*

I.SZ. – Kvankam la lingvon iniciatis nefakulo, la pollanda okulisto Zamenhof, ne necesis pli ol dek-dudek jaroj por altiri la atenton de profesiaj lingvistoj. En la dudekaj jaroj, Antoine MEILLET skribis en sia fama verko *La lingvoj de la mondo*: «Ĉiuj teoriaj diskutoj superfluas – Esperanto funkcias.» Kompreneble, la lingvistajn opiniojn ĉiam influis la regantaj sciencaj skoloj de la koncerna epoko. La novgramatikistoj, kiuj insistis pri la teorio de la «natura» evoluado de lingvoj, ne montris apartan simpatian al ĝi, sed iliaj kritikantoj – kiel MEILLET, BREAL, Baudouin DE COURTENAY; pli malfrue JESPERSEN kaj SAPIR – ne plu opiniis artefaritajn lingvojn nevivipovaj homunkuloj. Kiam en la sesdekaj jaroj elformiĝis la problemaro de aplikata lingvistiko, ekzemple de lingvopolitiko kaj lingvomodelado, evidentiĝis, ke Esperanto povas ludi gravan rolon ambaŭterene. Kiel lingvo politike neŭtrala, ĝi proponas solvon al la Babelo ĉi-epoka sur sennombraj kampoj – en la turismo, komerco, scienco ktp. Kiel modelo de hindeŭropaj lingvoj eble ĝi estas la plej taŭga por esplori la problemojn de lingva minimigo kaj ekonomio. Materialo ne mankas por lingvistoj; dum cent jaroj de sia ekzisto Esperanto ja estis elprovita en preskaŭ ĉiuj eblaj funkcioj, eĉ en tiaj, kiuj unuavide ŝajnas malproksimaj de sia origina destino, kiel ekzemple komunikado en plurlingvaj familioj. Konsultlibroj pri aplikata lingvistiko ne plu preteratentas Esperanton. La interesiĝo tiukampe ŝajnas daŭre kreski.

---

<sup>1</sup> Unu el la lastaj intervjuoj kun István Szerdahelyi. La originala hungarlingva intervjuo aperis en „Egyetemi Lapok” ‘Universtitataj Folioj’, 02.02.1987: 1-3. Intervjuis István Ertl. La Esperanta versio aperis en IPR1988/1: 8-11.

*Ĉu la ekesto mem de la fako ŝuldiĝas al tiu interesigo?*

I.SZ. – Ne rekte. La 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto en 1966, havis bonan gazetaran eĥon, kiu kontribuis al la favorigo de la cirkonstancoj por enkonduki Esperanton en nian universitaton. Hungara Esperanto-Asocio sendis, en februaro de 1966, peticion al la Ministerio pri Instruado kaj Klerigado, kiu plu adredis ĝin al la universitato. La rektoro petis opinion de la fama lingvisto Géza BÁRCZI, konata esperantisto de junaĝo kiu, ĝis tiam preskaŭ sola, okupiĝis ankaŭ science pri Esperanto. (BÁRCZI timis pri la misefiko de grandaj lingvoj sur la hungara, kaj en Esperanto li vidis ilon por gardi la identecon de malgrandaj popoloj.) Laŭ lia favora opinio, la fako «Esperantaj lingvo kaj literaturo» enkondukiĝis en septembro de 1966, komence kun naŭ studentoj.

*Kaj kiom da fakanoj sekvis?*

I.SZ. – Entute 98, inter ili dek eksterlandanoj: poloj, japano, vjetnamano. Dek studentoj doktoriĝis, kvindek verkis faklaboraĵojn, kvankam la plejmulto ne forlasis sian ĉeffakon.<sup>2</sup> Tio bone montras, kiom larĝas la neesploritaj terenoj en esperantologio. La studentoj sentas, ke ili malkovras novajn teritoriojn de la scienco. La varieco de la studprogramo logas en multajn direktojn: eblas okupiĝi pri ĝeneralaj problemoj de lingvoinstruado, observi tempajn kaj spacajn ŝanĝigojn de la lingvo sur la modelo de Esperanto, profundiĝi en la literaturhistorio. (La lingvo ja funkciis kaj funkcias ĉefe, kompreneble, en skriba formo, kreante valorajn originalaĵojn kaj tradukojn.)

*Sed kion povas fari eksstudento kun diplomo pri Esperanto?*

I.SZ. – Principe ĝi samrange rajtigas al mezgrada instruado, kiel diplomoj de aliaj fakoj. Evidente, oni ne povas sin vivteni per Esperanto, kiun oni instruas fakultative, en malmultaj lokoj. Tamen estas pensige, ke en la bazlernejoj dumil infanoj lernas Esperanton, kiu okupas tie la kvaran lokon post la deviga rusa kaj la elekteblaj angla kaj germana lingvoj. Nia fako, kiu enkadriĝas en lingvistikan katedron, kompreneble pli taŭgas por elformi esperantologojn, teoriajn fakulojn. Multaj el niaj diplomitoj agadas sur la instrua, junulara kaj aliaj kampoj de la movado. Ankaŭ la literaturo ne estas neglektata: ni povas fieri pri renomaj tradukistoj, eĉ pri literatura premiito.

*Kiel evoluas la rilatoj de la socio al Esperanto? Kian futuron kaj ŝancojn vi antaŭvidas por la lingvo?*

I.SZ. – La Esperanto-movado atingis la nivelon, kiun ĝi povis per la propraj fortoj, ĝin ja neniam apogis politikaj aŭ financaj potencoj. La kvalita kresko ankoraŭ atendata devas esti la paŝo-post-paŝo rekonigo kaj instituciigo de Esperanto. La plej konvinka modo atingi tion, laŭ mia opinio, estas pruvi la taŭgecon de la lingvo en kiel eble plej multaj aplikoj: en la turismo (ekz. «Pasporta Servo»), en la scienco (DLT, Esperantaj resumoj en revuoj), en la literaturo (kie ĝi same povas servi kiel pontlingvo kaj helpi la

<sup>2</sup> En la universitato ELTE oni kutime studas du aŭ tri fakojn samtempe. Tria fako estas komencebla en la dua (B-fako) aŭ en la tria (C-fako) jaro de la studoj. Esperanto estas C-fako. Por diplomigi, ĉiu studento devas prezenti faklaboraĵon en iu el siaj fakoj. (La redaktoro [I. Ertl])



diskonigon de «malgrandaj» kulturoj). Ni, hungaroj, ĉiam estis iniciatemaj en la historio de Esperanto. La literaturan lingvon praktike kreis en la tridekaj jaroj la budapeŝta skolo kaj Kolomano KALOCSAY; la scienca ekokupiĝo pri la lingvo samtempis kun la fondo de nia fako. Ankaŭ nun, kiam pleje urĝas instituciigi Esperanton, ni hungaroj devus fari decidan paŝon. Se tio okazos, kaj se Esperanto plue pruviĝos vivipova kaj evoluiva – kion mi firme kredas – ne povas esti dubo, ke ĝi plenumos la rolon de neŭtrala internacia pontlingvo en ĉiam pli kaj pli da rilatoj.



# Interlingvistiko



István Szerdahelyi kun partoprenantoj-kolegoj dum la Interlingvistika konferenco en 1978, Budapeŝto.

Dekstre de Szerdahelyi staras Mauro La Torre, Fabrizio Pennacchietti kaj antaŭ ili Vera Barandovská



# Enkonduko en la interlingvistikon<sup>1</sup>

## 1. Enkonduko

### 1.1. Kontaktologio – lingvomodeligo

**1.1.1.** La homon ĉirkaŭas informaj-enhavaj objektoj kaj fenomenoj. Ĉi objektoj kaj fenomenoj estas komunikivaj, se ili manifestas intencon de informaj-transdono.

La ĉiutaga **komunika situacio** havas kvar esencajn elementojn:

- a) *la teksto* – en vasta senco: ĉiu signo, resp. simbol-sistemo, ekz. la fajflingvo de Azoraj kamparanoj, la Afrika tambur-lingvo, ĝis la „lingvo” de aŭdiĵoj. La funkcio de teksto estas: enkonduki en la situacion signifon.
- b) *la subteksto* (ekz., gesto, mimiko, signifo-enhavaj movoj, paŭzoj, kondutformoj k.s.) helpas la interpretadon de la teksto. Dank’ al la subteksto, la teksto havas ne nur signifon, sed ankaŭ sencon.
- c) *la medio* – estas tiu areo, kie okazas la komunikado, tiuj sociaj kaj naturaj fenomenoj kaj objektoj, inter kiuj disvolviĝas la komunikado.
- ĉ) *la interrilato* inter la informato kaj la informanto generas la komunikadon: sen tiu interrilato ne ekzistas komunika akto.

**1.1.2.** La informado estas dupolusa procezo: la iniciatanto estas la informanto.

Li estas libera en la elekto de rimedoj. Tiun liberecon tamen limigas la elekto de la informato: se la informato (adresato) ne kapablas interpreti („kompreni“) la tekston, la informaĵo semiotike estas vakua, la inform-akto ne realiĝas.

La **informrilato** estas tri-tipa:

- ĉ1 – La informado okazas ne celkonscie. La adresato transkoda la informaĵon en alian signosistemon kaj interpretas ĝin en tiu signosistemo. Tiaj estas la naturaj fenomenoj (ekz., fulmo-tondro, malalte flugantaj hirundoj, roso sur herbo, k.s.) nomataj ankaŭ „lingvo de faktoj“ (langage des faits).
- ĉ2 – La informanto kaj la informato kapablas sur la sama nivelo analizi kaj sintezi la inform-kodon. Tipa ekzemplo estas la inform-ŝanĝo de du individuoj de sama gepatra lingvo (sur teksta nivelo – sed ne ĉiam ankaŭ sur la subteksta nivelo).
- ĉ3 – La informato ne kapablas malkodi (interpreti, kompreni) la informaĵon.

En tiu ĉi lasta situacio ekestas socia problemo, kies baza formulo estas la konflikto inter la unulingva individuo kaj plurlingva socio.

---

<sup>1</sup> Aperis en: Carlevaro, T. & Lobin, G. (red.) 1979: Einführung in die Interlinguistik (Enkonduko en la Interlingvistikon). [Paderborn]: Europaklub & FEoLL-Institut  
Rim. de IK: La (numeroj) montras al notoj fine de la artikolo.

**1.1.3.** La branĉo de la lingvoscienco, kiu studas la sociajn problemojn, kies kaŭzo aŭ/kaj solvo estas la lingvo, nomiĝas **aplikita lingvistiko**. Subbranĉo de aplikita lingvistiko estas la *kontaktologio*, t.e. la disciplino, studanta la sociajn problemojn, kaŭzitajn de heterolingvaj kontaktoj.


La plej ofta heterolingva kontakto estas *la dulingvismo* (subklaso de dulingvismo estas la *duglosio* – la alterna uzado de la literatura lingvo kaj iu dialekto de la sama lingvo). La dulingvismo havas tre varian tipologion, depende de la karaktero, statuso, uzado, rilato k.s. de la du kontaktiĝantaj lingvoj. La du lingvoj povas esti samstatusaj kaj uzataj alterne, sed unu el inter ili povas esti prestiĝa, la alia ne; unu el la du lingvoj povas esti la oficiala ŝtata lingvo aŭ la lingvo de konkerantoj; unu el la du lingvoj povas esti la lingvo de la plimulto, la alia de malplimulto; kaj fine, unu el la du lingvoj povas ludi pontlingvan rolon. (1)

Depende de tiu rilato inter la kontaktiĝantaj lingvoj ekestas la unudirekta aŭ du direkta (reciproka) influo. Tiel povas elformiĝi *dialektoj* sub la influo de la lingva plimulto (ekz. de divers-teritoriaj dialektoj de jida aŭ cigana lingvo), *kreolaj lingvoj* el la deformiĝo de la lingvo de konkerantoj sur indiĝena bazo (iu simila procezo okazis dum la naskiĝo de nov-latinaj lingvoj kaj okazis pli poste sur la kolonioj), *makaroniaj lingvoj* – groteskaj miksaĵoj de elementoj de aŭtoritataj lingvoj, perdintaj la prestiĝon, kun la elementoj de loka lingvo, *lingvaj frankaj* kaj *piĝinoj* – lingvomiksaĵoj el du aŭ pluraj lingvoj uzataj en interlingva trafiko ktp. (2)

Al tiuj ĉi loko kaj funkcie tre limigitaj spontanaj solvoj la aplikita lingvistiko kontribuis per du aliaj solveblecoj:

- a) per *tradukado* – homa kaj maŝina, skriba kaj buŝa; kaj
- b) per *instruado de fremdaj lingvoj*, t.e. per arta „kreado“ de dulingvuloj (tri-, plur-lingvuloj).

**1.1.4.** Pro la subita kaj tre intensiva amasiĝo de interlingvaj problemoj, nek la tradukado, nek la instruado de fremdaj lingvoj povas kontentigi la bezonojn. La aplikita lingvistiko devis rimarki, ke la nuna interlingva problemo estas novtipa demando, kreita de la moderna socio, de la evoluado de la tekniko, kiun ne plu eblas solvi per klasikaj-tradiciaj rimedoj. Oni devas apartigi novan disciplinon, kies tasko estu ĝuste la solvado de la interlingva problemo. Tiu nova branĉo de la aplikita lingvistiko nomiĝas *interlingvistiko*. La interlingvistiko devas trovi la respondon al la demando: kiu lingvo solvu la problemon: ĉu nacia aŭ internacia; ĉu estinta, estanta aŭ estonta; ĉu etna aŭ arta? La subbranĉo de la interlingvistiko, kiu serĉas la respondon al tiu demando nomiĝas *lingvopolitiko*. Se la konkludo estas, ke nur arta lingvo povas solvi la problemon, ekestas la dua demando: kiel plani tian lingvon? Kiel aspektu la plej konvena *lingvomodelo*? La dua subbranĉo de la interlingvistiko estas *la lingvomodeligo*. Skeme tiun ĉi temaron oni povas prezenti jene:



## 1.2. Difinoj

Inter la ĝisnunaj difinoj troveblas la plej diversaj. Ili estas grupigeblaj laŭ iliaj tendencoj jene:

- a) opozicio: lingvosciencia branĉo – aparta scienco;
- b) opozicio: nur lingvo-modeligo – nur lingvo-politiko;
- c) opozicio: konstata-priskriba – kreiva.

La fondinto de la scienca interlingvistiko, la fama dana lingvisto Otto JESPERSEN en la enkonduko de sia verko, priskribanta la lingvoplanon *Novial* (An International Language, London, 1928), sub la titolo „Interlinguistics”, trarigardas la ĝistiaman evoluon de diversaj lingvoplanoj, kiujn li alterne nomas „interlanguage” resp. „constructed language”. En sia fundamenta verketo: “A New Science, Interlinguistics” (Cambridge, 1930) li jene difinas la novan sciencon:

„A new science is developing, Interlinguistics – that branch of the science of language which deals with the structure and basic ideas of all languages with a view to the establishing of a norm for interlanguages, i.e. auxiliary languages destined for oral and written use between people who cannot make themselves understood by means of their mother tongue.” (3)

La kreivan elementon emfazas Dénes SZILÁGYI („Versus interlinguistica”, en: *Schola et Vita*, Milano, 1931/6, 97-120: „...systema totale de theorias et thechnicas, serviente ad productione de interlinguas”) kaj li jam distingas ĝeneralan interlingvistikon (= historia kaj kompara studo de interlingvoj) kaj *normativan*.

Multe pli poste ankaŭ M. MONNEROT-DUMAINE tiel konstruas sian verkon („Précis d’interlinguistique générale et spéciale”, Paris, 1960 – tamen ne tute laŭ la samaj kriterioj), kaj jene difinas la interlingvon: “langue conventionnelle s’insérant entre les langues existantes et suppléant à celles-ci dans les relations internationales”.

Laŭ W. MANDERS (“Interlingvistiko kaj Esperantologio”, Purmerend, 1950) interlingvistiko estas “...tiu branĉo, kiu celas trovi la plej kontentigan solvon de la planlingva problemo.”

Simile formulis sian difinon C.W. von SYDOW dum la dua internacia kongreso de lingvistoj (Genevo, 1931): “Il est évident, que la création d’une telle langue exige des connaissances linguistiques; en effet, on a besoin ici d’une discipline linguistique spéciale – l’interlinguistique.”

A.M. ROT (“A nyelvi kontaktusok kérdése”, en: *Nyelvtudományi Közlemények*, LXXIV/49-70/) uzas la terminon „interlingvistiko” kiel sinonimon de „lingvaj kontaktoj”.

Ankaŭ H. ÖLBERG emfazas la apartenon al lingvoscienco:

“Die Interlinguistik ist der Zweig der Sprachwissenschaft, der sich mit den ‚Interlinguae’ befasst... In einem eingeschränkteren Sinne, in welchem wohl die eigentliche Aufgabe der Interlinguistik zu fassen ist, können wir sagen: sie befasst sich mit den internationalen künstlich geschaffenen Sprachen.” (*Amman-Festgabe*, 2-a eld., Innsbruck, 1954, 64-70)

Yehoshua BAR-HILLEL kritikis la difinon de J.A. Fodor kaj J.J. Katz, laŭ kiuj „la lingvistika teorio estas tiu metateorio, kiu okupiĝas pri la lingvistika priskribo de naturaj lingvoj...” BAR-HILLEL demandas: se la lingvistika teorio okupiĝas nur pri la priskribo de naturaj lingvoj, kiu teorio okupiĝu pri la „konstruitaj lingvoj”, estu ili verkoj de logikistoj, produkto de komputilo aŭ tiaj sistemoj, kiel ekz. Esperanto? Kvankam inter ili estas esenca diferenco, konstatas BAR-HILLEL, tamen ili tiomgrade similas, ke estas nepre la tasko de lingvistika metateorio okupiĝi pri ili. (4)

E. WÜSTER komence nomis *sinteza lingvistiko* tiun „relative novan branĉon de lingvistiko, kiu ne nur konstatas, sed kiu konscie influas (gvidas) la evoluon de lingvo. (La terminoj ‚esperantologio’ kaj ‚interlingvistiko’, en: *Esperantologio*, 1955/1-4, Kopenhago, 209-214). WÜSTER ne akceptas la terminon, kiun uzis S. AUERBACH en la germana traduko de JESPERSEN-a verko („Eine internationale Sprache”, Heidelberg, 1928) “konstruierte Sprache” kaj proponas la terminon „Plansprache” kaj uzas ankaŭ la terminon „lingva planado”. (5)

La apartenon de interlingvistiko al aplikita lingvistiko emfazas V. TAULI (“Introduction to a theory of Language Planning”, Uppsala, 1968). Laŭ TAULI „la lingvoplanado estas tiu branĉo de la aplikita lingvistiko, kiu sisteme studas la celojn, principojn, metodojn kaj taktikon de lingvoplanado”, la lingvoplanado mem estas tiu metodologia procedo, kiu okupiĝas pri:



A) la reguligo kaj evoluigo de ekzistantaj lingvoj:

B) pri la kreado de novaj lingvoj, nome:

- a) regionaj;
- b) naciaj;
- c) internaciaj.

Ĉi lastan ĉapitron (VIII) nomas TAULI „Interlinguistics”. (6)

A.D. SVEJČER en sia verko („Voprosy sociologii jazyka v sovremennoj amerikanskoj lingvist’ike”, Leningrad, 1971) jene difinas la anglan terminon „language planning”: „konscia influo sur la lingvajn sanĝiĝojn” kaj aldonas: tiamaniere ĝi estas proksima al la terminoj uzataj en nia literaturo „jazykovaja polit’ika” kaj „jazykovoje stroit’el’stvo” (p. 70). Tiel al la unusola termino „lingvoplanado” en la soveta terminologii; korespondas du terminoj: „lingvopolitiko” kaj „lingvokonstruado”. En iom pli vasta senco ankaŭ ni uzas tiujn du paralelajn terminojn (vd Enkondukon)<sup>2</sup>.

La lingvomodeligan aspekton emfazas P.N. D’EN’ISOV konsiderante la interlingvistikon kiel „antaŭkibernetika lingvomodeligo” (Principy mod’elirovaniija jazyka, Moskva, 1965). O.S. AHMANOVA plivastigas ĝiajn limojn: laŭ ŝia difino en interlingvistikon eniras ankaŭ la maŝin-interlingvoj: “La interlingvistiko estas tiu branĉo de la lingvoscienco, kiu studas la diversajn problemojn, ligitajn kun la kreado kaj funkciigo de diversaj helplingvoj – de la internaciaj lingvoj kiel Esperanto, Interlingua k.s. ĝis la aŭtomataj interlingvoj.» (Slovar lingvisticeskih terminov, Moskva, 1966).

Troviĝas ankaŭ difinoj, kiuj preteratentas la lingvistikan karakteron de la disciplino, ĝian apartenon al la lingvoscienco, prezentante interlingvistikon kvazaŭ iun novan sendependan sciencan branĉon. En *Brockhaus Enzyklopädie* (Wiesbaden, 1970) troviĝas la jena difino: “Interlinguistik: ein Wissenschaftszweig, der die künstlichen Sprachen auf ihre Verwendbarkeit erforscht.”

La difino en PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, Paris, 1970) estas la jena:

„Interlingvistiko. Scienco, kiu esploras la kondiĉojn sociologiajn, kulturajn kaj lingvistikajn de komuna norma lingvo, uzota en la internaciaj rilatoj.”

### 1.3. La lingvistiko

**1.3.1.** Ĝi ĝis la lastaj tempoj klopodis neglekti kaj preteratenti la interlingvistikajn problemojn. Nur la moderna lingvistiko komencis iom pli serioze konsideri kaj la lingvopolitikan kaj la lingvomodeligan aspekton de la problemaro, plej ofte aparte.

<sup>2</sup> „ŝajne la termino „lingvoplanado” ne estas konvena, ĉar ĝi fakte ŝajnigas, kvazaŭ la lingvan evoluon oni povus direkti laŭ tiu aŭ alia fluejo. Mi pensas, ke la terminoj uzataj en la soveta lingvoscienco „lingva politiko” kaj „lingva konstruado” konsiderinde pli ekzakte kaj pli korekte spegulas la esencon, ĉar ili esprimas ne la direktadon de la lingvoevoluo, sed la enmiksiĝon en la spontane evoluantajn lingvajn procezojn...” (M.I. STEBLIN-KAMENSKIJ: Vozmojno li plan’irovan’ije jazykovovo razvit’ija., en: Voprosy Jazykoznan’ija, 1968/3, pp. 47-56).

Apenaŭ aperas lastatempe ĝeneral-lingvistika aŭ aplikita lingvistika verko, kiu ne okupiĝus en aparta ĉapitro pri la interlingva problemo.

La atento de fakaj lingvistoj direktiĝis al la internaciaj lingvoj precipe tiam, kiam iu tia sistemo eniris en la socion, komencis funkcii. La unua tia sistemo estis *la volapuko*. La unua lingvisto, kiu negative reagis estis Gustav MEYER (“Weltsprache und Weltsprachen”, en: *Schlesische Zeitung*, 1901, n-roj 400 kaj 406, repr. el: “Essays und Studien zur Sprachgeschichte und Volkskunde”, Strassburg, 1893, vol. 11, 23-46), al kiu respondis alia genia lingvisto de tiuj tempoj, Hugo SCHUCHARDT (“Weltsprache und Weltsprachen, an Gustav Meyer”, Strassburg, 1894). La tria lingvisto pozitive opinianta pri la ebleco de lingvo-modeligo kaj funkciado de tia lingva modelo estis Max MÜLLER. (7)

**1.3.2.** Multe pli akran diskuton eksplodigis la apero de *Esperanto*. Multaj signifaj lingvistoj de tiu tempo partoprenis tiun diskuton, esprimis siajn opiniojn pri la interlingva problemo. La unua diskuto eksplodis inter Hermann DIELS kaj Louis COUTURAT. La duan akran atakon kontraŭ la artaj lingvoj iniciatis la novgramatikistoj Karl BRUGMANN kaj August LESKIEN. Ilian sintenon motivas la baza koncepto de la skolo, al kiu ili apartenis, laŭ kiu lingvon oni povas esplori nur diakrone. Tiu lingvo, kiu ne havas historion, ne estas lingvo. Ne estas ja mirinde, ke kontraŭ la opinioj de BRUGMANN kaj LESKIEN tre forte reagis ĝuste tiuj lingvistoj, kiujn hodiaŭ ni konsideras kiel la fondintojn kaj iniciatintojn de tio, kion ni nomas „moderna lingvistiko”: J. BAUDOIN DE COURTENAY, N.S. TRUBETZKOJ, M. BREAL kaj A. MEILLET. (8)

La „determinisma koncepto” de novgramatikistoj neas ĉiun rajton de enmiksiĝo en „la naturan vivon” de la lingvo. Tiu koncepto siatempe disvastiĝinte en diversaj medioj multe damaĝis al la lingvokulturaj movadoj, bremsis la lingvokulturan aktivecon en multaj landoj. La koncepton de BRUGMANN kaj LESKIEN energie reĵetis BREAL, MEILLET kaj la elstara lingvisto Jan BAUDOIN DE COURTENAY. BREAL konstatis, ke la kritikataj artikoloj enhavas nebulajn esprimojn, kiel „la natura vivo de lingvoj”, “instinkta lingvo” k.s. kies uzado havas nur unu celon: misgvidi la legantaron. „Estas tre facile kaj tre elegante defendi la ekzistantan kaj kutiman, sed dume ĉe la alia flanko oni preparas la estontecon...” finas sian artikolon BREAL. MEILLET per konkretaj ekzemploj demonstris, ke nek BRUGMANN, nek LESKIEN konis sufiĉe la kritikatan lingvon (Esperanton). Ne estas akceptebla la tezo de BRUGMANN, laŭ kiu „la lingvoj estas produktaĵoj de natura evolado kaj ne eblas ilin arte konstrui”. „La homo – asertas MEILLET – aktive partoprenas en la kreado, funkciigo kaj evoluigo de la lingvo, kaj en tio estas almenaŭ tiom da arteco, kiom en la artaj lingvoj, ekstraktitaj el la vivantaj naturaj lingvoj kaj sinteze konstruitaj.” Ne estas vera la aserto de BRUGMANN ke interlingvan funkcion povas plenumi nur nacia lingvo (laŭ li la germana aŭ la angla). Kiam la pontlingvo fariĝos reala necesbezono, tiam tiun funkcion povos plenumi nur neŭtrala, arte konstruita

lingvo, asertas MEILLET. Finante, MEILLET konstatis, ke la absoluta neado de la vivrajto de artaj lingvoj far sinjoroj BRUGMANN kaj LESKIEN originas en tio, ke tiuj sinjoroj ne fidis je la homa intelekto kaj je la estonteco de internaciaj rilatoj. La akratona diskuto altiris la atenton de la lingvistoj al la problemoj kaj igis ilin esprimi siajn opiniojn. (9)

**1.3.3.** La trian ondon kirlis ĉirkaŭ la problemoj la aktiveco de la elstara dana lingvisto Otto JESPERSEN. Ĝi atingis la apogon dum la dua Internacia Kongreso de Lingvistoj (Parizo, 25-29. de aŭg., 1933) (10) kie la subtemo de la dua tagorda punkto estis: *Kion vi pensas pri la apliko de arta lingvo, kiel helplingvo?* Al la temo alparolis dudek ses kongresanoj, konataj lingvistoj. Estas interese observi, kiel ili respondis la demandon: ĉu lingvo aŭ ne? Neniu kontestis rekte la lingvan karakteron de la planitaj lingvoj<sup>3</sup>. Tamen la solvon konsideris reala nur pere de nacia lingvo B.W. SPEEKMAN kaj A. DAUZAT. Laŭ R. PAGET unue oni devas ellabori ekzakte la principojn de ideala simbol-sistemo kaj nur poste konstrui tian sistemon. PORZIG akceptis la rajton de arta enmiksiĝo nur en kazo de necesbezono (li citis la germanajn „Sprachreiniger“).

Ĉiuj aliaj alparolintoj proponis kiel solvon artan lingvon. C. K. OGDEN proponis sian projekton „Basic English», BRIOUET proponis iun projekton de simpligita latina (ekz. Latino Moderno aŭ la „Veneto perfezionato” de M. FACCIOLI).

La du elstaraj italaj lingvistoj, Matteo BARTOLI kaj G. PICCOLI demonstris seriozan konon de la problemoj. Ili ambaŭ prezentis historian trarigardon. BARTOLI konstatis ke la „akravidado de H. SCHUCHARDT pli profunden enpenetris en la esencon de tiu problemoj ol tiu de BRUGMANN.” A. PIECHKOVSKI deklaris: „Kio koncernas la artajn lingvojn kiel helplingvoj, mi konsideras ke la akiro de tia lingvo por la tuta homaro kaj speciale por la internaciaj rilatoj estas perfekte ebla kaj ekstreme dezirinda („parfaitement possible et extremement desirable”. 10, p. 75). Pri la ĝenerala-lingvistika bazo de la problemoj okupiĝis klare kaj detale Ch. BALLY,

W.E. COLLINSON, UHLENBECK kaj E. SAPIR. SAPIR emfazis, ke ĉi-kaze temas pri scienca lingvistika problemoj kaj energie kritikis tiujn lingvistojn, kiuj sen serioza pristudo de la problemoj diras opinionoj kaj prijuĝon. „La romantikismo de la pasinteco neniam plu povas ligi la manojn aŭ senkuraĝigi kaj ektimigi la estontecojn...” finis sian alparoladon SAPIR (10, p. 88). C.W. von SYDOW deklaris, ke li trastudis kelkajn el tiuj projektoj, eĉ mem uzis ilin praktike, sekve, laŭ tiel akiritaj spertoj li povas tutrajte konstati, ke „estas sendube eble kaj utile apliki artan lingvon kiel internacian helpan lingvon”. („Il serait sans doute possible et utile d’adopter une langue artificielle comme langue internationale auxiliaire”... 10, p. 91). Same pri la scienca karaktero de la problemoj atentigis ankaŭ DARKO: „Pro tio mi opinias, ke estas dezirinde fari la problemojn de la internaciaj helplingvoj objektoj de strikta scienca esploro... „ (Deshalb bin ich der Ansicht, dass es wünschenswert ist, das Problem der

<sup>3</sup> Eble tiakarakteraj estis la alparoloj de R.J. KE LLOG kaj F. HESTERMANN, kiuj konsideris la kongreson ne kompetenta en tiu demando.

internationalen Hilfssprache zum Objekt einer streng wissenschaftlichen Forschung zu machen... „, 10, p. 104).

Axel WALLENSKOLD (1864-1933) prezentis konkretan proponon por la konferencaj rezolucioj:

1. La internacia lingvo fariĝis necesa pro la konkuro de multnombraj lingvoj de diversa graveco. Internacia lingvo estus dezirinda por la internaciaj kongresoj.
2. Ĉi tiu internacia lingvo ne povas esti alia ol arta lingvo, konsiderante, ke natura ĵaluzo de nacioj ne permesos la akcepton de iu vivanta lingvo. Cetere, la gramatiko de la arta lingvo estas reduktebla ĝis minimume.
3. Se oni rekonas la necesbezonojn de internacia arta lingvo, oni nomumu komision, konsistantan el scienculoj (tiaj, kiel O. JESPERSEN), kiuj estas favoraj al la ideo de tia lingvo, kiuj prezentos al la sekva Kongreso raporton pri la plej bona rimedo por la realigo de la universala akcepto de iu arta lingvo.

B.W. SPEEKMAN prezentis alian proponon asertante, ke ne ekzistas alia, pli kompetenta organo por decidi pri tiu ĉi propono, ol ĝuste la internacia kongreso de lingvistoj. Laŭ li la nuna kongreso devas decidi en la jenaj demandoj: „ĉu por la funkcio de mond-help-lingvo (Welthilfssprache) oni elektu:

- a) jam ekzistantan aŭ artan lingvon?
- b) kiun ekzistantan aŭ kiun artan lingvon? „

Pro la tempmanko la prezidanto (A. MEILLET) fermis la diskuton sen decido kaj rezolucioj.

**1.3.4.** La sekvan periodon karakterizas la aktiveco de IALA (International Auxiliary Language Association). Jam en la Dua Kongreso IALA estis reprezentata kaj disvolvis dum ĝi aktivan agadon. Kiam la Kongreso nenion decidis pri la interlingva problemoj, pluraj lingvistoj konsideris ĝuste IALA kiel la plej kompetentan organizaĵon por daŭrigi tiun ĉi laboron kaj solvi ĝin. SCHRIJNEN la fama lingvisto (Nymwegen) deklaris:

„Wir haben eine Art feierlicher Ehrenrettung der künstlichen Sprachen vorgenommen, eine Ehrenrettung, der sich selbst jene angeschlossen haben, die die eine oder andere Nationalsprache als künftige Welthilfssprache vorzögen. Wir überlassen es der IALA, die von ihr begonnenen Untersuchungen fortzusetzen und sie in alle sich als nützlich erweisenden Richtungen auszudehnen...“ (citita en: „Das monumentale Werk einer Frau“, trad. W. Blaschke, en: *Revista de Interlingua*, jul. 1967 (Morges), n-ro 13).

La fondintino de IALA (Alice VANDERBILT SHEPPARD, laŭ la nomo de edzo, Alice V. MORRIS) (11) fondis la asocion en 1924 laŭ la sugestoj kaj proponoj de la fama kemiisto kaj inventisto D-ro Frederick Gardner COTTRELL. Ŝi preparis jam raporton por la 2-a Kongreso de Lingvistoj: „Statement Prepared for the Second International Congress of Linguists“, Genève, aŭg. 1931. Unu jaron antaŭ la Kongreso, en la sama urbo, ŝi organizis Kunvenon por lingva esplorado (Meeting of Linguistic

Research), en kiu partoprenis famaj lingvistoj (FUNKE, KARCEVSKI, DEBRUNNER, HERMANN k.a.), kaj la reprezentantoj de la internaciaj lingvoj kaj lingvoplanoj Esperanto, Ido, Occidental, Novial kaj Esperanto-II. (12)

La granda merito de Alice V. MORRIS estis, ke ŝi povis ekinteresi famajn lingvistojn pri la problemoj de la internacia lingvo kaj interrilati ilin: krom C. JESPERSEN, E. SAPIR kaj W.E. COLLINSON – K. ASAKAWA, R.H. FIFE, A. DEBRUNNER, J-P. VINAY, A. MARTINET (14). Ŝi sukcesis altiri la atenton de la Internacia Kongreso de Lingvistoj en 1936 (en Kopenhago) kaj sukcesis meti sur la tagordon denove la demandojn en 1948 dum la VI. Internacia Kongreso de Lingvistoj en Parizo. (15)

## 2. Interlingvistiko

### 2.1. Lingvopolitiko

**2.1.1.** La plej antikvaj relikvioj, elfositaj de la esploristoj atestas jam plurlingvismon. Ĝis hodiaŭ neniu sukcesis science pruvi la hipotezon, ke la homaro estis iam unulingva. (16) La *heterolingvismo* (tion pruvas ankaŭ la antikvaj mitologioj) estis ĉiam socia problemoj, konsiderata de la primitiva homo dia puno. Sed ĝia intensiveco ne estis ĉiam egale forta: ĝi evoluis paralele kun la kultura-teknika evoluo de la homaro, respektive kaj adekvate al tio – kun la intensiĝo de la interlingva trafiko.

**2.1.2.** Ĉiu kulturo en la antikveco havis sian interlingvon: la sumera estis longajn jarcentojn la „latina” de Mez-Oriento (17); la akada – la ĝenerale uzata diplomacia lingvo; la aramea – la interlingvo de la persa imperio, poste de la mediteranea trafiko; la greka – unue kulta, poste kultura kaj iom pli poste kaj la diplomacia, kaj la interkomerca pontlingvo de la tiam konata mondo. (18) Kulturhistoriisto konstata en 1802 pri la romianoj: „Eĉ pri la lernado de lingvoj tiom multe kiom ni, ili ne penadis; ili devis lerni la unusolan grekan lingvon por posedi la ŝlosilon de ĉiuj Sciencoj...” (19)

**2.1.3.** Paralele kun la disvastiĝo de romianoj en la konkerita mondo disvastiĝas la latina lingvo. Kaj kiam la klasika latino vulgariĝas kaj el la vulgara latina elformiĝas unue kreolecaj variantoj, poste la novaj t.n. latinidaj lingvoj, disvastiĝas la ĝermanaj kaj slavaj lingvoj kaj iom post iom elformiĝas la naciaj ŝtatoj – la latina postrestas kiel „mez-latina” – varianto por servi kiel interlingvo en ĉiuj rilatoj: ĝi funkcias kiel lingvo de kulturo – dank’ al la kristana eklezio, kiu komence gvidas ankaŭ la sciencan vivon – kiel lingvo de diplomatio, eĉ kiel interna ŝtata lingvo en pluraj ŝtatoj ĝis la komenco de la XIX-a jarcento. En tiu internacia latino ekestas ne nur religia kaj scienca literaturo, sed ankaŭ beletristiko: la unua firma pruvo, ke eblas krei artajn verkojn en neŭtrala pontlingvo, dua lingvo de la verkisto aŭ poeto. (20)

**2.1.4.** La plifirmiĝo de la nacia konscio, la lukto por la emancipo de novaj naciaj lingvoj iom post iom estigas kritikan sintenon rilate al la latina. Kontraŭ la latineca

tropedantismo naskiĝas la makaronia literaturo – fakte la karikaturo de la latina. Oni pridubas ĝian „sanktecon” kaj „perfektecon”.

**2.1.5.** Simile al la alkemiistoj, kiuj serĉis la panaceon de la eterna vivo kaj la rimedon transformi metalon je oro – la filozofoj serĉis la eblecojn konstrui la perfektan, idealan universalan lingvon de la tuta homaro. (21)

*La unua vojo laŭ kiu ili ekiris estis mistika.* La starta penso estis, ke la lingvo, kiun Dio donacis al la unua homo, la adama lingvo, estis perfekta. Sed tiu lingvo post la Babel-tura puno disipiĝis en la diversajn lingvojn – sekve, en ĉiu lingvo enestas elementoj de tiu perfekta adama lingvo. La devo de sciencisto estas: serĉi el la diversaj lingvoj (sed precipe el la tri „sanktaj” lingvoj: hebrea, greka kaj latina – pli poste kiel kvara aperas ankaŭ la ĉina) la elementojn de la adama lingvo kaj tiamaniere rekonstrui la idealan pralingvon. (22)

La dua koncepto eliris el la hipotezo de *antaŭlingva pensado*. Laŭ tiu koncepto la diversaj lingvoj dum la funkciado fuŝiĝis – ĉiam pli kaj pli granda fariĝis la abismo inter la ideo kaj la vorto (ni dirus hodiaŭ: inter la signifato kaj signifanto, inter la signo kaj signifo). Ekestis en la lingvoj mankoj kaj superfluaĵoj: la lingvoj ne plu spegulas fidele la realaĵon kaj ne plu sekvas la leĝojn de la unueca homa logiko. Oni do remodeligu la universalan realaĵon per strikte adekvata al ĝi universala kaj perfekta signaro. (23)

Simile al alkemiistoj, kiuj ne sukcesis fari artan oron, nek trovi la eliksiron de senmorteco, tamen eltrovis multajn principojn kaj rimedojn, kiuj poste ekevoluigis la modernan kemion, ankaŭ la filozofoj ne sukcesis krei la idealan lingvon de la homaro. Tamen ilia laboro ne estis vana: ili malkovris multajn leĝojn de la homa lingvo kaj per tio ili multe kontribuis al la evoluigo de la pliposta lingvoscienco. (24) Ĉar praktika interlingvo funkciis (la latina), tiuj konceptoj ne celis la praktikecon: iliaj klopodoj estis ĉiam teoriaj.

La alia tendenco de la „lingvokreado” estis la *konstruo de lingvo komprenata nur de iniciitoj* – tendenco tute kontraŭa al interlingvoj. Tial naskiĝas en tiu epoko ezoteraj projektoj (kriptolingvoj): en la latin-lingva medio la *Ignota Lingua*, en la araba

**2.1.6.** La historia dato, kiu ĝenerale konsideratas kiel la dato de *definitiva falo de latina lingvo* estas 1648 – la dato de Vestfaliaj packontraktoj. Tie okazas la unuan fojon, ke la delegitoj de diversaj potencoj ne plu uzas la latinon, sed la naciajn lingvojn (eĉ la mediatoroj de la papo parolis itale!). Dank’ al la lerteco de la franca diplomatio, la sama dato signas la starton de la franca lingvo kiel diplomatia lingvo kaj la komencon de ĝia ĝenerala prestiĝo. (26)

Kvankam antaŭ la unua mondmilito la franca ludis la ĉefan rolon en la internaciaj rilatoj, ĝi neniam plenumis tiom vaste la pontlingvan funkcion, kiel siatempe la latina.

La falo de la franca (simile al tiu de la latina) komenciĝas dum aliaj pac-traktadoj, nome dum la Versajlaj. Dank’ al la prestiĝo de W. WILSON apud la franca aperas la

angla kiel la paralele uzenda interlingvo de la internaciaj kontaktoj. WILSON deklaris: „la franca lingvo *estis* la lingvo de eŭropa diplomatio, sed ŝajne ni alvenis al la komenco de nova erao kaj ni strebas al la mond-diplomacio... „<sup>4</sup> (27)

Tiu pli-malpli paca funkciado de paralelo franca-angla daŭras inter la du mondmilitoj. Nur la mondregaj aspiroj de la faŝisma Germanio eksperimentas rivali, kandidatigante la lingvon de „supernacia nacio” – sen rimarkinda sukceso. (28)

**2.1.7.** Post la dua mondmilito la angla tre rapide superkreskas la francan, kaj ĉiam disvastiĝante (dank’ al la politika prestiĝo kaj financa subteno de Usono), ŝajnas nuntempe okupi la unuan lokon inter la naciaj lingvoj, konkurantaj por la titolo de „mondlingvo”. Tamen, la uzado de la angla, inter la nunaj cirkonstancoj, estas multe malpli vasta eĉ ol la siatempa uzado de la franca. La fakto mem, ke apud la angla en la „klubo de grandaj lingvoj” ĉeestas ankoraŭ aliaj (rusa, franca, hispana, ĉina, araba) kaj aperas ĉiam novaj pretendoj (germana, japana, suahila, portugala, ktp.) montras perspektive ne integriĝon, sed tute kontraŭe malintegriĝon. Neniu lingvisto (serioze okupiĝante pri la estonta solvo de la lingvoproblemo) konsideras efektivebla la ĝeneralan kaj ekskluzivan disvastiĝon kaj senkondiĉan oficialan akcepton de la angla lingvo, kiel la dua lingvo de ĉiuj.

**2.1.8.** Teorie oni povas ekskludi la aliajn rivalojn – kiel tion faras DECSY – kaj tiam restas la demando (simpligita ĝis minimumo): *ĉu la angla aŭ Esperanto? aŭ en pli ĝenerala formo: ĉu nacia lingvo aŭ arta?* (29)

La respondo al tiu demando estas la tasko de la internacia lingvopolitiko. La antaŭresponda argumentado postulas socilingvistikajn kaj psikolingvistikajn esplorojn. Ni vidu skeme la avantaĝojn resp. malavantaĝojn de la opozicioj:

---

<sup>4</sup> Citita ĉe Bourgeois, L. „Le Pacte de 1919 et la Société des Nations“, Paris, 1919.

a) **nacia lingvo** – opozicio: vivanta – mortinta

|                     | <b>vivanta</b>                                       | <b>mortinta</b>                                     |
|---------------------|--|---|
| <b>avantaĝoj</b>    | Havas etnan medion<br>Politike kaj finance subtenata | Neŭtraleco  |
| <b>malavantaĝoj</b> | Politike engaĝita                                    | Manko de moodernaj terminoj<br>Manko de taŭga apogo |


## b) etna – arta (nacia – internacia)

|                     | <b>etna</b>   | <b>arta</b>   |
|---------------------|---|---|
| <b>avantaĝoj</b>    | Havas etnan medion<br>Politike kaj finance subtenata<br>Havas kulturan, sciencan kaj socian prestiĝon<br>Havas tradiciojn | Neŭtraleco<br>Facila alproprigebleco<br>Demokrata karaktero (facile disvastigebla en ĉiuj popol-tavoloj)  |
| <b>malavantaĝoj</b> | Politika engaĝiteco<br>Malfacila alproprigebleco<br>Elita karaktero (neniam disvastigebla vastpopole)                     | Ne havas etnan medion<br>Science ne estas dokumentita kaj priskribita<br>Ne havas taŭgan organizaĵon<br>Ne estas apogata de iu socia, politika aŭ financa potenco<br>Ne havas socian, sciencan kaj kulturan prestiĝon |

**2.2. La internaci-lingva movado**

**2.2.1.** La unua funkcianta internacia lingvo estis *Volapük* (Volapuko, 1879) (30). Dum la funkciado de volapuka Akademio, laŭ la koncepto de ĝiaj prezidantoj disbranciĝas la evolutendencoj de la interlingvaj projektoj (vidu Bildon 1).






Bildo 1

Volapuko aperis dufoje antaŭ la forumo de sciencaj institucioj:

- a) unue: antaŭ la Amerika Filozofia Societo kaj
  - b) due: antaŭ la Internacia Asocio de Akademioj
- a) *La Amerika Filozofia Societo*, ne akceptinte volapukon, prikonsideris la antaŭnelonge aperintan novan projekton, Esperanton (31).
- b) La asocio „Weltsprachen-Zentralverein für Steiermark” petis (interalie) la Hungaran Sciencan Akademion proponi al la *2-a Asembleo de Asocio de Akademioj* (Londono, 30-31. de majo, 1904) la pridiskuton de la mondlingva problemo (letero registrita en la arkivo de la Hungara Sciencan Akademio sub n-ro 105/25-a de aprilo, 1904). Post la asembleo la reprezentanto de la Hungara Sciencan Akademio Ignác GOLDZIJER jene raportis al la Akademio:

„Ne eblis meti sur la tagordon de la Asocio la diversajn disdonitajn proponojn je la intereso de mondlingvo (Volapük k.s.), ĉar la temo ne estis scienca, sed pure praktika kaj, aliflanke, ne troviĝis Akademio, kiu entreprenis subteni ĝin...” (32)

### 2.2.2. El la volapuka movado disdividiĝis du branĉoj



### 2.2.3. *Kosmoglotiko* (laŭ tiutempa difino) estas la scienco de artefaritaj lingvoj.

La fondintoj de la asocio „Kosmoglott” (Petrogrado) estis J. Baudouin de Courtenay, V. Rosenberger, V. Ĉeŝiĥin, P. Stojan, V. Ŝmurlo kaj E. Drezen. La gvidantoj: unue V. Rosenberger (ĝis 1919), poste V. Ŝmurlo, fine E. von Wahl. (Simile al tio, kiel el la Delegitara iniciato naskiĝis Ido, el la Kosmoglotiko naskiĝis Occidental/Interlingue). La sciancan analizon kaj kritikon de Occidental ellaboris la konata rumana lingvisto A. GRAUR (36).

En 1887 aperis la Internacia Lingvo de D-ro Esperanto (L.L. ZAMENHOF). La komenca historio de Esperanto certgrade similas al tiu de Volapuko: rapida disvastiĝo, postaj kritikoj, reform-projektoj. Sed kontraŭe al Volapuko – Esperanto travivis ĉiujn provojn kaj malgraŭ la fortaj kaj oftaj kontraŭ-agadoj, daŭris disvastiĝi kaj evolui.

En la unua periodo de la lingvo-historio (samtempe kaj movada, kaj literatura) oni distingas du tendencojn: la idealisman slavan kaj la racian francan. En Francio la internacia lingvo disvastiĝis en sciencaj medioj – ne lingvistikaj, sed precipe natursciencaj, matematikaj kaj logikistaj. Se en oriento la „interna ideo” signifis fortan motivigon, en okcidento ĝi influis tute kontraŭe. (37)

Tiu ĉi koncepta konfrontado kondukis poste al la *ldo-movado*, al la kreado de diversaj esperantidaj kaj ididaj projektoj (38), fine al la projekto *Novial* de C. JESPERSEN. (39) Ĉar L. COUTURAT mem devis konvinkiĝi, ke dum 5-jara funkciado (17.1.1901–1906) la Delegitaro ne sukcesis plenumi siajn taskojn, kaj evidentiĝis, ke estas nenia espero por estonte ĝin plenumi, li turnis sin al la opaj akademioj petante ilin subteni en la sekva sesio de la Asocio de Akademioj la oficialan rekonon de la kompetenteco de la Delegitaro kaj subskribi la aldonitan deklaron.

En la Hungara Akademio de Sciencoj la referento estis denove I. GOLDZIHHER. Dum la sesio de la 1-a de februaro, 1907 li proponis al la Akademio ne akcepti la petleteron de COUTURAT (alveninta en dec. 1906), sed pri la subskribo de deklaro GOLDZIHHER proponis doni liberan eblecon al membroj por mem decidi: ĉu ili subskribas ĝin aŭ ne. La deklaro estis subskribita far 8 universitataj profesoroj kaj 1 membro de akademio (40: „La Protokoloj de Hungara Scienca Akademio”, 1907, Decido n-ro 73, Protokolaj aldonajoj. GOLDZIHHER Ignác, “La demando pri la internacia helplingvo”, la 1-an de febr., 1907, *Akademia Informilo*, p. 334-335.)

2.2.4. Malgraŭ la perdoj, kaŭzitaj de la unua mondmilito (kaj kvantaj, kaj kvalitaj), en la oficiala-politika kaj scienca vivo la internacilingva ideo revivas (dank’ankaŭ al la forta aspiro de popoloj al la paco kaj interkomprenemo). En Hungario la Komisariato pri Publika Instruado la 4an de julio 1919 fondas lektoratojn en la Filologia Fakultato de la Budapeŝta Universitato, nome por Esperanto (D-ro Leo LORÁND) kaj por Ido (BAKONYI István) ambaŭ lektoroj ŝtate nomumitaj kaj bone salajritaj. Per la sama decido la Komisariato fondis en la kadroj de la Fakultato la „Internacian Sciancan Lingvoinstituton” sub la gvidado de Prof. D-ro SCHMIDT József. (Tiuj ĉi

fruaj iniciatoj estas konsidereblaj kiel la antaŭuloj de la nuna Esperanto-fako en la sama Fakultato.) (41)

En Svislando dank' al la kompetenta aktiveco de Edmond PRI VAT la afero de internacia lingvo rolas en la konferencoj de la Ligo de Nacioj (42).

Alice V. MORRIS faris grandajn fortostreĉojn por interpacigi la du kontraŭajn tendencojn inter 1924-1930. Sed ĉar nek la esperantistoj, nek la idistoj volis cedi, ekde tiu tempo IALA entreprenis la konstruadon de nova lingva projekto, kies unua vortaro aperis en 1951: sub la nomo *Interlingua*. (43)

Nur tiuj ĉi tri kontraŭ-projektoj (Ido, Occidental kaj Interlingua) sukcesis en ege limigita rondo kolekti kelkajn adeptojn. Sed en neniu medio: nek scienca-lingvistika, nek socia-politika, nek kultura, estas konsiderataj kiel rivaloj de la vaste funkcia kaj amase uzata Esperanto.

### 2.3. Lingvomodeligo

2.3.1. La lingvomodeligo en ĝenerala lingvistiko eksponas du, jam delonge diskutatajn problemojn:

- (a) ĉu spontana aŭ direktita lingvoevoluo? (44)
- (b) „natureco” aŭ „artefariteco” de la lingvo? (45)

Laŭ la prijuĝo de tiuj ĉi du demandoj dividiĝas la lingvistoj je du kontraŭaj tendencoj: je tiuj, kiuj malpermesas ĉiun eksteran enmiksiĝon en la vivon de la lingvoj kaj je tiuj, laŭ kiuj ne nur rajto, sed eĉ devo estas la celkonscia partopreno de lingvisto en la evoluigo de la lingvo.

Kiel ni vidis, la determinisma koncepto de jungramatikistoj kategorie neis ĉiun konscian elementon en la lingvo. La disvastiĝo de ilia koncepto disvastigis ne nur la kompletan neadon de la ebleco de planita lingvo, sed bremsis ankaŭ la lingvo-kulturajn movadojn en diversaj lingvaj medioj. Prave konstatis unu el la plej elstaraj sovetaj lingvistoj L.V. ŜĈERBA jam en 1929, ke en la polemiko pri la internacia arta lingvo inter BAUDOIN DE COURTENAY kaj BRUGMANN-LESKIEN „lastfoje akre kaj klare konfrontis du lingvistikaj mondkonceptoj: la retrograda jungramatika kaj la opozicia boduena”.

2.3.2. ŜĈERBA eraris nur en la konstato, ke ĝi estis la *lasta* tia diskuto (kiel prave konstatas V.P. GRIGORJEV) (46). Estas granda malbonŝanco por la posta evoluado de la interlingvistiko, ke en sciencaj lingvistikaj medioj disvastiĝis ne la pozitivaj teorioj de BREAL, MEILLET, BAUDOIN DE COURTENAY kaj TRUBETZKOY, sed la retrogradaj poste iom post iom ĉesintaj kaj transpasitaj teorioj de jungramatikistoj. Al tiu fenomeno kontribuis du motivoj:

*Unue:* la moderna lingvistiko, kiu apenaŭ komencis disvolviĝi en la verkoj de BAUDOIN DE COURTENAY unuflanke kaj de F. DE SAUSSURE – aliflanke,

kaj kiuj poste fondis la du branĉojn de la moderna strukturismo – ankoraŭ ne estis sufiĉe formulitaj, sekve ne estis ankoraŭ sufiĉe konataj. Dume, la historia kaj lingvokompara tendencoj kune kun multaj, de tiam jam delonge nuligitaj negativaj ideoj de jungramatikistoj ankoraŭ vigle vivis kaj funkciis.

*Due:* la kritikoj de BRUGMANN-LESKIEN (verkitaj en impertinenta, tute ne kutima tono en la scienca literaturo) aperis paralele kun la similtaj kritikoj de idistoj – kies atakoj direktiĝis nur kontraŭ Esperanto – tamen, la kontraŭuloj de la internacilingva ideo eluzis ilin kontraŭ la ĝenerala ideo mem. Tiel okazis, ke en la lingvistika literaturo ekregis tia atmosfero, en kiu estis kvazaŭ honte okupiĝi pri la problemoj de lingvokulturo, lingvonormigo, lingvonovigo kaj kvazaŭ krimo paroli pri la internaciaj helplingvoj. Kaj se la ĝenerala koncepto de la jungramatika skolo estas jam nur scienchistoria kategorio, ĝia koncepto (same erara kaj retrograda kiel multaj aliaj) pri la interlingvoj postrestis, kaj ĝis hodiaŭ ni renkontas ĝin ĉe tiaj lingvistoj, kiuj ĝenerale neas la tutan konceptaron de la jungramatika skolo, kaj akceptas tiun unusolan koncepton (ekz. ĉe multaj strukturistoj kiuj, se ideoj estus konsekvencaj, devus ĝoji pri la ekzisto kaj funkciado de interlingvo, kiel unu el la plej fortaj argumentoj de ilia koncepto!) (47).

„Kio estas efektive *la lingvokulturo*? – demandas la plej elstara hungarologo kaj eminenta interlingvisto Géza BÁRCZI – kaj respondas jene (48): „La konscia, difinite direktita enmiksiĝo en la vivon de la lingvo, la limigo de la lingvoevoluo inter certajn kadrojn, eĉ la direktado de tiu evoluo.” La lingvokulturo estas la plej simpla lingvomodeliga operacio. Post la lingvokulturo, en tiu hierarkio sekvas la *lingvonormigo* kaj *lingvoreguligo*, la tria – *la lingvonovigo* (kp. la estonan kaj hungaran). Sekvas sur tiu skalo la konstruado de *regionaj* aŭ *naciaj lingvoj* (kp. la agadon de I. AASEN kaj E. BEN YEHUDA) (49).

**2.3.3.** Simila al la kreado de naciaj (regionaj) lingvoj estas la kreado de *minimum-lingvoj* (ekz. Latino sine Flexione de PEANO) kaj *bezik-lingvoj* (ekz. Basic English de OGDEN). La diferenco estas en ilia funkcio: la unuaj celas kontentigi la bezonojn de iu etna komunumo (ŝtato) dume la duaj celas plenumi internacilingvajn funkciojn (50).

lom pli forta modeligo manifestiĝas ĉe la planado de *simpligitaj naciaj lingvoj* (ekz. simpligitaj latina, greka, franca, angla, germana k.s. projektoj). Restas ankoraŭ lingve homogenaj la t.n. *zonaj lingvoj* (sintezoj de pluraj lingvoj, apartenantaj al la sama lingvo-grupo, ekz. interlatinidaj: Interlingua, Interlingue, Romanid k.s.; interslavaj, inter-germanaj ktp.) (51).

Apartan model-tipon reprezentas la t.n. *mezzofanti-projektoj*, kies esenco estas: lasi la originalan aŭtonoman leksikon netuŝita kaj konstrui por ĉiuj lingvoj gramatikan skeleton (ekz. Anti-volapük de F. MILL) (52).

Kiel lasta tipo de homogenaj projektoj aperas lastatempe la *intersistemaj projektoj* (MITROVIĆ, WEFERLING, VISSER k.a.), kiuj klopodas sintezigi plurajn homogenajn projektojn (53)..

La heterogenaj projektoj kombinas la elementojn de du aŭ pluraj lingvoj, apartenantaj al diversaj lingvo-grupoj, eĉ diversaj lingvofamilioj. Tiaj estas la *kompromisaj projektoj* (angla-franca, angla-latina, k.s.) kaj *la eklektikaj* (Novial, Ido, Esperanto, Volapük, k.a.) (54).

La komuna trajto de ĉiuj tiuj projektoj estas, ke ilia aŭtoro ne entreprenis konstrui novan modelon de la realaĵo, sed akceptis la jam modeligitan en unu, du aŭ pluraj lingvoj, elektis el inter ties elementoj kaj konstruis al ĝi pli-malpli aŭtonoman aŭtomaton por funkciigi ĝin. Tiujn projektojn oni nomas en la interlingvistika literaturo *aposterioraj*.

**2.3.4.** Ekzistas projektoj, kiuj klopodis preteratenti la jam ekzistantajn kaj funkciantajn lingvojn kaj konstrui novan modelon, remodeligi lingve la eksterlingvan realaĵon laŭ la ĝeneralaj, universale-homaj leĝoj de la pensado. Ili nomiĝas ĝenerale *aprioraj*, ĉar ili supozas la antaŭlingvan logikon kaj eksterlingvan realaĵon, percepteblan senlingve. Inter tiuj projektoj troviĝas tre diversaj, komplete nesistemigeblaj lingvoplanoj (ekz. logikismaj sistemoj, kabalistikaj, liter-simbolaj, ideoklasifikaj, k.a.) (55).


**2.3.5.** Kaj la aposterioraj, kaj la aprioraj sistemoj similas al la etnaj lingvoj per la du-dimensieco de sia signo (optika-akustika) kaj per la rilato inter la signo kaj signifo. En ĉi lasta rilato la aprioraj sistemoj diferencas de la etnaj lingvoj kaj aposterioraj sistemoj, ĉar en tiuj ĉi lastaj la lingva signo estas arbitra, dume en la aprioraj inter la lingva signo kaj ĝia signifo estas difinita rilato (ĉe la ideoklasifikaj sistemoj: la signo estas la semantika formulo de la signifo).

Krom la du-dimensiaj signalaroj, estas konataj ankaŭ unu-dimensiaj (nur optikaj) sistemoj: grafikaj (*pazigrafio*) kaj la gestoj kaj mimiko. La grafikaj signoj (estu ili simboloj literaj, ciferaĵoj, geometriaj aŭ muzik-notaj aŭ piktografiaj resp. ideografiaj aŭ hieroglifaj k.s.) ne havas sonvaloron: la informato perceptas ĝin en sia propra lingvo (aŭ en alia, laŭ. sia elekto (56). *La gesto kaj la mimiko* ĉeestas dum la komunikado kiel subteksto. Sed ili povas memstariĝi kaj funkcii kiel memstara „gest-lingvo”. Estas konataj la gest-lingvoj de certaj monaĥaj ordenoj, la gestlingvo de indianoj kaj tiu de surd-mutuloj, k.a.. Estas konataj ankaŭ provoj konstrui internacian gestlingvon. (57)

Deirinte de la etna lingvo, sekvante la hierarkion de modeligo ni alvenis al gestoj kaj mimiko. Tiu vicordo estas ne kronologia, sed modeliga. La kronologia vicordo (grandtrajto) konstruiĝus preskaŭ inverse. Skeme ĝi povus aspekti kiel en *Bildo 2*.

## 2.4. La tipologio

**2.4.1.** La tipologio de interhomaj lingvomodeloj ĝis nun ne estas kontentige ellaborita. Ekzistas provoj trovi ilian lokon en la semiotika sistemo de informenhavaj signoj kaj signaloj (VOLKOV) (58), interne de la lingvaj sistemoj (SVADOST kaj H. SPITZBART) (59), en la sistemo de arte konstruitaj signalaroj (BAUSANI) (60). Fine: estas provoj konstrui aŭtonoman tipologion de internaciaj lingvoj (el



Bildo 2

inter ili nun ni citas tri: tiun de MONNEROT-DUMAINE, KUZN'ECOV (61), kaj de MÜNNICH).

VOLKOV konstruis jene la tabelon de semiotikaj signalaroj:

| Karaktero de komunikado                         | Strukturo                            |  | Rilato inter la elementoj interne de la strukturo   |
|---|--------------------------------------|--|---|
|   | simpla                               | kompleksa                                |   |
| motivita (determinita)<br>probabla,<br>dinamika | jes – ne simboloj<br><br>la skribo   | la lingvo de bestoj<br><br>la lingvo     | 1. opozicioj<br>2. fermiteco<br><br>1. opozicioj<br>2. nominantoj,<br>operatoroj<br>3. malfermiteco |
| konvencia statika                               | la signalaro de la surstrata trafiko | la signalaro de matematiko,<br>Esperanto | 1. opozicioj<br>2. nominantoj,<br>operatoroj<br>3. fermiteco  |

**2.4.2.** Laŭ SVADOST – ĉiuj lingvoj estas artefaritaj, ili nur diferencas inter si per la grado de artefariteco (LA el Lingvo + Artefariteco). Laŭ la grado de artefariteco oni distingas 5 gradojn:

*LA-1:* lingvoj, kiuj ne havas skribsistemon; parolkomunuma lingvaĵo de antaŭskribaj naciaj lingvoj, historiaj lingvoj kaj iliaj dialektoj antaŭ la normigo.

*LA-2:* normigitaj lingvoj: la naciaj, literaturaj lingvoj.


*LA-3:* projektoj de praktike ankoraŭ ne uzataj (nur eksperimente) internaciaj lingvoj, konstruitaj surbaze de lingvaj spertoj de la homaro, el la materialo de historiaj lingvoj (aposterioraj lingvoj).

*LA-4:* internacilingvaj projektoj, konstruitaj sen konsidero de la lingvaj spertoj de la homaro, surbaze de filozofia ideoklasifiko kaj litera simbolaro (aprioraj lingvoj).


*LA-5:* sistemoj, kiuj eĉ ne eksperimente povas funkcii kiel parolaj: maŝin-interlingvoj, kibernetikaj, matematikaj kodoj, ĝenerale: ĉiuj kodoj.

**2.4.3.** H. SPITZBART („Weltsprachen und Welthilfssprachen”, en: *Zeitschrift für Phonetik und Sprachwissenschaft*, 1973: 26/6, 630-651) jene dividas la lingvo-tipojn:






2.4.4. BAUSANI ((60) 1970, p. 13, 1974, p. 15, vd ankoraŭ: “Lingvistiko, interlingvistiko, esperantologio”, prelego, resumo en: *Programo de Esperantotagoj*, Universitato ELTE, red. de HUKAJA Ŝitoŝi kaj Berta LIPOCZY, Budapest, 1976, p. 14):




2.4.5. La sistemo de MONNEROT-DUMAINE:



(Mallongigoj: *r* = radikoj; *d* = derivadoj; *v* = vortkategorioj)

- (1) r = arta; d = arta-skema; v = fiksa  
 (A) – ideoklasifikaj-filozofiaj  
 (B) – nefilozofiaj  
 (a) ciferaj  
 (b) muzikaj  
 (c) fonemo-simbola  
 (d) liter-klasifikaj  
 (2) r = duon-arta; d = arta-skema; v = fiksa  
 (3) r = natura-deformita; d = arta-skema; v = (generale) fiksa  
 (4) (A) – r = natura, nedeformita, monomorfa; d = duon-natura, skema; v = fiksa  
 (B) – r = natura-romanida, ofte dumorfa; d = neregula; v = nefiksa (naturalismaj principoj).

**2.4.6. KUZN’ECOV** unue distingas tri bazajn grupojn: *apriorajn*, *aposteriorajn* kaj *miksajn*. Laŭ li la miksaj estas tiuj sistemoj, kiuj el la vidpunkto de la lingvoaŭtoro estas aposterioraj kaj el la vidpunkto de potenciaj lingvouzantoj estas ne-aposterioraj. (61, p. 78) La apriorajn kaj aposteriorajn sistemojn poste KUZN’ECOV dividas jene:



### Aprioraj sistemoj

#### I. = *Semiotike nemotivataj*

I/A = matematik-simbola

I/A/1 = numeraj, ekz. Becher, 1662.

I/A/2 = ciferaj, ekz. Gordin /AO/, 1920.

B = pazigrafiaj, ekz. Berger, 1779.

C = gestaj, ekz. Rambosson, 1853.

D = pazilaliaj

#### II. *Semiotike motivataj*

II/A = ikonaj

II/A/1 = desegnaj, ekz. Näther, 1805, Effel.

II/A/2 = interlingva simbolaro

II/B = semantikaj


II/B/1 = filozofiaj (logikaj), ekz. Dalgarno, 1661, Foster, /RO/, 1908.

II/B/2 = psiko-asociaj, ekz. Kukul-Krajevskij, 1921.

II/B/3 = miksaj

II/B/3/a = cifer-logika, ekz. Digbeus, 1653

II/B/3/b = cifer-ĥiĝroglifa, ekz. Renzi, 1840.



### Aposterioraj sistemoj

**I. LEKSIKO** (A) origino: 1. homogena- (a) unu-lingva, ekz. Latino sine Flexione (Peano)

(b) intergenetika

(c) interkultura

2. heterogena, ekz. Anglo-franca, 1889, Anti-babilona, 1950.

(B) grado de deformiteco: 1. malgranda, ekz. Esperanto

2. meza, ekz. Konkorde

3. granda, ekz. Volapük

### II. GRAFIKO-FONETIKO

(A) la fonetiko kongruas kun la internacie uzata grafiko, ekz. Latino sine Flexione;

(B) la grafiko kongruas kun la internacia prononco, ekz. Idiom-neutral

(C) la konkretaj variantoj sonvaloraj de diversaj literoj konserviĝas, sed estas markitaj per specialaj diakritaj signoj, ekz. Esperanto

(D) la konkurantaj variantoj de prononco ne estas normigitaj, ekz. Interlingua (IALA).

### III. MORFOLOGIO

**IV. STRUKTURO** (A) skema: 1. hiperskema, ekz. Esperanto, Ido

2. hiposkema, ekz. Novial

(B) naturalisma: 1. hipernaturalisma, ekz. Latino sine Flexione, Interlingua (IALA)

2. hiponaturalisma, ekz. Occidental (Interlingue).

### 2.4.7. La kod-sistemo de A. MÜNNICH:

1. *La celo* de la modeligo povas esti piĝina, naturisma aŭ racia.

Ĉe *piĝina* celo la aŭtoro, celante facilecon, planas malpli da elementoj ol en etnaj lingvoj. Ekz. Wede, Latina sine Flexione, Basic English k.s. *Kod-signo*: <

La *naturalisto* planas egalan esprim-eblecon al la etnaj lingvoj. Li pensas, ke la planita lingvo estas des pli bona, ju pli ĝi similas al la lingvoj, konsiderataj de li „naturaj”. Ekz. Interlingue, Interlingua. *Kod-signo*: =

La *raciisto* planas pli grandan esprimpovon ol la etnaj lingvoj. Tiucele enkondukas li ankaŭ tiajn rimedojn, kiuj mankas en etnaj lingvoj. Ekz. Solresol, Volapük, Esperanto, Ido, Loglan ktp. *Kod-signo*: >

Ekzistas ankaŭ mikسaj, kompromis-tendencaj projektoj. ekz. Novial.  
*Kod-signo*: >= Per la unua kod-signo ni signas nur la celon de la modelo kaj oni ne aprecas kiomgrade oni sukcesis atingi tiun celon.

2. *La leksiko* de la lingvo entenas la sekvajn elementojn:

- arbitre elpensita, kod-signo O
- klasika latina L
- novlatina (romana) R
- germana G
- angla A
- slava S

En kazo de necesbezono estas enkondukeblaj novaj mallongigoj.

La fortan deformiĝon de la vorto oni signas per *demandosigno*, ekz. volapuko: A?

La diferencigo de la latino de romanaj lingvoj, tiu de la angla de la germanaj ne estas strikte logika, tamen el empiria vidpunkto ili ŝajnas esti utilaj. Ekz. ne estus celkonvene klasigi inter la germanajn-leksikajn la angla-leksikan volapukon; same la Interlinguan de PEANO kun la Interlingua de GODE.

Ĉe la lingvoj, elektantaj el pluraj fontoj, la simbolojn de la fontlingvoj oni vicigas laŭ *ilia graveco*. Se iu el la fontlingvoj pruntis pli ol 50%-jn, oni substrekas ĝin. Ekz. Esperanto: > RGSø, Ido: > RGS, Volapük: >A?ø

3. El *fonetika* vidpunkto oni distingas du intencojn: aŭ oni strebas al la kongruenco inter la grafemo kaj fonemo kaj en tiu kazo la *kod-signo estas F*, aŭ ne (pro la pli facila rekoneblo de la grafika vort-korpo): *kod-signo*: –.

4. *Gramatikaj esceptoj*: se laŭ la intencoj de la aŭtoro ne estas en la sistemo, la *kod-signo estas*: !, en kontraŭa kazo: ?

5. *Konjugacio* – laŭ la modela de la latina oni distingas per finaĵoj la nombron kaj personon; la *kod-signo estas*: K.

Se oni distingas nur modon kaj tempon per finaĵoj – la *kod-signo estas: F* . Se la konjugacio okazas perhelpe de helpverbo – la *kod-signo estas H* .

Se ŝanĝiĝas ankaŭ la radik-morfemo dum la konjugacio, la *kod-signo estas X* .

## 6. Kunmetado kaj derivado

La signo de aŭtonoma kunmetado estas +, tiu de aŭtonoma derivado estas \* , se ambaŭ mankas: –.

Ekz. Esperanto, Ido: + \* Interlingue: + Interlingua: –

## 7. La kompleta kodo konsistas el la sekvaj elementoj:

1. la nomo de la lingvo resp. lingvo-projekto;
2. interkrampe: la jaro de la apero de la unua lernolibro aŭ gramatiko; se aperis nur propaganda broŝuro aŭ nesignifa sciigo post la jaro estas demandosigno;
3. dupunkto;
4. la kod-signo de celo;
5. la kod-signo de leksiko;
6. oblikva divido-streko, poste la kod-signo de fonetiko;
7. la kod-signo de gramatikaj esceptoj;
8. la kod-signo de konjugacio;
9. la kod-signo de kunmetado kaj derivado.

Se ekzistas pluraj lingvoj (projektoj) kiuj havas la saman nomon, post la nomo kaj jaro interkrampe estas skribenda ankaŭ la nomo de la aŭtoro. Se la lingvo(projekto) havas plurajn nomojn, tiujn oni skribas ĉe 1. kunligitaj per streketo. Ekz-oj:

Esperanto (1887): >RGSoS /F!F+\*

Occidental-Interlingue (921): =B.G/-? H+

Interlingua (Gode 1951): =R/-? HFX–

## 3. La nuna stato kaj perspektivoj

### 3.1. Interlingvistiko kiel scienco

**3.1.1.** Ĉiu disciplino, antaŭ ol kreski ĝis la scienca nivelo, devis trairi certan evoluojn: unue ĝi aperis kiel *praktiko*, la praktiko kreis sian *studon* kaj el la studoj ekevoluis la *scienco*.

El inter ĉiuj interlingvoj, socian praktikon en la plena senco de la vorto havis nur *Esperanto*. Nur dank' al Esperanto, al ĝia funkciado kaj evoluado, la interlingvistiko povis mem trapasi tiujn ĉi etapojn. La ĉefa karaktertrajto de la moderna interlingvistiko estas ĝia kunfandiĝo kun la *esperantologio* kaj kune kun ĝi, kaj pere de ĝi – ĝia integriĝo en la lingvosciencan, en la aplikitan branĉon. Tiu ĉi rilato estas ankaŭ inversa: la esperantologio povas integriĝi en lingvosciencan nur kiel organika parto de interlingvistiko, kiel ĝia aplikita branĉo. Kaj la interlingvistikaj esploroj, kaj la esperantologiaj, estas

dudirektaj – la unua direkto estas ilia interefiko kaj reciprokeco, la alia – ilia rilato al la ĝenerala lingvistiko unuflanke kaj al la aplikita lingvistiko – aliflanke.

**3.1.2.** En la historio de Esperanto oni povas rimarki la **tri evoluetapojn**: pura praktiko en la unua periodo (antaŭ la unua mondmilito), studo – en la inter-du mondmilita-periodo – kaj fine, elformiĝanta scienco en la periodo de post la dua mondmilito, pli ĝuste, ekde la 60-aj jaraĵoj.

La diferenco inter la dua kaj tria evoluperiodo de Esperanto esence estas la sekva:

(a) la studo adresiĝas nur al esperantistoj, kultiviĝas nur interne de Esperantujo, tute izolita de la „establita” mondo.

La scienco adresiĝas al fakuloj, senkonsidere, ĉu ili estas en Esperantujo aŭ en la „establita” mondo; eĉ: pere de sciencaj metodoj la celo estas kaj science, kaj socie emancipi la internacilingvan ideon.

(b) la devizo de la tradicia kurento estas: „Ni bezonas nek sciencistojn, nepre ne lingvistojn, ni bezonas „bonajn esperantistojn”. Tiu devizo celas firmigi la amatorecon kaj diletantismon.

La serioza scienca esplorado postulas fakulojn, konatajn kaj rekonatajn en la ne-esperantistaj fakaj medioj.

Tiamaniere ekestas du **konfliktoj**: la unua – inter la tradiciaj esperantistoj kaj inter la interlingvistoj-esperantologoj, la dua – inter la interlingvistoj kaj la „akademiaj” profesiaj lingvistoj, neantaj la internaci-lingvan ideon. Ambaŭ konfliktoj estas produktaĵoj de la historia evoluo, ambaŭ estas perfekte motivitaj kaj – iasence – ankaŭ necesaj.

El la konfrontado de la unua opozicio devos estonte evidentiĝi: ĉu *Esperanto taŭgas nur por roli ian internan rolon de izolita, ekstersocia komunumo aŭ ĝi taŭgas solvi tiujn taskojn, por kies solvado ĝi estis kreita.*

El la konfrontado de la dua opozicio devos evidentiĝi: ĉu la internacia lingvo, kiel *nova lingva fenomeno, meritas esti science esplorata cele de ĝia realigo, aŭ ne..*

Nuntempe ĝuste la juna apenaŭ elformiĝanta interlingvistika-esperantologia tendenco troviĝas en la krucfajro de la du kontraŭ-direktaj atakoj. Se ĝi sukcesos venki en ambaŭ direktoj – tiam venkos la internacilingva ideo. Se ĝi fiaskos en unu el la du direktoj (des pli en ambaŭ) – tio signifus definitivan kaj kompletan fiaskon de la internacilingva ideo.

**3.1.3.** Analizante la nunan situacion, evidentiĝas, ke plioftas tiuj fenomenoj, kiuj pruvas la pozitivan perspektivon de la evoluebleco de interlingvistiko kaj esperantologio – kaj kiel teorio (scienca), kaj kiel praktiko (aplikado).

Ni vidu kelkajn aperaĵojn, kiuj pruvas tiun ĉi supozon:

(a) *La moderna lingvoscienco ne plu povas preteriri la problemon de la internacia lingvo. Apenaŭ aperas en niaj tagoj ĝeneral-lingvistika aŭ aplikita-lingvistika*

verko, kiu ne dediĉus almenaŭ ĉapitron al tiu problemo. Inter la opinioj de diversaj lingvistoj estas ankoraŭ granda diferenco. Tamen, el la vidpunkto de la evoluado, estas pli valora eĉ la negativa opinio aŭ skeptika demando ol la perfekta neglektado kaj preteratento de la problemaro.

- (b) *Ĉiam pli kaj pli ofte aperas monografioj de elstaraj lingvistoj, kiuj proksimiĝas al la problemo ne el afekcia, sed el serioza, objektiva starpunkto.* Aperas seriozaj sciencaj monografioj, pritraktantaj iun el la aspektoj de la problemaro. La moderna lingvistiko „malkovris” ankaŭ la valoran kontribuon de la interlingvistikaj verkoj al la evoluigo de la moderna lingvoscienco.
- (c) *Plioftas la iniciatoj kiuj venas ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de ne-esperantistoj, oficialaj, aŭtoritataj personoj aŭ instancoj por apliki la internacian lingvon en certaj medioj de la interlingva trafiko.*
- (ĉ) *Ĉiam pli kaj pli izoliĝas la kontraŭstaro de retrogradaj esperantistoj.* Nur kelkaj nesignifaj lokaj organizaĵoj kaj eble jam nur unusola periodaĵo entreprenas la atakojn de ĉiuj progresivaj iniciatoj (sekteca primokado pri „sciencumado”, primitiva kalumniado, ĉiu-rimeda diskriminado, subtakso de atingitaj rezultoj ktp.).
- (d) *Fine – sed ne laste – fondiĝas fakaj oficialaj centroj, aŭ certaj esperantistaj organizaĵoj aŭ periodaĵoj ŝanĝas sian profilon je pozitiva direkto.*

### 3.2. La lingvoscienco kaj la lingvistoj

Sufiĉe signifa parto de lingvistoj ĝis hodiaŭ neas la plenan lingvan statuson de interlingvoj. M. WANDRUSZKA uzas la terminon „interlingvistiko” kiel la nomon de nova lingvistika disciplino, kiu studas la konflikton inter la unulingva individuo kaj plurlingva homara, kaj kiu ĝis nun havis diversajn nefiksitajn nomojn, ekz. „kompara” „konfronta”, “kontrasta” ktp. lingvistiko, „lingvaj konfliktoj”, „lingvomiksigo” kaj „miksitaj lingvoj”, la tradukado kaj la multlingveco, ktp. Ankaŭ laŭ tiu koncepto la interlingvistiko devus solvi tiujn barojn, sed el inter la solveblecoj WANDRUSZKA ekskludas la internaciajn lingvojn (62). Neas la eblecon krei lingvon ankaŭ WHORF (63). Laŭ TOLNAI la internaciaj lingvoj estas „makaroniaĵoj”; laŭ SEREBRENNIKOV – similaj al piĝinoj kaj kreolaj lingvoj (64); laŭ STEBLIN-KAMENSKIJ ili ne havas fonetikan-fonemikan sistemon kaj tial ili similas al tiaj sistemoj kiaj ekz. *landsmal*; laŭ REFORMATSKIJ la internaciaj lingvoj estas eksterstilaj (65), laŭ SPANG HANNSEN ne-vivkapablaj, ĉar ili ne havas etnan medion (66).

La cititaj lingvistoj, kiel estas konstateble el iliaj verkoj, ne konas sufiĉe la problemaron kaj ripetas la eraron de la jungramatikistoj. Estas rimarkinda fenomeno, ke en lingvistikaj verkoj aperas apartaj ĉapitroj pri interlingvoj, i.a. en universitataj lernolibroj, ekz. kiel parto (eĉ se ne ampleksa) de la studmaterialo (67).

En aŭtoritataj fakaj revuoj aŭ kiel apartaj monografioj ĉiam pli ofte aperas artikoloj el la plumo de konataj lingvistoj (68) kaj recenzoj de interlingvistikaj verkoj.

| Periodaĵo                                       |                           | Recenzita verko  | Recenzinto                           |
|---|---------------------------|--|--------------------------------------|
| LINGUA  | 1967–68/19<br>p. 445–447  | <i>Brown, J.C.</i> , Loglan,<br>Gainesville, 1966  | Freudenthal, H.                      |
| LANGUAGE  | 1950/XXVI.<br>p. 175–185  | <i>Jacob, H.</i> , A Planned Auxiliary Language, London,<br>1947   | McQuown, N.A.                        |
| LANGUAGE  | 1969/42,2<br>p. 444–457   | <i>Brown, J.C.</i> , Loglan,<br>Gainesville, 1966  | Zwicky, A.M.                         |
| LINGUISTICS                                     | 1967/31<br>p. 44–49       | <i>Nabokov's</i> Zemblan: A constructed language of fiction  | Krueger, J.R.                        |
| WORD  | 1952/8<br>p. 163–167      | <i>Gode, A., Blair, E.</i> , Interlingva, New York, 1952<br>Interlingua-English ( <i>A.Gode</i> ), New York, 1951  | Martinet, A.<br>Martinet, A.         |
| PAIDEIA   | 1968/23<br>p. 129         | <i>Mitrovich, P.</i> , Essay de interlinguistique, III Sarajevo, 1967  | Pisani, V.                           |
| BULLETIN DE LA SOCIÉTÉ DE LINGUISTIQUE DE PARIS | 1947–48/<br>XLIV<br>p. 18 | <i>Heimer, H.</i> , Mondial, an International Language, Lund, 1947<br>IALA-General Report 1947 New York, 1946<br><i>Jacob, H.</i> , A Planned Auxiliary Language, London, 1947 | Cohen, M.<br>Cohen, M.<br>Benveniste |
|   | 1953/139<br>p. 15         | <i>Heimer, H.</i> , Mondial, langue internationale, Lund, 1953   | Cohen, M.                            |
|   | 1954/27                   | <i>Mitrovich, P.</i> , An Essay on Interlinguistics, Sarajevo, 1954  |                                      |
|   | 1956/2<br>p. 267          | <i>Heimer, H.</i> , Mondial, lingua internacional, Lund, 1955  | Martinet, A.                         |
|   | 1962/LVII,2<br>p. 30-34   | <i>Monnerot-Dumaine, M.</i> , Précis d'interlinguistique générale et spéciale, Paris, 1960   | Martinet, A.                         |



| Periodaĵo  | Recenzita verko  | Recenzinto     |
|--|--|----------------|
| BULLETIN DE LA SOCIÉTÉ DE LINGUISTIQUE DE PARIS 1963/LVIII, 2 p. 22–25                                   | <i>Burney, P.</i> , Les langues internationales, Paris, 1960                               | Gougenheim, G. |
| THE MODERN LANGUAGE JOURNAL (Ann Arbor) 1952/XXXVI p. 104–105  | Interlingua-English, A dictionary... ( <i>A. Gode</i> ) New York, 1951                     | Pei, M.A.      |
| CLASSICAL PHILOLOGY (Chicago) 1951/XLIX p. 63  | Interlingua-English, A Dictionary... ( <i>A. Gode</i> ) New York, 1951                     | Whatmough, J.  |
| REVUE DES LANGUES ROMANES (Montpellier) 1948/1 p. 75   | <i>Heimer, H.</i> , Mondial, an International Language, Lund, 1947                         | Red.           |
| 1954/LXXI p. 343–344   | <i>Heimer, H.</i> , Mondial, langue internationale, Lund, 1953                             | Roussel, P.    |
| NORSK TIDS-SKRIFT FOR SPROGVIDENSKAP (Oslo) 1952/XVI p. 471–472  | <i>Jacob, H.</i> , A Planned Auxiliary Language, London,                                   | Sommerfelt, A. |
| WIRKENDES WORT 1956–57/VII p. 52–53  | <i>Mitrovich, P.</i> , An Essay on Interlinguistics, Sarajevo, 1954                        | Jahn, R.       |
| ARCHIV FÜR DAS STUDIUM DER NEUEREN SPRACHEN (Braunschweig) 1956–57/CXCIII p. 301                         | Die Weltsprache Mondial, Örebro, 1956  | Lausberg, H.   |
| 1957–58/CXCIV  | <i>Heimer, H.</i> , Mondial, an International Language, Lund, 1957                         | Lausberg, H.   |
| SLOVO A SLOVESTNOST 1962/XXIII   | <i>Monnerot-Dumaine, M.</i> , Précis d'interlinguistique générale et spéciale, Paris, 1960 | Stuchlik, J.   |
| RUSKIJ JAZYK V ŠKOLE 1965/V p. 63–99   | <i>Freudenthal, L.</i> , Lincos, Amsterdam, 1961   | Suhot'in, B.V. |
| TRUDY PO JAZYKOVYM SISTEMAM 1965/2 p. 339–344  | <i>Lincbah, Ja.</i> , Principy filozofskovo jazyka, Petrograd, 1916                        | Rezvin, I. I.  |
| ZEITSCHRIFT FÜR PHONETIK, SPRACHWISSENSCHAFT UND KOMMUNIKATIONSWISSENSCHAFT (Berlin) 1973/1–2 p. 144–150 | Plena Ilustrita Vortaro  | Blanke, D.     |

### 3.3. La modern-lingvistikaj esploroj

**3.3.1.** Ili ekinteresisgis la lingvistojn pri la interlingvistikaj problemoj. „Por la lingvo-semiotiko – skribas VOLKOV – la teorio de Leibniz, la antaŭulo de Zamenhof (Esperanto) kaj De Beaufront (Ido) estas interesa ne kiel triviala eksperimento konstrui lingvon, kiel tion asertas multaj lingvistoj, sed kiel la scienca fundamentigo de semiotika modeligo, baziĝanta sur naturaj lingvoj... La realiĝo de ĉi pensoj de Locke kaj Leibniz estas ne nur la simbola logiko, sed ankaŭ la kreo de la unua universala lingvo Algol”.

La du deiraj pensoj de la XVII-jc-a lingvofilozofio (Lancelot, Descartes, Locke) nome: la koncepto pri la pensado sendependa de la lingvo kaj la supozo de egala pensmaniero, reaperas en la genera-transforma gramatiko. CHOMSKY mem skribas: „El multaj vidpunktoj ŝajnas al mi ĝusta tiu konstato, ke la genera transformata gramatiko, konsiderante ĝian nunan evolu-direkton, estas esence la pli eksplicita varianta de la Port-Royal gramatiko” (69). KOVÁCS Ferenc (70), simile al VOLKOV, konsideras la interlingvistikajn verkojn de DESCARTES kaj LEIBNIZ bazdokumentoj kaj unuaj konturoj de la moderna semasiologio (semiotiko):

„La malkovro de la sistemeco de lingvaj signoj, la integrado de tiu ĉi sistemo en la sistemretaron de la signo-scienca necesbezone kondukis – laŭ la analogio de universala matematiko – al la intenco krei universalan lingvon (Descartes) kaj al la realigo de tiu intenco per kolosa organiza verkado (Leibniz)... de kio oni atendis ne pli malgrandan rezulton, ol la forigon de la kontraŭdiro, estanta interne de sistem-retaro inter la signoj mem, kaj la kreon de tia simbolsistemo, kiu, per unusignifaj signoj kaj per ilia kombino, povus esprimi ĉiujn objektojn kaj fenomenojn de la mondo, sen kiu ajn kontraŭdiro... Tiu ĉi eksperimento, – daŭrigas KOVACS – ne povis sukcesi, ĉar oni volis liberigi la lingvon de tiaj kontraŭdiroj, kiuj apartenas al ĝia esenco, sen kiuj, la lingvo, kiel sistemo de signoj, ĉesus ekzisti...”

D’EN’ISOV konstatas, ke la moderna lingvistiko „multe ĉerpas el la arsenalo de la interlingvistiko (t.e. de la scienco de internaciaj helplingvoj)” sed samtempe ankaŭ prezentas la kontraŭdirojn de la ideo pri filozofiaj lingvoj. Malgraŭ sia baza eraro, certaj principoj estis akcepteblaj ankaŭ por la moderna lingvoscienco:

(a) Esplorante la universalan klasigon de ideoj, ili formulis la ĝeneralajn principojn de la ideo-klasigo, kiujn praktike aplikas la moderna bibliotekscienco kaj dokumentiko. Ili estas la praj formoj de modernaj tezaŭroj kaj semantikaj modeloj. Inter la semantika-skemo de VON WARTBURG kaj la sistemo de WILKINS estas granda simileco. Ankaŭ VON WARTBURG startas el la principo de „antaŭlingva pensado” – t.e. pensado, antaŭanta la sciencan ekkonon kaj klopodas „mapigi” ĉiun temon rondon de la mondbildo. Ĉe li la vortoj estas la signoj de ideoj kaj aranĝas ilin laŭ „la logiko de la vivo”.

(b) En la ideo de filozofia lingvo enestas la ebleco de formaligo de la procezo de logika konkludo, kiu signifas (en la nuna terminologio) la mekanikigon de la pensado.

Tiu ĉi ideo iniciatis la matematikajn-logikajn esplorojn, kiuj fine kondukis al la konstruado de „pensantaj aparatoj kaj maŝinoj”. t.e. al tiaj instalaĵoj, kiuj kapablas solvi logikajn taskojn.

- (c) Ne mortis ankoraŭ la ideo mem de la filozofia lingvo. Ĝi aperas hodiaŭ sur pli alta nivelo (dank’ al la multe pli profundaj natursciencaj konoj) en la kreado de la unueca „lingvo” de sciencoj, en la konstruo de la universala kodo de la sciencoj.

GOMBOCZ Zoltán konsideras WILKINS kaj DALGARNO la fondintoj de la moderna fonetiko; R.W. ALBRIGHT prezentas la verkon de WILKINS kiel de unu el la antaŭuloj de la moderna fonetika transskribo. (71) Laŭ L.L. JOFIK – Wilkins estas la antaŭulo de la moderna gramatiko. “WILKINS estis la unua, kiu klarigis la kategoriojn de la logiko kaj gramatiko.” Li difinis la subjekton kaj predikaton per ilia loko (kp. la moderna distribua teorio!): “Subjekto estas tio, kio staras antaŭ la kopulo. Se tiu estas unu vorto, tiam ĝi estas tio, kion la gramatikistoj nomas „nominativo”. (Ĉe WILKINS „subjekto” ne estas gramatika termino, sed ia funkcia-logika elemento.) La predikato, laŭ WILKINS, estas tio, kio sekvas post kopulo, ĝenerale adjektivo, kiu kunfandiĝas kun la kopulo kaj kune kun ĝi fariĝas verbo. Laŭ li „*he loves*” devenas el „*he is loving*” (tiu ĉi ideo reaperas ankaŭ ĉe LEIBNIZ). La pozicion de frazelementoj difinas ilia interrilato: la subordiga antaŭas la suborditan, tiel: la subjekto antaŭas la predikaton, la objekto sekvas ĝin (72).

La alia lingvistika temo al kiu multe kontribuis la interlingvistiko estas la esploro de *internaciismoj* (*interonimoj*) kaj de universalioj. AKULENKO konstatas (73), ke la interlingvistoj estis la unuaj (PEANO, MEILLET, WÜSTER), kiuj serioze okupiĝis pri la esplorado de internaciismoj. „La kreado de literaturaj lingvoj, la lingvokulturo, la unuecigo de terminologio, la kreado de skribsistemoj kaj ortografiaj reformoj, la instruado de fremdaj lingvoj kaj tradukado – ĉu plenumita de homo, ĉu de maŝino – la kreado de internaciaj helplingvoj, ĉiuj ĉi taskoj eblas nur tial, ĉar ekzistas kontakto inter la lingvoj, ĉar en lingvoj estas internaciaj elementoj (p. 263).

A. MARTINET (verko cit.) skribas:

„Temas pri tio, ke oni devas instali kontakton inter tiaj popoloj, kies civilizo estas la sama, aŭ atingis preskaŭ la saman nivelon de evoluiteco... La perfekta komuna lingvo devas havi vastan komunan civilizan bazon... Al tiu formo de civilizo oni serĉas komunan lingvon... Kaj ke tiu lingvo devas esti mondlingvo estas tial, ĉar ankaŭ la civilizo hodiaŭ progresas en la direkton de mondcivilizo... (p. 41-42).

„Ĉiu nacia kulturo tiel evoluas, skribas D’ESERJEV (74), ke ĝi altiras al si la plej bonajn elementojn de la kulturo de aliaj nacioj...” Pro la kreskinta interesiĝo al interlingvistiko ludas ĉiam pli gravan rolon la eŭropaj internaciismoj, ĉar, la internaciaj artaj lingvoj ĝenerale, kaj Esperanto speciale, baze konstruiĝas sur tiuj internaciismoj. (p. 14)

**3.3.2.** Interne de la *Esperantista komunumo*: ĉiam pli sentiĝas la disbranĉiĝo de du tendencoj – la endogena-tradicia kaj la ekzogena-progresiva. Ĝis la lastaj tempoj ne multaj esperantistoj „kuraĝis” publikigi siajn verkojn en nacilingvaj fakaj revuoj (75). La tendenco mumiigi la fundamentajn studojn de la dua periodo bremsas la provojn de scienca esplorado, kvankam, kiel prave konstatas WOOD

„PIV kaj PG, kvankam utilegaj iloj, ne estas rigore sciencaj priskriboj de la strukturo de Internacia Lingvo. Mankas efektive taŭgaj sciencaj studoj pri la lingvo kaj ĝiaj parolantoj, kiun tiuj parolantoj povas senhezite montri al lingvistikistoj, sociologoj, antropologoj ktp.” (LMLP, 1972/4-12, p. 174).

Tamen, kiel signoj de progreso, esperantistaj organoj ĉiam pli serioze okupiĝas pri ĝeneralaj lingvistikaj kaj interlingvistikaj temoj (76), esperantistaj organizacioj aktivigas laŭ modernaj laborstilo kaj koncepto (77), naskiĝas valoraj iniciatoj (78). La esenca trajto de ĉiuj ĉi aktivecoj estas: la unusenca klopodo al la emancipo de Esperanto, al ĝia integrado en la establitan mondon.

La plej gravaj institucioj, kie la internacia lingvo jam integriĝis en la scienca mondo kaj fariĝis integra parto de supergrada instruado kaj scienca esploro, estas la sekvaj:

- (A) la Hungara modelo;
- (B) la Soveta modelo;
- (C) la Paderborna modelo;
- (Ĉ) la La-Chaux-de-Fonds-a modelo;
- (D) la Amerika modelo.

### **(A) La Hungara modelo**

Estas vaste konata la kontribuo de hungaroj al la ĝenerala disvolvo de Esperanto kaj movada (P. LENGYEL k.a.) kaj literatura-lingvokultura (la Budapesta skolo kaj „Literatura Mondo”), kaj metodologia (A. CSEH) (79). La ĝenerala kaj tradicia interesiĝo de hungaroj pri la lingvo-politikaj kaj lingvomodeligaj problemoj, pro ilia lingva izoliteco (ekz. en Hungario vivis plej longe latino: akraj lingvaj bataloj por la emancipo de la hungara lingvo, intensiva lingvonoviga kaj lingvo-kultura movado ktp.) – ĉiam favoris la ideon de internacia lingvo.

Malpli konata estas la interlingvistika aktiveco de hungaroj. En la unua periodo elstaras la aktiveco de GIESSWEIN S., A. H. MARICH, kaj BÁLINT Gábor (80). En la antaŭmilita periodo kaj tuj post la unua mondmilito aperas aro da broŝuroj kaj artikoloj, prezentantaj la internacilingvan ideon al la granda publiko. (81) En tiu ĉi periodo eklaboras BÁRCZI Géza, la plej elstara hungara interlingvisto (82) kaj oni enkondukas oficiale la universitatan instruadon de du interlingvoj: Esperanto kaj Ido (vd noton 41). Hungario estis la unua ŝtato, kie ekfunkciis ŝtate organizita interlingvistika scienca instituto en universitataj kadroj (ibid.).

Naskiĝis diversaj lingvoprojektoj de hungaraj aŭtoroj (83) ne sufiĉe konataj en interlingvistiko pro la lingva izoliteco. Kelkaj estas vere tre signifaj.

La modernan periodon karakterizas la sekvaj eventoj:

(a) Lingvoscienco

- 1) la unua oficiala faka universitata instruado kaj integrita scienca esplorado en la Universitato ELTE, Budapesto (84),
- 2) interesiĝo de profesiaj lingvistoj (85),
- 3) altlerneja oficiala instruado (86),

(b) Aliaj sciencoj

- 1) komputiko kaj informadiko (87),
- 2) natursciencoj (88),

(c) Lingvopolitiko

- 1) historiaj esploroj (89),
- 2) internaciaj organoj (90),
- 3) nacilingva informado (publike vendata periodaĵo: *Eszperantó Magazin*),

(d) Praktika aplikado

- 1) lerneja politiko (forta tendenco al oficialigo)
- 2) ceteraj (91).

**(B) La Soveta modelo**

La verkon de J. BAUDOIN DE COURTENAY (92) kaj E. DREZEN (93) pluevoluigis kaj disvolvis E. A. BOKAREV, la fondinto de la moderna soveta interlingvistika skolo. Laŭ lia iniciato fondiĝis en 1964 la Interlingvistika Sekcio de la Lingvosciencia Instituto de Scienca Akademio de Sovetunio (94). Post la morto de BOKAR EV la sekcion gvidas M.J. ISAEV.

Laŭ la decido de la Prezidantaro de Soveta Akademio de Sciencoj en la kadro de Lingvosciencia Instituto, la 18-an de okt. 1973, fondiĝis la Laborgrupo por la esploro de la problemoj de internacia helplingvo kun la jena esplorprogramo:

- (a) la teoriaj problemoj de la helplingvo de internaciaj rilatoj;
- (b) la evoluhistorio de artefaritaj lingvoj;
- (c) la tipologio de artefaritaj lingvoj;
- (d) spontanaj kaj konsciaj elementoj en la lingvoevolua procezo;
- (e) la strukturo kaj funkcio de Esperanto kiel internacia helplingvo. (95)

En la kadroj de la sekcio aktivis elstaraj profesiaj lingvistoj – esperantologoj kaj ĝeneralaj lingvistoj (96).

**(C) La Paderborna modelo**

La fondinto estas Helmar FRANK, direktoro de la Institut für kybernetische Padagogik en FEOll (Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierete

Lehr- und Lernverfahren GmbH). En la kadro de la Instituto funkcias diverstipaj organoi, kies celo estas: pruvi la taŭgecon de planlingvoj en la instruteknologio kaj kibernetiko; ellabori kibernetikan terminologion en Esperanto; publiki vaste resumojn en Esperanto; ellabori aŭd-vidajn programojn, ktp. (ILUS – Interlingvistik und Sprachkybernetik) (97).

La Eŭropa Klubo (Gesellschaft für sprachgrenzübergreifende europäische Verständigung, agnoskita la 23-an de dec. 1974); celadoj:

- (a) okazigo de fakaj konferencoj kaj publikaj kulturaj kunvenoj, kie videbliĝu vojoj por venki lingvolim-problemojn en Eŭropo;
- (b) kunlaboro en la ellaborado de instruplanoj sub la vidpunkto de malpliigo de eŭropaj lingvolim-problemoj;
- (c) propraj kursoj kaj aliaj edukaj kaj klerigaj klopodoj, kiuj senpere servu al la popola interkompreniĝo;
- (ĉ) ellaborado de kunordigaj planoj por la esplor- kaj evoluiglaboro, servanta al lingvolim-transpaŝa interkompreniĝo, kaj la prezentado de tiuj planoj ĉe la koncernaj instancoj.

Organo: “Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft”, kun interlingvistika aldono: “Homo kaj Informo” (kun planlingvaj resumoj).

#### **(D) La La Chaux-de-Fonds-a modelo (La Svisa modelo)**

Fondinto: C. GACOND. Ĝi funkcias sur du terenoj – esperantologia: KCE (Kultura Centro Esperantista) kaj interlingvistika: CDELI (Centre de Documentation et d’Etude sur la Langue Internationale, prezidanto: T. CARLEVARO). KCE disvolvas ampleksan informan aktivecon pere de sia „Cirkulero” inter esperantistoj kaj pere de artikoloj, publikigitaj en nacilingvaj gazetoj kaj ĵurnaloj, same ankaŭ en la Svisa Radio. Ĝi organizas instruan kaj lingvo-perfektigan kursaron (kun paralela kampanjo „Esperanto à l’école” – O. TZAUT), eldonas studserion („Studoj”).

CDELI fondis la plej ampleksan interlingvistikan dokumentaron kaj librejon en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds kun kunordiga aktivado inter la reprezentantoj de diversaj planlingvoj (98).

#### **(E) La Amerika modelo**

La fakto, ke Esperanto enpenetris en Usonon tra la universitatoj (dank’ al la prelegvojaĝoj de OSTWALD) kaj dank’ al la antropologia, poste sociolingvistikaj, tendencoj en la lingvoscienco, la usonaj universitatoj kaj lingvistoj iom ĉiam interesiĝis pri la problemaro de la lingvoplanado kaj certagrade ankaŭ pri la internaciaj lingvoj (kp, SAPIR, H. COLLITZ, M. PEI) (99).

Apartan inciton kaj puŝon donis al la afero de internacia lingvo la 57-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Portland (29/VII-5/VIII, 1972). La 27-an de dec. de la sama jaro, en la kadroj de la 87-a jara mitingo de *Modern Language Association*,

en New York okazis seminario pri Esperanto kaj Interlingvistiko. Prezidis P. L. Ullman (Universitato de Wisconsin, Milwaukee). Prave povis rimarki R.E. WOOD (100):

„Nun komenciĝas nova epoko de oficialigo de kursoj kaj tute aparte de interesiĝo kaj kvalifikiĝo pri Esperanto flanke de profesiaj lingvistoj, profesoroj pri lingvoj kaj lingvistiko en Usono” (p. 173).

Somere de 1972 okazis oficialaj kursoj pri pedagogio de Esperanto en la Universitato de Portland, en la Universitato de Kalifornio, San Francisko (Lloyd O’CONNOR). tri oficialaj kursoj en la Universitato Portland (gastlekciisto, WOOD). En la Universitato Brigham Young, R. BLAIR okupiĝas pri la komputila analizo de Esperanto.

En dec. 1973 la sama asocio aranĝis simpozion pri esperantologio kaj interlingvistiko (prezidis CAROLL kaj WOOD). La temoj de referaĵoj estis:

„La ekesto de Interlingua”: D. CHARTERS (Foreign Language Dept., California State University, Arcata), kaj F. ESTERHILL (Interlingua-Institute, New York); „Ĉu Esperanto estas artefarita lingvo?”: J. BALBIN (Essex County College, New Jersey), kaj P.L. ULLMAN (Dept. of Spanish and Portuguese, University of Wisconsin, Milwaukee).

„Aplikita lingvistiko kaj instruado de Esperanto”: CHARTERS kaj BRENT.

En 1974 fondiĝis ESAA (Esperanto Studies Association of America; sciigo en: LMLP, V/14, p. 123) kies funkcio estas kunordigi la aktivecon de tri organizaĵoj:

ELNA – Esperanto League for North America – movada organizaĵo;  
AATE – American Association of Teachers of Esperanto – faka organizaĵo;  
ESF – Esperantic Studies Foundation – interlingvistika scienca fondumo.

La organiza komitato: Richard E. WOOD (Adelphi University, New York), Humphrey TONKIN (University of Pennsylvania, Philadelphia) kaj E. James LIEBERMAN, M.D., Prezidanto de ELNA (Washington) (101).

Dum la 59-a UK (Hamburg, 1974). H. TONKIN fariĝis prezidanto de UEA; ekde julio 1974 Jonathan POOL (Dept. of Political Science, State University of New York) transprenas la gvidadon de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, Rotterdam); kaj R.E. WOOD – fariĝas ĉefredaktoro de La Monda Lingvoproblemo (Socia, lingvistika, politika, jura, psikologia, ekonomia”, sub aŭspicio de CED) ekde la n-ro 14, vol. V.. La planlingvistikaj, aplikitaj lingvistikaj, interlingvistikaj kaj esperantologiaj esploradoj kunfandiĝas ne nur en la universitataj medioj de Usono (102) sed ankaŭ en tiuj sferoj, kie funkcias usonaj universitatoj (UEA, CED, LMLP). La interlingvistikan seminarion de Modern Language Association inter la 26-a kaj 30-a de dec. 1975 partoprenis jam la reprezentantoj de 50 universitatoj kaj sciencaj institutoj (102). En nov. 1974 aperis la unua n-ro de „*Novaĵleteroj por interlingvistoj*” (red. U. LINS) jam la kvara interlingvistika fakperiodaĵo – sed ĉi-kaze jam sub la aŭspicio de la organizita movado (103).

Kaj en tiu momento ni alvenis al la sojlo de la estonteco: UEA – pere de CED kaj LMLP povas integri ĉiujn pozitivajn iniciatojn, funkciajn sendepende unu de aliaj, koncentri ilian aktivecon, certigi la agnoskon de interlingvistiko kaj esperantologio far la scienca mondo, kaj la agnoskon de la internacia lingvo Esperanto far la socio kaj politika mondo.

## **Notoj, fontoj, referencoj**

- (1) SZÉPE Gy., Nyelvfeldolgozás és dokumentáció, en: A tudományos tájékoztatás elmélete és gyakorlata, p. 1-12
- SAINT-MARIE, P., De la nécessité d'une linguistique appliquée, Paris, 1953 VILDOMECC, V., Multilingualism, Leyden, 1963
- ROZENCVEIG, V.Ju., O jazykovyh kontaktah, en: VJa 1963/1
- , Jazykovyje kontakty, Leningrad, 1972.”
- VERESCAGIN, E.M., Psiholingvisticskaja problematika teorii jazykovyh kontaktov, en: VJa, 1967/6.
- MARTINET, A., Le bilinguisme, en: Cités Unies, V-Vi (1958). 7-8.
- , Réponse a une question relative au bilinguisme, en: Almanach Flinker (Paris, 1961), 27
- , Bilinguisme et plurilinguisme, en: Revue tunisienne des sciences sociales, VII (1966) 57-64, 65-77.
- CENTRE INTERNATIONAL DE RECHERCHES SUR LE BILINGUISME, Bibliographie internationale sur le bilinguisme, Ouébec, Presses de l'Université Laval, 1973, 757 p.
- (2) SCHÖNFELDER, K.H., Probleme der Völker und Sprachmischung, Halle, 1956 (Bibliografio de la temo: pp. 13-42).
- NÉMETH J., Zur Kenntnis der Mischsprachen, en: Acta linguistica Ac.Sc. Hung., 1953/111, pp. 159-198.
- HALL, R.A., Pidgin and Creole Languages, Heffter, Cambridge, 1966, 204 p. WURM, S.A., Pidgins, Creoles and Lingue Franche, Current Trends in Linguistics, vol. VIII, Mouton, Hago, 999-1021.
- WINNOM, K., The origin of the European-based creoles and pidgins, en: Orbis, 1965/XIV, n-ro 2, p. 509-527.
- SCHUCHARDT, H., Kreolische Studien, en: Sitzungberichte der Phil.-Hist. Classe Kais, Akademie der Wissenschaften, vol. 1-IX, Wien, 1882-1891.
- HYMES, D., Proceclings of the Second International Conference on Creole Languages held in Jamaica, 1968, Cambridge, 1971.
- REINECKE, J., Marginal languages: a sociological study of the creole language and jargons, New Haven, 1937.
- SCHADE, O., Zur Makaronischen Poesie, en: Weimarisches Jahrbuch, Hannover, 1855/11., pp. 409-464.
- GENTHE, F.W., Geschichte der Macaronischen Poesie und Sammlung ihrer vorzüglichsten Denkmale, E. Meissner, Leipzig, 1829.



- DELEPIERRE, O., *Macaroneana ou mélanges de littérature macaronique*, Brighton, Gancia Libraire, Paris, 1852.
- EICHSTADIUS, C.A., *De poesi Macaronica disputacio*, Jenae, 1831.
- (3) JACOB, H., *Otto Jespersen, his work for an international auxiliary language*, London, 1943.
- MARTINET, A., *Otto Jespersen*, en: *Word Study*, 1953/XXVIII, pp. 1-3.
- MANDERS, W.J.A., *Otto Jespersen kaj liaj helpingvaj teorioj*, en: E.K., 1947/44, pp. 138-150.
- LOZOVSKAJA, G.S., *Otto Jespersen*, *Bibliograficeskij ukazat'elj*, Moskva, 1963, p. 71.
- (4) *The structure of language*, Ed. by J.A. FODOR and J.J. KATZ, 1964. *Rec.*, Y. Bar-Hilel, en: *Languages*, 1967/43, n-ro 2, pp. 530-531.
- (5) TUULIO, O.J.T., *La langue internationale auxiliaire, Réflexions opposées au Novial de M. Jespersen*, en: *Ann. Acad. Scienciarum Fennicae*, 1932/XXVI I. RUBINYI M., *Egy új világnyelvi kísérletről*, en: *Budapesti Szemle*, 1928/611 (okt.), p. 142 k.s.
- WÜSTER E., *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik / Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung*, VDI-Verlag, 1931, 2. eldono, 1966, Bonn.
- , *Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko*, Budapest, 1936. Recenzo: Meillet, en: „Bulletin de la Société de Linguistique de Paris”, 1932, pp. 5-7.
- WEISGERBER, *Die Stellung der Sprache im Aufbau der Gesamtkultur*, Heidelberg, 1933-1934, pp. 12-13, 75, 77, 100-101, 113, 115-120. 128-129, 137
- WÜSTER, E., *Bibliography of monolingual and technical glossaries*, UNESCO, 1955.
- , *La normalisation du langage technique, problèmes et état actuel*, in: „Revue de Documentation”, vol. XXVI, n-ro 2, 1959, pp. 43-49. (germana originalo en: „Sprachforum”, vol. 1, n-ro 1, 1955, pp. 51-61.)
- JUMPELT, R.W., *Scientific terminology*, UNESCO, Kairo, 1955.
- , *Towards a FIT-Policy in Scientific and Technical Translation*, en: „Babel”, vol. 1, n-ro 1, 1955, p. 23.
- , *Practical Aspects of Terminological Services in International Organizations*, en: „Babel”, vol. IV, n-ro 3, 1958, p. 169.
- , *Die internationale Terminologie im Dienste der Informatik*, en: *LMLP*, 1971/6.
- Ehrung für Eugen Wüster zu seinem 60. Geburtstag am 3. Okt. 1958, en: *Sprachforum*, Bonn, 1959/1960, 111, 81-95, Leo Weisgerber, *Ein Markstein angewandter Sprachwissenschaft – Begegnung mit Eugen Wüster*.
- WÜSTER, E., *Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana*, 1923-1929, Leipzig.
- , *Die Verhältnswörter des Esperanto*, 1924.
- , *Maschinentechnisches Esperanto-Wörterbuch*, Leipzig, 1923.
- , *Fizikaj grandoj kaj iliaj unuoj*, Berlin, 1921.
- , *La Oficiala Radikaro, kun enkonduko kaj notoj*, Berlin, 1923.
- DENISOV, P.N., *Nekotorije lingvisticskije aspekty terminologiji*, en: *Russkij jazyk v skole*, 1965, n-ro 6, pp. 10-15.
- OANILENKO, V.P., *Kak sozdajutsja terminy?* en: *Russkij jazyk*, 1967, n-ro 2, pp. 37-64; n-ro 3, pp. 57-64.
- KRAVEC, L.G., *Sopostavlenije terminologiceskih sistem jestestvennyh i iskvustvennyh jazykov*. en: *Aktual'nyje problemy leksikologiji*, Novosibirsk, 1967, pp. 27-30.

- SOLOVJOVA, I.M., Normalizacija naučno-tehničke terminologije. en: Osobnosti jazyka naučnoj literatury, Moskva, 1965, pp. 122-137.
- (6) TAULI, V., Oigekeelsuse ja keelekorralduse pohimotted ja metodid, Tartu, 1938 („La principoj kaj metodoj de lingvoplibonigo kaj lingvoreguligo”).
- , Introduction to a Theory of Language Planning, Uppsala, 1968. *Rec. de ÉDER* 2., en: Nyelvtudományi Közlemények, LXXI/1, pp. 194-198.
- NIKOLSKIJ, L.V., Jazykovaja politika kak forma social’novo vozdejstvija na jazykovoje razvitije, en: Jazyk i obscestvo, Moskva, 1968, p. 114 k.s.
- (7) Die Wissenschaft der Sprache, von MAX MOLLEA, Leipzig, 1893. 11-a vol. 11-a çap.: p. 48: Künstliche Sprache; p. 49: Die Universalsprache des Leibniz; p. 50: Die philosophische Sprache des Bischofs Wilkins; p. 66: Volapük, Pasilingua etc.
- MEYER, G., Essays und Studien zur Sprachgeschichte und Volkskunde, Strassburg, 1893, vol. 11, pp. 23-46.
- aparte: Weltsprache und Weltsprachen, en: Schlesische Zeitung, 1901/400-406.
- SCHUCHARDT, H., Weltsprache und Weltsprachen, Strassburg, 1894.
- , Auf Anlass des Volapüks, Berlin, 1888.
- , Bericht über die auf Schaffung einer künstlichen internationalen Hilfssprache gerichtete Bewegung, en: Alm.d.Wien.Ak.der Wiss. 1904, pp. 281-296.
- (8) LEAU, L., La langue universelle est-elle possible? Appel aux hommes de science et aux commerçant, Paris, 1900.
- MEYER, R.M., Künstliche Sprachen, en: Indogermanische Forschungen, 1901/XII, n-ro 33, pp. 242-318.
- JEVTIFEJEV, N.P., K voprosu o mejdunarodnom jazyke, Doklad, pročítanny v sobraniji Troicko-Kjahtinskovo otdela imp. Russkovo geografičeskovo J obščestva 30. dekabnja 1902 goda, SPb, 1903.
- DIELS, H., Das Problem der Weltsprache, en: Deutsche Revue, Stuttgart, 26. jan. 1901, pp. 45-58.
- , Internationale Aufgaben der Universität, Berlin, 1906.
- COUTURAT, L., Eine Weltsprache oder drei? Antwort an Herrn Professor Diels, en: Deutsche Revue, Stuttgart, 1906 (E-e: Berlin, 1907).
- DIELS, H., Délégation pour l’adoption d’une langue auxiliaire internationale, Paris, 1907 (15-a de dec.). *Rec.*: en: Deutsche Literaturzeitung, 3 jan. 1909.
- BRUGMANN K., Die neusten Weltsprachenprojekte, pp. 5-29.
- LESKIEN, A., Zur Kritik des Esperanto, pp. 31-38. ambaù en: Zur Kritik der künstlichen Weltsprachen, Strassburg, 1907.
- BAUDOUIN DE COURTENAY, J., Zur Kritik der künstlichen Weltsprachen, veranlasst durch die gleichnamige Broschüre von K.B. und A.L., en: Annalen der Naturphilosophie, 1907, vol. VI, pp. 385-433. la sama en: Indogermanische Forschungen, XXII/5, pp. 365-396. repres: Leipzig, 1908.
- Respondo de BRUGMANN kaj LESKIEN: Zur Frage der Einführung einer künstlichen internationalen Hilfssprache, Strassburg, 1908, poste: Die künstlichen Weltsprachen und ihre Aussichten, en: Akademische Rundschau, Leipzig, 1914, pp. 290-309.
- Kritiko de BRÉAL, M., kaj MEI LLET, A., en: Revue critique d’histoire et de littérature, 1908 (2-a de apr.), pp. 241-246.

- Kp. BRÉAL, M., Le choix d'une langue internationale, en: Revue de Paris, 1901/VIII (15-a de jul.), n-ro 4, pp. 229-249.
- MEILLET, A., Opinion d'un linguiste sur la langue internationale, Paris, 1919. En: Meillet: Les langues dans l'Europe nouvelles, Paris, 1928, pp. 276-285: Chapitre XXXIV, Les essais de Langues Artificielles.
- Pri la negativa influo de jun-gramatikistoj, en: SVEJČER' A.O., Voprosy sociologii jazyka v sovremennoj amerikanskoj lingvistike, Leningrad, 1971, p. 70.
- TAMÁS L., en: Ált. Ny.-Stil., Nyj., Tört., Budapest, 1956, p. 42.
- (9) GOMPERZ, Th., Zur Frage der internationalen Hilfssprache, in: Deutsche Revue, dec. 1907.
- STEPHAN, F., Die Weltsprache Esperanto und ihre Bedeutung für Wissenschaft, in: Handel und Verkehr, Leipzig, 1908.
- KOLLER, K., Die Weltsprache eine Utopie? Eine Kritik des Weltsprachproblems, Sarajevo, 1908.
- JANOTTA, K.A., Das Problem einer internationalen Hilfssprache, en: Karlsruher Hochschulzeitung, 25 Jan. 1908, vol. VII., p. 18
- LORENZ, R., Das Problem der Weltsprache, en: Wissen und Leben, Zürich, 1908, 11., 15.
- SEIDEL, A., Das Weltsprache-Problem vor dem Forum der Sprachwissenschaft, Berlin, 1908.
- MEYER, R.H., Künstliche Sprache, en: Indogermanische Forschungen, 1908. XXII.
- GAUTHEROT, G., La question de la langue internationale, Paris, 1910.
- JESPERSEN, O., Esperanto og ILO, en: Politiken, København, 6. Jan. 1909. OFFICE CENTRAL ESPÉRANTISTE, L'Échec de la Délégation. Recueil de Documents, I. et II., Paris, 1911.
- BOIRAC, E., La problème de la langue internationale, Paris, 1911.
- OSTWALD, W., Die Weltsprache, Stuttgart, 1907 (Ruse: Moskva, 1908).
- WIENER L., Universalsprachen, en: Internationale Wochenschrift, 1907.
- MÜNSTENBERG, H., Sprachhoffnungen in der neuen Welt, en: Internationale Wochenschrift für Wissenschaft, Kunst und Technik, apr. 1907.
- JESPERSEN, O., Artificala lingui pos la mondmilito, 1918.
- GÜNTHER, H., Grundfragen der Sprachwissenschaft, Leipzig, 1925, pp. 126-129. Citaĵoj el la verko: „Esperanto devas iom post iom disfali en dialektojn...” „Ĝi (Esperanto) malhelpus la germanan kulturinfluan en la mondo, flankenigus la germanan lingvon, kiel mondlingvon. Esperanto estas antaŭbatalanto por la latinidigo de la mondo!”
- (10) Actes du deuxième congrès international des linguistes, Genève, 25-29. aout, Paris, 1933, pp. 72-108.
- (11) SOLZBACHER, W., Alice Vanderbilt Morris (nekrologo) en: Esperantologio, 1955/\* (julio), n-ro 4, pp. 237-240.
- Raporto de la Honora Sekretariino de la Amerika Asocio por Internacia Helplingvo (IALA), New York, 1927.
- Why Should We Cut Out Our Tongues? en: The Forum, New York, majo, 1927.
- A Preliminary Investigation of the Teaching of Auxiliary Languages in Schools. A report to the Council of the Parents League of New York., New York, 1927.
- A Plan for Obtaining Agreement on an International Language, New York, 1924.
- Annual Reports of IALA, New York, 1925-1941.

- (12) COTTRELL, F.G., *Science in the Building of a New Language*, IALA, 1933. Statement Prepared for the Second International Congress of Linguists, Geneva, agosto, 1931 (A.V. Morris).
- COLLINSON, W.E., *Indication*, Baltimore, 1937.
- MORRIS, A.V., *International Language and the IALA*, en: *The American Scholar*, New York, somero 1941.
- , *A Voice in the World*, en: *Quest*, New York, 1936. *Represo* en: *Global Thinking*, Detroit, 1945.
- (13) SAPIR, E., *The Function of an International Auxiliary Language*,
- , *The Problem of an International Auxiliary Language*, en: *Romanic Review*, 1925/XVI, n-ro 3.
- , *Totality*, Linguistic Society of America, Baltimore, 1930.
- , kaj SWADESH M., *The Expression of the Ending Point Relation in English, French and German*, Baltimore, 1932.
- , *Selected writings...* Berkeley and Los Angeles, 1949, pp. 110-121.
- SHENTON, H.E., SAPIR, E., JESPERSEN, O., *International Communication; Symposium on the Language Problem*, Kegan Paul, Trench, Trubner Co., London, 1931.
- SHENTON, H.E., *Cosmopolitan Conversation, The Language Problem of International Communication*, New York, 1933.
- (14) MARTINET, André, *Ouestionnaire of the International Auxiliary Language Association* (with J.P. Vinay), New York: IALA, 1946, 98 pp.
- , *Le Ouestionnaire d'IALA*, en: *Lingua*, 1 (1946), pp. 127-129.
- , *La Linguistique et les langues artificielles*, en: *Word*, 11 (1946), pp. 37-47.
- , *Ouestion D, Interlinguistique: Rapport Préliminaire*, en: *Actes du VI<sup>e</sup> Congrès des Linguistes*, Paris (1949), pp. 93-112.
- , *Rapport sur l'état des travaux relatifs à la constitution d'une langue internationale auxiliaire*, ACL/VI, pp. 586-592.
- , *Réponses aux questions 1, 11 et 111*, ACL/VI, pp. 177-182, 247-248, 292-295.
- , *Rec. de „Interlingua-English Dictionary”*, *Interlingua*, en: *Word*, VIII (1952), pp. 182-186.
- , *Rec. de H. Heimer, Mondial, Lingua international*, en: *BSL*, LII (1956), pp. 267-268.
- , *Rec. de M. Monnerot-Dumaine, Précis d'interlinguistique générale et spéciale*, en: *BSL*, LVII (1962), pp. 36-37.
- (15) *Actes du sixième Congrès International des Linguistes* (Paris, juillet 1948), publiés sous le patronage du C.I.P.L. par les soins de M. Lejeune, Paris, Klincksieck, 1949. p. 93-112, A. Martinet, *Rapport sur la question D. Interlinguistique*; pp. 409-416, *Les communications relatives à la question D.* pp. 585-600, *Discussion*.
- Rec. HJELMSLEV, L., *Sixieme congres international de linguistes*, en: *Acta Linguistica*, Copenhagen, V 1945-49, pp. 56-60.
- COPPENS, J., *Het Vle Congrès International des Linguistes, gehouden te Parijs van 19 tot 24 Juli 1948* en: *Jaarboek van de Koninklijke Vlaamse Academie voor Wetenschappen, Letteren en Schone Kunsten van België*, Brussel, X 1948, pp. 120-123.
- SAUVAGEOT, A., en: *Bulletin Hispanique, Annales de la Faculté des Lettres de Bordeaux*, Bordeaux, LI 1949, pp. 458-460.
- SAUVAGEOT, A., en: *Bulletin de la Société de Linguistique de Paris*, Paris, XLV (131), 1949, pp. 1-2.

- REDARD, G., VI-ème Congrès International des Linguistes, en: *Indo germanisches Jahrbuch*, Berlín, XXVII 1949, pp. 306-309.
- DOROSZEWSKI, W., Le VIe Congrès International des Linguistes, Paris, 19-24 VII. 1948, en: *Biuletyn polskiego towarzystwa jezykoznawczego*, Kraków, IX 1949, pp. 3-8. kaj en: J. S., en: *Język Polski*, Kraków, XXIX 1949, p. 131.
- HORÁLEK, K., Mesinárodní linguistický kongres v Parizi, en: *Slovo a Slovestnost*, Praha, XI, 1949, pp. 91-93.
- (16) BORST, A., *Der Turmbau von Babel*, Stuttgart, 1957.
- CRESPO CANO, E., *Babel, la confusión de lenguas y su solución*, Valencia, 1968, 85 p.
- TANZINI, G., *Sopra la lingua primitiva e sopra la confusione de linguaggi sotto Babele*, Roma, 1742.
- CAUBEL, A., *La raison contre Babel*, Paris, 1961.
- (17) WEISSBACH, F.H., *Die sumerische Frage*, Leipzig, 1898. HALEVY, *Précis d'allographie assyro-babylonienne*, Paris, 1912.
- LANDESDORFER, P.S., *Schule und Unterricht im Alten Babylon*, en: *Blatter für bayer. Gymnasialschulwesen*, 1909/9-10.
- (18) SZERDAHELYI I., *La lingvouzo de Hetidaj Ŝtatkontraktoj*, en: *Universo*, Budapest, 1964/1 (dec.), n-ro 2, pp. 45-47.
- AYMARD, A., AUBOYER, J., *Histoire générale des civilisations*, Paris, 1953.
- CHIERA, E., *Sie schreiben auf Ton*, Zürich-Leipzig, 1941.
- (19) Citajo el la verko de ÉSAIÁS BUDAI, *Régi Tudós Világ Históriaja*, Debrecen, 1802., 'Historio de la Antikva Scienca Mondo', citita en *Budapesta Informilo*, 1976/7 (majo), n-ro 5 (67), p. 8.
- (20) FRINGS, T., *Sprache und Geschichte*, Halle, 1956.
- JIRMUNSKIJ, V.M., *Nacional'nyj jazyk i social'nyje dialekty*, Leningrad, 1936.
- VINOGRADOV, V.V., *Problemy literaturnyh jazykov i zakonomernostej ili obrazovanija i razvitija*, Moskva, 1967.
- MULLER, H.F., *When did Latin cease to be a spoken language?* en: *RR*, 1921/12, pp. 318-334.
- , *The Chronology of Vulgar Latin*, en: *ZRPh*, Beiheft 78, Halle, 1929.
- LOT, F., *A quelle époque a-t-on cessé de parler latin?* en: *Alma*, 1931/VI, pp. 97-159.
- WARTBURG, W., *Die Ausgliederung der Romanischen Sprachraume*, Bern, 1950.
- MARTINET, A., *Rec. de: W. von Wartburg, Die Ausgliederung der romanischen Sprachraume*, en *Word*, VII (1951) pp. 73-76.
- KLEIN, H.W., *Latein und Vulgare in Italien*, München, 1957.
- LABANDE-JEANROY, Th., *La question de la langue en Italia*, Paris, 1925.
- TAGLIAVINI, C., *Le origini delle lingue neolatine*, Bologna, 1952.
- MIGLIORINI, B., *Storia della lingua italiana*, Firenze, 1960.
- VENDRYES, J., *Celtique et roman*, en: *Revue linguistique romane*, Paris, 1925, pp. 262-277.
- MAROUZEAU, J., *Du latin au français*, Paris, 1957.
- LAPESA, R., *Historia de la lengua española*, Madrid-Buenos Aires, 1950.
- (21) DÍAZ-PLAJA, G., *Las teorías sobre la creación de lenguaje en el siglo XVI.*, Zaragoza, 1939, 40 p.

- CARRERAS Y ARTAU, J., De Ramón Lull a los modernos ensayos de formación de una lengua universal, Barcelona, 1946, 41 p.
- CHUZEVI LLE, J., Les mystiques allemands du 13<sup>e</sup> au 19<sup>e</sup> siècle, 1935.
- (22) BÜHME, J., *Mysterium Magnum*, vd en: GRUNSKY, H., *Jacob Bohme*, Stuttgart, 1956.
- FABRE D'OLIVETS, *Die wiederhergestellte hebraische Sprache*, Paris, 1825. BECKH, *Neue Wege zur Ursprache*, Stuttgart, 1954.
- BLAISE, A., *Les langues sacrées*, Paris, 1957.
- (23) GRABMANN, M., *Die Entwicklung der mittelalterlichen Sprachlogik*, en: *Mittelalterliches Geistesleben*, I, München, 1926.
- FUNKE, O., *Zum Weltsprachenproblem in England im 17. Jahrhundert*, Heidelberg, 1929.
- GOMBOCZ Z., *A fonetika történetébol*, V.: *George Dalgarno és John Wilkins en: Nyelvtudomány*, 1910.
- DALGARNO, G. *Ars Signorum* (1661) and *Didascalocophus* (1680); red.
- V. SALMON, fotorepr., en la serio: *Classics of Linguistics*, Heffter, Cambridge. TECHMER, F., *John Wilkins' Essay, Part 111: Natural Grammar*, en: *Internationale Zeitschrift für allgemeine Sprachwissenschaft*, vol. IV., 1889.
- DE MOTT, B., *The Source and Development of John Wilkins' Philosophical Language*, en: *The Journal of English and Germanic Philology*, 1958/57, pp. 1-13..
- EMERY, C., *John Wilkins' Universal Language*, en: *Isis*, 1947-48/XXXVIII., n-ro 113-114, pp.174-185.
- SALMON, V., *John Wilkins' Essay* (1668): *Critics and Continuator*s, en: *Historiographia Linguistica*, 1974/1., n-ro 2, pp. 147-164.
- DE MOTT, B., *Comenius and the Real Character in England*, en: *Publications of the Modern Language Association of America*, 1955/70.
- GEISSLER, H., *Comenius und die Sprache*, Heidelberg, 1959.
- , Helpaj lingvoj: kronologia bibliografio de artefaritaj internaciaj lingvoj de antikveco ĝis nuntempo (912 lingvoprojektoj), informas: *Novajleteroj*, 1975/2, julio, p. 6, n-ro 5.1.
- (96) ISAJEV, M.I., Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko, *Suplemento al Budapeŝta Informilo*, Budapest, junio 1975.
- Wichtiger Beschluss der Akademie der Wissenschaften der UdSSR, en: *Der Esperantist*, 1974/X-67-68=5-6, pp. 1-2.
- Working group: Soviet interlinguist organization (R.E. Wood), en: *Language Planning Newsletter*, East-West Center, Honolulu, 1976/2 (febr), n-ro 1, p. 3.
- Problemy interlingvistiki, tipologija i evoluciya mejdunarodnyh iskusstvennyh jazykov, *Rekollegija: doktor filologiĉeski nauk M.I. Isajev, otv. red., Kandidaty filologiĉeskiĉ nauk: V.P. Grigor'jev, S.N. Kuznecov, V.E. Staltmane*, Izd. Nauka, Moskva, 1976.
- (97) FRANK, H., Thesen zur deutschen Sprachpolitik, en: *IBW Journal*, 1974/XII-2, pp. 1-6.
- (98) *Monata Cirkulero de KCE*  
 Eŭropa Dokumentaro – Centre d' éducation Européenne – Campagne „Espéranto a l'école» (Mont-Soleil),  
 Ekz. artikolserio de C. Gacond: *Petite histoire de l'espéranto en Coopération* n-ro 12 kaj postaj k.s. publikajoj.
- (99) COLLITZ, H., *World Languages*, en: *Language*, 1926/11, pp. 1-13.  
 PEI, M., *One language for the World*, New York, 1958.  
 —, *The Problem of International Communication in a Global World*, en: *Am. Esp.*, 1944/LIX, pp. 5-6.  
 —, *An International Language can be achieved*, en: *Town and Country*, 1944.  
 —, *The International Language Movement*, en: *International Shorthand Review*, 1954/11, n-ro 10.  
 —, *Language for Everybody*, New York, 1958.  
 —, *Wanted: a world language*, en: *Public Affairs Pamphlet*, 1969/434.
- (100) WOOD, A.E., *Proceedings of the Symposium on the Teaching of Esperanto at United States Universities and Colleges*, en: *LMLP*, 1972/IV-12, pp. 159-174.  
 POOL, J., *La estonteco de CEO*, 1975-03-20; *Informoj* en: *Esperanto*, 1975/4 (apr.), kaj *Heroldo de Esperanto* 1975/9 (V/20).
- (101) TONKIN, H., *Language Problems in International Relations, A Selected Bibliography*, en: *International Language Review*, 1965-66, pp. 44-45.  
 —, *Shakespeare en Esperanto (1884-1965)*, London, 1966.  
 —, *A Research Bibliography on Esperanto*, New York, 1967.  
 —, *Code or Culture: The Case of Esperanto*, en: *Era*, 1968/4.  
 —, *Esperanto Literature since the War*, *Pen Bull.*, cf *Sel. Bks.*, 1968/19.
- (102) *Lektos*, *Interdisciplinary working papers in language sciences*, University of Louisville, *Papers from the Seminar on Interlinguistics*, Modern Language Association, dec. 26-30, 1975., Edited by Robert St. Clair.
- (103) *The International Language Review* (ekde 1955 – nun: *Echo-logos*) *Fokuso*, *Interlingvistika cirkulero*, Red. E. VILBORG, Göteborg *Interlingvistika Informa Servo*, Eld. *Societo por Internacia Lingvo* (Gesellschaft für internationale Sprache) ekde 1957, Red. Dr. A. BORMANN, Reinbek/Hamburg.

# La historio kaj nuna stato de interlingvistika kaj esperantologia universitata instruado kaj scienca esploro en Hungario<sup>1</sup>

## Tezoj

**1. Ju pli izolita estas lingve iu nacio, des pli forte sentas la neces-bezonon de kontaktiga lingvo.**

**1.1.** La hungara lingvo funkcias en medio, ĉirkaŭata de neparencaj, tute „fremdaj” por ĝi lingvoj: slavaj, germana kaj romaninda.

**1.2.** Mem en sia propra, ŝtate organizita etna medio nur post akraj politikaj bataloj kaj fortaj lingvo-novigaj operacioj sukcesis plenrajtiĝi la nacia lingvo.

**1.3.** La hungara lingvopolitika kaj lingvonoviga movadoj estas la plej elokventaj historiaj ekzemploj pri la strikta adekvateco de ĉi-du flankoj de la aplikata lingvistiko.

**2. La interlingvistikaj eksperimentoj** elkreskas el la lingvopolitika kaj lingvonoviga movadoj: la unuaj lingvo-projektintoj (KALMÁR, RÉTHY, GÁTI, BOLYAI) partoprenis aktive ĉi-movadcn. Ilia komuna ideologia grundo estas la klerismo.

**2.1.** La plipostaj eksperimentoj (Velics, Menör) imitas la unuajn.

**2.2.** Volapük – kies pioniroj estis BÁNFLI, GEBAUR kaj la konata iranologo POZDER – elvokis akrajn polemikojn (influatajn ankaŭ de la tiam jam disvastiĝanta jun-gramatika koncepto) kaj igis kelkajn elstarajn lingvistojn eldiri siajn opiniojn (ekz. BALASSA).

**3. Esperanto** havis pli da sukceso. La fakto, ke ĝi aperis unue en universitata medio (BAUNT G.) kaj la unuaj Esperantaj verkoj aperis en fake kompetenta medio (BARABÁS Á.) certigis la seriozan bazon por ĝia disvastiĝo kaj enradikiĝo.

**3.1.** Alveninte tra la provinco (Szekszárd: LENGYEL P.) al la ĉefurbo je la komenco de nia jarcento komenciĝis ĝia organizado, ekĝermis ĝia literaturo. Unu el la plej aktivaj kaj plej multflankaj ĝia adepto estis Géza BÁRCZI la pliposta fama hungarologo, pri kiu ni rememoras ankaŭ dum tiu ĉi nia kongreso.

**3.2.** La unua mondmilito nur interrompis, sed ne ĉesigis la interlingvistikan movadon en Hungario. Reveninte el militkaptiteco Julio BAGHY kaj esperantiĝinte tuj post la mondmilito Kolomano KALOCSAY fondis kaj gvidis la t.n. Budapeŝtan Skolon.

**3.3.** Tuj post la mondmilito, dum la Konsilantara Respubliko fondiĝis la unua en la historio scienca interlingvistika instituto en la kadroj de la Budapeŝta universitato: la

---

<sup>1</sup> Aperis en IPR 1980/2: 38-40.

Internacia Scienca Lingvoinstituto (04.07.1919) gvidata de la katedra profesoro pri Germanistiko SCHMIDT József.

**4. En la periodo inter la du mondmilitoj** la interlingvistikan movadon karakterizas la jenaj eventoj;

**4.1.** Budapeŝto fariĝas la kultura centro de la tutmonda Esperanto-movado (Budapeŝta skolo; Literatura Mondo; aktiveco de A. CSEH);

**4.2.** Elformiĝas forta esperantista-laborista movado, kiu, post la faŝistiĝo de la reganta politiko, fariĝas la kaŝorganizaĵo de la laborista-socialista kaj komunista movado;

**4.3.** Sporade aperantaj verkoj kaj fondiĝantaj organizaĵoj (MARICH, D. SZILÁGYI, BIRKÁS) pruvas, ke la interlingva penso vivas.

**5. Post la dua mondmilito**, sed precipe post 1955 – reorganiziĝas la Esperanto-movado.

**5.1.** Post 1965 reaktivas profesoro BÁRCZI kaj sub lia influo elformiĝas kurento ĉiam pliforte akcentanta la neces-bezonon de la seriozaj sciencaj lingvistikaj esploroj.

**5.2.** Ekde septembro 1966 Esperanto lingvo kaj literaturo, resp. Interlingvistiko fariĝas oficiala fako en la Budapeŝta Universitato.

**5.3.** La historion de la fondiĝo kaj dekjara funkciado de la fako entenas la Jubilea Jarlibro (Esperantologiaj Kajeroj n-ro 2).

## **6. Konkludoj kaj proponoj**

**6.1.** La dekdu-jara funkciado de Esperanto-fako en la Universitato ELTE, Budapeŝto akumulis multajn pozitivajn spertojn. Estas domaĝe, ke ĝis nun nur en unusola universitato efektiviĝis tiaspeca instruado. Oni devas trovi la eblecojn:

**6.1.1.** enkonduki Esperanton simil-forme ankaŭ en aliajn universitatojn;

**6.1.2.** se tio ne eblas: almenaŭ instrui esperantologion kaj interlingvistikon oficiale en la kadroj de ĝenerale kaj aplikata lingvistiko;

**6.1.3.** integri en la kadroj de ĝeneralaj kaj aplikataj lingvistikaj esploroj ankaŭ la interlingvistikajn kaj esperantologiajn esplorojn.

**6.2.** Fondi internacian asocion de interlingvistoj kiu funkcii kiel membro-organizaĵo de la *Internacia Asocio de Aplikata Lingvistiko*. La antaŭpreparoj estu farataj dum la nuna kongreso, la fondo okazu en la sekva kongreso (Venezia, 1979).

**6.3.** Eldoni sciencajn periodaĵojn, aperontan dufoje jare kun la titolo: *Periodica Interlingvistica*.



# Esperantologio



István Szerdahelyi kun kolegoj kaj gastoj: Iván Bújdoso, Árpád Máthé,  
Andrzej Pettyn, Wera Blanke, Ilona Koutny



# Vorto kaj vortelemento en Esperanto<sup>1</sup>

## § 0. Antaŭeventoj

**0.1.** En kelkaj numeroj de LITERATURA FOIRO (LF) mi aperigis, laŭ la peto de la Redakcio, kelkajn artikoletojn, tuŝantajn – gramatikajn, lingistikajn temojn. Mi konsciis, ke la revuo ne estas lingvistika fakperiodaĵo, sed populara kultura gazeto kaj tial mi mem klopodis elekti temojn, pri kiuj mi pensis, ke ili estos legindaj por la vasta publiko.

**0.2.** Instruante profesie E-on en universitato kaj preparante fakulojn pri E-o kaj interlingvistiko, mi ofte renkontas problemojn. Dum naŭ jaroj de nia funkciado (ekde 1966) mi gvidis ĉ. 1450 horojn (prelegojn kaj seminariojn) se mi kalkulas nur la studhorojn pri gramatiko kaj lingvistiko. Instruante talentajn gejunulojn, kies interesiĝo pri lingvistikaj temoj estas multe pli alta ol la ĝenerala nivelo, diskutante kun la kolegoj-lingvistoj inter kiuj ni laboras ĉiutage, pri lingvistikaj temoj, koncernantaj rekte aŭ ne E-on, ni devis kaj devos solvi multajn, ĝis nun preteratentitajn problemojn, respondi multajn, ĝis nun ne kontentige responditajn demandojn. Kelkajn el inter ili ni publikigis ankaŭ en LF.

**0.3.** Kvankam nur sporade, ni ricevadis reagojn al tiuj miaj artikoloj, ĝenerale aprobajn, sed ankaŭ kritikajn kaj kompletigajn. Ili ĉiuj multe helpis min en mia laboro.

**0.4.** En septembro 1975 mi komencis la 10-an studjaron. Estas malfacile eniri oficiale kaj fake en iun universitaton. Almenaŭ tiom malfacile estas resti tie kaj enradikiĝi, funkcii naŭ jarojn tiel, ke dume la aŭtoritato de la fako ĉiam kreskas, ĝia oficiala rekono ĉiam plifirmiĝas. Tiu rezultato por ni estas des pli valora, ĉar ni atingis ĝin sen ia ekstera helpo, el niaj propraj fortoj. Dum naŭ jaroj nek UEA, nek la Akademio montris interesiĝon rilate nian aferon. Male: kelkaj eminentaj esperantistoj esprimis sin tute kontraŭaj al nia afero, disvastigis la opiniojn, kiuj bagateligis niajn rezultojn, deklaris malkaŝe, ke fari sciencon el E-o estas ŝerco, instrui neekzistantan kaj nebezonatan „pseŭdosciencan” (temas pri interlingvistiko) estas ridindaĵo – kaj tiuj deklaroj estis des pli danĝeraj, ĉar ofte ili estis adresitaj rekte al niaj fakaj studentoj (kies ŝanceliĝon oni malfacile sukcesas venki).

**0.5.** Vole-nevole: la ekzisto de senprecedenca universitata oficiala fako fariĝis divida linio inter du pensmanieroj: la malnova – strebanta ĉiumaniere konservi E-on la ĝisnuna stagna stato por certigi tiamaniere por si la altan statuson en la ekstera Esperantujo, kaj la nova – klopodanta ĉiurimede emancipi E-on, enigi ĝin en la establiton mondon, akceptigi ĝin en ĉiuj rilatoj far la sociaj, ŝtataj kaj sciencaj instancoj: unuflanke rigidigi, mumiigi la aferon, aliflanke – dissolvi ĝin en la sana, natura, normala homa medio.

<sup>1</sup> La studo aperis en la serio: Studoj Kultura Centro Esperantista 10. 1976. Kuopio: Librofako de LITERATURA FOIRO. 16 p.

**0.6.** Reveninte al LF: diskutinte kun niaj gestudentoj kaj kolegoj-lingvistoj ekestis certaj duboj pri la lingvo-priskriba sistemo, baziĝanta sur la „karaktero” de morfemoj (ne nur radikmorfemoj, sed ankaŭ de ceteraj), demandosignoj pri la identigo de vorto kaj vortelemento, pri la konsekvenco de la uzata terminologio ks. Mi provis skizi tiujn niajn demandojn en tri artikoloj (LF, 5-a jaro n-roj 23, 24, kaj 28). Mi ripetas: la artikoloj naskiĝis el la suverena rajto de ĉiu pensanta homo: p r i d u b i.

**0.7.** La artikolojn kritikis d.ro Kalocsay. Mi ne respondis al lia kritiko unue, ĉar enhave li donis neniun novan elementon al la jam konataj kaj mi konvinkiĝis, ke li perfekte miskomprenis miajn ĝeneral-lingvistikajn cerbumaĵojn (aŭ eble tute ne komprenis ilin); due, mi estus devinta responde uzi la saman pamfletan stilon kiun li uzis, kun subjektivaj, malicaj pikoj – kion mi neniam uzis, des malpli rilate lin.

**0.8.** En la 31/32a numero de LF, pĝ 12-14, aperis kelkaj leteroj: reagoj al miaj artikoloj. Kun la letero de Pier Giorgio Soranzo mi ĝenerale – konsentas. Al Géza Kurucz mi havas nenion por respondi: nenion novan aŭ originalan li diras. Al letero, subskribita ‘Carolina Minio – Paulello Minnaja’ mi respondas, ke la decido publikigi iun artikolon apartenas al la redakta komitato (kies membro, se miaj informaĵoj estas ĝustaj, ankaŭ unu el ŝiaj filoj estas). Al la demando: “Ĉu eliminenda la Akademio?” mi respondis per NE. Ĉu tiuj akademianoj, kiuj voĉdonis kontraŭ la proponoj aŭ sin detenis ankaŭ deziris – la likvidon de la Akademio? Ĉu la kritiko de Akademia decido signifas la volon elimini la tutan institucion? Tio tamen ne signifas, ke la nuna formo de la Akademio estas perfekta aŭ ke ĝi ne povus funkcii pli efike, pli aktive, pli aktuale kaj pli dinamike. Aŭ ke ĝi estas Akademio en la pura senco de la vorto, ke ĝi estas vere scienca metiejo aŭ movada organizaĵo, ke ne estas troa nomo Akademio, ke ne sufiĉus nomi ĝin “Lingva Komitato” – jen estas diskutindaj demandoj.

**0.9.** El la letero de la Prezidanto de la Akademio mi citas kvar frazojn kune kun miaj respondoj: *Mi devas diri ke, kiel Prezidanto de la Akademio, mi absolute kondamnas ĉian sistemon, kiu rezultigus la enkondukon de barbarismoj kiaj estas vipilo, brosililo ktp.*

Respondo: ankaŭ mi devas diri preskaŭ la samon: eĉ se mi ne kondamnas, almenaŭ mi ne akceptus tian teorion. Sed mi ĉiam signas per asterisko tiajn formojn kiel \*brosilo kaj \*vipilo, montrante tiamaniere, ke ili ne estas ĝustaj. Mi nur asertas, ke se Zamenhof estus enkondukinta BROSI kaj VIPI kiel primaraj formoj, tiam nun mi havus \*brosilon kaj \*vipilon.

*Zamenhof certe pravis, kiam li admonis la esperantistojn malfidi profesiajn lingvistojn!*

Eble siatempe Zamenhof pravis (kvankam mi ne estas ja pri tio tute konvinkita). Sed legi tion el la plumo de la Prezidanto de Akademio (citita ankaŭ en PIV kiel ekzempla frazo, pĝ 641) estas pli ol nekompreneble strange. Hodiaŭ, kiam ĉiam plialtiĝas la nombro de elstaraj lingvistoj, kiuj pozitive pritraktas E-on, kiuj klopodas enigi ĝin en la lingvosciencan kaj konvinki siajn kolegojn pri la seriozeco de la problemo, publike deklari malfidon al profesiaj lingvistoj estas krimo kontraŭ nia afero, atenco kontraŭ

la profunde seriozaj laboroj de tiaj institutoj, kiaj ekz. la Interlingvistika Sekcio de la Linvgvosciencia Instituto de Soveta Scienca Akademio, la Pedagogia-Cibernetika Instituto el Paderborn, la Internacia Kultura Servo el Zagrebo, La Kultura Centro el La Chaux-de-Fonds, kontraŭ la klopodoj de CED kaj LMLP ktp ktp. Ĉu la prezidanto de la Akademio mem ne estas profesia lingvisto? Se jes – ĉu li estas escepto? Se ne – kio li estas profesie?

*Se, kiel Szerdahelyi asertas, la morfemoj ne havas gramatikan karakteron, kiel li povas klarigi, ke el la morfemoj bros kaj bala oni devenigas broso kaj balailo, kaj ne inverse; ke el la morfemoj haj hak hok oni devenigas hakilo sed hoko, kaj ne inverse? Tiel longe, kiel d.ro Szerdahelyi ne estas klariginta kial tiuj paralelaj morfemoj postulas jen simplan finaĵon, jen sufikson, kaj ne lasas al la parolanto alian elekton, li ne rajtas – substrkita de mi, Sz. – aserti, ke li science priskribis la aktualan uzadon de nia lingvo.*

Tiuj du frazoj postulas iom pli detalan respondon – vidu ĉe § 1. – § 3.

**0.10.** LF (tre saĝe) ne daŭrigas la diskuton. Tamen, por ne lasi nebulon en la cerboj, mi devis iom pli ordigite prezenti miajn pensojn.

## § 1. Terminologio

**1.1.** Por priskribi lingvon bezonatas strikta, preciza terminologio. Ĝi estu kiel eble plej proksima al la ĝenerale uzata sistemo kaj deviu de tiu nur tiam, kiam la specifo de la priskribata lingvo tion postulas.

**1.2.** Kiam temas pri vortfara sistemo la baza termino estas la vorto. La termino vorto estas unu el la plej malfacile difineblaj lingvistikaj terminoj: kiom da lingvistoj, preskaŭ tiom da difinoj. En la Aktoj la difino de vorto mankas, sed pri ĝia koncepto oni povas konkludi el la uzo. Citaĵo el la KONSTATO nr 11 (pĝ 61):

*Ni konstatas, ke laŭ la Fundamenta Gramatiko la finaĵoj „estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj” (R.11). Tio tamen ne signifas, ke ili estas uzataj kiel memstaraj vortoj.... tio signifas nur, ke ili povas funkcii kiel substantiviga, adjektiviga aŭ vertiga elementoj (sufiksoj).*

El tio sekvas, ke:

- a) la finaĵoj estas rigardataj kiel memstaraj vortoj
- b) tamen ili ne uzatas kiel memstaraj vortoj
- c) sed ili estas vortoj nur tial, ĉar ili povas substantivigi, adjektivigi, respektive verbigi
- ĉ) kaj en tiu funkcio ili estas sufiksoj.

El tiu klarigo oni ne multe povas ekscii pri la vorto. Sed traleginte la tutan materialon estas unusence konstateble – ke la Aktoj uzas la terminon vorto kiel sinonimon de vortelemento: sekve la vorto kaj vortelemento estas samnivela lingva signo.

**1.3.** La unusola fonto, konsiderebla pli-malpli “oficiala” estas PIV. En PIV (pĝ 1205) la vorto estas difinita jene: *Areto de artigitaj sonoj, havanta difinitan signifon kaj gramatikan uziĝon.* En la difino enestas unu formala kriterio (*areto de artikigitaj sonoj* = sonokorpo) kaj du enhavaj: unu aludas al informaĵo semantika/leksika, la alia al la gramatika/funkcia. La formala kriterio (*areto*) jam ekskludas la finaĵojn (almenaŭ la unuvokalajn –A, –E, –I, –O, –U) el la kategorio vorto. Laŭ la enhava postulo: oni povas nomi vorto nur tiun lingvan elementon, kiu estas finita, fermita, nome ne bezonas aldonan elementon por roli en frazo kiel ĉefa aŭ cetera frazelemento. Tiun tutecon de la vorto certigas ĝia semantika/leksika kaj ĝia gramatika/funkcia valoro. Ni vidu ekzemplon: TABLO estas vorto. Ĝi konsistas el du lingvaj signoj: TABL portas la ĝeneralan semantikan/leksikan informaĵon, –O la gramatikan/funkcian.

Lingva signo:

|  |  |
|--|--|
| TABL<br>ideo de meblo kun ebena<br>palto super la tersurfaco<br>semantika/leksika<br> <br>informaĵo<br> <br>rilato inter la eksterlingva realaĵo<br>kaj la lingvosistemo | 0<br>substantivo<br>singular, nominative<br>gramatika/funkcia<br> <br>rilato inter la lingvaj signoj interne<br>de la sistemo<br>de la sistemo |
|--|--|

Pri TABL oni scias kion signifas, pri –O oni scias kiel oni ĝin uzas interne de la sistemo. Laŭ la Fundamento ĉiu substantivo en E-o (asimilita en la sistemo) devas finiĝi per –O. La difino de substantivo en PIV (pĝ 1042): *Vortspeco, prezentata la ideon de aĵo, abstraktaĵo, ago aŭ stato kiel konceptata en la spaco (ekz. homo, beleco, kato, dormo ktp): la=oj havas la finiĝon 0<sup>2</sup>.* Ni vidu la elementojn de tiu ĉi difino.

*vortspeco* – ne difinita en PIV, tamen la difino de ĉiu parolelemento en PIV (krom la interjekcio: *Ekkria senfleksia vorto*) komenciĝas per tiu vorto. “Specon” povas havi nur vorto, klasifikebla en iun parolelemnetan klason. Vortelemento ne povas havi “specon”.

*prezentanta la ideon de* – signifanta. Sed la tradicia klasigo de vortoj en vortspecajn, parolelementajn klasojn ne estas homogena: la tri aŭtonomajn vortspecojn oni distingas laŭ semantikaj markiloj (substantivo, adjektivo, respektive verbo estas tiu vorto, kiu signifas...) dume, la ceterajn laŭ ilia funkcio (ekz ĉe prepozicioj en la difino la kriterio de signifo mankas kaj ĉeestas nur la kriterio de ensistema funkcio, rolo).

*aĵo, abstraktaĵo, ago aŭ stato kiel konceptata en la spaco* – sed agon kaj staton esprimas ankaŭ la verbo. Kiamaniere oni povas distingi la vorton, kiu signifas agon aŭ staton – ĉu ĝi estas substantivo aŭ verbo? Laŭ tiu lingva signo, kiu esprimas tiun substantivecon aŭ verbecon. Sekve: KURO kaj DORMO estas substantivoj – vidu

la ekzemplojn en PIV! – KURI kaj DORMI estst verboj, sed KUR kaj DORM estas nek substantivoj, nek verboj, eĉ ne vortoj, do nur vortelemoj!

**1.4.** La vortelemo estas konstruelemento, konsistiga elemento de la vortaro. Laŭ la ĝenerale uzata termino ni nomu vortelemojn morfemoj kaj la vorton leksemo. (Laŭ alia nomenklatur, uzata precipe de francoj: la ĝenerala nomo de vortelemo estas monemo, la gramatikaj monemoj – morfemoj, la leksikaj monemoj – leksemoj kaj vortoj: leksioj). La morfemoj ne estas egalaj: ili estas grupigeblaj en diversajn tipojn laŭ diversaj kriterioj. La diferenco inter ili ne estas kvanta, sed kvalita. Ekz AL, AM, AR, AS, AT „kvante” estas egalaj (ĉiuj konsistas el A + konsonanto). Sufiĉas rigardi ilian “neston” en la vortaro, oni tuj povas konstati, ke nur ĉe AM oni trovas tradukon, ĉe AL tradukon kaj klarigon, ĉe AR klarigon pri uzado, ĉe AS kaj AT nenian signifon, nur difinon kaj klarigon. La diferenco inter ili estas: la kvanto de leksika, respektive gramatika informo kaj ilia proporcio, la frekvenco, la valento (aŭ kombinebleco), la fermiteco aŭ malfermiteco de la mikrosistemo. Laŭ tiuj kriterioj, inter ili estas hierarkia gradigo:

### Semantika valoro



radikmorfemoj  
de aŭtonomaj  
vortspecoj  
radikvortoj  
afiksoj  
finaĵoj  
(funkcemoj)

### Gramatika valoro

Frekvenco  
Valento  
Fermiteco



Laŭ tiu skemo, semantike la plej plenaj estas la finaĵbezonaĵoj radikoj kaj de tiu nivelo la semantika valoro malkreskas, la gramatika valoro kreskas inversdirekte; do ĉe la finaĵoj la semantika valoro estas la plej malforta, dume frekvenco, fermiteco kaj valento malkreskas en la direkto de la radikmorfemoj.

Kiel granda estas la diferenco el la vidpunkto de la fermiteco pruvas la fakto, ke dum la preskaŭ 90-jara funkciado de la lingvo la nombro de la finaĵmorfemoj (funkcemoj) ne ŝanĝiĝis kaj ŝajne neniam ŝanĝiĝos (ili ĉiam restos dek unu), dume la nombro de la radikmorfemoj ĉiam ŝanĝiĝas kune kun la ŝanĝiĝoj, okazantaj ekster la lingvo, en la ĉirkaŭanta realaĵo.

Sekve: laŭ plene motivitaj lingvaj kriterioj montriĝas oportuna la divido de morfemoj en tri bazaj klasoj (tipoj): radik/morfemoj, afiks/morfemoj kaj finaĵ/morfemoj. La morfemo estas la fundamenta lingva signo en E-o (la fonemon ni konsideras nur elemento de signo) – ĝi estas la unua sur la hierarkia skalo de lingvaj signoj:

morfemo  
leksemo  
sintagmo  
frazo

Ilia interrilato estas: konsistas el..., konsistigas – on; ekz, la leksemo konsistas el morfemoj, la morfemoj konsistigas la leksemon ktp.

## § 2. La ekesto de Esperanto

**2.1.** Ĉiu lingvo estas siaspeca modelo de la nin ĉirkŭanta realaĵo. La realaĵeroj vortiĝas en la aŭtonomaj vortklasoj, dume la ceteraj parolelementoj servas (ĝenerale) por ilia interrilatigo interne de la sistemo mem. Estus tamen erare pensi, ke la mondo estas granda magazeno de konkretaĵoj kaj abstraktaĵoj kaj ke la vortoj estas iliaj simplaj etikedoj (Martinet). En ĉiu vortkorpo kaŝiĝas tuta retaro da signiferoj: rektaj kaj transaj, konkretaj kaj metaforaj.

**2.2.** Kiam Zamenhof konstruis internacian lingvon por solvi pere de ĝi la interlingvan embarason li ne konstruis tute novan, ĝis tiam neekzistantan modelon, sed akceptis la jam ekzistantajn kaj de li konatajn lingvajn modelojn: li ne inventis, li nur elektis el la inventaro de la diversaj (precipe eŭropaj) lingvoj. Ekz: por tiu meblo, ĉe kiu oni manĝas aŭ skribas li elektis la vorton el la franca (F) lingvo: table ~ TABLO, same el la F brosse ~ BROSO. Tamen ni nepre substreku: Zamenhofen kondukisen la novan lingvon ne vortelementon sed vorton. Vortelementon li ne povis traspreni el la fontlingvo: li povis traspreni nur plenan, memstaran vorton. La ekstrakto de la radikmorfemo el la vorto estis jam la dua operacio. La unua operacio: la transpreno de la vorto el la fontlingvo okazis inter la du sistemoj – inter la fonto kaj nova, konstruiĝanta sistemo. La dua operacio: la ekstrakto de la radiko el la vorto okazis jam interne de la nova sistemo.

Tion pruvas ankaŭ la nuntempa enkonduko de neologismoj: oni enkondukas ne la radikon NILON sed la vorton NILONO, ne la radikon DUR sed la sinonimon de MALMOLA – DURA. Plene pruvas tiun ĉi nian supozon la enkonduko de etnonimo HARAKIRI, kiu en tia originala formo envenis en E-on kaj, kvankam en la fontolingvo (kaj en ĉiuj aliaj lingvoj, kien ĝi eniris) estas substantivo, en E-on, pro la formala I-finaĵo, envenis kiel verbo.

**2.3.** La vorto (kaj ne ĝia radiko) enportis en la novan sistemon ankaŭ la kromsignifojn. Se E-o estus filozofia lingvo (kiel tion unue planis Zamenhof), tiam en E-o la nomo de ‘ĉevalo’ eble estus simila al tiu de Dalgarno: N? K? – kie la vorto estas samtempe la semantika formulo de la ideo mem. Sed Zamenhof elektis la F cheval kaj ne anglan (A) horse, nek la germanan (G) Pferd, nek la rusan (R) loŝad’/kon’ – tamen en la derivaĵo: ‘ĉevaleta’ li ne sekvas la F modelon (dada), sed la R kon’ok (diminutivo



de ‘kon’ eble sub la influo de la A hobby-horse, kp ankaŭ la G Steckenpferd). Kune kun la substantivo TABLO signifanta konkrete meblo-pecon envenis en la novan sistemon ankaŭ ĝia kromsignifo: ‘manĝo’ – teni bonan TABLON; homo, kiun la TABLO ruinigis; la plezuroj de la TABLO. Ja tiaj esprimoj, por certaj lingvanoj (ekz por hungaroj), estas perfekte – sensencaj, nekompreneblaj.

**2.4.** En la kazo de ĈEVALO (kp cheval, Pferd, horse, kon’) la diverslingva traduko estis facila: en ĉiuj lingvoj ĝi apartenas al la sama vortspeco (ĝuste ĉar en ĉiuj lingvoj oni distingas tiujn vortspecojn laŭ la samaj kriterioj). Deviojn ĉe la tradukado kaŭzis nur tiuj vortoj, kies vortklaso ne estis unueca laŭ lingvoj, aŭ (kiel mi demonstris en la cititaj artikoloj) kie la vorto ne estis tradukebla per primara vortformo. Sed tiu traduko koncernas ĉiam vorton kaj ne morfemon: la morfemon oni ne povas traduki alilingven!

### §3. Pri la radikkaraktero

El la diritaĵoj sekvas, ke la radiko havas semantikan/leksikan valoron. La aŭtonomaj vortspecoj estas difinitaj laŭ semantikaj kategorioj – sekve, oni povus kredi, ke tiu semantika enhavo sufiĉas por konstati ilian vortspecon. Ĉio dependas de la difino kaj laborhipotezo. Se oni diras, ke la radiko, ekstraktita el la primara substantivo estas substantiveca (aŭ substantivkaraktera), ekz BROS ekstraktita el BROSO – tion oni povus akcepti (laŭ la difino). Sed el praktika vidpunkto (ekz el la vidpunkto de la lingvolernado): ĉu ne estas pli simple lerni, ke BROSO signifas ilon (ĉar tiel enkondukis ĝin Zamenhof) kaj ĉiuj aliaj derivaĵoj estas jam antaŭkondiĉitaj de tiu ĉi primara formo, ol lerni tion, ke BROS estas substantivkaraktera radiko (kiel ĝenerale nenie oni lernas)?

#### Resume

Por klare priskribi E-on oni distingu inter la vorto kaj vortelemento. Vortspecon havas nur la vorto: nur ĝi povas esti parolelemento. La finaĵo ĉe aŭtonomaj vortoj ne estas pleonasma: ĝi portas la gramatikan/funkcian informaĵon apud la semantika/leksika informado de la radiko.

La aŭtonomaj vortoj (substantivo, adjektivo, verbo) en E-o estas ĉiam minimume duelementaj: TABLO, PERI, ETA ktp. En la novan sistemon Zamenhof enkondukis ne vortelementojn – sed vortojn: li kvazaŭ t r a d u k i s la fontvorton en E-on, la substantivon ‘brosse’ je BROSO. La radiko ekstraktita el la vorto komencis sian novan vivon interne de la nova sistemo, havante eblecon (teorie) kombiniĝi kun ĉiuj aliaj (kaj alitipaj) elementoj de la lingvo. La limoj de la kombinlibereco estas semantik-karakteraj. La vortelementoj estas egalaj nur sur la nivelo de lingvaj signoj. Sed laŭ bone distingeblaj lingvaj kriterioj oni povas ilin grupigi en tri tipojn. Tiujn

ĉi tri tipojn dum la lingvopriskribo ne eblas kaj ne estas konsilinde intermiksi. Eblas konstati la econ de la finaĵbezonaĵoj radikoj laŭ genetikaj respektive semantikaj kriterioj. Sed tiu karakterizo ne estas ekzakta kaj laŭ ĝisnunaj spertoj (instruado, verkado, maŝintradukado) ne estas bezonata por la preciza kaj klara priskribo de la lingvo. Ĉar Esperanto ne estas filozofia lingvo eblas ĝin priskribi ne laŭ logikaj/matematikaj metodoj kaj kriterioj (kp Couturat, de Saussure), sed laŭ la lingvistikaj. Por ĝin kompetente priskribi ne sufiĉas nur la bona praktika regado de la parolo, sed bezonatas ankaŭ ĝeneralaj lingvistikaj konoj.

## § 4. Pri la karaktero de la “elementoj krom la radikoj”

**4.1.** En la V Konstato (pĝ 62) temas fakte pri vortfarado. Pri tiu temo ni ne okupiĝas en ĉi tiu artikolo, eble iam poste. La VI Konstato (pĝ 63) enhavas argumenton, kiu pruvas nian tezon, ke en la lingvon envenis ne radikoj, sed vortoj. Temas pri FIRM kaj PIK. En ambaŭ kazoj estas po du diversaj vortoj – FIRMA=’solida’ kaj FIRMO = ‘komerca’ societo. Post la forlaso de la finaĵoj restis la nuda radiko, kiu (tute hazarde) koincidis. Laŭ la Konstatoj la radiko FIRM estas A-, jen O-kategoria. Laŭ ni – FIRMA estas adjektivo, FIRMO substantivo; same PIKI verbo kaj PIKO (ludkarta figuro) substantivo, sed PIK nek verbo, nek substantivo.

**4.2.** La VII Konstato priskribas la karakteron de la ceteraj elementoj krom la radikoj. Almenaŭ laŭ la enkonduko, ĉar poste evidentiĝas, ke al la *elementoj, krom la radikoj apartenas ankaŭ la adverbe tradukitaj radikoj aŭ E-radikoj* kiuj estas A-kategoriaj (pĝ 63, alineo 9). La strebo perforte enŝovi ĉiun morfemon de la lingva inventaro en unu el tri kategorioj (-O, -A, -I) kaŭzas tutan serion de konfuzaĵoj kaj arbitraj klasigoj. Mem la sistemo devis tuj kompletigi la tri kategoriojn per la kvara: eksterkategoria-kategorio. Do, laŭ la VII Konstato: la elementoj, krom la radikoj ĉu pro ilia reala signifo – *kategorio (afiksoidoj), ĉu pro la funkcioj, kiujn ili ekhavas en efektivaj kunmetoj* estas praktike klasigeblaj en la kvar nomitaj kategorioj. Al la O-kategorio apartenas unu finaĵo (-O) kaj dek naŭ sufiksoidoj. Al la A-kategorio apartenas: du finaĵoj (-A kaj -E), la adverbe tradukitaj radikmorfemoj, kvin *prefiksoidoj*, la primitivaj (nesimetriaĵaj kaj AU-finaĵaj) adverboj, la prepozicioj kaj la interjekcio FI. Al la I-kategorio apartenas la finaĵo -I kaj la parencaĵoj -AS, -IS, -OS, -US, -U; la *afiksoidoj* -IG- kaj IĜ-, la prepozicio PER kaj la interjekcio VE.

### Kritikaj rimarkoj

Terminologio: la 19 O-kategoriajn sufiksojn la Aktoj nomas „sufiksoidoj”, la du I-kategoriajn sufiksojn „afiksoidoj”, La 5 A-kategoriajn prefiksojn „prefiksoidoj” kaj la 4 A-kategoriajn sufiksojn denove „sufiksoidoj”. Iom poste, en la antaŭlasta alineo, la sufikson -OP- nomas „sufikso”, sur la sekva paĝo -ĈJ- kaj -NJ- estas nomataj „kares-

-sufiksoj”, iom poste -AĴ-, -EC-, -UL- estas nomataj „kategorio-sufiksoj” (antaŭe ili estis „sufiksoidoj”), en la X Konstatoj ni trovas, ke -ET-, -EG- kaj -AĈ- *estas veraj sufiksoj, aŭ deriviloj, aŭ modifiloj...*

Se ne temus pri oficialaj „Akademiaj Aktoj” oni povus preteriri tiun terminologian konfuzon. Ekzistas nenia klarigo, kial -OP en unu alineo estas sufiksoido kaj en la alia sufikso. Kial nur -IG kaj -IGĜ estas afiksoidoj ktp.

La afiksaran sistemon ne inventis Zamenhof. Ĝi estas lingva universalajo (aŭ preskaŭ) kaj tre simple modeligebla: afikso=derivilo, prefikso=antaŭa afikso, sufikso=post-afikso (postfikso). Kial la sufikso -OID? Eĉ pli konfuza estas ilia kategoriigo. Ni demonstras tion per kelkaj ekzemploj.

AD – laŭ la Konstatoj – estas O-kategoria. Laŭ la baza tezo -AD devas esti substantivo. Sed AD (kiel ĝenerale la afiksoj) estas kaj polisema kaj polifunkcia. Laŭ unu funkcio ĝi esprimas substantivigitan agon (BROSO~BROSI~BROSADO), sed laŭ alia funkcio ĝi estas pure „verbeca”, ĉar servas por formi verbajn kategoriojn: durativon – PROMENADI; aŭ iterativon – SALTADI.

EK – laŭ la Konstatoj – estas A-kategoria (do adjektivo). La funkcio de EK estas formi momentan aspekton: EKVIDI, EKIRI. Ankaŭ ĝia memstara uzado estas multe pli “verbeca”: EK AL LABORO = ni komencu labori. Kial do A-kategoria?

Plej strangan klarigon oni trovas ĉe la finaĵo -E, *kiu estas propre adjektivo kun alia gramatika rolo*, ekz PATRE estas propre adjektivo kun adverba rolo. Kvazaŭ ni dirus en epidemologio, ke la tifo estas propre variolo kun aliaj simptomoj!

Cetere, la N- kaj J-finaĵoj mankas el la modelo. Tial oni ne scias, ĉu ili estas substantivoj, adjektivoj aŭ verboj.

### 4.3. La eksterkategoria kategorio


Al tiu kategorio klasigas la Konstatoj la morfemojn:

1. ĉiuj elementoj kiuj ĝenerale ne formas kunmetaĵojn (ni tuj notu: principe tiaj elementoj en la sistemo de la lingvo ne ekzistas!);
2. la elementoj, obeantaj specialajn regulojn (ni demandu: kiu konstatas tiujn specialajn regulojn, aŭ ĉu ili latente enestas en la lingvo kaj Zamenhof ne rimarkis ilin?):
  - a) la *numeraloj estas du-kategoriaj: jen O-kategoriaj: du plus du estas kvar*; jen A-kategoriaj: du birdoj. (rimarko: post la intermikso de leksikologiaj kaj morfologiaj kategorioj, jen aperas nova, eĉ pli konfuza miksaĵo: difini morfologian kategorion je leksikologiaj celoj per sintaksaj funkcioj – kvazaŭ ni dirus, ke sinjoro estas jen O-kategoria: *sinjoro plus sinjoro estas sinjoroj*, jen A-kategoria: *sinjoro doktoro*). Poste oni ekscias, ke la O-finaĵo servas por plifortigi la substantivan karakteron, de UNU estas jam substantivo – sed ankaŭ *jen adjektivo*

– kaj UNUO estas pli forta substantivo. *Tamen*, ni legas poste, ĉe la A-finaĵa pluformado tiu O-finaĵo ne konserviĝas (kial ĝi devas konserviĝi?),... *sed estas anstataŭata de la sufikso -OP- (unuopa, centopa)*. Se mi bone komprenis, laŭ tiu Konstato UNUOPA = unuoa (ĉar OP anstataŭas la nekonservitan O-finaĵon)... Ni tamen, el puraj praktikaj celoj, proponus trarigardi la numeralan sistemon de la R lingvo, kies modelon principe sekvis Zamenhof dum la konstruado de sia numeralo sistemo.

- b) En tiu ĉi alineo temas pri la participoj, kaj ni trovas vere surprizan “konstaton”, laŭ kiu.... *la A-finaĵaj kaj la O-finaĵaj formoj estas sendependaj unu de la alia*. Ekz (se ni bone komprenis) inter AMANTA kaj AMANTO ekzistas neniam rilato. Kaj la kaŭzo estas, ke la *O-finaĵo neniam formas la nomon de abstrakta koncepto aŭ kvalito, sed la nomon de estulo aŭ de aĵo, kiu faras – respektive suferas – la agon definitan de la radiko: ĝenerale temas pri persono (amanto, konato)*. En tiu ĉi difino postrestas la dubo: ĉu la signifero “persono” estas deviga aŭ nur ĝenerale uzata? Konkrete: ĉu -ANTO povas signifi ankaŭ aĵon aŭ devige kaj ekskluzive nur personon? Laŭ Zamenhof: *signifas ordinare personon, aŭ objekton, kiu plenumas funkcion*. La zamenhofa ‘funkcio’ estas pli ĝusta ol la vorto ‘ago’ de la Konstatoj (ĉar ne ĉiu verbo esprimas agon, sed funkcion jes).

Laŭ nia opinio inter AMANTA kaj AMANTO estas rilato tre strikta – AMANTA estas participo de la verbo AMI:



La signifero „persono” ĉe ag- kaj statverboj elformiĝis praktike, dum la uzado: tiu, kiu amas; tiu, kiu dormas...

Se el la signifo-komplekso mankas la ero de ago aŭ stato ekestas dilemo: ESTANTO – ĉu estas persono? Jes, ĉar en tiu pozicio la morfemo EST sinonimas kun EKZISTI, sekve ESTANTO ~ EKZISTANTO – tiu, kiu ekzistas. Sed kaj laŭ la Konstatoj, kaj laŭ la zamenhofa difino, ĝi povus signifi ankaŭ: tio, kio ekzistas. Kaj do en tio ni vidas nenian kontraŭdiron, nenion, kio danĝerigus la sistemon mem.

- c) *la pronomoj personaj estas kvazaŭ apartaj substantivoj, en kiuj la O-finaĵo ne estas esprimita: mi(o), mi(o)n, mi-a*. Jen: ankaŭ la pronomoj estas substantivoj (kvazaŭ ni dirus, ke la fiŝoj estas apartaj kaproj, nur mankas al ili la kornoj).

Kiel ni vidis, la substantivoj estas elementoj de la semantika retaro de la sistemo, esprimas iun realaĵeron de la nin ĉirkaŭanta mondo. La pronomoj estas enlingva mikrosistemo, fermata, konstruita en E-o laŭ iu nacilingva modelo. Se ni komparas tri modelojn tuj evidentiĝas, ke Zamenhof sekvis la tipon de A, G, R lingvoj:



Kvankam al kelkaj legantoj ne plaĉas, se mi citas „ekzotikajn” lingvojn, tamen, pro la surpriza simileco, mi citas la sistemon de personaj pronomoj el la franca-kreolo el Reunion:

MI – TI – LI / NI – VI – I

Kp Elodie Jourdain: *Du Français aux parlars creoles*. Paris. 1956.

ĉ) Laŭ tiu Konstato la du kares-sufiksoj estas substantivoj nur se ili uzatas memstare. Se ne – ilia karaktero restas sekreto.

d) La lasta elemento UM estas la plej jen-jena:

- jen substantiva (BUŜUMO),
- jen adjektiva (PROKSIMUMA),
- jen verba (KRUCUMI).

Anstataŭ tiu (vere komplika kaj malfacile divenebla) jen-jeno oni povus simple diri, ke UM havas nek fiksan semantikan, nek fiksan gramatikan enhavon, sekve ĝia signifo kaj gramatika funkcio estas ĉiam aktuala. Eĉ se mi konas la vorton BUŜO, oni malfacile povas diveni, kion signifas BUŜUMO, se oni ne lernis ĝin en tia formo. En PROKSIMUMA ŝajnas ke la UM-fino estas postrestaĵo de la latina interonomo: *proximum* (hazarda koincido). Se ni analizas ĝin laŭ la B-regulo de la vortefiko (pĝ 65):


PROKSIMUMA = PROKSIMO UMA = UMA JE PROKSIMO

povas kaŭzi kapdolorojn ne nur al *profesiaj lingvistoj*, sed ankaŭ al „spertaj esperantistoj”.


Sur tiu neklara kaj nekonsistenca klasigo de E-aj vortelementoj, arbitra kaj konfuza uzo de la plej kutima lingvistika terminologio, ĉiupaŝa intermiksado de leksikaj, gramatikaj kaj eĉ sintaksaj funkcioj, konstruiĝas la vortfara sistemo (enestanta en la sama eldonaĵo<sup>2</sup>), sed pri kies kritiko ni trovos okazon estonte okupiĝi.

Konklude, mi proponas revizii la skemon de E-aj vortelementoj (vortoj?), proponitaj far la Aktoj, kiu aspektas jene:

<sup>2</sup> Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto. N° 9. Aktoj de la Akademio. 1963-1967. Rotterdam-Paris. Sj. (1968?)



kaj reveni al la originala zamenhofa sistemo: multe pli simpla, pli konsekvenca, pli konforma al la lingvosistemo – sekve multe pli scienca kaj pli valora el praktikaj vidpunktoj:



(kiun sistemon akceptis kaj uzis ankaŭ la ofte citita R. de Saussure: *Ces éléments sont de trois espèces. Il y a: 1. les radicaux simples... 2. les affixes... 3. les terminaisons.*

Kp Antido: La construction logique des mots en Espéranto. Genève, 1910. pĝ 8.

Same en: Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en Esperanto. Fotorepreso. Saarbrücken. 1969. pĝ 5.

## La artikolo<sup>1</sup>

**1§** La artikolo<sup>2</sup> estas sinsemantika, deiktika vorteto (= morfemo) uzata determini sian aŭtonoman vorton, al kiu morfologie ĝi rilatas. La artikolo ne povas esti memstara elemento de la strukturo (escepte en difino: “*La*” estas artikolo.)

Rim. R de SAUSSURE uzis ĝin kiel determinativon anstataŭ la pronomo tiu (-j, -n, -jn):

\*Oni kaptis la, kiuj prirabis la butikon.

(Oni kaptis tiujn, kiuj prirabis la butikon.)

Tiu formo ne enradikiĝis, nun ĝi estas konsiderata kiel historia eksperimento arkaisma. PG §76/1.

La artikolo ne estas ĝenerala kategorio. En kelkaj lingvoj ĝi tute mankas (slavaj, latina ktp.) En la komenca periodo, la uzo de la artikolo kaŭzis problemojn, precipe en slavaj medioj. Tio klarigas la Rimarkon al la §1. de la FG: “La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.”<sup>3</sup>

Rim. La konsilo rilate al la uzo de artikolo (“kiel aliaj lingvoj” – ne estas preciza. Estas lingvoj, en kiuj la artikolo estas uzata aglutine-postpozicie. Ekz. rumana: homo = om; la homo = omul; albana: populli; norvega: friheten.

**2§** En Esp-o estas markita nur la kategorio “difina-artikolo”. Ĝi realiĝas per la vorteto *la* aŭ ĝia reduktita formo *l’*. La nedifinitan artikolon esprimas la forlaso de la difina artikolo (nul-artikolo).

|                   | E       | A     | F                  | D                       | H     | R |
|-------------------|---------|-------|--------------------|-------------------------|-------|---|
| difina artikolo   | la (l’) | the   | le<br>la les<br>l’ | der<br>die die<br>das   | a, az | Ø |
| nedifina artikolo | Ø       | a, an | un<br>des<br>une   | ein<br>eine eine<br>ein | egy   | Ø |

<sup>1</sup> Aperis en: Szerdahelyi I. (red) 1976: *Esperantologiaj kajeroj 1.*: 121-131.

<sup>2</sup> La vorto “artikolo” laŭ PV havas tri signifojn: 1. vorteto uzata antaŭ substantivo por ĝin determini; 2. aparte pritraktata temo en gazeto, revuo, vortaro, enciklopedio; 3. ĉiu aparta speco de komercaĵoj, varspeco. En sia tria signifo ĝi estas la sinonimo de “artiklo”. Oni povas nur bedaŭri, ke la vorto “artiklo” ne fariĝis gramatika termino. Kp. A: article; F: article; D: Artikel; S: artikulo; R: АРТИКЛЪ

<sup>3</sup> “...la artikolo estas ja vorto tute aparta kaj sur la konstruon de frazoj ĝi havas nenian influon; tial, se vi volas, vi povas tute ĝin ne uzadi, almenaŭ ĝis la tempo kiam vi tute bone scias ĝian signifon.” Z, LR § 83A

**La uzo de la artikolo**

1. La artikolo estas akcesoraĵo de substantivo (formulo LA -O). Se ĝi antaŭas alian vortspecon, ĝi “substantivigas” la koncernan vorton (konversio).

|                    | A        | F                                | D   |
|--------------------|----------|----------------------------------|---|
| verbo              | play     | dîner                            | schreiben   |
| substantivo        | the play | le dîner                         | das Schreiben   |
| eĉ tutan sintagmon |          | il va et vient<br>le va et vient | an und für sich<br>sein;<br>das An und für<br>sich sein |

La artikolo en Esp-o substantivigas adjektivon: La fortaj helpu al la malfortaj.<sup>KK</sup>  
adverbon: La “tuj” de sinjoroj estas multe da horoj.<sup>Z</sup>  
faras komunan substantivon el propra: Li estas la heraklo de la vilaĝo.<sup>KK</sup>

2. En la opozicio difinita/nedifinita la artikolo signas difinitecon. Difinita estas tio, kio ne estas anstataŭebla per alia individuo de la sama kategorio aŭ speco (X~X);  
En la opozicio nombrebla/nenombrebla esprimas la nombreblecon. Nombrebla estas tio, kio prezentiĝas en apartaj individuoj de la speco (ekz. homo, pomo ktp.). Nenombrebla estas tio, kio estas reprezentata amase (ekz. iu materialo, oro, fero, aero) kaj la abstraktaĵoj (amo ktp.). (Y~Y)

|                | Y <sub>1</sub> | Y <sub>2</sub>        |
|----------------|----------------|-----------------------|
| X <sub>1</sub> | A A man        | We eat bread.         |
|                | F Uun homme    | Nou mangeons du pain. |
|                | D Ein Mann     | Wir essen Brot.       |
|                | A Un hombre    | Comemos pan.          |
|                | R ЧЕЛОВЕК      | Мы едим хлеб.         |
|                | E Homo         | Ni manĝas panon.      |

|                | Y1          | Y2                      |
|----------------|-------------|-------------------------|
| X <sub>2</sub> | A The man   | Bread is necessary.     |
|                | F L'homme   | Le pain est nécessaire. |
|                | D Der Mann  | Das Brot ist notwendig. |
|                | S El hombre | El pan es necesario.    |
|                | R ЧЕЛОВЕК   | ХЛЕБ – НЕОБХОДИМ.       |
|                | E La homo   | La pano estas necesa.   |



Rim. La rusa lingvo esprimas morfologie la difinitecon/nedifinitecon. Ekz. ĉe neado per la uzo de akuzativo, respektive genitivo:

Mi ne vidas la libron.

Я НЕ ВИЖУ КНИГУ.

Mi ne vidas libron.

Я НЕ ВИЖУ КНИГ.

En la rilato X1 – Y1 la nedifina artikolo esprimas, ke eblas nombreblico kaj anstataŭebleco;

En la rilato X1 – Y2 la artikolo montras ke la anstataŭado eblas sed la nombrado ne;

En la rilato X2 – Y1 la artikolo montras, ke la anstataŭado ne eblas, sed la nombrado eblas;

En la rilato X2 – Y2 la artikolo montras, ke nek anstataŭado, nek nombrado eblas.

Por esprimi la nedifinan artikolon la rusa lingvo uzas artikole la numeralon unu (evitenda!): ekz.: Envenis (unu) kamarado kaj alportis (unu) libron.

Verŝajne tiu “numerala artikolo” influis la aŭtoron de la lingvo uzi konsekvencaj artikole la numeralon unu en la komenca periodo:

ekz.: Unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton.<sup>Z</sup>

Per la numeralo Z distingis la unuflankan nedifinitecon disde la duflanka:

Li parolis pri hundo admirinde dresita.<sup>Z</sup>

(Unuflanka nedifiniteco = nur la parolanto konas la koncernan aferon kaj povus ĝin nomi, sed la alparolato(j) ne. Duflanka nedifiniteco = nek la parolanto, nek la alparolato(j) konas la koncernan aferon.)

La lingvoevoluo ne konservis tiun formon. Nun oni uzas la numeralon “unu” nur kiam temas pri efektiva nombro (Li havis unu filon kaj du filinojn. PG § 85 A/I.).

La difiniteco signifas, ke la koncerna substantivo estas konata kaj de parolanto kaj de alparolato(j). En tiu kazo la uzo de difina artikolo estas deviga: *Mi aĉetis la libron.* (temas pri libro, pri kiu kaj la informanto kaj la informato scias.) Ĉar: *Mi aĉetis libron.* (La informato ne konas la libron.) En tiu kazo la artikolo semantike havas la valoron de **tiu**: *Mi aĉetis tiun libron...* (pri kiu ni parolis hieraŭ).

### 3§ Krom sia ĉefa funkcio, **la artikolo estas uzata en la sekvaj kazoj**:

1. La unika artikolo signas, ke temas pri ununura, sola: *la suno, la ĉielo, la infero.* Ekz.: La filo de la reĝo renkontis ŝin. (la reĝo havis nur unu filon.)
2. Antaŭ substantivoj, signifantaj korpopartojn aŭ vestaĵon havas la valoron de poseda pronomo:

vundis la manon. (= Li vundis sian manon.)

Ĝentile mi levis la ĉapelon. (t.e. mian ĉapelon)

Rim. Analogie uzis artikolon Zamenhof antaŭ la substantivoj, signifantaj familianojn, parencojn:

Mi venas de la patro kaj mi iras al la onklo.

Nuntempe, en tiu strukturo oni forlasas la artikolon:

Mi venas de patro kaj iras al onklo.

3. En la komparado de adjektivo kaj adverbo:

Antaŭ *pli* (la pli -a) transformas komparativon en relativan superlativon (kiam la komparo koncernas nur du aferojn): *la pli forta el la manoj*.

Antaŭ *plej* distingas la adjektivan superlativon disde la adverba:

La plej kara Kalevido  
sur la patran tombon paŝas...<sup>hD</sup>

4. Antaŭ deverba substantivo en la transformo:

Alvenis la printempo – la alveno de la printempo.

Oni fermis la pordon – la fermo de la pordo.

5. En la korelativo unu – alia (reciproka pronomo);

Komprenante unu la alian...<sup>Z</sup>

Helpante unu al la alia...

6. Distingas la du funkciojn de la poseda pronomo

Mia libro estas pli interesa ol la via. (sed: ... ol via libro).

(En poeziaj inverzioj ofte konserviĝas: *Irante al la litoj viaj*. (Irante al viaj litoj.)

### Oni ne uzas artikolon:

1. antaŭ vokativo: *Forte ni staru, fratoj amataj...*<sup>Z</sup>

2. kune kun la vortoj:

da, ĉiuj, ĉiu, kies, ties, ambaŭ,

(sed oni uzas artikolon antaŭ: tuta, cetera)

3. en proverboj la artikolo ofte forlasatas:

Leĝo pasintaĵon ne tuŝas. (La leĝo ne tuŝas la pasintaĵon.)

4§ Antaŭ propraj nomoj la difina artikolo estas superflua.

**1. Antroponimiko:** *Kaj Adamo donis al sia edzino nomon Eva.*<sup>Z</sup>

Rim. Oni uzas artikolon se la personan nomon antaŭas adjektiva epiteto. Ekz. Zamenhof korektis en la pres-provaĵo la sekvajn frazojn de Kabe: *Tre baldaŭ granda Ramzes foriros en la regnon de l'ombroj...* kaj *...ĉar per la buŝo de l'estroj senmorta Oziris parolas...* jene: *Tre baldaŭ la granda Ramzes...* kaj *...ĉar per la buŝo de l'estroj la senmorta Oziris parolas...*

Oni ne uzas artikolon, se la propra nomo estas anstataŭata far nominacio: *sinjoro, doktoro, profesoro, kamarado, fraŭlino* ktp. nur se la blokon antaŭas adjektiva epiteto: *genia doktoro Zamenhof*; same: *sinjoro la vicgrafo, Ludoviko la Dua, Johano la Brava, Rikardo la Leonkora*.

Rim. Antaŭ la adjektivoj *sankta* kaj *beata* oni ne uzas artikolon: *Sankta Johano, Beata Angelika*.

**2. Toponimiko** – Oni ne uzas artikolon antaŭ land-, urb- kaj vilaĝnomoj:

Kaj de Aroero ĝis urbo Minito

Kaj poste ĝis Avel-Kerumo

Triumfas Izrael en sanga milito

Per glavo, per fajro kaj fumo...<sup>aK</sup>

antaŭ la nomo de maro, lago, rivero, monto: *Oni veturas al Bosforo.<sup>Z</sup> Tamizo, Danubo, Rajno* ankoraŭ ruliĝas.

Riĉa hotelo sur la supro de Olimpo<sup>Z</sup>

Rim. Oni uzas artikolon antaŭ epitetita toponimio:

a) la Ruĝa Maro; la Blua Rivero; la Monto Blanka;

b) la tuta Italujo<sup>Z</sup>; la larĝa Danubo<sup>Z</sup>;

c) la rivero Gango<sup>Z</sup>; la monto Karmel<sup>Z</sup>;

Kiom permesas la komuna voĉo

De tuta la Danujo...<sup>Z</sup>

La orientpunktoj estas konsiderataj komunaj nomoj, sekve oni uzas antaŭ ili artikolon:

Homoj en la oriento

Homoj en la okcidento

En la sud' kaj en la nord'!<sup>Z</sup>

### 3. Kalendaraj nomoj kaj esprimoj

a) la nomoj de tempodividoj ne toleras artikolon:

Januaro estas la unua monato de la jaro.<sup>Z</sup>

Hodiaŭ estas sabato.<sup>Z</sup>

Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago...<sup>Z</sup>

(La sintagmon *de l'mateno ĝis vespero* (1888) Zamenhof poste korektis je: *de mateno ĝis vespero*.)

Rim. Antaŭ la orda numeralo, signanta daton la uzo de artikolo estas deviga.

Hodiaŭ estas la dudeksepa de Marto.<sup>Z</sup>

La uzo de la artikolo kun la nomoj de sezonoj dependas de ilia predikato.

Kiam ili estas la subjektoj de agverbaj predikatoj, oni uzas la artikolon:

Nun komenciĝas la vintro. Jen aperis la printempo. Venis la vintro.

Kiam ili estas la subjektoj de statverboj, oni preterlasas la artikolon:

Kaj estis printempo kaj fariĝis somero. En somero ni veturas per diversaj veturiloj.<sup>Z</sup>

b) Oni ne uzas artikolon antaŭ la nomoj de festoj: *Pasko, Pentekosto, Kristnasko, Ramadano*.

Rim. Oni uzas artikolon, se

a) la festonomo estas antaŭata de adjektivo: *la Sankta Silvestro*,

b) far numeralo: *la Tri Reĝoj, la Unua de Majo*

c) far la bloko *la tago de aŭ la festo de*:

la tago de Sankta Johano (= la Johana tago),

d) se la festonomo estas uzata nur plurale (pluralia tantum):

la Palmaĵoj, la Mortintoj,

e) se la festonomo konsistas el genitiva rilato:

la Koncipiteco de Maria (same: la Kristokorpo = la korpo de Kristo).

4. Kvankam propraj nomoj, tamen estas antaŭataj de artikolo:

a) nomoj de ŝipoj, gastejoj ktp.;

- Li ekloĝis en la Tri Cervoj. Li veturis per la Titanic.
- b) titoloj de verkoj:  
la Eneido, la Odiseado, la Plena Vortaro;
- c) titoloj de societoj: *la Universala Esperanto-Asocio*, (sed antaŭ akronimoj (UEA) ne!)  
Rim.
- a) La form-redukcio de la artikolo (l') ne influas ĝian valoron. La formredukado estas operacio pure fonetika.
- b) Krom la uzado en denombritaj funkcioj, en aliaj lingvoj la artikolo distingas genron:
- D: der Hausa = la haŭso  
die Hausa = la haŭsino
- F: le chat = la kato  
la chat = la katino
- nombrojn:
- D: das Fenster = la fenestro  
die Fenster = la fenestroj
- kazon: D: der Tisch = la tablo  
den Tisch = la tablon

### 5§ La loko de la artikolo en la sintagmo

La artikolo ne estas sintagmo-membro nur kun la rilatanta vorto. En Esp-o la artikolo antaŭas la aŭtonoman vorton (precipe substantivon):

LA -O

LA -A -O aŭ -O... LA -A.

La prepozicio (Pr) antaŭas la artikolon:

Pr LA -O : *sub la signo*

Pr LA -A -O : *sub la sankta signo de l'espero<sup>Z</sup>*

En poezio oni trovas ofte inverziojn:

- a) la inverzio -A LA -O havas ofte la signifon:  
-O ESTAS -A. : Bela, juna la floreto..<sup>Z</sup> ('La floreto estas bela, juna').  
La kamp' estas larĝ' kaj rekta la voj'...<sup>Z</sup>
- b) la inverzio -O LA -A emfazas la kvaliton:  
Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
Perdiĝis sub l'akvoturnado;<sup>Z</sup>
- c) inverzio Pr -A LA -O  
Vi kial flugas en malvarmo  
Tra flora la tombejo?<sup>eP</sup>  
Post longa migrado sur dorna la voj...<sup>aG</sup>
- d) eĉ hiperbaton ni trovas:  
La lasta reĝo, kies la figuro  
Ĵus antaŭ ni aperis...<sup>Z</sup>  
(*la kies figuro... gramatike estas neĝusta!*)

## Historio

En la komenca periodo disvolviĝas akra disputo pri la artikolo. Zamenhof vicigas la demandon inter la problemojn solveblajn:

“La artikolon “la” oni povas ne uzi. Tio ĉi ankaŭ konfuzos neniun (en okazoj de bezono oni povas helpi al si per la vorto “tiu” aŭ alia); dume por ĉiuj popoloj slavaj, kiuj ne scias la uzon de artikolo, ĝi estos granda faciligo.” (Z, Esperantisto, 1892., N-ro 4., OV p.149.)

S. A. Lundström respondas:

“la tria punkto pri la forigo de l’artikolo kontraŭe ŝajnas al mi tre grava. Vere ĝi estos granda faciligo por la slavoj, kiuj ne scias la uzon de l’artikolo, sed aliflanke ĝi estos por la aliaj popoloj granda malfaciligo kaj ekster tio por la lingvo mem granda malplibonigo. La lingvo ja estas tiel konstruita, ke la artikolo oftege povas esti ellasata sen neklareco, se oni ne komprenas ĝian uzon, sed aliflanke ĝi havas eksterordinare grandegan signifon se oni komprenas ĝin ĝuste uzi. Tiuj, kiuj ne komprenas ĝian uzon, povas ĝin tiel ellasi, sed tute forigi ĝin el la lingvo ne estos plibonigo, sed tute certe granda malplibonigo. Pri tiu ĉi punkto mi sekve serioze konsilas: ne faru eĉ ian ŝanĝon en la uzo de l’artikolo.”

(Samopiniis la plej elstaraj esp-istoj, inter ili Grabowski, Trompeter, Ŝmurlo ktp.) En “La Revuo”, 1906, decembro Zamenhof skribas pri la artikolo:

“Tute vane vi faras al vi multe da klopodoj kun la uzado de la artikolo. Vi devas memori, ke en nia lingvo la uzado de la artikolo ne estas devige; sekve la plej bona maniero de agado estas jene: uzu la artikolon tiam, kiam vi scias certe, ke ĝia uzado estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj dubaj okazoj tute ĝin ne uzu. Pli bone estas ne uzi la artikolon en tia okazo, kiam ĝi estas necesa, ol uzi ĝin tiam, kiam la logiko kaj la kutimoj de ĉiuj popoloj ĝin malpermesas. Se vi ekzemple diras “venis tago, kiun mi tiel longe atendis”, via frazo estos ne tute bonstila, sed ne rekte erara, kvankam oni devus tie ĉi diri “la tago”; sed se vi diros “hodiaŭ estas la dimanĉo” anstataŭ “hodiaŭ estas dimanĉo”, tiam vi faros rekte eraron, kiu estos malagrable por la oreloj de ĉiu bona esperantisto.”

LR § 83 B

Rim. La lingvopraktiko jam solvis la disputon. La artikolo, kiel kategorio grava en la plej grandaj eŭropaj lingvoj, havas sian didaktikan valoron por tiuj lingvanoj, en kies lingvo la artikolo mankas. En Sovetunio en ĉiu lernejo oni instruas fremdan lingvon: anglan, francan, germanan, hispanan. Por la ruslingvaj gelernantoj la Esp-a artikolo antaŭpreparas la komprenon de la kategorio en la aliaj lingvoj, aŭ, se oni lernas Esp-on post tiuj lingvoj, la kategorio kaŭzos neniam malfacilaĵon.

**Mallongigoj**

|                      |                         |
|----------------------|-------------------------|
| A angla lingvo       | hD Hilda Dresen         |
| D germana lingvo     | aK Antoni Kofman        |
| F franca lingvo      | eP Edmond Privat        |
| H hungara lingvo     | aG Antoni Grabowski     |
| R rusa lingvo        | PG Plena Gramatiko      |
| S hispana lingvo     | PV Plena Vortaro        |
| Rim rimarko(j)       | FG Fundamenta Gramatiko |
| Z Zamenhof           | LR Lingvaj Respondoj    |
| KK Kolomano Kalocsay | OV Originala Verkaro    |

## CI: ĉu mortnaskita?<sup>1</sup>

Inter la plej diskutataj leksemoj de E-inventaro estas certe la pronomo CI. Kelkaj Esperantologoj eĉ anatemis ĝin kiel superflua, nenecesa.

La kategorio **persona pronomo** en la diversaj lingvoj de la mondo konsistigas eble la plej interesan kaj elastan sistemon. Kompreneble, ĉar tiu kategorio esprimas la plej personajn interrilatojn de la parolanto kun la ĉirkaŭanta lin mondo: lian opinion, sintenon, koncepton, estimon aŭ malestimon, simpatian, aman aŭ respekton. La pronomo kaj la interjekcio estas la plej subjektivaj vortoj de la homa lingvo. Sekve, la pronomo respegulas certgrade la socian strukturon, kutimojn kaj pensmanieron de la uzantoj.

Analizante iun elementon de E-o oni devas ĉiam pensi “interlingve”: neniu problemo estas solvebla spekulative, tra la spektro de iu nacia lingvo – estu ĝi tiel aŭtoritata, kiel la angla! Ke la angla lingvo perdis sian pronomon thou kaj havas nur la neŭtran formon you tute ne signifas, ke ankaŭ en E-o devas tia okazi. Estas vere, ke en E-socio, en vivaj parolsituacioj ĉi estas neniam uzata. Mi mem neniam uzas ĝin, eĉ parolante kun amikoj kun kiuj en naciaj lingvoj ni “interciadas”. El tio sekvas, ke la pronomo ĉi ne estas kategorio de ĉiutaga parolo kaj konversacio.

Sed, ĉar E-o estas interlingvo, ĝi nepre devas priatenti la internajn strukturojn de la ceteraj lingvoj. Preskaŭ en ĉiu lingvo vivas la opozicio VI – CI, kaj per tiu paro oni esprimas sociajn interrilatojn, oficialajn kaj intimajn inter subuloj kaj superuloj, gepatroj kaj gefiloj, viroj kaj virinoj ktp. En multaj lingvoj ĝi estas duapersona multenombra (alparolo al la monarko adekvate al reĝa mi, la francdevena: *vous*, rusa: *bbl*; en aliaj lingvoj havante apartan singularon kaj pluralon kiel hispana: *usted, ustedes*, portugala: *vossencia, voce, mece, vosse*. Aliaj lingvoj esprimas ĝin triapersona, laŭ la hispana modelo: *el senor*, ktp. Komparu la italan: *li, le, egli, ella, lei*; la germanan: *sie*, la norvegan: *de*). La Esperanta transkodigo de tiuj kategorioj jam en si mem motivas la vivrajton de **ci** apud **vi**.

Ne nur en tradukaĵoj aperas ĉi. Ankaŭ en originala prozo ĝi uzatas, kiam la verkisto kreas tian situacion, en kiu la ciado kaj viado ludas gravan rolon en la formigo de karakteroj. En la romano de Julio Baghy: *Hura!* La potenca Jenlafiŝ kvazaŭ vendas la permeson de ciado al sia subulo Krak kontraŭ ia servo. Tiu propono tiel ŝokas la ruzan karieriston Krak, ke li povas nur balbuti:

- Espereble, ĉi ne koleras pro ciado? Finfine mi estas ja pli ...
- Ho, granda, jes ... vere tre granda honoro por mi ke... ke... ĉi bonvolas tiel umi..., distingumi...

Eĉ Baghy kreas apartan saluton por la interciantoj: *Servus* (ne kreas, sed tute simple prunteprenas ĝin el la hungara; cetere, la tuta situacio, kvankam ĝi okazas en iu Bagonio – verŝajne el Bag(hy)? – ĝi spegulas perfekte la hungaran situacion el 1930-jaroj.)

<sup>1</sup> Aperis en: Literatura Foiro, 1970 (1)/3: 11-12. kaj en: Szerdahelyi I. (red.) 1976: Esperantologiaj kajeroj 1. Budapeŝto: ELTE, 133-135

Kontraŭ la neŭtra, senkarakteraj *vi* – la pronomo *ci* havas ankaŭ afekcian nuancon. Puŝkin verse analizas ĉi tiun diferencon en sia poemeto. Ŝi (la virino) anstataŭis la dezertan vorton *vi* per kora vorto *ci*, kaj tiu simpla vortŝanĝo amorsoifajn revojn vekis en la amebria koro. La junulo staras antaŭ ŝi ravita, kaj:

Mi diras al ŝi: Kiel kara vi estas,

Kaj mi pensas: Kiel mi amas *cin*.

Tute similan bildon ni trovas ĉe Eli Urbanova:

En sonĝo nur

ni pekas sen pudoro

regataj de pasi

en sonĝo nur

mi tra feliĉa ploro diradas al vi: ci!

(En sonĝo nur...)

Konklude: CI estas pure literatura kategorio, elemento de skriba lingvo, kiu konvinke pravas ke inter la parola kaj skriba stilo estas ne nur formala, sed ankaŭ enhava diferenco.



## Onomastiko en Esperanto<sup>1</sup>

Inter la nesolvitaj problemoj de la Esperanta lingvistiko okupas firman lokon la problemo de propraj nomoj. Tamen, ĉi-rilate ni ne devas honti: ankaŭ la ĝenerala lingvistiko kaj la specialaj lingvistikoj ne solvis ĝin unusence. Ekzistas kelkaj, tre malproksimaj unu de la aliaj, konceptoj. La ekstremo estas la absoluta neado de la lingvistika karaktero de propraj nomoj.

Lasttempe tiam pli kaj pli ofte ni trovas monografiojn, traktantaj nian temon. Evidentiĝis, ke la onomastiko – t.e. la studo de propraj nomoj, tamen apartenas al la lingvistiko, ĉar propraj nomoj estas ja vortoj, kiel vortoj formas ian sistemon kaj tiu sistemo enestas en la sistemo de la konkreta lingvo.

Ekzemple, la andronimoj havas ja morfologian karakteron: ili povas havi genron, povas deklinaciigi oni devas kun ili akordigi la epiteton ktp, do, formale ili nepre postulas gramatikan studon. La problemo estas plie enhava. Tamen, sen la enprofundiĝo en la problemon; ni konstata, ke la andronimoj intime apartenas al la ĉiutaga vivo de tiu popolo kaj ilia socia uzado havas striktajn regulojn.

La nomoj povas havi afekcian valoron: oni parolas pri seriozaj, belaj, komikaj ktp nomoj. Dum la milito, ekzemple la germanoj nomis. la rusojn „Ivan“, la rusoj la germanojn „Fric“. En tiu senco du karakterizaj nomoj signifis ne iun, sed ĝenerale rusion, respektive germanon. Post la morto de Cromwell (1658) en Britujo dum cent jaroj neniun oni baptis „Oliver“, simile en Vieno inter 1938 kaj 1958 ne troviĝas en matrikuloj kiel nomo de novnaskito „Adolf“. Ĉe hispanoj la nomo „Sancho“ ĝis la apero de „Don Kihoto“ estis ofta nomo de nobeluloj, Post la disvastiĝo kaj populariĝo de la romano ĝi akiris komikan nuancon<sup>3</sup>.

La lingva etiketo en ĉiu lingvo reguligas la esprimon de intimeco, oficialeco aŭ kareso, ekzistas formoj oficialaj, neŭtraj, ktp. Ne obei tiujn regulojn signifas ofendi la nom-portanton. Jes, ni prenu ekzemplon el la rusa lingvo<sup>4</sup>. Iun viron, nomatan *Pavel* (Paŭlo) oni povas nomi *Pasa*, *Pavlik*, *Pavluša* ktp. (havas ĉirkaŭ 25 karesajn kaj diminutivajn formojn, sed ĉiuj kun alia nuanco!), aŭ alparoli *Pavel*, *Pavel Mihajloviĉ*, *Pável Vlasov*, aŭ simple *Vlasov*, sed ĉiuj estas diversaj situacioj, ĉiuj havas alian signifon kaj motivas alian interrilaton inter la alparolanto kaj la alparolato,

La tradukistoj (antaŭ ol solvi la problemon de la tradukado de la propraj nomoj) devas perfekte koni tiujn sociajn regulojn, kiuj koncernas la uzadon de la propraj nomoj, precipe andronimoj. Ni vidu ekzemplon el la franca, itala kaj hispana tradukaĵoj de la romano *La Patrino*. La nomo de la patrino estas: *Pelageja Nilovna Vlasova*. Tiu ĉi formo estas la kompleta, oficiala nomo.

<sup>1</sup> Aperis en: *Literatura Foiro*. 1971/6: 12-14.

<sup>2</sup> Razvitije metodov toponimiĉeskikh issledovanĵij, Moskvo.

<sup>3</sup> Smith, E.: *Treasury of name lore*, New York, 1967, p. 196.

<sup>4</sup> Ĉiujn ekzemplojn, koncernantajn la rusan lingvon mi prenis el la romano de Gorkij•”*La Patrino*“

PELAGEJA – estas la ingenra formo de la virnomo PELAGEJ, el la greka vorto pelagios, signifanta: ‚mara‘, ‚marista‘

NILOVNA – estas la patronimo. La nomo de ŝia patro estis NIL (+OVIĈ ĉe viroj kaj +OVNA ĉe virinoj)

VLASOVA – familia nomo (ingenra varianto de VLASOV)

a)

Qu'est-ce qu'il faut faire? – demanda Pélagie...

Che cosa si deve fare? – domandò la Vlassova...

Que hay hacer? – preguntò la madre...

b)

C'est vous? – s'écrivira Pélagie...

Siete voi? – esclamò la Vlassova...

!Es usted! – gritò alegremente

c)

Dans la pièce où se trouva Pélagie...

Nella stanza ove sedeva la made...

...entrò en el cuarto donde estaba Pelagia

d)

Vous êtes fatiguée, Nilovna?

Nilovna, siete stanca?

Estarà usted cansada, Pelagia?

## Resume

|   |            |         |          |          |
|---|------------|---------|----------|----------|
| A | la patrino | Pélagie | Vlasova  | la madre |
| B | Pelageja   | Pélagie | Vlasova  | Pelagia  |
| C | la patrino | Pélagie | La madre | Pelagia  |
| D | Nilovna    | Nilovna | Nilovna  | Pelagia  |
|   | originalo  | franca  | itala    | hispana  |

En la lasta kazo (d) la nomo Pelargia (hispana) estas granda eraro de la tradukisto. Tiujn vortojn diras al la patrino Sofija kiu antaŭ kelkaj paĝoj diris al ŝi: “Mi nomos vin Nilovna; Pelageja ne konvenas al vi...” Ekde tiu momento Sofija neniam plu alparolis la patronon “Pelagia” – kiel tion faras la hispana tradukaĵo!

Aparta problemo estas la traduko de propraj nomoj. Pli ĝuste la transkodigo. “Stefano” ne estas la traduko de Stjepan, István aŭ Etienne, nur la Esperanta formo de la koncernaj nomoj. La nomo devenas de la greka “stephanos” kiu signifas ‘kronito’. Do, temas pli ĝuste pri iaforma speciala sinonimo, sed nepre ne traduko.

La transiro de propraj nomoj el unu lingvo en aliajn povas okazi diversforme kaj diversnivele:

1. Lasi la grafikan formon senŝanĝe, ekz. New York, István
2. Sur grafika nivelo: Nev-Jork, Iŝtvan
3. Sur fonema nivelo: Nju-Jork, Iŝtvan
4. Transkodigo sur morfema nivelo: Novjorko, Stefano
5. Transkodigo sur leksema nivelo: Nova urbo, Monto Blanka

En Esperanto preskaŭ ĉiu el tiuj ĉi 5 eblecoj havas siajn adeptojn. Tamen lastatempe oni povas rimarki ian tendencon al la unua formo: ne ŝanĝi la originalan grafikan korpon de la nomoj (precipe en andronimio). Oni povas rimarki, ekz. ĉe niaj verkistoj: en la klasika periodo oni uzis prefere la Esperantajn variantoj (Julio, Kolomano) en la moderna – la originalajn: William, Marjorie, Baldur, Edwin ktp. Kaj tiu tendenco estas tute ĝusta: neniun oni baptas Kolomano sed Kálmán, Julio sed Gyula. La Esperantaj nomoj ne havas realan socian bazon, ili povas nur akcesore helpi en kazo de nepra bezono.

Ĉe la nomoj, transprenitaj el lingvoj uzantaj ne-latinan alfabeton la solvo estas la transkodigo sur fonema nivelo, do: *Pavel* restas Pavel kaj ne Paŭlo, *Jakov* restas Jakov kaj ne Jakobo. Tion faras ankaŭ la rusoj: en Moskvo mi estis ĉiam *Istvan* kaj neniam oni nomis min Stjepan.

Per la nacia varianto la teksto perdas sian originalan atmosferon, aromon. Jen ekzemplo el la romano:

F: Est-ce que vous ne boiriez pas du lait avant de partir? – demanda Jacques.

I: Prendete un po' di latte prima di mettermi in cammino? – disse Giacomo.

H: ?Quiere usted beber un poco de lache antaes de partis? – preguntò Jacobo

Ĉu ruse povas esti Jacques, Giacomo aŭ Jacobo? Cetere Jakov devenas pli rekte el la originalo hebrea: Iàqōb 'li sekvas iun'.

Do mi ankaŭ subskribas ĉiam ne Stefano, sed

*István Szerdahelyi*



## La enhava (semantika) aspekto de la morfemaro<sup>1</sup>

Jam WARINGHIEN rimarkis, ke inter la formala etimo kaj ĝia enhavo estas ĉe kelkaj morfemoj devioj sub la influo de alia lingvo (“...tri lingvoj plej familiaraj al Zamenhof estis la rusa, pola kaj germana: tial okazis, ke la ideokompleksoj de tiuj lingvoj tute nature trudiĝis al lia penso”, 1959)

|          |  |
|----------|--|
| E AGORD  | F accorder, I accordare = ĝustigi muzikilon, sub influo de<br>G stimmen = inklinigi, humorigi iun al io  |
| E KOLEKT | L colligere } R собирать, ekz. kolekti pajlon<br>A to collect }  |
| E ŜIR    | F déchirer (ekz. ŝiri siajn ŝtrumpojn)<br>R ravatj Ŝiru rozojn! (en F signifus: ‘dispecigu rozojn’)      |
| E AKCEPT | ne la F accepter<br>A to accept, sed L accipere = F recevoir<br>A to receive                             |
| E OFER   | L offere = F sacrifier sed ne: F offrir<br>G opfern I sacrificare I offrire<br>A to sacrifice A to offer |
| E ĜENTIL | I gentile sed ne F gentile }<br>A gentle }   |
| E LERT   | laŭforme F alerte } laŭenhave R lovkij<br>A alert }  |

La plej grava demando (ĝis nun ne sufiĉe studata) estas: la morfemo, envenanta en la novan sistemon (E-on), kiom da semem-eroj kunportis krom la baza (ĉefa) signifo.

Ni vidu ekzemplon. Por la ideo “tablo” Z estus povinta elekti el diversaj lingvoj, konataj far li: A table (tejbl), F table (tabl). G Tisch (tiŝ), L mensa, R stol ktp. Li elektis la F, A (kp. ankaŭ, L tabula) formon: TABLo. Sed en ĉiuj menciitaj lingvoj al la vorto, signifanta baze la meblon, algluiĝas aldonaj ideoj. La lingvo ja ne estas inventaro de son(liter) korpoj, respondantaj al unu sola objekto de la realaĵo, kiel prave konstatas Martinet (1960: 14.).

“Laŭ tiu naiva koncepto la mondo estas granda magazeno de objektoj, materiaj kaj nemateriaj, kaj la lingvo simple konstruas inventaron de tiu magazeno, markante per unu etikedo nur unusolan objekton el tiu magazeno.”

La vortoj ne nur diversmaniere nomas la samajn objektojn kaj ideojn, sed (kiel jam vidita) respegulas diversan mond-strukturon, diversan interrilaton de la objektoj kaj fenomenoj en la homa konscio.

<sup>1</sup> Estas parto (paĝoj 76-89) de la ĉapitro *La Esperanta morfemaro*. En: Szerdahelyi I. (red.) 1976: *Esperantologiaj kajeroj* 1.: 61-134

La semantika modelo de TABLE en la **F lingvo**:

1. meblo
2. manĝo
3. kuirarto
4. societo (ĉetabla) ..... tablée
5. komuniejo
6. tabelo ..... tableau
7. stablo
8. plato
9. tegaĵo
10. indekso
11. podio
12. faktermino en geografio kaj medicino

Genetikaj parencoj kaj derivaĵoj: tablette, tabler, tablier, tabletier, tablement, tableautin, tableur, tabloin...

La modelo de TABL (tebl) en la **A lingvo**:

| <b>table</b>                  | <b>tabling</b>         |
|-------------------------------|------------------------|
| 1. meblo                      |                        |
| 2. manĝantaro (societo) ..... | 1. sidordo ĉe la tablo |
| 3. tabelo .....               | 2. tabelo              |
| 4. tabulo .....               | 3. tabulo              |
| 5. plato                      | 4. klasifiko           |
| 6. plataĵo                    | 5. enlistigo           |
| 7. lameno                     |                        |

#### **to table**

- |                                   |                                     |
|-----------------------------------|-------------------------------------|
| 1. meti sur tablon                |                                     |
| 2. ekludi ludkarton               | ↗ (brita) prezentado de leĝopropono |
| 3. prezenti (ekz. leĝoproponon).. | 6.                                  |
| 4. alĝustigi (unu al la alia)     | ↘ (usona) prokrasto de leĝopropono  |

Genetikaj parencoj: **tableau**

1. grupbildo
2. drama bildo
3. drama situacio

#### **tablet**

1. memortabulo
2. tablojdo ..... tabloid

En **R** la koresponda vorto СТОЛ havas la sekvan semantikan kampon:

|               |                         |                   |
|---------------|-------------------------|-------------------|
| 1. meblo      | СТОЛИК, СТОЛИЩЕ         | tableto           |
|               | СТОЛЕШНИЦА              | tablotuko         |
|               | СТОЛЕШНИК               | tabloplato        |
| 2. tabloplato | СТОЛЯР, СТОЛЯРИХА       | meblisto, -edzino |
|               | СТОЛЯРИТЬ, СТОЛЯРНИЧАТЬ | meblisti, -adi    |

|                           |  |                         |
|---------------------------|--|-------------------------|
|                           | СТОЛЯРНЫЙ  | meblista, lignaĵa       |
|                           | СТОЛЯРНАЯ/СТОЛЯРНЯ   | meblistejo              |
|                           | СТОЛЯРСКИЙ   | meblista                |
|                           | ТОЛЯРСТВО  | meblisteco              |
| 3. manĝ/o, -ado, -aĵo     | СТОЛОВАЯ   | manĝejo                 |
|                           | СТОЛОВКА   | kantino                 |
|                           | СТОЛОВАТЬСЯ  | manĝi, nutri sin        |
|                           | СТОЛОВАНИЕ   | manĝado                 |
|                           | СТОЛОВНИК  | manĝgasto(aboninta)     |
| 4. ofico, sekcio, kontoro | СТОЛОНАЧАЛНИК  | sekciestro, kontorestro |
| 5. trono                  | СТОЛИЦА (СТОЛЬНЫЙ город)                                   | ĉefurbo                 |
|                           | СТОЛЬИЧНЫЙ   | ĉefurba                 |
| 6. Faktermino             | a) militafera; b) mineralogia                              |                         |
|                           | Vortoj rilatantaj al morfemo TABL en R lingvo              |                         |
| ТАБЛЬДОТ                  | Комуна tagmanĝa tablo en pensionoj, hoteloj, gastejoj k.s. |                         |
| ТАБЕЛЬ                    | 1. tabelo, listo   |                         |
|                           | 2. tabulo  |                         |
|                           | 3. lerneja atestilo  |                         |
| ТАБЛЕТКА                  | tablojdo   |                         |
| ТАБЛИЦА                   | graftabelo, tabelo (ekz. de multobligado)                  |                         |
| ТАБЛЮ                     | kontrol-(signal-) tabelo                                   |                         |

En **Hu lingvo** ASZTAL [âsztâl] estas slavdevena: STOL < OSTOL < ÂSZTÂL.

- Signifo-kampo:
1. meblo
  2. manĝo, festeno
  3. societo
  4. stablo
  5. ĉe briĝ-ludo: sterno

Derivaĵoj: ASZTALOS (= meblisto, sub la influo de R: СТОЛЯР kaj G: Tischler, Кр. A: joiner, F: menuisier) ASZTALKA = tableto, ASZTALNOK: ‘tablestro ĉe kortego’ – verŝajne slava influo. Кр. СТОЛНИК (same: UDVAR – UDVARNOK = ДВОР – ДВОРНИК.)

En **G** TISCH devenas el la greka *discus* – kiu signifis unue nur la platon kaj tiama-niere estas en strikta rilato kun TAFEL > tavola > tabula. Ambaŭ vortoj, krom meblo, signifas ankaŭ “manĝon” (*essen*):

Zu Tisch(e) sitzen, sich setzen, gehen, kommen  
zur Tafel bitten, laden

bei Tische sein            tafeln = speisen

über, vor, nach Tisch    während der Tafel

seinem Tisch bei jemand haben    die Tafel dauert lange

einem guten Tisch führen  
 der Mittagstisch kostet 2 Mark Tafelrunde < table ronde

El tiuj ideo-kompleksoj, kune kun la vorto transiris en E-on ankaŭ kelkaj kromaj signifoj. Sed ni devas emfazi, ke Zamenhof transprenis el la fontlingvo ne morfemon, sed vorton (transpreni morfemon ne eblis). La vorton li povis transpreni kune kun ĝia signifo. Poste, jam interne de la nova sistemo (t.e. E-o) el la vorto Zamenhof ekstraktis la morfemon. La primara signifo de la morfemo estas kondiĉita far la etimo, la sekvaj derivaĵoj kaj kunmetaĵoj estas jam la rezultoj de la interna strukturo de la nova lingvo.


En PIV (p. 1077) ĉe TABL/o ni trovas la jenajn signifojn (kune kun ekzemploj):

- TABLO 1. Meblo  
 2. meblo uzata por manĝaĵoj  
 3. manĝaĵo (“teni bonan tablon”, “teni apertan tablon”)  
 4. manĝantaro  
 5. loko de komunikiĝo (tablo de l’sinjoro, la sankta Tablo)

El la genetikaj parencoj de Esperanto enestas: TABELO, TABULO, TAVOLO, TABLOJDO.

Derivaĵoj: tablETO, Ĉetable kaj kunmetaĵoj: kudrotablo, skribotablo k.s.

Ni vidu alian ekzemplon! La ideon DOMo/HEJMo E-o esprimas per rusdevena respektive germandevena morfemo. En E-o ekestas la modelo:



(La R vorto estas grek-L devena: hindeŭropa morfemo dem- kies originala signifo estis ‘konstrui’ ekz. prahinda *dáma* “konstruitaĵo”, “domo” G: *Zimmer* (= demmer → timmer → zimmer, kun ŝanĝado d→t→z; ĝis signifo unue “konstruaĵo”, poste “ĉambro”) pragreka: *demo* = mi “konstruas”, L: *domus* “domo”.

La latinidaj lingvoj ne transprenis tiun ĉi morfemon, sed el CASA (“dometo, kabanino, domaĉo”, Kp. Hi, I kaj P: CASA, Rum, CASĂ, resp. el MANEO “resti, loĝi” → mansio “restejo, loĝejo” → MAISON (F).

(Derivaĵoj de DOM en L domesticus, domicilium, dominus, domina k.s.).



**La komponentoj de sememo DOM:**

|                          | E | R | Hu | A | F  | G  |
|--------------------------|---|---|----|---|----|----|
| 1. konstruaĵo            | X | X | X  | X | X  | X  |
| 2. mastrumado            |   | X | X  | X | X  | X  |
| 3. familiano             | X | X | X  | X | X  | X  |
| 4. hejmo, loĝejo         | X | X | X  | X | X  | X  |
| 5. gento                 |   |   |    |   | X  | X  |
| 6. firmao                |   |   | X  |   | X  | X  |
| 7. instituto             | X | X |    |   | X  |    |
| 8. hotelo                |   |   |    |   |    | X  |
| 9. publiko (ekz. teatra) |   |   | X  | X |    | X  |
| 10. parlamento           |   |   | X  | X |    | X  |
| 11. dinastio             |   | X | X  | X | X  | X  |
| 12. ujo, ingo            |   |   | X  |   |    | X  |
| 13. ulo                  |   |   |    |   |    | X  |
| 14. servistaro           |   |   |    |   | X  |    |
| 15. preĝejo              |   |   |    | X |    |    |
| 16. scienca faktermino   | X |   |    |   | X  |    |
| Entute                   | 5 | 6 | 9  | 8 | 10 | 12 |

**La derivaĵoj de DOM kaj HEJM**

|             |                   |                    |          |
|-------------|-------------------|--------------------|----------|
| DOMa        | ДОМАШНИЙ<br>ДОВОЙ | hazai              | heimisch |
| DOMe        | HEJMe ДОМА        | otthon             |          |
| DOMen       | HEJMen ДОМОЙ      | haza               |          |
| DOMaĉo      |                   |                    |          |
| DOMano/j    | ДОМАШНИЕ          | háziak             |          |
| DOMeto      | ДОМИК<br>ДОМОК    | házacska<br>házikó |          |
| DOMaĉeto    | ДОМИШКО<br>ДОМИЩЕ |                    |          |
| DOMego      | ДОМИНА            |                    |          |
| DOMEGAĉo    |                   |                    |          |
| DOMeska     | ДОМОВИТЫЙ         | házas              |          |
| DOMeskeco   | ДОМОВИТНОСТЬ      | háziasság          |          |
| DOMMASTRo   |                   | házigazda          | Hauser   |
| DOMMASTRino |                   | háziasszony        | Hauserin |
|             | HEJMeca           | otthonias          | heimelig |
|             | HEJMemigi         |                    | hejmeln  |

|             |                    |             |               |
|-------------|--------------------|-------------|---------------|
|             | bieno              | Heimen      |               |
|             | senHEJMa БЕЗДОМНЫЙ | hontalan    | hejmlos       |
|             | senHEJMulo         |             | Hejmlose      |
|             | senHEJMeco         | hontalanság | Heimlosigkeit |
|             | loĝi/-igi          | hausen      |               |
|             | ŝparema            | häuslich    |               |
|             | nuda / sendoma     | hauslos     |               |
| kolporti    |                    | házalni     |               |
| kolportisto |                    | házaló      | Hausierer     |
| kolportado  |                    | házalás     | Hausiererei   |
| edziĝinta   |                    | házas       |               |
| edziĝi      |                    | házasítani  |               |
| edziĝi      |                    | házasodni   |               |
|             |                    | házasulni   |               |
| geedzeco    |                    | házasság    |               |
| edzeca      |                    | házassági   |               |
| geedziĝo    |                    | házasulás   |               |

(En la A kaj F la korespondaj vortoj estas preskaŭ neproduktivaj.)

Esprimante la **proksimecon de diverslingvaj ekvivalentoj al E-a DOM-** per la formulo de BEREJAN:

$$v = \frac{2k}{n + m}$$

kie k = komunaj sememeroj, n kaj m la nombro de sememeroj en la komparataj lingvoj, ni ricevos, ke estas II-a-grada parenceco inter

E kaj R – 0,72

E kaj A – 0,66, kaj

E kaj F – 0,66,

III-a-grada parenceco inter E kaj Hu – 0,57 – kaj

IV-a-grada parenceco inter E kaj G – 0,35.

Se ni komparas la derivan modelon: I-a grada inter E kaj R – 0,84

III-a grada inter E kaj H – 0,51 kaj

V-a grada inter E kaj G – 0,20.

HEIM devenas el la pragermana *haims* (parenca kun la greka *kōmē* ‘vilaĝo’) kun pluraj derivaĵoj (heimführen, heimschicken, Heimfahrt, Heimkehr, Heimsuchung, Heimweh, Heimat) < ahd: *heimōti*, heimisch kun antonimo *fremd* / same: Heimat <-> Fremde (kp. E-o: HEJMo<sup>3</sup> – lando, patrujo – alihejmulo ‘fremdulo’, same: *malfremda* = hejma ( vd PIV, p.317, ĉe “fremd/a” ).

Zamenhof ne ĉiam priantis la genetikan homogenecon ĉe la semantikaj mikrostrukturoj, ekz. HIERAŬ – HODIAŬ – MORGAŬ (hier-hodi-morg) tri morfemoj el tri diversaj lingvoj.

Sed: TAG, SEMAJN, MONAT, JAR – estas jam pli homogena grupo: tri germanaj kaj unu francdevena. Ankaŭ kelkajn aliajn vortojn kun tempaj signifoj Zamenhof pruntis el la germana: ekz. BALDAŬ, DAŬR.

BALD (ahd: baldo, mhd: balde) havas du signifojn:  
 mhd: eilig, schnell  
 nhd: in kurzer Zeit, kurz darauf

En Esperanto aperis ĉi lasta signifo. La adjektiva formo kaj ĝia komparado ankaŭ influis la Esperantan uzon: BALDIG, BALDIGST, BALDMÖGLICHST (ankaŭ: BALD – BALDER/BÄLDER). Sur sintagma nivelo: *Er ist bald da. Er wird bald da sein. Das ist bald getan. Das war bald getan. Das wird bald getan sein.*

La signifo de BALDAŬ en E-o (laŭ PIV, p.91): “post paso de nur iom da tempo” – kaj la frazekzemploj montras similan sintagman tempo-rilaton:

Falis gutoj post gutoj, kaj baldaŭ fariĝis vera pluvego.<sup>Z</sup>

La lacigita cigno estis la lasta en la vico, kaj ĝi restis je granda distanco malantaŭe.<sup>Z</sup>

Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj baldaŭ ricevas teatrajn manierojn.<sup>Z</sup>


Se via formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn amikojn.<sup>Z</sup>

Kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre baldaŭ okulojn difektas.<sup>Z</sup>

Publikigu la proponon kiel eble plej baldaŭ.

Tiu pli-malpli adekvata rilato, kiu enestas inter la germana etimo kaj E-a morfemo mankas en la aliaj (R, F, A) lingvoj.

La modelo de DAŬR aspektas jene:



Tiu ĉi modelo demonstros, kiomgrade povas renversi la simetrian de la sistemo la enkonduko de superflua neologismo. Fakte, la L etimo enhavis ankaŭ la sememon: ‘malmoligi, sekigi, forĝi, sensentigi’..., tamen, en E-o la morfemo DAŬR havas tempan kaj ne kvalitan ideon (en tiu senco la neologisma faktermino DURATIVO = ‘daŭra aspekto’ estas tolerebla). Sed DUR- anstataŭ MALMOL – estas superflua.

(K. Kalocsay, argumentante la enkondukon de la neologismo *dura*, asertas interalie, ke “malmola” sonas rekte kontraŭe al la dezirata impresio, ĝi ne posedas la necesan elokvitecon kiun havas *dura* (citita ĉe Atanasov, p.V., 22) Tiaj pure subjektivaj konstatoj apenaŭ estas akcepteblaj.)

La asimiligan forton de la nova (E-a) sistemo demonstros, ke interne de la lingvo, dum la funkciado perfekte harmoniigis la du diversoriginaj, antonime interrilatigantaj morfemoj: DAŬR kaj ĈES, kiuj formas perfekte simetriajn modelojn:

APERIS – DAŬRIS – NE ĈESIS – ĈESIS – MALAPERIS  
KOMENCIĜIS – DAŬRIS – NE ĈESIS – ĈESIS – FINIĜIS  
DAŬRI = NE ĈESI  
ĈESI = NE DAŬRI

Por esprimi la ideon ‘antaŭa parto de la homa (besta) kapo’ Z elektis morfemojn el la franca lingvo, kie tiu ĉi mikromodelo estas tre riĉa (chère, viaire, vout, face, façon, figure, physionomie, vis, visage, mine). El inter ili Z transprenis la plej oftajn, stilistike la plej neŭtrajn kaj enstantajn ankaŭ en alia (almenaŭ A) lingvo: face, mien, visage, physiognomy, figure...

El la F: *face* en E-o ekestis du morfemoj: FAC- kaj FACI-. La vorto *face* en la franca lingvo estas vaste polisema (antaŭa parto de bestokapo, de homkapo, surfaco, aspekto, ĉiuj flankoj de iu korpo, fasado, fronto, kap-faceto de monero; krome ĝi estas faktermine uzata en astronomio, kuirarto, kartludo ktp.) Tiuj sememeroj en E-o dividiĝis je du kampoj:

FAC- ebena parto de surfaco (kun sinonimoj: edro, flanko, latero, surfaco) de kie: FACETo – FACETI (ekz. diamanton) laŭ la franca (poste internacia) modelo: facette – facetter (H: fazetta – fazettál).

FACI- kun la baza signifo de *face* kaj kun speciala kompletigo: specifa aspekto de la vizaĝo en malsanoj (*rim*: tute la saman signifon atribuas PIV ankaŭ al mien-2 : ‘karakteriza aspekto de la vizaĝo en difinita malsano’ – do en tiu ĉi signifo la du morfemoj: faci- kaj mien- sinonimas.)

En franca lingvo la vorto *face* estas tre produktiva kaj en derivaĵoj, kaj en sintagmoj (en E-o kiel aparta morfemo aperis la derivaĵo *surface*: SURFAC- (façail, fassure, facer, défacer, effacer, effaceur, effacement, effaçure, effacence, effaçable, effaçage, ineffaçable, ineffaçablement, superface, superficie, superficiel, superficiellement, superficité, superficiosité, superficialité, superficiaire, superficiairement, biface, bifacial, contreface, hémiface, hémifacial; face-à-main, face-à-face, en face de, à la face de, de face, face à, de prime face ktp. Per la biblio-tradukadoj disvastiĝis en la senco: en ĉeesto, antaŭ (sub hebrea influo): face de Dieu, du Seigneur, voir Dieu, parler à Dieu face à face, Dieu détourne sa face k.s.

Tiun riĉan semantikan kampon en E-o realigas nek FAC- nek FACI- sed parton el ĝi transprenas la morfemo VIZAĜ

VIZAĜ- <F: visage (ŝajne aperis unue en Rolandkanto) havas diversan etimologion, laŭ Renon (1962) ĝi estas simpla plilongigo de la vortkorpo *vis*<sup>2</sup> per pli-malpli neŭtra sufikso -age (sufikso devenanta el mezL: -aticu: visaticu, formaticu, koraticu k.s.) kaj signifanta la tutaĵon de karakteroj, rilataj al la radikmorfemo, aŭ la kolektaĵon de tiaj konkretaĵoj, poste servis derivi ag-substantivojn el verboj: balisage, marchandage, atterissage k.s. Etimologie tiu ĉi morfemo devus aspekti en E-o: vidaĵ.

La F: mine (Kp. A: mine, R: МИНА) dividiĝas en E-o je du morfemoj:

|   |       |
|---|-------|
| MINE <sup>3</sup>                                 | E-o   |
| 1. natura aspekto de la vizaĝo                    | MIEN- |
| 2. vola (imitita, simulita) aspekto de la vizaĝo. | MIN-  |

Por vidi la similecon kaj la diferencon inter la etimo kaj ĝia E-a varianto, ni komparu kelkajn esprimojn (sintagmojn):

|                            | E-o  | F                                | E-o F                                 |
|----------------------------|--|----------------------------------|---------------------------------------|
| fari grimacon<br>(grimaci) | faire visages<br>(grimacer)<br>faire bon (grand<br>laid...) visage<br>faire visage de<br>bois (de pierre)      | fari mienojn                     | faire (bonne)<br>mine                 |
| montri sian vizaĝon        |  |                                  |                                       |
| montri per sia mieno       |  |                                  | montrer mine                          |
| trafi rekte en vizaĝon     |  |                                  |                                       |
| mokadi iun en vizaĝon      |  |                                  |                                       |
| rigardi iun en vizaĝon     | regarder au visage   |                                  |                                       |
| perdi la vizaĝon           | perdre le visage<br>changer de visage<br>composer son visage<br>emprunter le visage de qn.<br>avoir bon visage | perdi -an mienon<br>ŝanĝi mienon |                                       |
|                            |  | havi misteran<br>mienon (mieni)  | avoir une<br>mauvaise<br>mine (miner) |
|                            | être maître de<br>son visage   |                                  |                                       |
| vento en la vizaĝon        | vent au visage   |                                  |                                       |
| duvizaĝa                   | à double visage<br>à deux visage   |                                  |                                       |

<sup>2</sup> La rilaton de VIZAĜ al VID pruvas multaj diversaj lingvoj, ekz. persa: did-ar did = okulo, ar – sufikso analoga al -age (aj). Estona: suu-silmad – suu = buŝo + silmad = okuloj; tohara: ak-mal – ak= okulo, mal=buŝo; oseta: coeskom okulo+buŝo; sed: zirjena: nir-vom: nir= nazo, vom= buŝo; votjaka: im-nir: im= buŝo, nir= nazo. (Rédei 1977)

<sup>3</sup> La taja lingvo esprimas la *mieno*-n: na-ta, kie na=vizaĝo+ta=okulo

Ĉu hazarde, ĉu konscie, ĉe certaj semantikaj mikromodeloj Z tamen priatentis la genetikan homogenecon, ekz.

HAŬT-, LED-, FEL-, PELT-, HAR- estas ĉiuj german-devenaj.

HAUT- < G: Haut < ahd.mhd. tut < L: cutus

‘ekstera membrano, kiu tegas tute la korpon de homo’

FEL- < G: FELL < greka: Pélla, L: pellis ‘haŭto’

‘kruda besta haŭto kun haroj, nepreparita’

(de tie: Felleisen ‘Reisesack, Ranzen’ < mhd. velis < mezL: valisia

‘Satteltasche’ → F: valise ‘Handkoffer’ → VALIZO)

LED- < G: Leder < ahd. Lēdar, mhd. Leder; kp. A: leather

‘felo senharigita, tanita kaj preparita por homa uzado’

PELT- < G: Pelz < mezL: pellicia

‘speciale preparita felo, belhara, harriĉa, uzata por fari veston

HAR- < G: Haar < mhd. hār, Kp. A: hair

### Ĝemelaj radikoj

Por eviti la homonimion kaj polisemion Zamenhof distranĉis la etimon je du vortoj. Tiamaniere ekestis la “ĝemelaj radikoj” (Wiener, 1950), (pli ĝuste: etimologiaj duopoj / “doublets étymologiques ou génétiques”).

→ F chaîne

L catena → A chain → E ĈENo kaj KATENo

L lingua → F langue → E LINGVO kaj LANGo

L numerus → F nombre

↓

↓

E NUMERo E NOMBRo

L velum (pl. vela) ----- → E VELo

↓

↓

F le voile ---- F la voile ----- → E VUALo

L pondo ----- → G Pfund ↗ A pund ----- → E PUNDo

↘ G funt ----- → E FUNTo

↗ G General -→ E GENERALo

L generalis ---- ↗ A general --→ E ĜENERALa

↘ F general

F jaque, jaquette G Jacke -> E ĴAKo kaj JAKo

F carte -> E KARTo  
 L charta ↗ F charte -> E ĈARTo  
 ↘ A charter

(WARINGHIEN, 1959:79) kompletigas la ekzemplojn: F boucle > E BUKO – BUKLO, F conscience > E KONSCIO – KONSCIENCO, F latte > E LATO – LADO, F perche > E PERĈO – PERKO, F pin > E PINO – PINIO, F poste > E POSTENO – POŜTO (Kp. Prepozicio POST!)

Zamenhof klopodis pliĝustigi la enhavon de certaj etimoj, forigi la semantikajn anomaliojn. Ekz. en la plej granda parto de lingvoj la ideo RAJD rilatas al ĉevalo (kp. G hippeuein ep'onu – hippos = 'ĉevalo') per rajdi azenon

I: cavalcare un asino; cavallo > cavalcare

H: meglomagolni egy szamarat; ló > lovagolni

Li elektis la neŭtran RAJD: rajdi sur ĉevalo, kamelo, azeno...  
 rajdi ĉevalon, kamelon, azenon...

Laŭ la A-G modelo:

|        |          |        |
|--------|----------|--------|
| G      | A        |        |
| gehen  | to go    | IRI    |
| reiten | to ride  | RAJDI  |
| fahren | to drive | VETURI |

La socilingvistika *statuso de Esperanto* estas tute alia, ol tiu de la etnaj lingvoj. En la etnaj lingvoj ĉiu sememo (aŭ preskaŭ ĉiu) enhavas (krom diversaj kriteriaj elementoj) ankaŭ la "etnan" elementon, tiu estas la markon de tiu specifa etna kulturo, meze de kiu la lingvo elformiĝis. Ne ekzistas Esperantaj etnaj sociaj institucioj, kiel ekz-e la familio.

## Bibliografio

Martinet, A. 1960: *Éléments de linguistique générale*. Paris

Ranson, J. 1962: *Les dénominations du visage en français et dans les langues romanes*. Paris

Rédei K. *Wortbildung in der PU/PFU-Grundsprache*. *NyK* 1977/1: 93.

Waringhien, Gaston 1959: *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj*. La Laguna

Wiener, F.I. 1950: Ĝemelaj radikoj. En: *Esperantologio* I/2: 98-106.





# Signo, signifo, signifo-integrado<sup>1</sup>

“La signifo de vorto estas io multe malpli  
Facile fiksebla, ol ĝia formo.”

(G. Waringhien, 1959:82)

## 0. ENKONDUKO

**0.1.** Estas konataj la statistikoj, amase aperantaj precipe en la komenca periodo de la lingvo, kiuj celis cifere demonstri la internaciecon de la leksiko de la konkurantaj lingvo-projektoj kompare al la Internacia Lingvo de D-ro Zamenhof. Ĉiuj ĉi statistikoj havis la komunan mankon: ili ĉiuj konsideris nur la formalan flankon tute ignorante la enhavon, t.e. nur la signon kaj ne ankaŭ la signifon. Gaston Waringhien estis eble la unua kiu serioze atentigis pri tiu manko, demonstrante per konkretaj ekzemploj, ke la formala koincido kun la font-lingva etimo ne signifas nepre ankaŭ la enhavan koincidon.

**0.2.** Waringhien en la citita studaĵo (1959:82) estime mencias la pioniran verkon de Bastien, la naŭlingvan etimologian vortaron. Sed ankaŭ tiu vortaro restas nur surfaca kaj se siatempe ĝi plenumis sian funkcion (precipe propagandan) hodiaŭ ĝi apenaŭ taŭgas kiel font-verko de etimologiaj-semantikaj esploroj. Sufiĉas citi nur unusolan ekzemplon:

ŜANĜI L *cambiare* F *changer* I *cambiare* H *cambiar* P *cambiar* D *changieren*  
A *change* R –

Ĉu eblas meti egalecan signon inter tiu vortoj? Ĉu al la F *changer* en Germana lingvo respondas *changieren*? Se ni rigardas la diversajn vortarojn ni trovos, ke al la Franca *changer* en la Germana lingvo – depende de la fraz-ĉirkaŭaĵo – povas respondi tuta aro da diversaj verboj (*ändern, abändern, verändern, umändern; wechseln, einwechseln, auswechseln, unwechseln; tauschen, vertauschen, austauschen, umtauschen; umschwenken, umkehren, umstellen, wenden, umsteigen, verwandeln, umgestalten, umdecken, umsteuern, umsetzen...*), sed ne troviĝas inter ili la supra verbo<sup>2</sup>.

**0.3.** Tiu DEFIRS-kampanjo estis ne nur falsa, sed ankaŭ danĝera: ĝi igis la lingvouzantojn kredi, ke la Esperanta vorto ne nur forme, sed ankaŭ enhave koincidas kun sia etimo kaj ke tiu koincido estus ia valora eco de la lingvo. Tiu misinformado efikis du-direkten: en certaj du-lingvaj vortaroj klare sentiĝas tiu ĉi tendenco – aliflanke: la tendenco konformigi la rilaton signo–signifo al la adekvata fontlingva rilato naskis en interligvistiko la t.n. “naturalisman” kurenton, t.e. la klopodon kiel eble plej fidele

<sup>1</sup> Aperis en Hauptenthal, Reinhard (red.) 1985: *LI kaj NI. Festlibro omaĝe al Gaston Waringhien, por la 80a naskiĝtago. Antverpeno – La Laguna [Antwerpen]: TK – eldonejo de Akademio de Esperanto. 313-336, ĉi tie ni publikigas la paĝojn 313-321 kaj el la Konkludoj sur la p. 335.*

<sup>2</sup> *Changieren* en D estas konsiderata fremda vorto. Estas interese konstati, ke la F-devena verbo konservis la semantikan valoron de la etimo: ‘ändern, sich ändern, tauschen, wechseln’ kp. Fremdwörterbuch 1966.

imiti la naciajn lingvojn. La baza diferenco inter tiuj projektoj kaj Esperanto estas, ke el ĉiuj konscie kreitaj internaciaj lingvoj nur Esperanto havas aŭtonoman semantikon, nur interne de ĝia sistemo memstariĝas la rilato signo–signifo, nur en Esperanto ni povas paroli pri signifo-integrado, striktiĝo kaj dilatiĝo. En la t.n. “naturalismaj” sistemoj la rilato signo–signifo estas la sama, kiel en la font-lingvo. Estas dube, ĉu oni entute povas paroli pri signifo en tiuj ĉi sistemoj. Se la signifo estas la uzvaloro de la signo dum la parol-akto, la signoj de lingvo-projektoj, socie ne realiĝantaj, povas havi maksimume ian hipotezan signifon, ne-realan, statikan, rigidan, amorfan.

**0.4.** En la studaĵoj de Waringhien troviĝas abunde ekzemploj, demonstrantaj la supre meciitan fakton. Memkompreneble la semantika memstareco de Esperanto tute ne signifas, ke inter la etimo kaj ĝia Esperanta formo ne estas pli-malpli strikta rilato. La baza signif-ero ĉiam koserviĝas. Sed interne de la nova sistemo la vorto komencas “novan vivon”, konforman al la ĝin integranta kaj funkciiganta sistemo.

## 1. Paraleloj

### 1.1. Horloĝo

La Esperanta *horloĝo* havas sian etimon en la F: horloge < L horologium, G horologion. Sed en la F lingvo al la Esperanta horloĝo respondas du vortoj:

horloĝo { *horloge* – granda horloĝo  
*montre* – malgranda horloĝo

Plurlingva komparo tuj evidentigos, ke laŭforme la plej proksima F estas, enhave (konsiderante ankaŭ la deriv-sistemon) la plej malproksima:

**Tabelo n-ro 1**

| E-o                 | F                    | D          | R               | H           |
|---------------------|----------------------|------------|-----------------|-------------|
| <b>horloĝo</b>      | Ø                    | Uhr        | ĉasy            | óra         |
| murhorloĝo          | horloge              | Wanduhr    | stennyje ĉasy   | falióra     |
| turhorloĝo          | horloge (de la tour) | Turmuhr    | baŝennyje ĉasy  | toronyóra   |
| pendul-horloĝo      | pendule              | Penduluhr  | majatnjik       | ingaóra     |
| vekhorloĝo          | réveille-matin       | Wecker     | budjilnjik      | ébresztóóra |
| poŝhorloĝo          | montre               | Taschenuhr | karmannyje ĉasy | zsebóra     |
| brak(pojno)-horloĝo | montre-bracelet      | Armbanduhr | ruĉnyje ĉasy    | karóra      |

El tiu komparo evidentiĝas, ke plej proksime al Esperanto estas la H, sekvas la D, poste R kaj laste la F. Plua komparado pruvas preskaŭ la samon:

**Tabelo n-ro 2**

| <b>Ilo</b>       | <b>Tempo-punkto</b> | <b>Tempo-daŭro</b> | <b>Instru-unuo</b> |
|------------------|---------------------|--------------------|--------------------|
| E-o horloĝo      | horo                | horo               | (stud-)horo        |
| F horloge montre | heure               | heure              | leçon              |
| A clock watch    | o'clock             | hour               | class              |
| D Uhr            | Uhr                 | Stunde             | Stunde             |
| R čas            | čas                 | čas                | urok               |
| H óra            | óra                 | óra                | (tan)óra           |

## 1.2. Tranĉi-tondi

Sed oni povas citi ankaŭ kontraŭan ekzemplon: en Esperanto ekzistas la verboj *tranĉi* kaj *tondi* ambaŭ el la F: *trancher* < L trincar 'trionigi' kaj *tondre* el popola L \*tondĉre, klasika L: tondĉre, sed la pli ĝenerala verbo *couper* – ne havas Esperantan ekvivalenton:

**Couper** (la difinoj laŭ Larousse 1979):

|                 |   |               |
|-----------------|---|---------------|
| <i>tailler</i>  | taliare* < talea = bouture<br>couper de ce qu'il a de superflu, pour lui donner une certaine forme; | <b>tajli</b>  |
| <i>trancher</i> | couper en séparant d'un seul coup; diviser nettement  | <b>tranĉi</b> |
| <i>tondre</i>   | couper à ras  | <b>tondi</b>  |
| <i>fendre</i>   | couper dans le sens de la longueur  | <b>fendi</b>  |
| <i>rogner</i>   | découper le bord d'une pièce suivant un profil déterminé  | ∅             |
| <i>hacher</i>   | couper en petits morceaux avec un instrument tranchant (hache)                                      | <b>haki</b>   |
| <i>scier</i>    | couper avec une scie  | <b>segi</b>   |
| <i>faucher</i>  | couper avec une faux <sup>3</sup>   | <b>falĉi</b>  |

<sup>3</sup> En la F verbo deriviĝas el la ilo: *scie* → *scier*, *faux* → *faucher* (simile en H: *fűrész* → *fűrész*el, *kasza* → *kasza*l) dume en Esperanto inverse: *segi* → *segilo*, *falĉi* → *falĉilo*.

Tabelo n-ro 3: TRANĈI (materialo laŭ PIV)

| Ilo: tranĉilo                      |                                   | Materialo               |                           |   | figura-sence  |
|------------------------------------|-----------------------------------|-------------------------|---------------------------|---|---|
|                                    | karno,<br>viando,<br>korpoparto   | manĝaĵo                 | besto                     | alia solida<br>materialo                              |   |
| A/1. penetri                       | gorĝo<br>fingro<br>piedo<br>karno |                         |                           |   |   |
| 2. dividi                          | piedo                             | pano<br>rostaĵo<br>pomo |                           | ledo, paĝoj<br>de broŝuro<br>(=papero)<br>Gordia nodo |   |
| 3. trairi<br>disigi                |                                   |                         |                           |   | vento –<br>vestojn<br>ŝipo –<br>ondojn<br>sago – aeron<br>krioj –<br>silenton |
| 4. akre/<br>dolore frapi<br>senson | (koro)<br>(orelo)<br>(okulo)      |                         |                           |   | sendankeco<br>–koron<br>muziko –<br>orelon<br>lumo, koloro<br>–okulojn        |
| B/1. detranĉi                      |                                   |                         |                           | branĉo<br>(=ligno)                                    |   |
| 2. distranĉi                       | korpo                             |                         | bovino                    | ligilo  | rivereto –<br>herbejon  |
|                                    |                                   |                         | kaprino<br>ŝafo<br>angilo | (ŝnuro)   |   |
| 3.                                 |                                   |                         |                           | osto<br>papero  |   |
| 4. entranĉi                        | epidermo                          |                         |                           | arboŝelo  |   |
| 5. fortranĉi                       | haroj                             |                         |                           | ligno   |   |
| 6. pritrانĉi                       |                                   |                         |                           | ligno   |   |
| 7. tratranĉi                       | gorĝo                             |                         |                           |   | rivereto –<br>landon  |
| 8. altranĉi                        |                                   |                         |                           | ŝtofo   |   |

Tabelo n-ro 4: TONDI (ekzemploj laŭ PIV)

| Ilo: tondilo                   | hararo         | plantoj                             | besto, korpo-parto | alia solida materialo |
|--------------------------------|----------------|-------------------------------------|--------------------|-----------------------|
| 1. fortranĉi -on               | barbo<br>haroj | gazono                              | flugilo            |                       |
| 2. senigi je...<br>-ilo por... | lano<br>haroj  |                                     | ungoj              | papero                |
|                                |                | heĝo                                |                    | ŝtofo                 |
| -maŝino por<br>-i -on          | horoj          | herbo                               |                    |                       |
| detondi                        | bukloj         |                                     |                    |                       |
| eltondi                        |                |                                     |                    | papero                |
| fortondi                       | haroj          |                                     |                    |                       |
| pritondi                       |                | rozujo<br>taksuso<br>radiko de arbo |                    |                       |

Tabelo n-ro 5: ‘Dividas je partoj per akra ilo’ (Laŭ Károlyi 1970)

| Por uzi la dividitaĵon |           |        |           | malplilongigo |           |           | forigo  |
|------------------------|-----------|--------|-----------|---------------|-----------|-----------|---------|
|                        | pano      | ligno  | fadeno    | herbo         | haro      | ungoj     | kapo    |
|                        |           |        |           | tranĉi        | tranĉi    |           |         |
| E-o                    | tranĉi    | tranĉi | tranĉi    | tondi         | tondi     | tondi     | tranĉi  |
| F                      | couper    | couper | couper    | couper        | couper    | rogner    | couper  |
| H                      | vágni     | vágni  | vágni     | vágni         | vágni     | vágni     | vágni   |
| Japana                 | kiru      | kiru   | kiru      | kiru          | kiru      | kiru      | kiru    |
| Suahila                | -kata     | -kata  | -kata     | -kata         | -kata     | -kata     | -kata   |
| G                      | schneiden | hacken | schneiden | hauen         | schneiden | schneiden | hauen   |
| R                      | rjezatj   | rubitj | rjezatj   | vyjatj        | striĉ     | striĉ     | rjezatj |

Sufiĉas apudmeti la du tabelojn (3 kaj 4) por tuj evidentiĝi, ke la semantika kampo de *tranĉi* estas pli vasta kaj pli dinamika ol tiu de *tondi*. En la sememo de ambaŭ verboj enestas du semeroj:

- a) ago per akra instrumento
- b) disigi je paroj

La diferencon inter la du verboj kaŭzas la uzata “akra instrumento”: ĉe *tranĉi* ĝi povas esti tranĉilo, sed ankaŭ alia instrumento, ĉe *tondi* nur tondilo.

Pli granda diferenco montriĝas ĉe la semantikaj operacioj. Ĉe la ĉeesto de a) kaj b) semeroj la objekto de la verbo povas esti nur materialo kiu disponas pri la “kavalito esti dividata je partoj per akra ilo”, ekz. viando, ligno, pomo... Se post tranĉi sekvas objekto, ne havanta tiun kvaliton, tiam la sintagmo estos aŭ figura-senca aŭ senseenca, ekz. *tranĉi akvon, aeron kaj tranĉi veteron*.

Forigante la semeron a) restas nur la komponento ‘dividi je partoj’.

(1) La rivereto tratanĉas la landon. (PIV)

Se oni forigas la semeron b) – tiam la signifo perdas la elementon ‘dispartigi’ kaj restas nur la signifo ‘wundi, penetri’:

(2) La knabo tranĉis al si la fingron ludante per la sabro. (PIV)

La ago per tranĉa instrumento sur vivan korpon, korpoparton kaŭzas doloran senton. Se oni forigas ambaŭ semerojn restas nur la signifo

c) kaŭzi fizikan doloron, ekz.

(3) Tia muziko tranĉas la orelojn.<sup>z</sup>

(4) Tranĉas nian oreleon tiel terure, kiel se iu tirus karbon sur vitro.<sup>z</sup>

(5) La lumo tranĉis al ni la okulojn, (Ekz-oj el PIV)

(6) Tranĉas al mi en la ventro. (PIV)

La fizika doloro en la lingvo ofte transiras je morala;


c<sub>1</sub>: kaŭzi moralan doloron:


(7) tiu via sendankeco tranĉas al mi la koron. (PIV)

d) Koncerne la manieron – ĉe tranĉi ĝi estas energia. Tiu elemento mankas ĉe *tondi* (ĉe *segi* ĝi eĉ estas ĝenerale kontraŭa: trankvila, malrapida, monotona):

(8) tranĉi rekte en la karnon (PIV)

La semantikaj spektroj de la du verboj aspektos jene:





*Rim.:* Ankaŭ la lingvoj, kiuj havas komunan verbon, uzeblan por ĉiuj materialoj kaj sendependan de la ag-maniĝo kaj ilo, havas specifajn verbojn por specifaj situacioj, sed tiu uzado ne estas deviga. ekz. H: *kenyeret vág – kenyeret szel* = tranĉas panon; *haját vág – haját nyír* = tranĉas/tondas harojn ktp.

...

## 4. Konkludo

“Fine, sur tiu kampo de la semantiko, t.e. sencologio, restus esplorota tuta kategorio da okazoj: la ideo-analizo” – skribas Gaston Waringhien en la jam citita studaĵo (Waringhien 1959:82). Dudekjaroj forpasis de tiam kaj oni devas sincere konstati, ke tiu atentigo de nia eminenta leksikografo ankoraŭ ne realiĝis. La “ideo-analizo”, la semantikaj kaj etimologiaj esploroj ne estas nuraj memcelaj sciencumadoj kaj teoriomadaj. Ili havas tre aktualan praktikan signifon. Sen profundaj kaj precizaj signifo-analizoj kaj konfrontaj-kontrastaj komparoj eblas konstrui nek seriozan unu-lingvan vortaron, nek ekzaktajn du lingvaj vortarojn. Kaj la vortaroj en la internacia lingvo ludas decidan rolon: ili kvazaŭ plenumas la funkcion de kompetento, anstataŭanta la gepatra-lingvan lingvo normigan medion.

## Referencoj

- BALASSA 1888: Balassa József: *A volapük ellen* (Kontraŭ Volapük). En: *Fővárosi lapok*, 27-a de jan., 1888.XXV. 27:191-193.
- BASTIEN 1907: Louis Bastien: *Naŭlingva etimologia leksikono de la lingvo Esperanto*. Paris 1907.
- FREMDWÖRTERBUCH 1966: *Fremdwörterbuch*. Gesamtleitung Horst Klien. Leipzig. 1966.
- KÁROLY 1970: Károly Sándor: *Általános és magyar jelentéstan (Ĝenerala kaj Hungara semantiko)*. Budapest 1970
- LAROUSSE 1979: *Larousse de la langue française: lexis*. Direction de J. Dubois. Paris. 1979.
- PIV: *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Red. Gaston Waringhien. Paris 1970.

- POTTIER 1978: Bernard Pottier: Organisation sémantique de l'article de dictionnaire. En: *Bulletin de la Société de Linguistique de Paris*. 1978. LXXIII.1: 339-366.
- SCHRADER 1980<sup>2</sup>: *Sprachvergleichung und Urgeschichte*. 2-a eld. Jena 1980.
- WARINGHIEN 1959: Gaston Waringhien: Etimologiaj esploroj. En: *Lingvo kaj Vivo*. La Laguna 1959: 55-129.
- ZSILKA 1978: Zsilka János: *Jelentésintegráció* (Signifo-interiĝo). Budapest 1978



# La leksikografiaj problemoj de la terminologio<sup>1</sup>

Un dictionnaire, c'est l'univers par ordre alphabétique.  
Anatole France

## 0. ENKONDUKO

**Leksiko** estas la tutaĵo de la vortoj (= leksemoj) de iu lingvo;

**Leksikono** estas la inventaro de la leksiko de iu lingvo, kiu praktike realiĝas en diversspecaj kaj diverstipaj vortaroj.

**Leksikologio** estas lingvistika disciplino, kiu studas la leksikonon;

**Leksikografio** okupiĝas pri la teoriaj kaj praktikaj problemoj de la leksikono;

**0.1. La vortaro** konsistas el aro da artikoloj, aranĝataj laŭ certa ordo.

Ĉiu vortara artikolo konsistas el du partoj: el *definiendum* kaj *definiens*, t.e. el la temo-vorto aŭ kap-vorto kaj el paralela informiĝo pri la tem/kap-vorto. La tem/kap-vorton ni nomu vokablo, kaj ni signu ĝin per  $x$ . La informiĝon ni signu per  $y$ , tiam la artikolo  $A=x+y$ .

**0.2.** La vortaroj diferencas laŭ la kvanto kaj kvalito de  $x$  kaj  $y$ . Laŭ la kvanto de  $x$  kaj profundeco de  $y$  oni distingas la jenajn tipojn:

**0.2.1. Plena Vogrtaro** – havas ĝin nur lingvoj klasikaj, kiuj ne plu havas etnan medion (ekz. klasika latina aŭ greka), aŭ ne plu funkcias (ekz. hitita), do ilia vort-inventaro ne plu ŝanĝiĝas.

**0.2.2. Granda aŭ Akademia (norma) vortaro** – registras ĉiujn vortojn de iu lingvo en certa periodo – do ĝi strebas al kompleteco. Tiaj vortaroj postulas enorman temp-kaj energi-investadon, ekz. la granda germana *Grimmvortaro* pretiĝis dum pli ol cent jaroj: la unua volumo aperis en 1852, la lasta en 1961. La granda angla *Oxford-vortaro* pretiĝis dum kvindek jaroj (1884-1928).

**0.2.3. Meza vortaro** – registras ĉ. 30-50 mil vortojn, ĝenerale ne inkludas la arkaismojn, ĵargonajn, slangajn, dialektajn kaj tro specialajn fakajn vortojn.

**0.2.4. Malgranda (poŝ-)vortaro** – enhavas ĝenerale ne pli ol 10 mil vortojn elektitajn laŭ ofteca principo. La vokablo-elektado povas okazi en iu celo (ekz. turisma, instrua).

**0.3. Laŭ la karaktero de la informiĝo**  $y$  ekzistas diversaj vortaroj (se en la  $y$ -a kolono estas nenia informiĝo oni parolas ne pri vortaro, sed pri *vortlisto*):

**0.3.1. Ofteca vortlisto** – la vokabloj estas aranĝataj laŭ sia frekvenco, aŭ en alfabeto ordo kaj en la  $y$ -a kolono troviĝas ilia frekvenca koeficiento.

<sup>1</sup> Aperis en *Planlingvistiko*, 1983 somero, (2)/6: 1-3.; 1984. Printempo (3)/9: 7-12. kaj vintro (3)/12:1-3.

**0.3.2. Ortografia aŭ ortofonia vortlisto** – donas informaĵon pri la ĝusta skribo aŭ prononco de la vokablo.

**0.3.3. Laŭtema vortlisto** – la vokabloj estas aranĝataj laŭ semantikaj mikrosistemoj, situacioj, temoj, leksikaj kampoj, ekz; bestoj, koloroj, parenco k.s.

**0.3.4. Tergo-vortlistoj** aŭ inversaj, vort-fin-vortlistoj, kie la ordo de vokabloj estas aranĝata alfabete, sed laŭ inversa ordo (*A reverse wordlist, F dictionnaire inverse, G rückläufiges Wörterbuch*).

**0.3.4.1. Rim-vortlistoj** – similaj al la antaŭaj.

**0.3.5. Gramatikaj vortaroj** – donas gramatikajn informaĵojn pri la vokablaro:

**0.3.5.1. Etimologiaj vortaroj** – donas informaĵojn pri la origino de la vokablo: pri ĝia etimo, pri la tempo de ĝia apero en la lingvo, pri la fonto k.s.

**0.3.5.2. Sinonimaj, homonimaj, antonimaj, paronimaj vortaroj** – kie  $y =$  la sinonimo- $j$ - $n$  homonimo- $j$ - $n$ , antonimo- $j$ - $n$ ; paronimo- $j$ - $n$  de la vokablo.

**0.3.5.3. Rekciaj vortaroj** – kie oni ricevas informaĵon pri la rekcio (regado) de la vokablo.

**0.3.5.4. Sintagmaj vortaroj** – kie oni ricevas informaĵon pri tiuj vortoj, kune kun kiuj la vokablo povas formi sintagmon.

**0.3.6. Semantikaj vortaroj** – kie oni ricevas respondon al la demandoj: Kion signifas la vokablo? Kiel oni uzas ĝuste la vokablon? Ili povas esti *eksplikaj-unulingvaj* kaj *tradukaj*: du aŭ plurlingvaj. Ĉe semantikaj vortaroj  $y$  estas kompleksa kaj povas doni krom la pure semantikaj informaĵoj ankaŭ aliajn (etimologiajn, sinonimajn, rekciajn, sintagmajn k.a.), depende de la profundeco (amplekso) de la vortaro.

**0.3.6.1.** Se anstataŭ ekspliko aŭ traduko  $y$  estas prezentata per bildo, temas pri *bildvortaro*. Se la traduko kaj ekspliko estas akompanata de bildo, temas pri *ilustrata vortaro*.

**0.4.** Laŭ la karaktero de  $x$ -o, t.e. laŭ la elekto-kriterioj oni distingas *ĝeneralajn / komun-uzajn* kaj *specialajn vortarojn*.

**0.4.1. La specialaj vortaroj** registras nur iun segmenton de la leksiko, elektata laŭ certaj principoj:

**0.4.2. Verkistaj vortlistoj** – la vortoj, uzataj de iu verkisto en sia tuta verkaro, alinome: konkordanco de...

**0.4.3. Onomastikaj vortaroj** – la inventaro de propraj nomoj, kiuj povas esti ĝeneralaj, aŭ aparte toponimaj, antroponimaj k.s.

**0.4.4. Frazologiaj vortaroj** – ekz. la *Proverbaro* de Zamenhof, aŭ la *Domfabriko* de Kalocsay kaj Csiszár.

**0.4.5. Fakvortaroj** – kiuj enhavas la nomenklaturon kaj terminologion de iu fako, profesio, metio aŭ scienco.

Pri la leksikografiaj problemoj de ĉi-lastaj vortar-tipo ni intencas okupiĝi en la sekvaj ĉapitroj.

## 1. Terminologio

**1.1.** La faka lingvo estas tiu specialiĝinta segmento de iu lingvo, kiu ekestas ĉe la intersekco de du diversaj signosistemoj: de iu konkreta fako (profesio, tekniko aŭ scienco) kaj la komun-uza lingvaĵo. Ĉiuj similaj intersekcaĵoj kaŭzas specifajn problemojn – ĉi-okaze: konkretajn problemojn por la praktikantoj de la koncerna fako – kaj tute specialajn problemojn por la lingvisto.

Unu el la karakteriziloj de la faka lingvo estas, ke ĝi estas pli internacia ol la komunuza lingvo. Tiu ĝia karaktero, kaj la sama fundamenta karaktero de E-o, kiel lingvo internacia, donas apartan specifan nuancon al la problemaro, diferencigantan de la sama temo en etnaj lingvoj. Funkcianta en interlingva medio, kaj E-o, kaj la faka lingvo estas ĉiam sub la premo de diversdirektaj influoj, konstantaj moviĝoj, transiroj kaj transprenoj. Tiu komuna «internacieco» komprenigas, kial ĝuste interlingvistoj / esperantologoj estis la unuaj, kiuj okupiĝis, eĉ fondis la sciencon esploradon de terminologio. Akulenko citas la nomojn de G. Peano, E. Wüster kaj E. Drezen kiel la iniciatintoj de:

- a) la internacia faka terminologio,
- b) la esplorado de interonimoj kaj
- c) la esplorado de universalioj.

**1.2.** La fak-lingvo – kiel speciala segmento de la lingvo – estas lingvistika problemo, sed tute speciala problemo: la lingvisto povas ĝin solvi nur kunlabore kun la specialisto de la koncerna fako. Estas eksplicita interdisciplina temo, kies ĝusta solvo dependas de kunordigita, harmonia kunlaboro de du diversfakaj specialistoj: por la ontologiaj kaj gnoseologiaj problemoj *la fakulo de la koncerna fako*, por la semiotikaj-lingvistikaj problemoj – *la lingvisto*<sup>2</sup>.

**1.3.** Ĉiu fako: metio, profesio, arto, tekniko, scienco k.s. havas sian terminologion, konsistantan el aro da terminoj.

La termino estas speciala vorto aŭ vortrilato (sintagmo), kreita, pruntata, aplikata por ekzakte esprimi ideon, apartenantan al iu speciala fako, profesio, metio, disciplino,

---

<sup>2</sup> Estas ĝojige, ke en E-aj medioj oni ĉiam pli forte rekonas la bezonon de la prilaborado de faka lingvo. Sed estas ege malĝojige, ke samtempe forte disvastiĝas iaspeca teknosnobismo, precipe inter la reprezentantoj de certaj teknikaj sciencoj, pensantaj kvazaŭ nenecesa, superflua, eĉ evitenda la kunlaboradon kun la lingvistoj. Tiuj tekno-snobo forgesas, ke tiamanĵere ili faras en la 90-jaran kontaĝan Esperantan malsanon, en la diletantismon kaj amatorecon. Ĉu vere: neniam ni povus liberigi E-on de tiu ĉi mortminaca epidemia?

scienco. La ideala termino estas monosema (unusignifa): ĝi formas senperan (monomorfan) rilaton inter la ideo kaj ĝia lingva signo (*nomenklatur*). La terminoj aperas en la lingvaĵo tiam, kiam ili estas necesaj iam kiel atestantoj (*mots-témoins*) de la difinita stato de iu scienco en iu difinita periodo.

## 2. La tem/kap-vorto (x-kolono)

En fakvortaro la tem/kap-vorto estas la termino.

La fakvortaristo (fak-leksikografo) dum la elekto de la x-inventaro alfrontas

- a) kvantajn,
- b) enhavajn kaj
- c) formalajn problemojn.

La kvanton determinas la amplekso (vd. §0.2). La enhavon y determinas la tipo de la vortaro (vd. §0.3). La formala problemo estas: kiel aspektu la grafika/fonemika korpo de la termino?

**2.1.** La grafika/fonemika korpo de la termino estas konstatende:

- a) Ĉu la koncerna termino jam estas ie registrita en la E-a leksikografio t.e. ĉu ĝi jam troviĝas en iu E-a vortaro?
- b) Se jes: ĉu ĝi estas ĝusta laŭ la fak-sciencaj kriterioj aŭ ne? Se ne – ĝi estas korektenda laŭ la ĝeneralaj grafemikaj/fonemikaj principoj de E-o.
- c) Se ĝi ne estas registrita: ĉu eblas ĝin esprimi per la morfemo(j) aŭ morfemokombinaĵo(j) jam ekzistantaj en la lingvo? Se ne – laŭ kiuj principoj konstrui ĝian korpon/formon konvene al la ĝeneralaj grafemikaj/fonemikaj principoj de E-o?

**2.2.** La vort-importado.

Verkante aŭ tradukante en iu speciala fako, la fakulo renkontos nocion, kiu ankoraŭ neniam aperis en E-a teksto, sekve ne havas E-an «nomon». Se tiu termino ne estas registrita, nek estas esprimebla per E-a morfemo aŭ morfemokombinaĵo, la verkisto/tradukisto devas ĝin *krei* aŭ *importi* ĝin el alia lingvo. Ekestas la demando: laŭ kiuj principoj li/ŝi konstruu la grafikan/fonemikan korpon de la nova termino?

Similan problemon alfrontas ne nur la esperantista fakulo, sed ankaŭ la fakuloj de aliaj lingvoj. Antaŭ ol respondi rekte al la demando, koncernanta E-on, unue ni trarigardu, kiel aspektas tiu ĉi problemo en kelkaj (hazarde elektataj) etnaj lingvoj.

**2.2.1.** Enkondukante iun novan terminon, la akceptanta lingvo transformas la fonemikan/grafikan korpon de la etimo laŭ siaj internaj fonemikaj/grafikaj leĝoj kaj tradicioj, funkciantaj interne de la sistemo jam de jarcentoj.

Ekz. BAZARo en preskaŭ ĉiuj lingvoj de Sovetunio estas *bazar*; same en la Persa, Araba, Afgana, Hindia kaj Urdua; en Bulgara, Serbo-Kroata, Turka kaj Indonezia: *pazar*; en Kartvela: *bazari*; en Uzbeka kaj Taĝika: *bozor*; en Bengala: *bagar*.

DOKTORo en Indonezia *dokter*, en Joruba *dókitá*, en Suahili *daktari*, en Sranan *datra*.

LIMONADo en R *limonad*, A *limonade*, I *limonata*, H *limonádé*, Indonezia *limun*, Tagaloga *limunada*, J *remonedo*.

MAŜINo en Suahili *mashini* [masinil, en Eskima *masinat*, en Kirunda *imáshini* [ima-sini], en Havaja-A-a *mikini*.

TELEFONo en Havaja-A-a *kelepona*, en eina *te lü feng* .

TELEVIDo en Suahili *television*, en Meskuakia *telepiŝini*, en Indonezia *televisi*, en Malaja *talivisen*, en J *terebi*.

La cititaj ekzemploj elokvente pravas la vortojn de E. Buyskens:

Il est rare qu'une langue emprunte un phonème à une autre; en règle générale, la tangué emprunteuse remplace les phonèmes étrangers par des phonèmes traditionnels: elle les intègre dans sa structure phonique traditionnelle.

Komparo en kvin diverstipaj lingvoj:

|                 | A         | Suahili   | J         | R        | H          |
|-----------------|-----------|-----------|-----------|----------|------------|
| <b>aŭtobuso</b> | bus       | basi      | basu      | aftobus  | busz [bus] |
| <b>ĉokolado</b> | chocolate | chokoleti | chokoreto | ŝokolad  | csokoládé  |
| <b>flanelo</b>  | flannel   | flana     | furanneru | flan'el' | flanell    |
| <b>metro</b>    | metre     | mita      | metoru    | metr     | méter      |
| <b>stilo</b>    | style     | staili    | sutairu   | stil'    | stilus     |
| <b>tuno</b>     | ton       | tani      | tonneru   | tonna    | tonna      |

El la ekzemploj rimarkeblas, ke ĉe la ekstereŭropaj lingvoj regas ĝenerale la **fonemika principo**. Tio estas rimarkebla ankaŭ ĉe la ne hindeŭropaj lingvoj ĝenerale.

F > Turka:

classique > klasik  
physique > fizik  
príncipe > prensip  
bureau > büro

La J tre konsekvenca (kaj neevitebla) asimilas la import-vortojn laŭ sia interna sistemo:

A > J:

Basket > basuketto  
Date > dētō, detō  
Rayon > reijon  
Receptor > reciba

Karakteriza trajto estas la silabigo kaj la anstataŭigo de la fonemo [I] per [rl].

albumo: *arubamu*; alergio: *arerugi*; alkalio: *arukari*; alkoholo: *arukoru*; ampolo: *anpuru*; etilo: *etiru*; lako: *rakka*; lenso: *renzu*; listo: *risuto*; litro: *ritturu*; realismo: *riarizumu*; balanco: *baransu*.

En certaj pozicioj la [r] sono malaperas: card > *kaado* ,karto', barter > *bata* ,broki'

La transprenoj ofte estigas falsajn homonimojn:

|        |  |
|--------|--|
| A > J: | rocket > <i>roketto</i> <sup>1</sup> ,raketo'                          |
|        | locket > <i>roketto</i> <sup>2</sup> ,pendaĵeto'                       |
|        | liver > <i>reba</i> <sup>1</sup> ,hepato'                              |
|        | lever > <i>reba</i> <sup>2</sup> ,levilo, krano, slosilo, funkciigilo' |
|        | lace > <i>resu</i> <sup>1</sup> ,punto'                                |
|        | race > <i>resu</i> <sup>2</sup> ,konkurso, konkuro'                    |

La A-aj pruntaĵoj ĝenerale transiras fonemike:

|   |                  |  |
|---|------------------|--|
| A | > Tagaloga:      | leader > <i>líder</i><br>baseball > <i>beisbol</i>   |
|   | > Sranan:        | water > <i>vatra</i><br>master > <i>masra</i>        |
|   | > Meskakija:     | farmer > <i>fameha</i><br>tractor > <i>trekitech</i> |
|   | > Neo-Melanezia: | pipe > <i>paip</i><br>Clear > <i>klia</i>            |

Forfalo de [r] sono:

|                   |            |             |
|-------------------|------------|-------------|
| A > Suahila:      | artery     | > aterí     |
|                   | form       | > fom       |
|                   | centre     | > senta     |
|                   | vapour     | > vepa      |
|                   | editor     | > edita     |
|                   | equator    | > ekweta    |
|                   | cultivator | > kaltiveta |
|                   | speaker    | > spika     |
| F > F-aj Kreoloj: | courbe     | > kub       |
|                   | mettre     | > met       |

Inversa transformiĝo al la J: [r] je [l]:

|                 |              |  |
|-----------------|--------------|--|
| Chinook-Jargon: | cry          | > kilai  |
|                 | dry          | > dlai   |
| F > Pende:      | numéro       | > lumelo   |
|                 | ministre     | > <i>ministele</i>   |
|                 | dictionnaire | > <i>digisionele</i>   |
| S > Tagaloga:   | pastor       | > pasto/   |
|                 | barba        | > balbas   |
| V > b           | J:           | rendevuo: randebu; vanilio: banira; violono: baiorin; viruso: birusu; vitamino: bitamin. |
| f > p           | Indoneza:    | fakturo: paktur; fantazio : pantasi; provinco: propinsi.                                 |
| f > h           | J:           | alfabeto: aruhabetto; asfalto: asuhuaruto.   |

Voĉiĝo kaj senvoĉiĝo:

|            |          |              |
|------------|----------|--------------|
| F > Turka: | microbe  | > mikrop     |
|            | ligue    | > lik        |
| F > H      | cavalier | > gavalér    |
|            | cajoler  | > gazsulálni |
|            | a tout   | > adutt      |
| A > novG   | pudding  | > putinga    |
| A > Havaja | vinegar  | > uineka     |

El inter la konsonantoj specifajn problemojn kaŭzas la palat-alveolaroj kaj la F-aj nazaloj.

La [g] transformiĝas plej ofte je [j]:

|                                 |                  |                         |
|---------------------------------|------------------|-------------------------|
| Sùahila: A                      | agent            | > <i>ajenti</i> (j = ĵ) |
|                                 | jam              | > <i>jem</i>            |
|                                 | general          | > <i>jeneral</i>        |
|                                 | jersey           | > <i>jezi</i>           |
|                                 | geography        | > <i>jiografia</i>      |
|                                 | July             | > <i>Julai</i>          |
| en J je z/zj:                   | orange           | > <i>orenzi</i>         |
|                                 | jazz             | > <i>zjazu</i>          |
|                                 | reportage        | > <i>ruporutazju</i>    |
| en novG je dz/dzj:              | jazz             | > <i>dzaz</i>           |
|                                 | jersey           | > <i>dzersej</i>        |
| La [ĵ] sono en Malgasa je       | dzj : orange     | > <i>orandzj</i>        |
|                                 | zj : fromage     | > <i>foromazj</i>       |
|                                 | z : jardin       | > <i>zaridena</i>       |
| La [ŝ] je [s] en                | J : chemise      | > <i>sjumiizu</i>       |
|                                 | Malgasa : cheval | > <i>sovalj</i>         |
|                                 | : fourchette     | > <i>forosetj</i>       |
| en H 90% restas [ŝ], variantoj: |                  |                         |
| [ĵ]                             | réchaud          | > <i>rezsó</i> (zs=ĵ)   |
| [ĉ]                             | mêche            | > <i>mécs</i> (cs=ĉ)    |

## La F diftongo -oí- [wa]

|                                  |          |                  |
|----------------------------------|----------|------------------|
| en la Luiziana Negro-F-a je [úa] | fois     | > fúa            |
|                                  | voir     | > úa             |
|                                  | soif     | > súaƒ           |
|                                  | voyage   | > úajaj          |
| en la Trinidad-Kreolo            | roi      | > úa             |
| en Karibaj Kreoloj je [úe]       | doigt    | > dùet           |
|                                  | voile    | > vùel           |
|                                  | noir     | > nùer           |
|                                  | loin     | > lùe            |
| en Turka je [uva], [ua]          | loyal    | > luvayal (y =j) |
|                                  | étoile   | > etuval         |
|                                  | voile    | > vual           |
| en H je [oa]                     | soirée   | > szoaré (sz=s)  |
|                                  | hautbois | > oboa           |

El inter la **vokaloj** la antaŭaj rondaj kaŭzas problemojn, ĉar ili mankas en multaj lingvoj.

Les voyelles antérieures [oe] [ø] et [ü] n'existent dans aucun créole. [ü] aboutit dans presque tous les créoles a [i], en Guyanne, pour certains mots, à [ou] (bifluence portugaise). (Goodman 1964:91)

Laŭ Bídwell (verko citita) la Serbo-Kroatoj kaj Ĉeĥoj aŭdas la F-an kaj D-an [ü] kiel [i], dume la Rusoj – kiel [u] kaj donas ekzemplon: F bureau: Ĉeĥa kaj Serbo-Kroata : *biro*, R *bjuro*

|                           |                       |                              |
|---------------------------|-----------------------|------------------------------|
| F bureau:                 | Ĉeĥa kaj Serbo-Kroata | : <i>biro</i>                |
|                           |                       | R : <i>bjuro</i>             |
| [ø] [oe] [ø] > e          |                       |                              |
| F-Kreoloj:                | Luiziana Negro F:     | seul > <i>sel</i>            |
|                           |                       | que > <i>ke</i>              |
|                           | Kariba Negro F:       | fleur > <i>fler</i>          |
|                           | Dominika Negro F:     | bleu > <i>ble</i>            |
|                           |                       | boeuf > <i>bef</i>           |
|                           | Sango                 | L'Heure > <i>léré</i>        |
|                           | Pende                 | directeur > <i>digitele</i>  |
|                           |                       | chauffeur > <i>ŝifele</i>    |
|                           |                       | tailleur > <i>tajele</i>     |
| D > Kroata:               |                       | schön > <i>ŝen</i>           |
|                           |                       | Löffel > <i>lefla</i>        |
|                           |                       | Möbelstoff > <i>meblstof</i> |
| ü [y] en F-aj Kreoloj [i] |                       |                              |
| F-Kreoloj:                | Luiziana Negro F:     | fumer > <i>fime</i>          |
|                           |                       | plume > <i>plim</i>          |
|                           |                       | plus > <i>pli</i>            |
|                           |                       | surprise > <i>sirpri</i>     |



|             |                 |               |                     |
|-------------|-----------------|---------------|---------------------|
|             | Kariba Negro F: | bruit         | > <i>bri</i>        |
|             | Sango:          | depuis        | > <i>dupii</i>      |
| D > Kroata: |                 | Bürger        | > <i>birger</i>     |
|             |                 | Hühnerauge    | > <i>hinerauge</i>  |
|             |                 | Bücherschrank | > <i>biheršrank</i> |
|             |                 | Schiebetür    | > <i>šibetir</i>    |
|             |                 | Überzieher    | > <i>iberciger</i>  |

En Pende [u]: révolution > *luvuoluso*, numéro > *lumelo*

En J [ju]: début > *debju*, revue > *rebju*

La sinapsio «kumulajo»: du aŭ pluraj vortoj, konsistigantaj en la fonto-lingvo sintagmon, kunfandiĝas je unu vorto (ekz. en E: par coeur > *parkere*):

|   |                |                                 |                        |
|---|----------------|---------------------------------|------------------------|
| F | dent de lion   | > A <i>dandelion</i>            | ,leontodo‘             |
| F | eau de Cologne | > R <i>ad‘ekalon</i>            | ,kolonja akvo‘         |
| F | chaise longue  | > H <i>sezlon</i> (s=ŝ)         | ,sofo‘                 |
| F | mise-en-plis   | > Turka <i>mizampli</i>         | ,frizado‘              |
| F | chemin-de-fer  | > Turka <i>ŝimendifer</i> (ŝ=s) | ,fervojo‘              |
| F | garde-robe     | > Turka <i>gardirop</i>         | ,garderobo‘            |
| F | va-et-vient    | > Turka <i>vayven</i>           | ,iro-reiro‘            |
| F | coup d’état    | > Ĉina <i>ku ti ta</i>          | ,ŝtatrenverso‘         |
| S | luna de miel   | > Tagaloga <i>lunademjel</i>    | ,miel-monato‘          |
| S | cota de malla  | > Tagaloga <i>kotamaj</i>       | ,fleksebla armaturo‘   |
| S | Santo Cristo   | > Tagaloga <i>santukristo</i>   | ,tre pacienca persono‘ |
| A | at random      | > J <i>atorandamu</i>           | ,senatente‘            |
| A | Davis cup      | > J <i>Debisukappu</i>          | «Davis»-pokalo‘        |
| A | ice hockey     | > J <i>aisuhokke</i>            | ,«hockey» sur glacio‘  |

Ĉu tiuj kaprice kaj hazarde elektitaj ekzemploj povos helpi nin en la solvado de la samaj problemoj en la Esperanta Termino-leksiko – pri tio ni intencas skribi en la daŭrigo de ĉi tiu artikolo.

### 3. La grafika/fonemika korpo de la termino en Esperanto

3.1. En la paragrafo 2<sup>a</sup> (PL 9) ni klopodis montri per kelkaj ekzemploj kiamaniere ŝanĝiĝas la ekstero de la importata termino surbaze de grafika-fonemika sistemo de la importa lingvo. Tute same: en Esperanto la ekstero de la termino ŝanĝiĝas laŭ la liter- kaj sonsistemo de Esperanto. Tre primitive esprimate: oni devus diveni kiel transprenus tiun aŭ alian terminon Zamenhof, se li vivus. Ĉu – ekzemple – li estus transpreninta la formon *cibernetiko*, *sibernetiko* aŭ *kibernetiko*? Analizinte la Universalan Vortaron mi konstatis, ke (se la originalan grek-latinan formon li ne povis transpreni senŝanĝe) plej ofte li uzis la metodon, kiun mi nomas retransliterigo. Per centoj da ekzemploj estas demonstreble, ke Zamenhof deiris el la rusa formo kaj

retranskribis ĝin per latinaj literoj, uzante la Esperantan grafikon. Surbaze de tio mi supozas, ke en la supra ekzemplo Zamenhof tutcerte estus transpreninta la formon *kibernetiko* (des pli, ĉar ankaŭ etimologie ĝi estas plej proksima al la originalo!).

**3.2.** En la moderna scienca mondo por Esperanto grandan problemon kaŭzas, ke en kelkaj sciencoj (ekz. en kibernetiko, kies “denaska” lingvo estas la angla) malkreskas la nombro de facile asimileblaj grek-latinaj terminoj kaj plioftiĝas la importaĵoj el modernaj lingvoj, precipe angla, kiujn plej malfacile “digestas” la internacia lingvo.


**3.3.** Ĉiama problemo estis kaj restas la konflikto inter la Esperanta formo kaj la internacia, inter la komunlingva kaj la faka.

**Substrato** (PIV: p. 1042) *substrat-o* kaj ne *sub-strat-o*: povus esti en lingvistiko (signifo 3 en PIV): *subtavolo*. (Estas alia – enhava-faka – problemo, ke el la tri-elementa mikrosistemo en PIV enestas nur unu kaj mankas: *superstrato* – *adstrato* aŭ *supertavolo* – *altavolo/kuntavolo*).

Internacie uzata estas la formo: *\*origo*. Ĝi mankas en Esperanto, pro la konfuziga ŝajnderivaĵo: *or-ig-o*. Sed la enestanta *origino* ankaŭ estas analizebla: *or-ig-in-o* – la klarigo estas verŝajne, ke la *origo* ne povas havi IN-paron, do (kiel derivaĵo) ĝi estus semantika absurdaĵo. Ne parolante ankoraŭ pri *Origeno*, *origina/originala*!

**Interfero** estas analizebla: *inter-fer-o*; *\*interferenco* ne.


**3.4.** El la ekzemploj de la 2a paragrafo estis rimarkeble, ke certaj lingvanoj ne nur diversmaniere prononcas certajn fremdajn vortojn kaj laŭ tiu prononco transprenas ilin, sed ankaŭ diversmaniere aŭdas ilin. Jen karaktera ekzemplo: la anglan vorton *touch* la hungaro aŭdis kaj transprenis en la formo *taccs* [taĉ], la germano en la formo *Tösch* [töĉ]. Poste tiu dua formo, perata far la germana, ankaŭ aperis en la hungara, sed en alia sport-branĉo: *taccs* en futbalo kaj *töccs* en tabloteniso:



H: *taccs/vonal*  
 A: *touch/line*  
 F: *ligne de/touche*  
 G: *Seitenlinie*  
 SL: *flanklinio*  
 PIV: tuŝo (signifo 4)

G: *Tösch*  
 H: *töccs*  
 A: *touch*  
 F: *touché*  
 SL: *flankpilko, glitpilko*

La franca *touche* en la hungaran eniris en du sportbranĉojn: en sportlukton kaj en skermadon.



(Estas interese rimarki, ke PIV uzas la radikon *tuŝ-* ĝuste tiam, kiam malpli klara estas la signifo-elemento de tuŝado!). Sed en la hungara la vorto *tus* estas plursignifa. Krom la jam montritaj, ĝi signifas: ‘tuĉo’ – ‘duŝo’ ‘fusil/kolbo’ (ligna), fine: ‘orkestra-muziko “tosto” por vivui aŭ saluti iun’. La Esperanta triopo: *tuŝo* – *tuĉo* – *duŝo*, estas ankaŭ tre bona ekzemplo de metodoj uzataj por eviti homonimion.

**3.5.** La mallongigon SL mi uzas anstataŭ la titolo de la projekto de Tibor Ujlaki-Nagy, *La sporta lingvo en Esperanto* (Budapest, 1972), kiun – malgraŭ siaj mankoj – mi konsideras modela baza verko por ĉiu alia profesio, fako kaj scienco. Ĝi estas grava precipe el enhava vidpunkto, montrante ekzemplon kiamaniere oni konstruu la teman skeleton de iu scienco, fako, profesio. Sed ĝi ne donas principojn, kiel ekz. la eviton de ŝajn- kaj pseŭdoafiksoj kaj kunmetaĵoj, la anstataŭado de sonoj, ne ekzistantaj en la fonemaro de Esperanto, la problemon de t.n. sciencaj afiksoj ks. Mi provis solvi tiun problemon kaj konstrui iun principaron surbaze de detala ka profunda analizo de la Universala Vortaro: unu el miaj studaĵoj devus aperi ĉe Michel Duc Goninaz (?), la alia, *Enkonduko en la etimologion de Esperanto*, verŝajne aperos venontsomere ĉe KCE. Aliaj du miaj laboraĵoj, tuŝantaj la saman problemon, kuŝas jam de pli ol ses jaroj en tirkesto de HEA. Sed – feliĉe – ekzistas jam sufiĉe riĉa literaturo ĉi-teme. La fundamentaj verkoj estas tiuj de Wüster kaj en la lastaj jaroj ĉiam pli ofte aperadas monografioj kaj artikoloj, enhavantaj multajn valorajn pensojn. Ŝajne ankaŭ la kunlaboro inter la diversfakaj specialistoj kaj lingvistoj pliboniĝas. Ĉiuj ĉi signoj montras, ke la laboro estas jam komencita.



# Principoj de esperanta etimologio (Enkonduka skizo)<sup>1</sup>

*Etymologia est scientia originationis  
vocum, seu, ex antiquorum mente,  
inquisitio et investigatio etymi illarum...*

Æ. SPRINGHETTI

## 1. LA ETIMOLOGIO

(L etymologia < G ετυμος 'vera, ĝusta' + λόγος 'vorto, opinio') science studas kaj difinas la originon, devenon kaj ekeston de la lingvaj signoj:

a) Ĉe praheredaĵoj (la elementoj de baza/fundamenta leksiko de iu lingvo), komparante la signaron de parencaj lingvoj, klopodas rekonstrui la komunan pralingvon kaj trovi la pra-etimon. La kernon de iu lingvo konsistigas ĝia baza/fundamenta leksiko (*basic word stock, osnovnoj leksiĉeskij fond*): la inventaro de ĝia primara, originala, praa leksiko, certiganta la fundamentan karakteron de la koncerna lingvo. Ekz. la nombro de pra-Slavaj vortoj en la R. lingvo estas ĉ. du mil [Ŝanskij 1975], la pra-Finn-Ugraj en la H. lingvo ĉ. mil [Bárczi 1966]. Samtempe, tiu baza leksiko enhavas la plej dinamikajn elementojn de la lingvo. BÁRCZI citas statistikon, laŭ kiu en la lingvaĵo de poetoj la elementoj de la baza leksiko estas super 90 %! Konkretaj ekzemploj: Tompa M. 1827-68: 93,1 %; Vörösmarty M. 1800-55: 92,8 %; Petöfi S. 1823-49: 90,7 %; Arany J. 1817-82: 90,6 %; Ady E. 1877-1919: 90 %; en la prozo de Kemény Zs. 1814-75: 92,1 %. En la ĉiutaga lingvaĵo tiu ĉi proporcio altiĝas meze ĝis 94,3 %! (Oni konsideru, ke temas precipe pri radik-morfemoj kaj la H. lingvo havas eksterordinare dinamikan morfemo-kombin-sistemon!)

b) Ĉe pruntaĵoj la etimologia operacio limiĝas al la identigo de la etimo en pruntedonanta lingvo. Inter la operacioj (a) kaj (b) la esenca diferenco estas, ke la operacio (a) postulas multe pli profundan esploradojn kaj ĝi okazas laŭ certaj konstantaj normoj, fiksitaj dum tiu esplorado — dume ĉe (b) tiaj fiksitaj formoj ne ekzistas, kiel ĝuste konstataas DERROY [1956: 244]: ili estas akcidentaj, sekvantaj la artikulaciajn kutimojn de la akceptanta lingvo "*sans règle préétablie*", ĝuste tial ankaŭ la gramatikistoj evitas fiksi iajn regulojn: "*Il est rare que les grammairiens les codifient strictement et il s'agit presque toujours de tendances et non de règles*".

Ekz. estas neniam dubo pri tio, ke la H vorto *neglizés* [neglijé] 'negliĝo' havas sian etimon en la F. Ofte inter la font-lingvo kaj akceptanta intermetiĝas peranta lingvo: la H. vorto *diszpécser* [dispéĉer] havas A-etimon: *dispatcher* sed en H-an ĝi envenis pere de la R (kie ĝi estis jam antaŭe integrita: [d'ispéĉer].)

Sed, konstati ke la H. vorto *hal* 'fiŝo' kaj la Finna *kala* 'fiŝo' havas la saman etimon povas nur tiu, kiu scias, ke la pra-Finn-Ugra vort-komenca [\*k] en la Finna restis, sed en la H. transformiĝis je [h]. Tial oni pli bone povas kompreni la parencecon inter la Finna *kolme* 'tri' kaj la samsignifa H. *három* (praformo [charmuj]).

La Esperanta etimologio sekvas la (b)-tipan operacion kaj estas preskaŭ analoga al ĝi. Estas sufiĉe identigi la E-an vorton *kaj* kun ĝia G. etimo *kai*. Kiamaniere ekestis la G. *kai* ne apartenas jam al E-etimologio, sed estas problemo de la G. etimologio! Laŭ la esprimo de SCHUCHARDT: temas pri *Elementarverwantschaft* kaj ne *geschichtliche Verwandtschaft*! Tiamaniere la E. etimologio restas en la sinkrona sfero kaj ne apartenas al la diakrona esplorado. (Komparu ankaŭ O. Back en Szerdahelyi 1980!)

<sup>1</sup> Aperis en: Duc Goninaz, Michel (red.) 1987: Studoj pri la internacia lingvo. Études sur la langue internationale. Studies on international language. Gent: AIMAV, p. 109-138.



## 2. LA FONTOJ DE ESPERANTO

La esenca diferenco inter la pruntado en etnaj lingvoj kaj en E. estas, ke en etnaj lingvoj la pruntaĵoj kompletigas la bazan leksikon, dume en E ankaŭ ĝia baza leksiko ekestis per "pruntaĵoj". En E oni povas konsideri *baza leksiko* la morfemaron de la Unua Libro, *fundamenta leksiko* — la ĉ. du kaj duonmilan morfemaron de la Universala Vortaro (UV).

El etimologia vidpunkto inter la E-aj morfemoj oni povas distingi du tipojn: la internaciajn "migrantajn" vortojn = internaciismoj, aŭ pli oportune: *interonomoj* kaj la unu-, du- (malofte tri-) etimajn pruntaĵojn, ne apartenantajn al interonomoj. Eble oni povus konsideri kiel trian tipon la Zamenhofajn "originalaĵojn" kiuj tamen ne ĉiam estas "senetimaj".

### 2.1. LA INTERONIMOJ

Laŭ la plej ĝenerala difino *interonomo* estas konsiderebla tiu vorto, kiu el la sama fonto eniris en plurajn, malsamfamiliajn (neparencajn) lingvojn kaj estas forme, enhave kaj esprime identigeblaj inter si kaj kun ilia komuna etimo.

La interonomojn ebligas la ekzisto de universalioj: la biologiaj trajtoj de la homoj, la psikologiaj universalioj, t.e. la komunaj pens-funkciadaj leĝoj kaj la kosmogoniaj universalioj, t.e. la unueco de la objektiva mondo, la sameco de la homa karaktero kaj la komuna kulturo — trajtoj, difinantaj la homan eston. La kosmogoniaj (eksterlingvaj) universalioj ebligas la transkodon de signifoj; la psikologiaj universalioj ebligas la diversajn signifoŝanĝiĝojn: striktiĝojn, dilatiĝojn, metaforiĝojn ktp.; la biologiaj universalioj (sur fonologia ebena) ebligas la samecon aŭ similecon de la prononcmankio; sekve: la fonemikan transiron el unu lingvo en alian.

La internaciaj vortoj aperis unue en Eŭropo kiel sekvo de la konverĝa evoluo de kulturoj. La fonon de Eŭropaj interonomoj (= eŭropismoj) konsistigas la G-L-devenaj leksemoj, disvastiĝantaj dum la kontaktiga rolo de la L. Ĝiam la L ĉesis funkcii en tiu rolo, en la 'novaj' lingvoj postrestis signifa stoko de L-aj fakvortoj, precipe en anatomio, patologio, farmakologio, biologio kaj zoologio. En la XVII–XVIII jc-oj la F lingvo liveras amase la novajn interonomojn, kiuj rapide disvastiĝas dank' al la granda aŭtoritato kaj populareco de la F lingvo ("*On emprunte, par admiration, volontiers des mots et des tournures à une langue que l'on tient pour plus fine, plus élégante, plus riche, représentative, d'une civilisation supérieure.*" – Deroy 1956: 172). Kaj la L origino de la F certigas ankaŭ la kontinuecon de la internacia leksiko, kiu pliriĉiĝas precipe en la abstraktaj kampoj, en la sociologia, filozofia kaj ĝenerala-sciencia terminologio. Kontribuas al la riĉigo de la interonomoj ankaŭ la I kaj D, malpli signife la S kaj lastatempe la A kaj R — sed la L ĉiam estis kaj ĝis hodiaŭ restis neelĉerpebla fonto de novaj kaj pli novaj interonomoj. Estas konstateble, ke la areo de naskiĝo kaj disvastiĝo de interonomoj estas Eŭropo; ilia fono estas la "*mentalité européenne*" (Bally 1935/2) kaj MEILLET prave povas konstati la naskiĝon de la kultur-leksika unueco de Romanaj, Germanaj kaj Slavaj lingvoj (1936).

La diversaj lingvoj tamen diferencas laŭ la kvanto kaj kvalito de la akceptataj interonomoj. AKULENKO (verko cit.) distingas kvin interonomajn areojn: [Akulenko nomas "interonima areo" tiujn teritoriojn sur la lingvistika mapo de la mondo, kie koncentriĝas certaj interonomoj.] 1) Eŭropa-Amerika, 2) Proksim- kaj Mez-Orienta, 3) la areo de la lingvoj de Sovetunio, 4) la areo de la Hinda Oceano kaj 5) la Fora Oriento. (Ŝajne la aŭtoro forgesis pri Afriko kaj Oceanio). Sed estas rimarkebla la ĉiam pli rapida proksimiĝo de tiuj areoj per la disvastiĝo de interonomoj.

En lingvistiko la esplorado de interonomoj apartenas al unu el la plej neglektataj temoj. AKULENKO prave konstatas, ke la unuaj esploristoj de interonomoj estis ne la lingvistoj, sed la interlingvistoj, poliglotaj praktikuloj kiel la kuracisto L. ZAMENHOF, la matematikisto G. PEANO aŭ la teknikisto E. WÜSTER (Akulenko 1972: 4).

La atento de la interlingvistoj direktiĝis al interonomoj tiam, kiam en interlingvistiko aperis la aposteriora koncepto. Ankaŭ por Zamenhof la baza principo de vort-elektado estis la internacieco. La 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko eĉ deklaras, ke ĉiu interonomo (laŭ la nacilingva nomenklaturato "fremda vorto") estas konsiderebla E vorto se ĝi estas


prezentata grafike per E-aj grafemoj kaj asimilata morfologie. ZAMENHOF mem uzis centojn da interonimoj, kiuj ne estis registritaj sed kiujn li konsideris "evidente" internaciaj. (ZAMENHOF ĉi-okaze ne estis tute konsekvenca: li konsideris kelkajn interonimojn "evidente internaciaj" kiuj tamen ne estas tiaj kaj ne registris multe pli internaciajn.) La granda manko de la 15-a regulo estas, ke ĝi donas neniajn instrukciojn pri la metodoj de la transskribo. (vd. pliposte).

Laŭ la jam konceptita difino de interonimo en la UV- vortaro ĉ. 40 % el la kapvortoj listigitaj estas konsidereblaj interonimoj. Tre verŝajne Zamenhof elektis ilin el la *Schmidt-vortaro*\* laŭ la internacieca kriterio. En la elekto de la vort-formo la unua influa faktoro estis la grafika korpo, due la fonetika kaj nur en esceptaj kazoj la semantika valoro. Plej facila estas la elekto tiam, kiam en la fontlingvoj la interonimo havis la saman aŭ tre similan formon, ekz.

F *ananas* A *ananas* D *Ananas* R *ананас* P *ananas* > E *ananas*-o

Se inter la fontlingvaj interonimoj estis devioj, tiam ZAMENHOF elektis la plej internacian formon, aŭ tiun formon, kiu estis la plej facile transskribebla en la nova sistemo.

Estas konstateble, ke la hierarkio de font-lingvoj sekvis la jenan ordon:



La primaraj fontoj estis la L, F kaj D kun R kaj P plifortigo kaj — en iuj okazoj — kun I kaj A influo.

## 2.2. LA DU- KAJ UNU-ETIMAJ VORTOJ

La kampo de interonimoj, kaj morfologie kaj semantike, estas tre limigita. La plej granda parto de interonimoj estas la substantivoj kaj preskaŭ tute mankas inter ili la duon-aŭtonomaj kaj ne-aŭtonomaj vortspecoj (ekz. pronomoj, prepozicioj, konjunkcioj, numeraloj k.s.). Laŭ la diversaj statistikoj la vortspeca tabelo de interonimoj aspektas jene:

|              |          |               |      |
|--------------|----------|---------------|------|
| Substantivoj | 70–75 %  | Laŭ Akulenko: | 76 % |
| Verboj       | 10–15 %  |               | 5 %  |
| Adjektivoj   | 5– 8 %   |               | 18 % |
| Adverboj     | 0,5– 1 % | } Ceteraj:    | 1 %  |
| Ceteraj      | ĉ. 1 %   |               |      |

Semantike: la interonimoj ekestas en tiuj temoj kaj situacioj, kie okazas la interlingvaj kontaktoj. La plej fekunda tereno por interonimoj estas la scienca vivo, ĝuste tial la plej

\* "... la plena kaj multlingva vortaro de Schmidt" menciita far Zamenhof en la kunsido de Lingva Komitato dum la VI-a UK en Vaŝingtono (1910) estis verŝajne lia fundamenta fontverko. Bedaŭrinde mi ne sukcesis ĝin trovi.



granda estas la nombro de sciencaj, fakaj, profesiaj, teknikaj terminoj. Sed en multaj vivo-situacioj, precipe en la plej intimaj kaj ĉiutagaj mankas la internaciaj vortoj. En tiaj okazoj Zamenhof elektis vortojn laŭeble komunajn al du aŭtoritataj lingvoj. La du-etimaj vortoj en UV konsistigas ĉ. 20 % de la tuto, kaj interne de ĝi 65 % estas komunaj al F kaj A! Inter la unuetimaj elstaras la F- kaj L-devenaj vortoj. Unuetimaj (entute ĉ. 40 % de la tuto) konsistas ĉefe el F-etimaj (35 %) kaj L-etimaj (33 %) kaj nur 32 % konsistigas kune la ceteraj lingvoj (D, A, I, R, P kaj Zamenhofaj originaloj).

### 2.3. LA IDENTIGO

Ĉe la plur-etimaj vortoj [*étymologie croisée*, *перекрёстная этимология*] la senperan (primaran) etimon oni difinas laŭvice laŭ jenaj indeksoj:

- a) grafiko,
- b) fonemiko,
- c) semantiko.

- a) Inter pluraj etimoj la senpera/primara estas tiu, kiu grafike estas la plej proksima, ekz. *F toilette* A D *Toilette* R *туалет* P *tualeta* > E *tualet-o*; primaraj etimoj: R kaj P.
- b) Fonemika proksimeco: ekzemple inter la *F toucher* kaj *A touch* > E *tuŝi*, la F estas la primara, ĉe *F rail* kaj *A rail* — la A.
- c) Ĉe identaj etimoj la primara estas tiu, kies signifo kongruas kun la E: A/F *toast* = (1) rostita pano, (2) trinkpropona paroladeto. — R *тоаст* nur en signifo (2), same en E *tost-o* nur en signifo (2). La primara etimo estas do la R.

### 3. LA GRAFIKA KORPO DE LA LINGVA SIGNO

La ĉefa identiga kriterio en la etnaj lingvoj estas fonetika: “... *le critère phonétique est incontestablement le plus décisif et le plus significatif aux yeux du linguiste...*” [Deroy 1956: 49]. La fonetika principo en etnaj lingvoj gravas fakte pro tio, ĉar la plej granda parto de pruntaĵoj en etnaj lingvojn envenas per akustikaj kanaloj. “*En entendant un mot inconnu étranger ... nous tâchons d’y retrouver un complexe de nos représentations phonologiques, de les décomposer en des phonèmes propres à notre langue maternelle, et même en conformité à nos lois de groupement des phonèmes.*” [Polivanov, cit. far Haugen 1950: 215].

La internacia vorto *klubo* en la T estas *klüp*, en la Ja *kurabu*, en la Ĉina *cū-lō-pu*; la adjektivo *blua* (pere de A *blue*) en indonezia estas *biru*, en la Ja *buru*, en Sŭa *buluu*, en la lingvo de Muray-insuloj *bulubulu* (pere de la F *bleu*), en novG *ble*, same en la F-kreoloj, en Pende *bulé* kaj simile.

Se la pruntaĵo venas per skrib-lingva kanalo, tiam la transpreno okazas laŭ grafika principo. Antaŭ la asimiliĝo iuj pruntaĵoj restas en la originala grafika formo de la etimo, ekz. en la H sufiĉe granda nombro da A-aj neologismoj, ekzemple *business*, *disc jockey*, *grape-fruit*, *input-output*, *jacket*, *jersey*, *marketing*, *musical*, *lumberjack*, *know-how*, *nylon*, *software*, *spray*, *stewardess*, *striptease*, *team* k.s.

En E la morfemoj venis el skribitaj fontoj kaj estis ‘tradukitaj’ (transliterigitaj, transskribitaj) far ZAMENHOF laŭ lia propra gusto. Kiu estis la kriterioj de ZAMENHOF dum la konstruado de la signo-korpo? La respondo al tiu ĉi demando oni devas serĉi en la lingvokono, en la gepatra(j) lingvo(j) de la aŭtoro. En diversaj fontoj ZAMENHOF parolas pri la R kiel lia gepatra lingvo, tre verŝajne li samnivele konis (kaj uzis) la P-an kaj la J-an: supozeble tiuj tri lingvoj influis lin plej forte.

#### 3.1. LA TRANSLITERIGO

El inter la font-lingvoj du uzas ne-L-an grafikon: la G kaj la R. La vortoj venantaj el tiuj du lingvoj estas transliterigeblaj per la E-a grafiko: G *ка1* > *kaj*.



La cirila sistemo estas facile transliterigebla. Nur unu sola grafemo ne havas ekvivalenton en la E-a grafiko: **ы** (ni ĝin signas en nia praktika transskribo per /y/).

|              |               |               |                |
|--------------|---------------|---------------|----------------|
| <b>по</b>    | > <i>po</i>   | <b>бант</b>   | > <i>bant-</i> |
| <b>при</b>   | > <i>pri</i>  | <b>прав</b>   | > <i>prav-</i> |
| <b>кроме</b> | > <i>krom</i> | <b>крутой</b> | > <i>krut-</i> |

La palataligo ne estas signita:

|                |                |                  |                  |
|----------------|----------------|------------------|------------------|
| <b>гладить</b> | > <i>glad-</i> | <b>картавить</b> | > <i>kartav-</i> |
|----------------|----------------|------------------|------------------|

La R grafemo /x/ estas transliterigata ne per ĝia ekvivalento /h/, sed per /k/:

|                    |                  |             |                |
|--------------------|------------------|-------------|----------------|
| <b>барахтаться</b> | > <i>barakt-</i> | <b>хрен</b> | > <i>kren-</i> |
|--------------------|------------------|-------------|----------------|

Escepto: **хвост** > *vost-*

Verŝajna P influo: **хлопотать**, P *klopotac' sie* > *klopod-*

|             |          |          |         |              |                  |                |
|-------------|----------|----------|---------|--------------|------------------|----------------|
| Devioj: R ш | P /sz/   | ne E /ŝ/ | sed /ĉ/ | <b>каша</b>  | П <i>касза</i>   | > <i>kaĉ-</i>  |
| R ш         | P /cz/   | E /ĉ/    |         | <b>шапка</b> | П <i>ĉapka</i>   | > <i>ĉap-</i>  |
| R щ         | P /szcz/ | E /ŝĉ/   |         | <b>борщ</b>  | П <i>barszcz</i> | > <i>barĉ-</i> |

### 3.2. LA RE-TRANSLITERIGO

Signifa parto de la vortoj envenis en E-on perataj far la R. La R lingvo apartenas al tiuj lingvoj, kiuj volonte kaj facile transprenas fremdajn vortojn. (En la vortaro de A.D. Miĥelson, aperinta en 1866, jam estas enregistritaj 30 000 fremdaj vortoj!) Ĉe la transprenado, la R uzas ĝenerale fonemikan metodon (malofte kaj nur escepte grafikan). ZAMENHOFF — kiu plurfoje nomis la R-an sia gepatra lingvo — supozeble estis ankaŭ ĉe la elekto de la grafika formo de la vorto sub forta influo de la R kaj ankaŭ de lia dua lingvo — la P.

Ekzemploj:

|                      |   |                         |                   |                      |                                       |
|----------------------|---|-------------------------|-------------------|----------------------|---------------------------------------|
| F <i>aspic</i>       | A <i>asp</i>  | L <i>aspis, aspidis</i> | R <b>аспид</b>    | [aspid]              | > <i>aspid-</i>                       |
| F/A <i>biscuit</i>   |   |                         | R <b>бисквит</b>  | [biskvit]            | > <i>biskvit-</i>                     |
| F <i>paysage</i>     |   |                         | R <b>пейзаж</b>   | [pejzaj]             | > <i>pejzaĝ-</i>                      |
| F/D <i>ponceau</i>   | P <i>ponsowy</i>  |                         | R <b>пунцовый</b> | [puncovyj]           | > <i>punc-</i>                        |
| F <i>ruines</i>      | A <i>ruins</i>  | D <i>Ruine</i>          | R <b>руина</b>    | [ruina]              | > <i>ruin-</i>                        |
| L <i>capitellum</i>  | F <i>chapiteau</i> A <i>chapiter</i><br>R <b>капитель</b> [kapit'el'] > <i>kapitel-</i> |                         |                   |                      |                                       |
| T/Persa <i>tafta</i> | I <i>taffetta</i>   | F <i>taffetas</i>       | A <i>taffety</i>  | D <i>Taffet</i>      | R <b>тафта</b> [tafta] > <i>taft-</i> |
| F <i>ouate</i>       | A <i>wad</i>  | D <i>Watte</i>          | P <i>wata</i>     | R <b>вата</b> [vata] | > <i>vat-</i>                         |

#### 3.2.1. LA G-DEVENAJ ETIMOJ

El la G lingvo la R transprenis kelkajn vortojn rekte, la pli grandan parton pere de aliaj perantaj lingvoj. La plej ofta etimologia vico estas:

G **κάστανον** > L *castanea* > D *Kastanie* > P *kasztan* > R **каштан** > E *kaŝtan-o*

Vokaloj

/Y, y/ **υ/υπιλον** 'ipsilono' — laŭorigine havis [u]-similan sonvaloron, transformiĝis dum la Helenisma G-periodo je [ü], transiris en la R-an komence kiel /vr (iĵica), poste kiel /и/ [i]:

G **τυραννος** > L *tyrannus* > R **тиран** [t'iran] > *tiran-o*

/y/ el la L kaj, pere de ĝi, el la modernaj lingvoj transiris en la R-an kiel /и/ [i] /i/.

Diftongoj

G /ai/ > L *a* > R /e/ [je], [e] /ə/ [e] > E /e/

G **διαίτα** > L *diæta* > R **диета** [d'ieta] > E *diet-o*

G /ei/ > L *i* > R /и/ [i] > E /i/

- G ειρωνεια > L ironia > R ирония [iron'ija] > E ironi-o  
 G /oi/, /of/ > L ce > R /e/ > E /e/  
 G τραγωδία > L tragœdia > R трагедия [trag'ed'ija] > E tragedi-o  
 G /au/, /eu/ > L au, eu > R /ав/, /ев/ > E /aŭ/, /eŭ/  
 G αὐτό- > L auto- > R авто- [avto-] > E aŭto-  
 G εὐφωνία > L euphonia > Р евфония [evfon'ija] > E eŭfoni-o

*RIMARKO:* La enkonduko de la duonvokalo [ŭ] estas, ŝajne, klarigebla ĝuste per tiu ĉi desilabiga redukto en la R. (En Esperanto: diftongiĝo de la silabo).

Tiu ĉi redukto estas konsiderebla kiel ĝenerale valida regulo en E:


- L audio > E aŭd-i → ausculto > E aŭskult-a  
 L raucus > F rauque > E raŭk-a  
 G ναυτία > L nausea > F nausée > A nausea (laŭ UV: nauseate) > E naŭz-  
 D bedauern > E bedaŭr-i; dauern > daŭr-i; Haut > haŭt-o; Raupe > raŭp-o; taugen > taŭg-i; kaj aliaj.

La G litero κ (kappa), sekvata de [ε] aŭ [ι], transiris en la L-an kiel /ce/ kaj /ci/, en la R-san kiel /це/ [ce], /ци/ [ci] kaj > en E-on kiel /ce/, /ci/. Ĉe la rektaj pruntaĵoj el la G la R konservis la grafemon [κ]:

|   |           |           |        |          |
|---|-----------|-----------|--------|----------|
| G | κίχουριον | ναρκισσος | κεδρος | κymbαλον |
| L | cichoreum | narcissus | cedrus | cymbalum |
| F | chicorée  | narcisse  | cèdre  | cymbale  |
| A | chicory   | narcissus | cedar  | cymbal   |
| D | Cichorie  | Narcisse  | Ceder  | Cymbel   |
| P | суко́ра   | narcyż    | cedr   | cymbaly  |
| R | цико́рий  | нарцисс   | кедр   | кимвал   |
|   | [cikori]  | [narcis]  | [kedr] | [kimval] |
| E | cikori-   | narcis-   | cedr-  | cimbal-  |

En la klasika L /c/ estis servoĉa gorĝa konsonanto [k] kiu en la V-a jarcento en la Gaŭlia vulgar-L antaŭ [e] kaj [i] afrikatiĝis: [ce] [ci], [ĉe] [ĉi] resp. [se] [si]. En la P kaj R ĝi prononciĝis [c] kaj kun tiu valoro ĝi eniris en Esperanton.

Skeme:



Ekzemploj:

- certus > cert-a — facilis > facil-a
- G κεντρον > L centrum > R центр [centr] > E centr-o  
 L citare > R цитировать [cit'irovat'] > E cit-i
- F céder > E ced-i — F cire > E cir-o

*RIMARKO:* La F-ajn /ce/ kaj /ci/ la R transprenas fonemike:

- F sauce > R соус [sous] 'saŭco' — cigare > сигара [sigara] 'cigaro'  
 F service > R сервис [serviz] > E 'servic-o'

La G litero η /χ/ [kh] havas en la R-a la ekvivalenton /x/ [ħ] kaj transiras en E-on kiel /ĥ/ (kun moderna varianto /k/) kaj /h/.

|   |        |          |          |         |             |            |
|---|--------|----------|----------|---------|-------------|------------|
| G | ἦχος   | χιμαρα   | μοναχος  | εποχη   | χαρακτηρ    | χρονικα    |
| L | echo   | chimæra  | monachus | epocha  | character   | chronica   |
| F | écho   | chimère  | moine    | époque  | caractère   | chronique  |
| A | echo   | chimera  | monk     | epoch   | character   | chronicle  |
| D | Echo   | Chimäre  | Mönch    | Époque  | charakter   | Chronik    |
| P | odglos | chimera  | zakonnik | эпока   | charakter   | kronika    |
| R | эхо    | химера   | монах    | эпоха   | характер    | хроника    |
|   | [eħo]  | [ħimera] | [monaħ]  | [eħoħa] | [ħarakt'er] | [ħron'ika] |
| E | eĥ-    | ħimer-   | monaħ-   | eħok-   | karakter-   | kronik-    |



La G *spiritus asper* transiras en L (kaj de tie en aliajn lingvojn) kiel /h/. Ĉar tiu grafemo mankas en la R, oni transliterigas ĝin per /r/ [g] aŭ oni forlasas ĝin:

|   |         |          |          |         |           |            |
|---|---------|----------|----------|---------|-----------|------------|
| G | ἥρος    | ῥδρο-    | ῥπερ     | ῥπο-    | ἄρεσις    | ἱστορία    |
| L | heros   | hydro-   | hyper-   | hypo-   | hæresis   | historia   |
| F | héros   | hydro-   | hyper-   | hypo-   | hérésie   | histoire   |
| A | hero    | hydro-   | hyper-   | hypo-   | heresy    | history    |
| D | «Heros» | hydro-   | hyper-   | hypo-   | «Häresie» | «Historie» |
| P |         |          |          |         | herezja   | hystorya   |
| R | герой   | гидро-   | гипер-   | гипо-   | еречь     | история    |
|   | [geroj] | [gidro-] | [giper-] | [gipo-] | [jeres']  | [istorija] |
| E | hero-   | hidro-   | hiper-   | hipo-   | herez-    | histori-   |

**REMARKO:** Oni povas konsideri ĝenerale la transskribon de *spiritus asper* per /h/, sendepende de la R-formo: *harpo*, *hepato*, *hipnoto*, *hipodromo*, *horizonto*. Komparu R: арфа [arfa] 'harpo', гепатит [gepatit] 'hepatito', гипноз [gipnoz] 'hipnoto', ипподром [ippodrom] 'hipodromo', горизонт [gorizont] 'horizonto'.

En la lingvo-evoluo estas rimarkebla la tendenco forigi el la grafika sistemo la literon /h/. En pluraj vortoj la G χ 'khi' envenis E-on jam kiel /k/: *epoko*, *karaktero*, *kroniko*. Pliposte elformiĝis liberaj variantoj:

*himer-/kimer-*  
*monaĥ-/monak-*  
*monarĥ-/monark-*  
*arĥi-/arki-*  
*meĥan-/mekan-:*

"Moderna tolerata formo de la internacia radiko meĥan..." (PIV: 681)

Komparu: G χαος LFADP chaos R хаос [ħaos] > ĥaos-o → kaos-o  
 G τραχεια Ltrachea R трахея [traħeja] > traħe-o → trake-o

(Oni rimarku, ke en l en certaj pozicioj /ch/ transiras je /c/: *arcaismo*, en S en /qu/ !)

Se la transformo /ħ/ → /k/ kaŭzas kolizion, en la ĝisnuna praktiko oni uzis paragogon: G χολερα L cholera F choléra A cholera' D Cholera R холера P cholera E ĥoler-o — pro jam ekzistanta *koler-o* — sekve: *kolera-o* (PIV: 526). Ŝajne estas pli oportune en tia situacio uzi la transformon /ħ/ → /h/: ĥoler-o → \*holer-o.

Se tiu transformo ne eblas pro triobla kolizio (cetere tre malofta en la lingvo): *horo* – ĥoro – koro, la solvo povas esti la paragogo: *korus-o* (PIV: 571).

La transformo /ħ/ → /ĉ/ (ekzemple *ĥilo* → ĉilo, *Ĥino* → Ĉino) ŝajnas jam arkaikiginta.

La grafemo ζ 'zeta' [dzeta] transiris en L-an kaj de tie en FADPR kiel /z/: G ζωδιακός > L zodiacus F zodiaque D Zodiakus R зодиак E zodiak<sup>1</sup>-o.

Per /z/ [z] transskribas la R la G-an literon 'sigma' /σ, ς/ [s] inter du vokaloj, vortfine kaj antaŭ la nazaloj /m, n/:

G φασιανός L phasianus F faisan A pheasant D Fasan R фазан [fazan] > E fazan-o

G βασис R базис, база > E baz-o

G κρισις R кризис [krizis] > E kriz-o

Tiu ĉi transformo ĝeneraliĝis en la lingvo: D sorgen > zorg-i. Tamen D Suppe P zuppa, sed F soupe A soup R суп > E sup-o.

Intervokale: *dezert-*, *dezir-*, *izol-*, *mezur-*, *mizer-*, *prezent-*, *prezid-*, *rezerv-*, *sezon-*, *parazit-*, *trezor-*, *uzurp-*, *vizaĝ-*, *vizier-*, ...

Antaŭnazale: R розмарин > E (escepte) *rosmaren-* ↑ D Rosmarin.

Morfem-fine: *amuz-*, *aviz-*, *deviz-*, *griz-*, *huz-*, *infuz-*, *meriz-*, *piz-*, *preciz-*, *proviz-*, *raz-*,

*supoz-*, *surpriz-*, *ruz-*, *uz-*, *valiz-*, *virtuoz-*, *vaz-*;

sed: F gaz A gas D Gas R газ P gaz > gas-o. (Vorto kreita de Van Helmont el la L chaos < G χαος !)

La G litero ξ 'ksi' [ks] transiris en L-an kaj de tie en la aliajn lingvojn kiel /x/ — grafemo

mankanta kaj en la R\* kaj en E, kie ĝi transskribiĝas per /кс/ [ks] kaj — pro asimilado — per /кз/ [kz]. E sekvas senescepte la R-an modelon:

eks- *ekscelenc-*, *ekscit-*, *ekskurs-*, *eksped-*, *eksplo-*, *ekspozici-*, *eksterm-*, *ekstr-*, *ekstrem-*;

ekz- *ekzamen-*, *ekzekut-*, *ekzempl-*, *ekzempler-*, *ekzerc-*, *ekzist-*.

↑ R: *экскурсия*, *экспедиция*, *экспозиция*, *эстренный*, *экстремист*, *экзамен*, *экземпляр*, *экзистенциализм* ...

La transskribo /x/ → /ks, kz/ ĝeneraliĝis en la internacia lingvo:

L axis F axe > *aks-o*; FAD < borax P boraks > *boraks-o*

L mixtus F mixte A mix > *miks-*

L proximus > *proksim-a*

L sex F sexe A sex > *seks-o*

A wax D Wachs > *vaks-o*

L taxo F taxer A tax D taxieren P taksować > *taks-i*

Esceptoj:

L exceptus F excepter A except > *escept-i*

L explorare F explorer A explore > *esplor-i*

L expressus F exprimer A express > *esprim-i*

La G φ [ph] 'fi', θ [th] 'teta' kaj ρ [rh] 'ro' — (pri χ [ch] vd. pli antaŭe) — eniris en la L-an kiel "consonantes conglobatae":

L /ph/, same en FAD; en I kaj S /f/; en R /φ/ [f] > E /f/

G φοσφορος L phosphorus F phosphore A phosphorus D Phosphor P fosfor

R фосфор [fosfor] > *fosfor-o*

'Ro' en LFAD /rh/, en ISR /r/ > E /r/

G ρομβος L rhombus F rhombe F ромб [romb] > *romb<sup>1</sup>-o*

'Teta' – en LFAD /rh/, en ISP /t/, en R /φ/ [f] malofte, precipe antaŭ [e] kaj [i]:

G αιθηρ L æther F éther A ether D Aether P eter R эфир [efir] > *eter-o*

G θησις L thesis F thèse A thesis D Thesis, These P teza R тезис [tezis] > *tez-o*

La G-ajn geminatojn (bb, gg, dd, kk, ll, mm, nn, pp, ss, tt) ĉiuj lingvoj konservas escepte la S. En E (komence) ne estis duoblaj konsonantoj, sekve en E la geminatoj reduktiĝas je unu sola konsonanto:

G γαμμα L gamma F gamme R гамма [gamma] > *gam-o*

### 3.2.2. LA L-DEVENAJ ETIMOJ

En la L lingvo la grafemo /t/, sekvata de /i/, prononciĝas en diversaj periodoj laŭ la vojo: [-tia] → [tja] → [cja] → [cia].

En la R-an (ofte per P perado) ĝi eniris kiel /ци/ [ci], kaj de tie en E-on:

L sententia > FA sentence D Sentenz P sentencya R **сентенция** [sentencija] > *sentenc-o*

L obstructio > FA obstruction P obstrukcyя R **обструкция** [obstrukcija] > *obstrukc-o*.

Ĉe la substantivoj, finiĝantaj en L per -tio > en F -tion la vokalo /i/ konserviĝas:

L corporatio F corporation P korporaciya R **корпорация** [korporacija] > *korporaci-o*

L generatio F génération A generation D Generation R **генерация** [generacija] > *generaci-o*

L instructio FAD instruction R **инструкция** [instrukcija] > *instrukci-o*

\* La grafemo /X, x/ ekzistas en la R sistemo, sed — kiel ni jam vidis — kun sonvaloro [f]. Por [ks] nek la R, nek E havas apartan grafemon!



L natio FAD nation P nacya R **нация** [naciĵa] > *naci-o*  
 L portio FAD portion P porcyu R **порция** [porciĵa] > *porci-o*  
 L situacio FAD situation P situacya R **ситуация** [situaciĵa] > *situaci-o*  
 Esceptoj: L conditio F condition > *kondiĉ-o*  
 L iniciatio F initiation > *iniciat-o*

La L /ce/ kaj /ci/ transskribiĝas en R per /ц/ same kiel en E:  
 L princeps FA prince D Prinz R **принц** [princ] > *princ-o*  
 L processus F procès A process D Process, Prozess P proces R **процес**  
 [proces] > *proces-o*

Escepto: L filices > *filik-o*  
 L officarius F officier A officer D Offizier P oficer R **офицер** [oficer]  
 > *oficir-o*  
 L provincia F province A province D Provinz P prowincya R **провинция**  
 [provinciĵa] > *provinc-o*

Escepto: L pistacia F pistache A pistachio D Pistacie P pistacya R **фисташка**  
 [fistaŝka] > *pistak-o*

La L /cc/ transiras en la R-an kaj de tie en E-on kiel /kc/:  
 L accelerare F accélérer > *akcel-i*  
 ↑ R **акцелератор** [akcel'er'ator] > *akcelil-o*  
 L accentus > F accent R **акцент** [akcent] > *akcent-o*

La substantivaj finaĵoj:

-a la R konservas, Esperanto ne:  
 L ruina > R **руина** [ruina] > *ruin-o*  
 Escepto: L boa > R **боа** [boa] > *boa-o* (pro prefikso *bo-*!)

-ea R /ей/ [ej] > E /-e-/

-ia R /иа, ия/ [ia, ija] > E /-i-/ ↑ suprel!

-us R ∅ E ∅

L actus > R **акт** [akt] > *akt-o*

Esceptoj: L conus R **конус** [konus] > *konus-o*  
 L corpus R **корпус** [korus] > *korus-o*  
 L polus R **полюс** [pol'us] > *polus-o*

-ius R /ий/ [ij] E /-i-/

L genius R **гений** [gen'ij] > *geni-o*

L vicarius R **викарий** [vikarij] > *vikari-o*

-uus sed: L carduus R **карда** [karda] > *kard-o*

-æus L erinacæus > *erinac-o*

-um R ∅ > E ∅

L instrumentum > R **инструмент** [instrument] > *instrument-o*

L monumentum > R **монумент** [monument] > *monument-o*

L obiectum > R **объект** [objekt] > *objekt-o*

-ium R /ия/ [ija] > E /-i-/ aŭ ∅

L imperium > R **империя** [imperija] > *imperi-o*

sed: L acridium > *akrid-o*

L lolium > *lol-o*

-is, -es, -os, -e: ∅

L arthritis > R **артрит** [artrit] > *artrit-o*

**RIMARKO:** La litero /q/ mankas en la E literosistemo. — La songrupon /qu/ la R kaj E transprenas kiel /kv/:

L quartus F quart A quart D Quart P kwarta R **кварта** [kwarta]  
 > *kwart-o*

L quitus F quitte A quit D quitt P kwitt R **квит** [kvit] > *kvit-a*

La /v/ en E restas, eĉ se en la R ĝi malaperas:

L liquor F liqueur A liquor D Liqueur P likier R ликёр [l'ikjor] > *likvor-o*

### 3.2.3. LA F-DEVENAJ ETIMOJ

Vokaloj

Kaj en la R kaj en E mankas la vokaloj [ö] /eu/ kaj [ü] /u/.

/eu/ [ö] > R /ë/ [jo] aŭ /e/ [je] > E /e/

F meuble > R мебель [mebel'] > *mebl-o*

/u/ [ü] > R /ю/ [ju] > E /u/

F buste > R бюст [b'ust] > *bust-o*

F surtout > R сюртук aŭ сюртук\* [s'urtuk/s'urtut] > *surtut-o*

La du- kaj tri-grafoj /au/, /ou/, /eau/ transskribiĝas per la grafemoj laŭ ilia sonvaloro:

R /o/ resp. /y/ [u] > E /o/ resp. /u/

F restaurant/restauration R ресторация\* [restoracija] > *restoraci-o*

F poudre R пудра [pudra] > *pudr-o*

Nek la R, nek E diferencigas la fermitan [ɛ] kaj malfermitan [ɶ]. — La vortfina muta [ə] malaperas:

F gazette > R газета [gazeta] > *gazet-o*

F ingénieur > R инженер [inžen'er] > *inĝenier-o*

Nek en la R, nek en E ekzistas nazaj vokaloj. Ili transskribiĝas en ambaŭ lingvoj per vokalo plus nazalo (= naza konsonanto): /en/ |ǣ| > R /ан/ [an] > E /en/ aŭ (malofte) /in/:

F sergent > R сержант [serʒant] > *serĝent-o*

F révérence > R реверанс [reverans] > *riverenc-o*

/in/ |ē| R /ен/ E /en/, malofte /in/

F vélin R веленевая бумага [velen-...] > E *velen-o*

/on/ |ə| R /он/ > E /on/

F bastion R бастион [bastion] > E *bastion-o*

F bronze R бронза [bronza] > E *bronz-o*

Al la R kaj E /k/ en la F respondas /c/, /k/ kaj /q/:

F critiquer R критиковать [krit'ikovat'] > E *kritik-i*

F coquette R кокетливый [koketlivyj] > E *koket-a*

/ce/, /ci/ transskribiĝas fonemike en la R, sed grafike en E: /ce/, /ci/

F centime R сантим [santim] > E *centim-o*

F cigare R сигара [sigara] > E *cigar-o*

F révérence R реверанс [reverans] > E *riverenc-o*

sed: F service R сервис [serviz] > E *servic-o*

F caprice R каприз [kapriz] > E *kapric-o*

F ponceux R пунцовый [puncovyj] > E *punc-a*

/wa/ |wa| R /ya/ [ŭa] > E /ŭa/

F toilette R туалет [tualet] > E *tualet-o*

F trottoir R тротуар [trotuar] > E *trotuar-o*

F voile R вуаль [vual'] > E *vual-o*

|waj| /oy/ R /ой/ [oj] E /oj/

F voyage R вояж [voja] > E *vojaĝ-o*

|ej| /ay/ R /ей/ [ej] E /ej/

F paysage R пейзаж [pejza] > E *pejzaĝ-o*

\* “Я не имею духа писать сюртук, иди — что ещё хуже — сюртук.” — Vortoj de N.M. Karamzin, cit. ĉe Hüttl Worth.

\* Nun: **ресторан**.



Konsonantoj  
Afrikatoj, frikativoj

|     |     |     |     |     |     |            |
|-----|-----|-----|-----|-----|-----|------------|
| F   |     | R   |     | E   |     |            |
|     |     | c   | ĉ   | c   | ĉ-ĝ | Afrikatoj  |
| s-z | ŝ-ĵ | s-z | ŝ-ĵ | s-z | ŝ-ĵ | Frikativoj |

La supra tabelo klare montras la grandan diferencon inter la F kaj E.

/ch/ |ʃ| R /ш/ [ŝ] > E /ŝ/ kaj /ĉ/ — ĉi-lasta pli oftas!  
 F échafaud R эшафот [eŝafot] > E eŝafod-o  
 F galoche R галоша [galoŝa] > E galoŝ-o  
 F coqueluche R коклуш [kokluŝ] > E kokluŝ-o  
 sed: F chocolat R шоколад [ŝokolad] > E ĉokolad-o  
 RIM. — La elekton de la [ĉ] pravigas ĝia internacieco:  
 P czekolada A chocolate H csokoládé Ja chokoreto Sŭa chokoleti —  
 En ĉiuj [ĉo...]!

sed kontraŭas la internacian uzadon:

F champagne R шампанское [ŝampanskoje] > E ĉampan-o  
 F charlatan R шарлатан [ŝarlatan] > E ĉarlatan-o  
 F charnière R шарнир [ŝarnir] > E ĉarnir-o

/j/ |ʒ| /j/, /ge/, /gi/ > R /ж/ [j] > E /j/, /ĝ/, /g/  
 F jargon R жаргон [jargon] > E ĵargon-o  
 F jongler R жонглировать [jonĝlirovat'] E ĵongl-i  
 F journal R журнал [jurnal] > E ĵurnal-o  
 F régime R режим [reĵim] > E reĝim-o  
 F ingénieur R инженер [inĵen'er] > E inĝenier-o  
 F négligé R неглиже [negliĵe] > E negliĝ-o  
 ↑ P negliź, H neglizsé — kun [j]. (Verŝajne grafika influo!?)  
 F bandage R бандаж [bandaĵ] > E bandaĝ-o  
 F étage R этаж [etaĵ] > E etaĝ-o  
 F fourrage R фураж [furaĵ] > E furaĝ-o  
 (Verŝajne por eviti la kolizion kun la sufikso -aĵ!)

sed: F geste R жест [jest] > E gest-o

La vortfinaj (nur skribe signataj) mutaj konsonantoj ĝenerale konserviĝas kaj en la R kaj en E:

F ballet R балет [balet] > E balet<sup>6</sup>-o  
 F bouquet R букет [buket] > E buked-o  
 F dessert R десерт [d'esert] > E desert<sup>1</sup>-o  
 sed: F boulevard R бульвар [bul'var] > E bulvard<sup>1</sup>-o

### 3.3. LA SENPERAJ PRUNTAĴOJ

Esperanto senpere pruntis vortojn el la sekvaj lingvoj: L, F, D, A kaj I.

#### 3.3.1. Senperaj pruntaĵoj el la L

Ĉe la senperaj pruntaĵoj validas la samaj principoj, kiel ĉe la re-transliterigo (vd. 3.2.1. kaj 3.2.2.!).

Kompletigo: El inter ĉiuj fontlingvoj kaj grafike, kaj fonemike la plej proksima al E estas la L. [vd. LR 67: "La elparolado de Esperanto estas tute konforma (kompreneble

krom la supersignitaj literoj] al la latina elparolado, kiu estas uzata en mia lando." ] Sekve nur la L pruntaĵoj povas esti perfektaj homografoj/homofonoj:

bufo > *buf-o* *hirundo* > *hirund-o* gobio > *gobi-o*  
lanugo > *lanug-o*

Homografoj (sed ne homofonoj pro la malsama akcento):

*cētera* > *cetēr-a* *īnsula* > *insūl-o* *sīmia* > *simī-o*

Kompletigo al la morfologia aspekto de la pruntado: La -er-finaj substantivoj de II-a kaj III-a deklinacioj la finaĵo konserviĝas, se dum la deklinacio -e- ne forfalas:

acer, aceris > *acer-o* anser, anseris > *anser-o*  
tuber, tuberis > *tuber-o*

Cetere, E transprenas la genitivan radikon:

aper, apri > *apr-o* coluber, colubri > *kolubr-o*  
cancer, cancri > *kankr-o* pater, patris > *patr-o*

La konsonant-finaj substantivoj de III-a deklinacio envenis en E-on senŝanĝe:

anas > *anas-o* marmor > *marmor-o* mus > *mus-o* sal > *sal-o*  
Escepto: bos, bovis > *bov-o*

La x, ex, ix-finaj pruntiĝas pere de ilia genitiva radiko kun transformo /c/ → /k/:

faux, faucis > *faŭk-o* linx, lincis > *link-o* nox, noctis > *nokt-o*  
limax, limacis > *limak-o* silex, silicis > *silik-o*

pumex, pumicis > *pumik-o* sorex, soricis > *sorik-o*  
Escepto: vox, vocis > *voĉ-o* (pro la jam ekzistanta vok-!)

esox, esocis > *ezok-o* perdrix, perdricis > *perdrik-o*

histris, histicis > *histris-o* salix, salicis > *salik-o*

stris, strigis > *strig-o*

lex, legis > *leĝ-o* (pro *leg-o*!) rex, regis > *reĝ-o* (pro *reg-o*!)

Ĉe kelkaj simple foriĝas la finaĵo -ex:

cimex > *cim-o* culex > *kul-o* pulex > *pul-o* ...

Ĉe la adjektivoj validas la samaj principoj:

acidus > *acid-a* alius > *ali-a* favus > *fav-a* flavus > *flav-a*

maturus > *matur-a* nudus > *nud-a* plenus > *plen-a*

humilis > *humil-a* acer, acris, acre > *akr-a* felix, felicis > *feliĉ-a*(!)

sagax, sagacis > *sagac-a*(!)

La verboj perdas la infinitivan finaĵon:

clinare > *klin-i* laborare > *labor-i* postulare > *postul-i*

vocare > *vok-i*

Sed: procrastinare > *prokrast-i* stare > *star-i*

admonare > *admon-i* indulgere > *indulg-i* jungere > *jung-i*

legare > *leg-i* ludere > *lud-i* petere > *pet-i* solvere > *solv-i*

tegere > *teg-i*...

Sed: putrescere → L<sub>5</sub> putrire > *putr-i* stertere > *stertor-i*

audire > *aŭd-i* balbutire > *balbut-i* sentire > *sent-i*...

Sed: scire > *sci-i* conscire > *konsci-i*

El la supina radiko (sub influo de aliaj lingvoj):

fodio, fodire, fossus > *fos-i* vd. F fosse | fossa > L fossa → "*fosaĵ-o*"

### 3.3.2. Senperaj pruntaĵoj el la F

El inter la nov-Latinaj lingvoj la F estas grafike kaj fonemike la plej malproksima de la L, sekve ankaŭ de E.



Vokalismo

| GRAFEMO  | FONEMO | E      | TRANSSKRIBO                            |
|----------|--------|--------|--|
| a        | a      | a      | frac  frak  > <i>frak-</i>             |
|          | ɑ      | a      | amas  a'mɑ  > <i>amas-</i>             |
| â        | ɛ̃     | a      | mâcher  mɛ̃'ʃe  > <i>mac-</i>          |
| ai       | ɛ      | e      | affaire  afɛʀ  > <i>afēr-</i>          |
|          |        | a      | flairer  fle're  > <i>flar-</i>        |
|          |        | aj     | trait  tre  > <i>trajt-</i>            |
| ai       | e      | e      | trainer  tre'ne  > <i>tren-</i>        |
| aï       | aj     | aj     | baïonette  bajɔ'net  > <i>bajonet-</i> |
| ail      | aj     | ajl    | ail  aj  > <i>ajl-</i>                 |
| aille    | aj     | ajl    | paille  paj  > <i>pajl-</i>            |
| aim, ain | ɛ̃     | em, en | plaindre  plɛ̃dr̥  > <i>plend-</i>     |
| am       | ɑ̃     | am     | rampier  rɑ̃'pe  > <i>ramp-</i>        |
| an       | ɑ̃     | an     | gant  gɑ̃  > <i>gant-</i>              |
| au       | o, ɔ   | o      | échafaud  eʃa'fo  > <i>eŝafod-</i>     |
|          |        | aŭ     | sauce  sos  > <i>saŭc-</i>             |
|          |        | ∅      | gruau  gry'o  > <i>gri-</i>            |
| ay       | ej     | aj     | crayon  kre'jɔ̃  > <i>krajon-</i>      |
| e        | ɔ̃     | e      | cheval  ʃɔ'val  > <i>ĉeval-</i>        |
|          |        | ∅      | secouer  sɛku'we  > <i>sku-</i>        |
|          | e      | e      | serrure  seryr̥  > <i>serur-</i>       |
|          | ɛ      | e      | sec  sɛk  > <i>sek-</i>                |
| é        | e      | e      | espérer  espe're  > <i>esper-</i>      |
| è        | ɛ      | e      | mèche  mɛʃ  > <i>meĉ-</i>              |
|          |        |        | très  tre  > <i>tre</i>                |
| ê        | e      | e      | même  mɛm  > <i>mem</i>                |
| ei       | ɛ      | e      | neige  neʒ  > <i>neĝ-</i>              |
| eille    | ej     | el     | abeille  Abɛj  > <i>abel-</i>          |
|          |        | ∅      | groseille  gro'zej  > <i>gros-</i>     |
| em       | ɑ̃     | em     | tremper  trɑ̃'pe  > <i>trem-p-</i>     |
| en       | ɑ̃     | en     | fendre  fɑ̃dr̥  > <i>fend-</i>         |
|          | ɛ̃     | en     | bien  bjɛ̃  > <i>bien-</i>             |
| eu       | ø      | u      | bleu  blø  > <i>blu-</i>               |
|          |        | aŭ     | jeudi  ʒø'di  > <i>ĵaŭd-</i>           |
| i, î, ï  | i      | i      | dire  dir̥  > <i>dir-</i>              |
|          | j      | i      | violon  vjɔ̃'lɔ̃  > <i>violon-</i>     |
| im, in   | ɛ̃     | im, in | grincer  grɛ̃'se  > <i>grinc-</i>      |
|          |        | em, en | matin  ma'tɛ̃  > <i>maten-</i>         |
| o        | o      | o      | trop  tro  > <i>tro</i>                |
|          | ɔ̃     | o      | bord  bɔ̃r̥  > <i>bord-</i>            |
| ô        | o      | o      | fantôme  fɑ̃'tom  > <i>fantom-</i>     |
| oi       | wa     | ua     | voile  vwal  > <i>vual-</i>            |
|          |        | oi     | soif  swaf  > <i>soif-</i>             |
|          |        | oj     | fois  fwa  > <i>foj-</i>               |
| œu       | œ      | e      | cœur  kœr̥  > <i>ker-</i>              |
| oin      | wɛ̃    | ojn    | foin  fwɛ̃  > <i>fojn-</i>             |
|          |        | on     | besoin  bɛzɔwɛ̃  > <i>bezon-</i>       |
| om       | ɔ̃     | om     | trombe  trɔ̃b  > <i>tromb-</i>         |
| on       | ɔ̃     | on     | tondre  tɔ̃dr̥  > <i>tond-</i>         |

|            |     |    |                                    |
|------------|-----|----|------------------------------------|
| ou, où, oû | u   | ∅  | goudron  gu'drɔ̃  > <i>gudr-</i>   |
|            |     | u  | trou  tru  > <i>tru-</i>           |
|            |     | o  | trouver  tru've  > <i>trov-</i>    |
|            | w   | u  | louer  lu'we  > <i>lu-</i>         |
| oy         | waj | oj | voyager  vwaja'ʒe  > <i>vojaĝ-</i> |
| u          | y   | u  | sur  syr  > <i>sur</i>             |
|            |     | i  | grau  gry'o  > <i>gri-</i>         |
| uy         | ujj | u  | ennuyer  ānɥi'je  > <i>enu-</i>    |
|            |     | og | appuyer  apɥi'je  > <i>apog-</i>   |
| un         | ā   | un | lundi  lā'di  > <i>lund-</i>       |
| y          | i   | i  | embryon  āmbri'iʒ  > <i>embri-</i> |

## Konsonantismo

| GRAFEMO | FONEMO | E | TRANSSKRIBO                           |
|---------|--------|---|---------------------------------------|
| c       | k      | k | catcher  ka'ʃe  > <i>kaš-</i>         |
|         |        |   | commune  kɔ'myn  > <i>komun-</i>      |
|         |        |   | cuve  kyv  > <i>kuv-</i>              |
|         | s      | c | crêver  krə've  > <i>krév-</i>        |
|         |        |   | cinabre  si'nabr  > <i>cinabr-</i>    |
|         |        |   | agacer  aga'se  > <i>agac-</i>        |
|         |        | ĉ | ciel  sjel  > <i>ĉiel-</i>            |
|         |        |   | fiancé  fijā'se  > <i>fianĉ-</i>      |
| ç       | s      | s | maçonner  masɔ'ne  > <i>mason-</i>    |
| ch      | ʃ      | s | bouche  buʃ  > <i>buš-</i>            |
|         |        |   | catcher  ka'ʃe  > <i>kaš-</i>         |
|         |        | ĉ | cracher  kra'ʃe  > <i>kraĉ-</i>       |
|         |        |   | trancher  tra'ʃe  > <i>tranĉ-</i>     |
|         |        | c | corniche  kɔr'niʃ  > <i>kornic-</i>   |
| g       | g      | g | garantir  garā'tir  > <i>garanti-</i> |
|         |        |   | golfe  gɔlf golfe-                    |
|         |        |   | gratter  grɔ'te grat-                 |
|         | ʒ      | ĝ | gener  ʒe'ne  > <i>ĝen-</i>           |
|         |        |   | giraffe  ʒi'raf  > <i>ĝiraf-</i>      |
|         |        |   | sage  səʒ  > <i>saĝ-</i>              |
|         |        | g | gélatine  ʒela'tin  > <i>gelaten-</i> |
| j       | ʒ      | ĵ | jeter  ʒə'te  > <i>ĵet-</i>           |
|         |        | ĝ | jouir  ʒwir  > <i>ĝu-</i>             |
| gn      | ɲ      | ɲ | gagner  ga'ɲe  > <i>gajɲ-</i>         |
| gu      | g      | g | digue  dig  > <i>dig-</i>             |
| q       | k      | k | coq  kɔk  > <i>kok-</i>               |
| qu      | k      | k | basque  bask  > <i>bask-</i>          |
|         |        |   | quelque  kelk  > <i>kelk-</i>         |
| r       | ʀ      | r | cadre  kadʀ  > <i>kadr-</i>           |

La adjektivoj envenas en la vir-genra formo: *sec* > *sek-a* *blanc* > *blank-a*,  
escepte ankaŭ en in-genra: *grise* > *griz-a*.

La verboj de la unua konjugacio perdas la finaĵon:

*acheter* > *aĉet-i* *broder* > *brod-i* *dorloter* > *dorlot-i* *nager* > *naĝ-i*  
*donner* > *don-i* *frotter* > *frot-i* *gratter* > *grat-i* *pardoner* > *pardon-i*.

La -ir-finaj same: finir > *fin-i* jouir > *ĝu-i*,  
sed: garantir > *garanti-i*.

La -re-finaj same: fendre > *fend-i* tondre > *tond-i* mettre > *met-i*,  
sed kelkaj verboj forlasas nur la finvokalon:

coudre > *kudr-i* cuire > *kuir-i* dire > *dir-i*

(ĉe "prendre" forfalas ankaŭ la lasta konsonanto: *pren-i*)

### 3.3.3. Senperaj pruntaĵoj el la D

La modelo de la D-transskribo estis la J kiel peranto inter D kaj E:

Forigo de geminatoj

D Teller J teler > E *teler-o*

D Rippe J rip > E *rip-o*

D Fell J fel > E *fel-o*

D glatt J glat > E *glat-a*

[pluajn ekzemplojn vidu en la tabelo!]

Vokaloj, diftongoj

| GRAFEMO | FONEMO | E  | TRANSSKRIBO   |
|---------|--------|----|---|
| au      |        | aŭ | Haut > <i>haŭt-</i><br>dauern > <i>daŭr-</i><br>laŭt > <i>laŭt-</i> |
| ä       | ɛ      | a  | Mäkler > <i>makler-</i>   |
| äu      |        | e  | schälen > <i>ŝel-</i> (vd. J sheyln)                                |
| ei      |        | aŭ | Fräulein > <i>fraŭl-in-</i>   |
|         |        | ej | Heim > <i>hejm-</i>   |
|         |        | aj | feilen > <i>fajl-</i>   |
| ie      | i:     | i  | Riemen > <i>rimen-</i> (vd. J rimen)                                |
| ö       | œ, ø   | e  | Möwe > <i>mev-</i> (vd. J meve)                                     |
| ü       | y, y   | u  | früh > <i>fru-</i>  |
|         | i̯     | i  | krüppel > <i>kripl-</i><br>Kürass > <i>.kiras-</i>                  |

Konsonantoj

| GRAFEMO | FONEMO | E  | TRANSSKRIBO                       |
|---------|--------|----|-----------------------------------|
| ch      | x, ç   | h  | Kachel  kaxel  > <i>kahel-</i>    |
|         |        | k  | Fach  fax  > <i>fak-</i>          |
|         |        | ĉ  | Tuch  tu:x  > <i>tuk-</i>         |
|         |        | ĉ  | Pech  pex  > <i>peĉ-</i>          |
| ck      | k      | k  | jucken     > <i>juk-</i>          |
| h       | h      | h  | hell  hel  > <i>hel-</i>          |
|         |        | ∅  | Schuh  ŝu:  > <i>ŝu-</i>          |
| pf      | pf     | f  | pflügen  pfle:gøn  > <i>fleg-</i> |
|         |        | f  | pfeifen > <i>fajf-</i>            |
| sch     | ŝ      | ŝ  | Schaf  ŝaf  > <i>ŝaf-</i>         |
| st      | st     | st | Stange     > <i>stang-</i>        |
|         | ŝt     | ŝt | stehlen     > <i>ŝtel-</i>        |
| th      | t      | t  | Koth     > <i>kot-</i>            |
| tz      | ts     | c  | schmatzen     > <i>ŝmac-</i>      |



|   |    |   |                              |
|---|----|---|------------------------------|
| v | f  | f | Verdeck     > <i>ferdek-</i> |
| w | v  | v | welken     > <i>velk-</i>    |
| z | ts | c | Zoll  tsɔl  > <i>col-</i>    |
|   |    | t | Pelz     > <i>pelt-</i>      |

**RIMARKO 1:** Estas konstateble, ke ĉe D-pruntaĵoj, Zamenhof sekvis precipe la fonemikan principon.

La vortfinaĵoj -e, -el, -en, -er forfalas:

Bube > *bub-o* Rippe > *rip-o* Raupe > *raŭp-o* Schraube > *ŝraŭb-o*  
 Libelle > *libel-o*;  
 Kringel > *kring-o*, sed Kittel > *kitel-o*;  
 Pfosten > *fost-o*, kaj Schincken > *ŝink-o*, sed Faden > *faden-o*;  
 Klawter > *klaft-o* Leder > *led-o*...

La verbo-finaĵoj forfalas:

scheinen > *ŝajn-i* scherzen > *ŝerc-i* schulden > *ŝuld-i*  
 schütten > *ŝut-i* taugen > *taŭg-i* trinken > *trink-i* warten > *vart-i*

Ĉe kelkaj verboj Zamenhof elektis la preteritan formon en kunmetaĵoj: *flug-i* (vidu: Flug, Flugblatt, Flugmaschine, Flugpost, Flugzeug k.s.)

**RIMARKO 2:** Estas rimarkeble, ke ĉe la D-pruntaĵoj |ŝ| neniam transformiĝas je |tŝ|. Inter la D-etimaj vortoj tute mankas la literoj /ĉ/ kaj /ĥ/ (kvankam tiuj fonemoj ekzistas en la D!), /j/ kaj /ĝ/.

### 3.3.4. Senperaj pruntaĵoj el la A

La pli granda parto de la A-aj pruntaĵoj aperas en E laŭ grafika principo:

bed > *bed-o* bird > *bird-o* boat > *boat-o* bran > *bran-o*  
 drink > *drink-i* farm > *farm-i* flirt > *flirt-i* help > *help-i* ink > *ink-o*  
 last > *last-a* rust > *rust-o* spite > *spit-e* sun > *sun-o*  
 funnel > *funel-o* kiss > *kis-i*...

Laŭ fono-grafemika principo

| GRAFEMO | FONEMO | E  | TRANSSKRIBO                             |
|---------|--------|----|---|
| ai      | aj     | aj | nail > <i>najl-</i> hail > <i>hajl-</i> |
| ea      | i      | e  | streak > <i>strek-</i>                  |
| oa      | ɔu     | o  | road > <i>rod-</i> toast > <i>tost-</i> |
| oi      | ɔj     | o  | boil > <i>bol-</i>                      |
| ou      | ʌ      | u  | scourge > <i>skurĝ-</i>                 |

/y/ kaj /e/ vortfine forfalas:

brandy > *brand-o* cooky > *kuk-o* dandy > *dand-o* glue > *glu-i*  
 have > *hav-i* incite > *incit-i*...

c > k comb > *komb-i*, scrape > *skrap-i*  
 ck > k tickle > *tikl-i*  
 ge > ĝ scourge > *skurĝ-o* j > ĝ, joy > *ĝoj-i*  
 sh > ŝ bushel > *buŝel-o* push > *puŝ-i*  
 shell > *ŝel-o* ship > *ŝip-o*  
 st > ŝt stone > *ŝton-o*  
 w > v blow > *blow-i* swing > *sving-i*  
 wh > v whip > *vip-o*  
 wn > n drown > *dron-i*  
 tch > ĉ stretch > *streĉ-i*

Laŭ fonemika principo:




i > aj fire > fajr-o ride > rajd-i

### 3.3.5. Kompromisaj solvoj

Specifa maniero de morfemo-konstruado: form-intermikaĵo de du aŭ pluraj etimoj. Ekzemple por *glit-i* Zamenhof ne elektis la F-an "glisser" (ĝi estus \**glis-i*) nek la D "gleiten" (ĝi estus \**glejt-i* aŭ \**glajt-i*), sed li konstruis kompromisan morfemo-korpon: *glit-*.

Kelkaj karakteraj ekzemploj:

|               |                      |             |                               |
|---------------|----------------------|-------------|-------------------------------|
| A heat        | } <i>hejt-i</i>      | A deliver   | } <i>liver-i</i> vd. J livern |
| D heizen      |                      | F livrer    |                               |
| A stone       | } <i>ŝton-o</i>      | F caisse    | } <i>kest-o</i>               |
| D Stein       |                      | A chest     |                               |
| A neighbour   | } <i>najbar-o</i>    | Kasten      |                               |
| D Nachbar     |                      |             |                               |
| A forget      | } <i>forges-i</i>    | FAD palette | } <i>paletr-o</i>             |
| D vergessen   |                      | P paleta    |                               |
| A knead       | } <i>kned-i</i>      | F ravir     |                               |
| D kneten      |                      | D rauben    |                               |
| A nightingale | } <i>najtingal-o</i> | F ruban     | } <i>ruband-o</i>             |
| D Nachtigall  |                      | D Band      |                               |
| F danser      | } <i>danc-i</i>      | L aquila    | } <i>agl-o</i>                |
| A dance       |                      | F aigle     |                               |
| D tanzen      | } <i>ĉan-o</i>       | A eagle     |                               |
| F chien       |                      | L runcare   | } <i>ronk-i</i>               |
| D Hahn        | F ronfler            |             |                               |
| F hâvre       | } <i>haven-o</i>     | A cover     | } <i>kovr-i</i>               |
| D Hafen       |                      | F couvrir   |                               |
| F glaive      | } <i>glav-o</i>      | L sturio    | } <i>sturg-o</i>              |
| L gladius     |                      | A sturgeon  |                               |
| L cerebrum    | } <i>cerb-o</i>      | F esturgeon |                               |
| F cerveau     |                      | F hareng    | } <i>haring-o</i>             |
| A scarf       | A herring            |             |                               |
| F écharpe     | D Häring             |             |                               |
| F cahier      | } <i>kajer-o</i>     | L tonare    | } → F tonner                  |
| P kajer       |                      | D donnern   |                               |
| L sedeo       | } <i>sid-i</i>       | A thunder   | ↓<br>→ <i>tondr-i</i>         |
| A sit         |                      | F chat      | } <i>kat-o</i> vd. { D Katze  |
| D sitzen      |                      | A cat       |                               |




### 3.4. ETIMOLOGIAJ-GENETIKAJ ŜANĜOJ EN LA MORFEM-KORPO


#### 3.4.1. Evito de polisemio, signifo-fiksiĝo

Per fonemo/grafemo-ŝanĝo oni evitas la polisemion:


u ~ o




∅ ~ d




∅ ~ t




k ~ g



ĉ ~ ŝ




ĝ ~ g




#### 3.4.2. Evito de homonimio

t ~ d






s ~ ŝ




### 3.4.3. Morfologie diverskarakteraj etimoj

k ~ c





k ~ g



k ~ t






ŝ ~ s




### 3.4.4. Plur-etimaj variantoj







✓ Primara + sekundara etimo [etimologiaj-genetikaj duopoj (Wiener 1950)].


Se la etimo estis plursignifa, Zamenhof dividis je du la lingvan signon: por unu morfemo li konsideris la primaran etimon, por la alia — la sekundaran. Ekzemple la F 'lettre' el la L littera havas du signifojn: *litero* kaj *letero*. Zamenhof solvis la problemon jene:












praA drincan, mezA drinke/n

- D trinken > *trink-i*
- A drink > *drink-i*



3.5. NE-ETIMOLOGIAJ (NE-GENETIKAJ) SON/LITER-ŜANĜOJ

3.5.1. Evito de homonimio

| VOKAL-ŜANĜOJ | LA ŜANĜO  | LA KAŬZO  |
|--------------|---|---|
| <u>u ~ o</u> | D werben<br>P werbovac<br>R вербовать } > <i>varb-i</i>   | <i>verb-o</i>   |
| <u>i ~ e</u> | D piepen > <i>pep-i</i>   | <i>pip-o</i>  |
| <u>u ~ i</u> | F gruau > <i>gri-o</i>  | <i>gru-o</i>  |
| <u>u ~ o</u> | L regulus > <i>regol-o</i>  | <i>regul-o</i>  |
| <u>∅ ~ j</u> | FD galle<br>A gall<br>P galas } <i>gajl-o</i>   | A gall<br>D Galle } <i>gal-o</i>                        |
| <u>b ~ p</u> | F sorbe<br>A sorb } <i>sorp-o</i>   | L sorbeo > <i>sorb-i</i>                                |
| <u>p ~ b</u> | D steppen > <i>steb-i</i>   | <i>step-o</i>   |
| <u>k ~ g</u> | D locken > <i>log-i</i><br>L picus > A (wood)peck > <i>peg-o</i><br>L pica > <i>pig-o</i>       | <i>lok-o</i><br><i>pek-i</i><br>F piquer > <i>pik-i</i> |
| <u>s ~ c</u> | L lassus F las > <i>lac-a</i>   | <i>las-i</i>  |
| <u>s ~ ŝ</u> | R пачти > <i>paŝt-i</i><br>I posta } <i>poŝt-o</i><br>F poste<br>AD post<br>R почта<br>P poczta | <i>past-o</i><br><br><i>post</i>                        |
| <u>ŝ ~ s</u> | R штоф } > <i>stof-o</i><br>P sztof   | <i>ŝtof-o</i>   |
| <u>t ~ d</u> | L tenta > F tente > <i>tend-o</i><br>L porta > F porte > <i>pord-o</i>                          | <i>tent-i</i><br><i>port-i</i>                          |
| <u>t d</u>   | D Loth R лот P łut > <i>lod-o</i><br>L lota > F lote/lotte > <i>lojt-o</i>                      | <i>lot-i</i>  |
| <u>v ~ f</u> | I lava > <i>laf-o</i>   | <i>lav-i</i>  |

3.5.2. La forigo de eks-afiksoj

En E-on envenis la pruntaĵoj ne ĉiam en ilia baza (radika) formo, sed tre ofte kiel derivaĵoj. Tiujn derivaĵojn ni nomas antaŭ-Esperantaj derivaĵoj kaj la afiksojn: eksafiksoj, eks-prefiksoj kaj eks-sufiksoj. [HONFAN en sia artikolo "Malsamaj internaciecoj en Esperanto" en *El Popola Ĉinio* (1982, 4:28-29) distingas 'internaciajn' kaj 'fremdajn' vortojn en Esperanto. Laŭ la aŭtoro: "Internaciaj estas tiuj vortoj, kies internacieco kuŝas en la radiko fundamenta, ekz. *konkret-*, *son-*, *vent-*. 'Fremdaj' estas tiuj, kiuj eniris en Esperanton sole radike, sed ankaŭ kun la ceteraj elementoj, ekz. *imperialismo*, *individualismo*, *liberalismo*.)

La eksafiksoj ĝenerale ne kaŭzas kolizion nur tiam, se ili estas analogaj al E-aj afiksoj kaj la ilin sekvanta vort-trunko estas E-a morfemo, ekzemple *defend-* ~ *de-fend-* aŭ: *lekant-* ~ *lek-ant-*. Kelkajn el inter ili Zamenhof klopodis forigi, sed ĉiujn solvi li ne sukcesis.



### 3.5.2.1 Eksprefiksoj

Analogaj al E-aj prefiksoj estas *de-*, *eks-*, *dis-* kaj *re-* kaj kelkaj prefikse uzataj prepozicioj: *per-*, *sub-*, *super-*, *tra-*, *trans-*...

La *de-* kaj *re-* eksprefiksojn Zamenhof (en kelkaj okazoj) anstataŭis per *di-* kaj *ri-*; ekzemple en *diboĉ-*, *difekt-*, *difin-*...

Laŭ itala modelo: *ribel-*, *ricev-*, *rifuĝ-*, *rifuz-*, *rigard-*, *rikolt-*, *rilat-*, *rimark-*, *rimed-*, *ripet-*, *risort-*, *riverenc-*...

El inter nesolvitaj kelkaj povas kaŭzi kolizion: *degrad-* ~ *de-grad-*, *delir-* ~ *de-lir-*, *demon-* ~ *de-mon-*, *deput-* ~ *de-put-*, *detru-* ~ *de-tru-*...

### 3.5.2.2 Ekssufiksoj

La plej granda parto de ekssufiksoj estas internaciaj kaj eniris en ĉiujn lingvojn kune kun la pruntaĵoj. Parto el inter ili pliposte memstariĝis kaj produktiviĝis. (En E similan tendencon oni povas rimarki ĉe *-ent-*, *-iv-*, *-iz-*.)

#### Homofonaj ekssufiksoj

- an- ĉambelan-, ĉarlatan-, ...
- ant- leŭtenant-;  
arogant-, brilant-, diamant- (vd. di-am-ant-!), kontant-, konstant-, ...
- et- societ-, trumpet-, tualet- (plejparte ŝanĝitaj per -ed-!)
- id- fluid-, rigid-, ...
- in- termin- (plejparte ŝanĝitaj per -en-!)

Ceteraj ekzemploj:

- al- trivial-, universal-, vasal-, vertikal-, ...
- aci- generaci-, korporaci-, redakci-, restoraci-, situaci-, ...
- ari- kancelari-; / notari-, sekretari-, vikari-, ...
- ent- fundament-, monument-, pasament-, regiment-, ...  
argument-, fragment-, taĉment-, tegment-, ...  
diligent-, elokvent-, eminent-, ...  
serĝent-, student-, ...
- er-, -ier-, -ir-, -or- kelner-, kancelier-, barbir-, oficir-, pionir-, kantor-, kurator-,  
redaktor-, ...
- eri- galanteri-, galeri-, imperi-, ...
- ik- fortik-, lunatik-, praktik-, tropik-, ...
- iv- efektiv-, masiv-, ...
- iz- civiliz-, proviz-, surpriz-, ...
- ur- aventur-, faktur-, figur-, gravur-, ...

En UV enestas vortparoj kies bezonateco estas duba, ekzemple: *ĉif-/ĉifon-*, *eskadr-/skadr-*, *kant-/kantor-*, *ov-/oval-*, *univers-/universal-*, *kancelier-/kancelari-*, *redaktor-/redakci-*, ... Cetera la konflikto "internacieco ↔ reguleco" ĝis hodiaŭ restas aktuala problemo.

### 3.5.3. Pseŭdo-afiksoj

Pli grandan problemon kaŭzis por Zamenhof, se la etimo finiĝis per silabo, homologa al iu E-a sufikso. Parton el ili (precipe *-et-*, *-in-*, *-il-* kaj *-ul-*) Zamenhof solvis per forlaso [vd. 3.6.3.3.!] aŭ per sonŝanĝo:

- et-/ed- bufed-, buked-, cigared-, moned-, piked-, planed-, sterled-, ...
- eg-/ag- kratag-,
- er-/ur- vipur-,
- il-/el- mirtel-, pastel-, amel-, makzel- < maxilla
- il-/ol- skrofol-, ventol-,
- in-/en- arleken-, azen-, baldaken-, delfen-, domen-, ermen-, fraksen-,\* jasmen-,

\* En L, *fraxinus* transformiĝis je *fraxus* kaj de tie en I: frasso!

kamen-, kapucen-, karaben-, karpn-, kvaranten-, magazen-, maroken-,  
nanken-, platen-, raben-, rozmarenen-, ruben-, ...  
-in-/-un- farun-,

Granda parto de pseŭdo-afiksoj tamen restis kaj kelkaj el inter ili vere kaŭzas konfliktojn:  
*koket-*~*kok-et-o* ("eta koko"); *katar-*~*kat-ar-o* ("aro da katoj"); *legend-*~*leg-end-a*  
("kion oni devas legi"); *haring-*~*har-ing-o*, k.s.

Restis nesolvitaj (la substrekoj montras tiujn morfemojn, kiuj estas analizeblaj):

-ad- limonad-, grenad-,  
-an- akompan-, ĉambelan-, ĉampan-, ĉarlatan-, hortulan-, kalkan-, kapitan-, kaŝtan-,  
koran-, marcipan-, membran-, pelikan-, rafan-, safran-, sopran-, taban-, tetan-,  
timian-, turban-, ...  
-ar- avar-, gitar-, bazar-, husar-, katar-, kaviar-, rempar-, trotuar-, rosmar-, akar-, ...  
-eg- koleg-,  
-end- legend-, etend-,  
-er- danĝer-, degener-, ekzempler-, eter-, heder-, ĥimer-, ĥoler-, juniper-, kamer-,  
kelner-, klister-, koler-, konsider-, krater-, kuler-, kurier-, lonicer-, manier-,  
mister-, mizer-, moder-, morter-, paper-, parker-, parter-, paser-, porter-,  
prosper-, river-, sever-, sincer-, somer-, teler-, toler-, tuber-, ulcer-, uter-,  
-et- bajonet-, bet-, facet-, epolet-, gazet-, klarinet-, koket-, parget-, portret-, profet-,  
ripet-, societ-, tapet-, trumpet-, tualet-,  
-id- akrid-, avid-, fluid-, kantarid-, prezid-, rapid-, rigid-,  
-il- angil-, argil-, babil-, daktil-, ĝentil-, humil-, kamomil-, koĉenil-, konsil-,  
krokodil-, morbil-, siml-, util-,  
-in- ilumin-, karmin-, kombin-, maŝin-, muslin-, obstin-, rafin-, rezin-, termin-, urin-,  
-ing- disting-, esting-, faring-, haring-, laring-, siring-,  
-on- antimon-, bastion-, baston-, beladon-, bezon-, bombon-, buljon-, burĝon-,  
buton-, citron-, dispon-, fanfaron-, fripon-, galon-, kaldron-, kalson-, kapon-,  
kolofon-, kolon-, koton-, krajon-, leksikon-, medalion-, menton-, pantalon-,  
peron-, person-, poligon-, propon-, salon-, sezon-, spion-, timon-, vagon-,  
violon-,  
-ul- angul-, betul-, fistul-, kapsul-, makul-, okul-, postul-, spegul-, tabul-,  
-um- kostum-, kukum-, volum-,

#### Participaj sufiksoj

-ant- ↑ 3.5.2.2.1  
-at- klimat-, kravat-, monat-, muskat-, oblat-, palat-, predikat-, rabat-, sabat-,  
skarlat-, soldat-, ...  
-int- terebint- ...  
-it- granit-, merit-, pirit-, profit-, spirit-, zenit-, ...  
-ont- diskont-, rakont-, volont-, ...  
-ot- abrikot-, dortlot-, kalikot-, markot-, marmot-, perlamot-, rabot-, ...

### 3.6. TRASTRUKTURIGO DE SILABOJ

Sur silaba nivelo: estas ŝanĝebla la ordo de silaboj, oni povas pligi aŭ malpligi la nombron de silaboj. Por ĉiuj operacioj troviĝas ekzemploj: kelkaj estas pli, aliaj malpli produktivaj.

#### 3.6.1. Metatezo

Malofte, kaj — ŝajne — laŭokaze uzata operacio:

I valanga > *lavang-o*

D Sporn > *spron-o* < L<sub>5</sub> spornus Franka \*sporo F éperon

A spur R шпора



Inversigo ĉe interjekcioj (laŭ la signifoj, donitaj en UV):

FD ah! D ach! R ax! P ach! > *ha!*  
 FA oh! D och! R ox! P och! > *ho!*

3.6.2. **Dilato** (plimultigo de la silabo-nombro).

3.6.2.1. Protezo — Kompletigo vort-komence. Tre produktiva operacio en certaj naciaj lingvoj:

L stella > F étoile “*stelo*”  
 F station > T istasiyon “*stacio*”  
 F machine > Kirundi imashiniaŭ “*maŝino*”  
 A stylo > Sango esetiloo “*font-plumo*”

En Esperanto ne uzata. Ĉe etimoj E elektas la originalan, ne protezitan formon (plej ofte komunan kun la L kaj A):

L species F épice A spice > “*spico*”  
 L spina F épine A spine > “*spino*”  
 L spinacia F épinards A spinach D Spinat R спинат P szpinak  
 > “*spinaco*”

Same: *spion-*, *spong-*, *skarp-*, *strang-*, *sturg-*, *sturn-*, ...

Nur unu ekzemplon ni trovis en UV kiam oni distingas du morfemojn per protezo:

|             |              |
|-------------|--------------|
| E skadr-o   | E eskadr-o   |
| I squadrone | I squadra    |
| F escadron  | F escadre    |
| A squadron  | A squadron   |
| D Eskadron  | D Geschwader |
| R ескадрон  | R ескадра    |
| P szwadron  | P eskadra    |

3.6.2.2. Epentezo — Kompletigo vort-interne, ofta en iuj naciaj lingvoj, tre malofta en Esperanto:

L planta > H palánta  
 F graphique > T girafik Ja gurafu  
 F blouse > T buluz Ja burausu  
 F place > Sango palasi F brique > Malgasa birika ...

En Esperanto:

|           |                |        |                 |     |   |
|-----------|----------------|--------|-----------------|-----|---|
| D löten   | } <i>lut-i</i> | F luth | } <i>liut-o</i> | L { | } <i>pōpulus &gt; popl-o</i><br><i>pōpulus &gt; popol-o</i> |
| P lutować |                | A lute |                 |     |   |
|           | R лютия        |        |                 |     |   |
|           | P lutnia       |        |                 |     |   |

3.6.2.3. Paragogo — Plilongigo de la morfemo per unu silabo. Operacio produktiva en Esperanto, kaj motivita:

a) por eviti homonimon:

man-/mana-; loĝ-/loĝi-; mil-/mili-; paĝ-/paĝi-; part-/parti-; pin-/pini-;  
 temp-/tempo-; tetr-/tetra-

b) por eviti pseŭdo-afikson:

|             |              |                    |                     |                     |
|-------------|--------------|--------------------|---------------------|---------------------|
| G εἰδυλλιον | > L idyllium | R идиллия          | } <i>idili-</i>     | (↑ <i>id-il-!</i> ) |
| F idylle    | A idyll      | D Idylle           |                     |                     |
| P notaryusz | F notaire    | } > <i>notari-</i> | (↑ <i>not-ar-</i> ) |                     |
| L notarius  | F notaire    |                    |                     |                     |
| R нотариус  | A notary     |                    |                     |                     |
| P notaryusz | D Notar      |                    |                     |                     |

Same: *sekretari-* (kp. *sekret-ar-!*)

|                  |              |                |                     |
|------------------|--------------|----------------|---------------------|
| Sed: F commenter | A comment    | D commentieren | } <i>komentari-</i> |
| R комментировать | P komentować |                |                     |

*RIMARKO:* Sufiĉus: *koment-*! Verŝajne R-influo, kie la formo **коментарий** estas pli frekvenca! — Pliposte tion konsciis ankaŭ Zamenhof [vd. *Leteroj*, vol. II: 279].  
 Nemotivita estas: L *condolere* praF *condoloir* A *condole* P *kondolować* > *kondolenc-*. Sufiĉus: \**kondol-*.  
 L *ornare* F *orner* > *ornam-i* (\**orn-i?*)  
 L *sterto*, -ere > *stertor-i* (\**stert-i?*)

### 3.6.3. Redukto de la silabo-nombro

3.6.3.1. Aferezo — Redukto vortkomence. Tre produktiva en multaj etnaj lingvoj (kaj precipe en kreolaj lingvoj):

F → F-kreola: *accuser* > *kize*; *demande* > *mande*; *échapper* > *ŝape*;  
*écorcher* > *kroŝe*; *écouter* > *kute*; *oublier* > *blije/bilje* ...  
 S → Tagaloga: *elastico* > *lastiko*; *apostar* > *pusta*; *encender* > *sinde* ...  
 F → Pende: *indépendance* > *dipanda*; *appel* > *pelo* ...

En Esperanto (ĝenerale nemotivita):

F-aj etimoj: *aboyer* > *boj-*; *alerte* > *lert-*; *accrocher* > *kroĉ-*;  
*assiéger* > *sieĝ-*; *déchirer* > *ŝir-* (motivita); *écluse* > *kluz-*;  
*emprunter* > *prunt-*; *épingle* > *pingl-* [kp. L *spingula*, P *szpilka*];  
*étendard* > *standard-* [↑ Franka \**standhard*!];  
*exhalaison* > *haladz-* [↑ F *exhaler* > L *exhalare* ← *halo*, -are!];  
*incliner* > *klin-*; *repentir* > *pent-* [↑ praF *se pentir* < L *pœnitere*!];  
*expert* > *spert-* ...

3.6.3.2. Sinkopo — Redukto vortinterne.

Historie: L *calidus* > I *caldo*; L *eremitum* > F *ermite*

En Esperanto malofte: F *agréable* > *agrabl-*; L *carduelis* > *kardel-*;

A *politure* D *Politur* R **политура** > *polur-* (*pol-it-ur-*) [↑ -it-i!]

F *servitude* > *servut-*; F *friand*, -e → *friandise* > *frand-*

3.6.3.3. Арокопо — Redukto vortfine. — Motivita por eviti pseŭdosufikson:

-ad- F *embuscade* > *embusk-*; *palissade* > *palis-*

-air- F *arbitraire* A *arbitrary* > *arbitr-*

F *nécessaire* A *necessary* > *neces-*

-an- G **орфанос** > L *orphanus* > *orf-*

-ant- L *petulans* > FA *petulant* > *petol-* (↑ -ul- → -ol-!)

-ar- L *convallaria* > *konval-* (↑ P *konwalia*)

-et- F *lorgnette* R **лорнет** P *lorneta* > *lorn-*

-er- D *Finger* > *fingr-*; DP *Tornister* > *tornistr-*;

FAD *hamster* > *hamstr-*; D *Winter* > *vintr-*

-ig- L *fuligo* > *fulg-*

-il- L *fringilla*  $\begin{array}{l} \text{fring-} \\ \text{fringel-} \end{array}$  L *sibilo*, -are > *sibl-*

L *vespertilio* > *vespert-*; *vigilare*, *vigilans* > FA *vigilant* > *vigl-*

-in- FA *cousin* P *kuzyn* > *kuz-*; L *imaginari* F *imaginer* > *imag-*

F *intestin* > *intest-*; L *proscrastinare* > *prokrast-*

-it- L *cucurbita* > *kukurb-*

-on- F *bourdon* > *burd-*; F *goudron* > *gudr-*; sed: F *région* > *region-*

-ul- L *buccula* > *buk-*; F *crépuscule* > *krepusk-*;

L *furunculus* > F *furuncle* A *furuncle* D *Furunkel* > *furunk-*;

L *forticulus* > *fortik-*; L *cuniculus*\* > *kunikl-*; L *monedula* > *moned-*;

\* En la XVI–XVII jarcento en R uzata formo (cit. far Hüttle Worth 1963: 82): “Куникулус есть зверок подобен зайцу” = кролик.



L pediculus > *pedik-*; L stabula > *stabl-*;  
 F testicule A testicle > *testik-*; F vestibule > *vestibl-*

#### 4. ELKONDUKO

4.1. La studaĵo kovras nur parton de la promesita en la titola temo. La kadroj de similaj studaĵoj estas tro striktaj por senmanke pritrakti la cetere tre ampleksan problemaron. Fakte ni prezentis skeme nur la unuan flankon de la materialo: la formalan. Ni ne tuŝis la alian — eble eĉ pli gravan flankon: la enhavan-semantikan. Tio povus esti temo de aparta monografio.

4.2. La etimologiaj esploroj en Esperanto ne estas nuraj kabinetaj, spekulaciaj ludoj: ili devas havi celdirektatan praktikan taskon. Per etimologiaj analizoj eblas klarigi multajn formalajn kaj enhavajn problemojn de la lingvo, similaj esploroj povas servi kiel bazo al la norma vortaro, samtempe ili povas doni certajn sugestojn koncerne la enkondukon de novaj morfemoj en la lingvo.

4.3. La ĉefa celo de tiu ĉi laboraĵo estis prezenti la eblojn kaj la limojn de la etimologiaj esploroj en Esperanto. La temo estas sufiĉe neglektata ĝis nun kaj eĉ tiuj sporadaj artikoloj, kiuj okupiĝis pri certaj etimologiaj demandoj ŝajne ne ĉiam sekvas ĝustan vojon. La etimologio estas eble la malplej ekzakta branĉo de la lingvoscienco. Abundas en ĝi supozoj, hipotezoj, ofte ankaŭ miskomprenoj kaj eraraj, ofte bizaraj deduktoj. En Esperanto — kiel ni klopodis demonstri — tiaj danĝeroj estas malmultaj. Sed ankaŭ ilin oni evitu!

#### Signoj uzataj

|                              |   |
|------------------------------|---|
| /c/                          | Grafemo   |
| [c]                          | Praktika aŭ Esperanta transskribo.                                    |
|                              | <u>Mankantaj grafemoj:</u> /ø/ =  ø ,  œ ; /ü/ =  y ,  q ; /y/ =  i . |
| ç                            | IFA-transskribo   |
| >                            | "devenas de" ...  |
| <                            | "estas etimo de" ...  |
| →                            | "ŝanĝiĝas, transiras en ...-on, deriviĝas"                            |
| ↑                            | vidu! komparu! atentu!  |
| ~                            | Variantoj   |
| n'                           | Mola-palataligita konsonanto (nur la plej gravaj!)                    |
| ū                            | Longa vokalo  |
| ũ                            | Mallonga vokalo   |
| <i>diet</i> <sup>1</sup> -o  | Numero de la oficialiga dokumento                                     |
| <i>ordin</i> <sup>o</sup> -o | Neoficiala morfemo  |
| <i>lok</i> -o                | Fundamenta morfemo (sen aparta signo)                                 |

#### Mallongigoj


|     |   |
|-----|---|
| A   | Angla lingvo  |
| D   | Germana lingvo  |
| E   | Esperanto   |
| F   | Franca lingvo   |
| FdE | Zamenhof, L.L., <i>Fundamento de Esperanto</i> , red. A. Albault, 9-a eld., Marmande 1963 |
| G   | Greka lingvo (klasika)  |
| H   | Hungara lingvo  |
| I   | Itala lingvo  |
| J   | Jida lingvo   |
| Ja  | Japana lingvo   |



|                |   |
|----------------|---|
| L              | Latina lingvo (klasika)   |
| L <sub>1</sub> | Latina lingvo popola  |
| L <sub>2</sub> | Latina lingvo mezepoka  |
| L <sub>3</sub> | Latina lingvo skolastika  |
| L <sub>4</sub> | Latina lingvo eklezia   |
| L <sub>5</sub> | Latina lingvo vulgara   |
| LR             | Zamenhof, L.L., <i>Lingvaj Respondoj</i> , ed. G. Waringhien, 6-a eld., Marmande 1962 |
| P              | Pola lingvo   |
| PIV            | <i>Plena Ilustrita Vortaro</i> , red. G. Waringhien, Paris 1970                       |
| R              | Rusa lingvo   |
| S              | Hispana lingvo  |
| Sua            | Sŭahila lingvo  |
| T              | Turka lingvo  |
| UV             | <i>Universala Vortaro de la Lingvo Internacia Esperanto</i> , en FdE: 137-232         |

### Referencoj

|                   |   |
|-------------------|---|
| Akul'enko 1972    | Акуленко, В.В., <i>Вопросы интернационализации словарного состава языка</i> , Харьков 1972  |
| Back 1980         | Back, O., "Pri planlingva etimologio", en: Szerdahelyi 1980: 266-278  |
| Bally 1935        | Bally, Ch., <i>Le langage et la vie</i> , Zürich 1935 <sup>2</sup>  |
| Bárczi 1966       | Bárczi G., <i>A magyar nyelv életrajza</i> ("La biografio de la Hungara lingvo"), Budapest 1966   |
| Deroy 1956        | Deroy, L., <i>L'emprunt linguistique</i> , Paris 1956   |
| Haugen 1950       | Haugen, E., "The Analysis of Linguistic Borrowing", en: <i>Language</i> , 26.2: 210-231   |
| Hüttle Worth 1963 | Hüttle Worth, G., <i>Foreign Words in Russian</i> , University of California Press, Berkeley-Los Angeles 1963                                   |
| Meillet 1936      | Meillet, A., <i>Linguistique historique et linguistique générale</i> , 2-a vol.: <i>Les interférences entre vocabulaires</i> (1925), Paris 1936 |
| Szerdahelyi 1980  | <i>Miscellanea Interlinguistica</i> , red. Szerdahelyi I., Budapest 1980  |
| Waringhien 1959   | Waringhien, G., <i>Lingvo kaj vivo</i> , La Laguna 1959   |
| Wiener 1950       | Wiener, F.I., "Ĝemelaj radikoj", en: <i>Esperantologio</i> 1.2: 98-106  |



Interkultura komunikado estas ĉiutaga afero en nia tutmondiĝinta epoko, ja homoj moviĝas de unu lando al alia por laboro, por pli bona vivo aŭ turismado, kaj la tekniko ebligas jam virtualajn renkontiĝojn el diversaj landoj. La uzata lingvo havas sian rolon en la (mal)sukceso de la komunikado, ĉu en interpersona, ĉu en internacia kunteksto. Kian rolon havas la internaciaj lingvoj kiel la angla, hispana kaj la internaciaj planlingvoj kiel esperanto en la komunikado – estas la temo de la unua volumo de la eldonserio “Cross-linguistic and Cross-cultural Studies” de la Etnolingvistika Instituto de AMU. La temo estas prezentata el teoriaj kaj praktikaj vidpunktoj, tra lingvopolitikaj kaj edukaj aspektoj, ankaŭ en la tereno de gestolingvoj dank’al la kontribuo de 20 fakuloj el 7 landoj.

Interkulturaj studoj iĝis gravaj en nia tutteriĝanta mondo por helpi la reciprokan komprenon kaj kunlaboron mondscale. La dua volumo de la eldonserio “Cross-linguistic and Cross-cultural Studies” de la Etnolingvistika Instituto de AMU prezentas la rolon de la internacia planlingvo Esperanto en la multkultura mondo: kiel la lingvo kreita por internacia komunikado peras inter lingvoj, literaturoj kaj kulturoj; kiujn defiojn ĝi alfrontas en diverskultura internacia parolkomunumo – dank’al 16 aŭtoroj el 11 landoj.

La volumoj de la nova serio ***Cross-linguistic and Cross-cultural Studies*** de la Etnolingvistika Instituto (nun jam Fakultato) de AMU ekestis el la prilaboritaj prelegoj de la *5-a Interlingvistika Simpozio* en septembro 2020, organizita far la Interlingvistikaj Studoj. Ili enhavas artikolojn esperantajn, anglajn kaj polajn kun iliaj alilingvaj resumoj. Ili estas elŝuteblaj el la retejo de la Interlingvistikaj Studoj kaj de la Eldonejo Rys (<https://wydawnictworys.com/>).

La 3-a volumo de la serio: Linguistic politeness ‘Lingva ĝentileco’ aperis en 2022 kun polaj kaj anglaj artikoloj pri la lingva esprimo de ĝentileco en la lingvoj hispana, hungara, japana, kmara, korea, persa, svahila, tunezia araba kaj esperanto.

# Instruado de Esperanto



Kelkaj el la lernolibroj de I. Szerdahelyi kaj lia universitata libro pri Metodologio de Esperanto



## Pedagogiaj valoroj de instruado de esperanto<sup>1</sup>

Esperanto ekzistas jam okdek jarojn, sed ankoraŭ ne sukcesis atingi sian celadon. Kial oni instruas fremdajn lingvojn? Fremdajn lingvojn oni instruas por havi eliron el lingva izoliteco al aliaj lingvaj teritorioj. Oni elektas tiujn lingvojn kiuj havas la plej grandan koeficienton de cirkulanta lingva trafiko. Do, la ĉina estas altnombra, sed ĝi ne havas altan valoron por fremdlingva instruado, ĉar ĝia koeficiento de cirkulanta lingva trafiko estas malgranda. La angla tial estas trovebla en preskaŭ ĉiu monda instrusistemo, ĉar ĝi havas altan trafikan valoron. Certan rolon ludas tradiciaj, historiaj, kulturpolitikaj, socipolitikaj kialoj, sed ankaŭ lingvaj kialoj. Elektante fremdan lingvon, oni ne elektas pro ia lingva kvalito, sed pro alta interlingva funkcio. Ni vidu, ekz. kiel estas difinita la fremda lingvo kiel studobjekto en Perspektiva Programo de Fremdlingva Reformo en Hungario:

“Fremdlingvo kiel komunikacia rimedo baze diferenciĝas de aliaj objektoj ĉar tie realiĝas kaj kognitivaj kaj operativaj aktivecoj. La lingvokono estas rimedo de kreiva paroluzo. La fremdlingvo devas esti rimedo de internacia informajŝanĝo.”

Se ni legas metodologiajn verkojn de aliaj lingvoj (ekz. la anglajn), oni povas vidi ke la angla lingvo pretendas ke ĝi estu konsiderata kiel internacia kiun oni nomas landkono (germ. Landeskunde), kiun kunportas la lingvo, ne plu estas la angla, sed pro larĝskala uzo de la angla mondkulturo, ĝi ne reprezentas ian etnan sed mondan kulturon. Simile asertas ankaŭ iuj francaj metodologoj. Tiu mondkono estas nur fiktiva afero, ĉar se oni rigardas konkrete elementojn kiujn transportas la edukado per fremda lingvo, oni vidas ke la karaktero de la landkono vere sanĝiĝis, sed ne en direkto de mondkono, sed ĝi ne plu reprezentas la klasikan anglan kulturon de Shakespeare aŭ Byron, sed kulturon modernan de Beatles k.s. Tial oni ĉe ni en Hungario tuj povas vidi kiuj lernantoj intensive lernas la anglan lingvon kaj oni povas diferencii ilin de tiuj kiuj lernas la rusan.

Do, ĉiu lingvo estas kanalo de certa etna kulturo kaj tiu celado troviĝas en programo de certaj lingvoj. Oni devas koni la geografion, historion, folkloron kaj eĉ lastatempe la t.n. lingvan etikedon, do, oni devas ankaŭ konduki lingve laŭ la konkreta etna medio. Oni, sekve, toleras tion, kaj unu statistiko, kiun mi trovis antaŭ nelonge en Esperanto-Revuo demonstras ke la programoj de lernejoj certigas ege grandan amplekson al la instruado de fremdlingvoj. Se oni konsideras la diferencon inter investita energio kaj atingitaj rezultoj, oni devas konstati ke la plej deficitaj laboro en la tuta mondo estas la instruado de fremdlingvoj, kun enorma investado kaj minimuma rezulto kaj sukceso. Ti ĉi sukcesomanko skurgas psike la lernantojn, sed ankaŭ la instruistojn mem, ĉar de tago al tago ili sentas ke ilia laboro estas superflua.

<sup>1</sup> La artikolo aperis en: *Internacia Lingvistika Simpozio*. 1976. Zagreb: I.K.S. 9-18.

Tie ekestas la problemo de malfacileco. Kaj ĝi estas relativa. Ekzistas certaj absolutaj parametroj (interne de la lingvo: kontraŭdiroj, esceptoj, malregulaĵoj), sed aliaj estas relativaj kiel la ĉiam dupolusa sistemo dependanta de la gepatra lingvo. Ju pli malproksima la gepatra lingvo genetike de la cellingvo, des pli malfacile alproprigi la cellingvon. Tamen, vi erarus, se vi kredas ke estas tre bela afero se du lingvoj estas genetike proksimaj. Mi konas la interferencojn de genetike similaj lingvoj kaj la simileco kaŭzas pli malagrablan, negativan transferon ol la perfekta malsimileco. Se ni sumigas ĉion tion, ni konstatas ke Esperanto ne estas en la establita lerneja sistemo. Due: ke ĉiu etna lingvo enportas sian kulturon. Tio fariĝas pedagogia, eduka elemento de eduka komplekso, sed ne estas reciproka, ĉar la akceptanta lando ne transdonas sian kulturon al la alia. Trie: tiu nova lingva sistemo kiun la gelernantoj devas absorbi en siajn cerbojn estas pena, malfacila, kelkfoje eĉ neefektivebla celado. Kvare: la gepatra lingvo en tiurilato ludas tre gravan rolon.

Mi starigas la problemon pri Esperanto apud tiuj kvar konstatoj.

*Unue:* la fremdlingvo devas esti *kontaktilo*. Esperanto ja estas nur por tio farita. Do, el tiu vidpunkto Esperanto per si mem devus esti akceptebla.

*Due:* ĝi ne *reprezentas etnan kulturon*, do, el tiu vidpunkto estas neŭtrala, kaj enhavas ĉiujn pozitivajn elementojn por reprezenti morale sintezon de universala homa kulturo. Kion mi subkomprenas sub tio? Esperanto estas certa sintezo en si mem, sed sintezi lingvon samtempe ne sintezigante almenaŭ iomgrade ankaŭ la kulturojn oni ne povas. La lingvoj kontaktiĝas kaj ankaŭ la kulturoj. La lingvoj influas unuj la aliajn, kaj opaj elementoj estas pli vaste uzataj el kiuj fariĝas la t.n. internaciismoj. Dum kontaktado de kulturoj, lingvoj, diversaj kulturoj kaj lingvoj interŝanĝas ĉiam pozitivajn elementojn kaj neniam negativajn (morale pozitivajn). Esperanto estas lingva kaj kultura sintezo, en Esperanto ekzistas la t.n. internacia kultura potencialo, kaj tiu ĉiam pli larĝa potencialo donas la socian fonon al la ekzistofunkciado de Esperanto kaj samtempe servas al ĝi kiel kultura komponento por Esperanto kiel studobjekto. Kion faras la etnaj lingvoj por etnaj kulturoj, tion faras Esperanto por (estas iom troige diri, sed tamen) por universala kulturo. Tiu evoludirekto tamen estas palpebla – tio estas tio kion la francoj nomus “la planetalisacion”<sup>2</sup> – la pensmaniero en planetaj diapazonoj, la planetigo.

*Trie: facileco.* Absoluta facileco estas mezurebla. Relativa facileco ekestas per konfrontado de du lingvoj – la gepatra kaj la cellingvo. Esperanto estas facila. Oni povas teorie demonstri tute simple per absoluta maniero (cibernetikistoj povas tion) se ni faras programon de Esperanto kaj la germana lingvo ekz. en kiu ajn gramatika parto, tuj evidentiĝos kiu estas pli facila. Tamen, nia eksperimento pri trijara instruado en Hungario, Bulgario, Jugoslavio, Aŭstrio kaj Italio donas pli konkretajn rezultojn. Ni faris tri mezuradojn el kiuj ni prilaboris ĝis nun du kun kontrolaj lingvoj la angla, germana, rusa kaj itala. Por trovi la interligojn ni uzis formulon kiu ebligis al ni vidi la kvanton de la lernado kaj la agon de la lernantoj. Ni ricevis la sekvan rezulton:

<sup>2</sup> Rim. de IK: Verŝajne temas pri *planétisation*, enkondukita far Teilhard de Chardin.

| Lingvo    | koeficiento |
|-----------|-------------|
| Esperanto | 42,2        |
| Angla     | 26,0        |
| Germana   | 21,3        |
| Itala     | 25,7        |
| Rusa      | 23,9        |

Tiu skalo demonstras ke, se ni kalkulas la samajn kondiĉojn de lernado kaj la samajn taskojn, iomgrade pli bone solvas la lernantoj en Esperanto ol en aliaj lingvoj. Tio demonstras ke Esperanto estas pli facila, ĉar oni *povas* pli efike instruí ĝin.

*Kvare*: rilate la *interferadon* ekzistas du tipoj:

- a) interfero inter genetike parencaj lingvoj kaj
- b) interfero inter genetike neparencaj lingvoj.

Kiom helpas Esperanto en tio? Jen unu ekzemplo en la hungara lingvo. En ĝi ne ekzistas kategorio prepozicio en tiu formo kiel en hindeŭropaj lingvoj. Do:

|                 |                |
|-----------------|----------------|
| E: SUR LA TABLO | SUR MIA TABLO  |
| R: NA STOLE     | NA MOJEM STOLE |
| F: SUR LA TABLE | SUR MA TABLE   |
| H: ASZTALON     | ASZTALOMON     |

Se oni enŝovas unu atributon, oni ricevas la dekstran flankon

Do, Esperanto instruas per maksimuma simpleco la hindeŭropajn kategoriojn al hungaro. Kaj tiel ni obeas la plej gravan didaktikan leĝon: iri de la simpla al la komplika. Ĉar se li al kutimiĝas al: SUR LA TABLO, SUR MIA TABLO, ktp., li tion facile transportas ankaŭ al aliaj lingvoj kun la sama strukturo sed kun pliaj kazaj kaj aliaj komplikiĝoj. Temas, do, pri instruo de la lingva strukturo, kaj por hungaro ĝi eĉ donas leksikajn proksimecojn al internacia vortaro.

*Laste*: Psika valoro. Ekzistas psika baro por ekparoli en fremdlingvo. Tion kaŭzas la timo de malsukceso, de fiasko, la timo ke ili fariĝos ridindaj. En Esperanto tiu timo estas reduktita je minimumo kaj la lernantoj kuraĝas tuj paroli. Ilia parolmekanismo ekfunkcias multe pli rapide ol en aliaj lingvoj. Ne estas tiel granda ebleco erari. Tiun pozitivan reflekson li poste transportas en lernadon de alia lingvo. Ĉio tio estas mezuritaj elementoj kaj observitaj de mi dum multaj jaroj de mia pedagogia laboro kaj dum la menciita eksperimento.

Lasta demando estas la plej malfacile respondebla demando: kial oni tamen ne instruas Esperanton, se ĝi estas tia?

Jes, ĝi superas ĉiujn lingvojn en tiuj elementoj, nur en unu rilato ne: en la rilato de *motivado*. Tie ĉi ĝi postrestas. Se oni demandas kial ni lernas Esperanton, ni ne havas sufiĉe motivitajn respondojn. Neniu lernas lingvon ĉar ĝi estas facila ( tial ni same bone povus lerni la telefonan lingvon). Tio ne estas motivo. Homoj estas praktikaj, ne helpas utopiaj sloganoj. Ne helpas tio ke ni diras ke post mil jaroj ĉiuj homoj

parolos Esperanton. Oni demandas: kian materian avantaĝon oni havas de tio, ĉu oni povas uzi ĝin praktike, ĉu oni povas legi sciencajn librojn, uzi ĝin en internacia turismo? Sed, en tio estas la plej granda neglektado de esperantistoj. Ili konstruis sian internan mondeton, kelkfoje operetan, kaj interne de tiu ĉi interna mondeto ili ludas siajn ludetojn. Ili havas ĉion: flagon, himnon, akademion, ĉion ili havas, sed ili restis ekster la establita mondo. Kvazaŭ iu artefarita sputniko nur rondirus tiun ĉi establitan monden, sed ne enirus ĝin.

Ni devas eniri ĝin kaj tiam ankaŭ Esperanto fariĝos instruata lingvo de la establita mondo. La celo de nia instruado ne estu tio ke ni multigu la loĝantojn de tiu sputniko sed ke ni faru homojn kapablaj uzi Esperanton por la plej diversaj praktikaj celoj. Ne fari, produkti iuspecan Esperantiston kiu vivas por Esperanto, sed ne vidas ke ĝi estas iu praktika ilo! Ni devas eniri en la socion, kaj se ni eniros ĝin, la socio faros en ĝi la lokon por Esperanto. Ĝis nun ni ricevadis almozon de la socio, sed ni ne bezonas tion. Ni bezonas radikalan solvon, kaj ĝuste tion celas nia pedagogia-didaktika eksperimento. Ni limigis nin je unu geografia zono ĉar ligite ni povas pli efike labori. Nun, kiam ni finprilaboros la rezultojn, ni metos ilin sur la tablojn de ministerioj en kies landoj okazis la eksperimento petante ke ili traktu serioze tiun aferon kaj registare decidu pri tiu problemo. La fina solvo tamen estas pli malfacila ol oni pensas, ĉar ja temas pri la problemo de kokino kaj ovo: ĉu unue Esperanto-parolantoj kaj poste funkciado aŭ inverse? Tio tamen ne estas tute nesolvebla, sed la esperantistaro devas radike ŝanĝi sian sintenon kaj pensmanieron en tiuj ĉi rilatoj.





Interlingvistiko, origine scienco stariganta normojn por helplingvoj, plivastigis sian esplor- kaj studobjekton dum cent jaroj da sia ekzisto. Ĝi iĝis interdisciplina sciencobranĉo, kiu kovras ne nur historion, teorion kaj praktikan esploron de planlingvoj, sed krome lingvoplanandon, lingvonormigon, multingvecon, lingvopolitikon kaj aliajn aspektojn de komunikado, inklude de internacia uzado de etnaj lingvoj. Larĝe difinata kompreno kaj malfermas al interlingvistiko novajn horizontojn kaj ebligas pli profundan specialigon en unuopaj aspektoj.

La lernolibro de Věra Barandovská-Frank estas rezulto de dudekjaraj spertoj de studado kaj instruado en kunlaboro de la instruistino kaj la studentoj. La prezentata materialo respegulas iliajn preferojn kaj dezirojn pri enhavo de la enkonduka interlingvistika kurso.



Ĉu ekzistas Esperanta kulturo? – sonas la dubanta demando de ne-esperantistoj. Al tiu demando donas abundan – sed ne elĉerpan – respondon la nuna libro. Esperanta kulturo elformiĝis dank'al ĝia lingvokomunumo, dismetita en la mondo. Ĝi riĉiĝas daŭre el la kulturoj de siaj parolantoj, do temas pri inkluziva kulturo.


La 15 ĉapitroj de 13 aŭtoroj el 10 landoj prezentas Esperantan kulturon ekde arto tra la ĉiutaga kulturo ĝis la pensmaniero de esperantistoj.



Komunikado – interŝanĝo de informoj – iĝis baza afero en la 20-a jarcento kiun la tekniko pli kaj pli subtenas. Homoj komunikas parole, skribe kaj ankaŭ bilde; persone, telefone aŭ rete, sed ankaŭ per sia konduto kaj aspekto. Komunikado povas okazi unudirekte kiu ĉefe karakterizas la amaskomunikadon aŭ plurdirekte. La internacia kaj interkultura komunikado iĝis ĉiutaga realeco pro la tutmondiĝo, tiel povas okazi konfliktoj pro la kulturaj kaj lingvaj malsamecoj. La libro donas superrigardon pri la vasta temo kaj analizas la eblecojn kaj kontribuon de Esperanto en kelkaj terenoj, en tri partoj: *Komunikado el diversaj aspektoj*, *Internacia komunikado kaj Interkultura komunikado*.

La volumoj de la serio *Interlingvistikaj Studoj* estas elŝuteblaj el la retejo de la Interlingvistikaj Studoj de AMU (Adam-Mickiewicz-Universitato, <https://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/>) kaj el la retejo de la Eldonejo Rys.

Ili estas interesaj kaj utilaj fontoj por interesiĝantoj pri la temoj.



La memorlibro (2009) estas dediĉita al István Szerdahelyi far tiuj, kiuj ankoraŭ kunlaboris kun li en iu formo, kiuj estis instigitaj far li rekte aŭ de liaj ideoj. Kontribuis liaj disĉiploj, kolegoj en vasta senco, el Hungario kaj el aliaj landoj. La unua ĉapitro prezentas lin mallonge, per kelkaj bildoj kaj rememoroj. Zsuzsa Gados kaj Árpád Máthé ellaboris abundan bibliografion.

La sekvaj 5 ĉapitroj grupigas studojn ĉirkaŭ la ĉefaj temoj de esperantologio, temoj pri kiuj ankaŭ li okupiĝis: *Lingvoplanado kaj lingvopolitiko*; *Lingvistiko de Esperanto*, *Lingvopedagogio*, *Literaturo*; *Leksikografio kaj la cetero*. Vi povas legi pri Praesperanto (Vera Barandovská) kaj ŝancoj de Esperanto (László Gados). Estas retraktataj la kontroversia problemoj de radikalkaraktero (i.a. Michel Duc Goninaz), la lernfaciligado de Esperanto (Renato Corsetti), sed ankaŭ novaj atingoj kiel la Komuna Eŭropa Referenckadro (Márta Kovács), la stato de esperanta leksikografio (Jozefo Horváth, Iona Koutny). Vi povos enrigardi en pretiĝantan romanon de Éva Tófalvy, ekscii la misteron de la Tero (Endre Dudich) ktp.



La **Angla-Esperanta-Ĉina laŭtema etvortaro** plene trafas vian celon, se vi volas lerni lingvon (ĉefe en progressa nivelo) kaj ekzameniĝi, aŭ se vi volas paroli kaj skribi pri iu temo kun riĉa vortprovizo. La ĉ. 1200 vortoj kaj esprimoj en la unuopaj temoj estas ordigitaj sub ofte uzataj kapvortoj laŭ la praktika bezono de lingvouzo. Fine kelkaj leksikaj kaj komunikaj ekzercoj helpas la plilaboron de la temoj en Esperanto.

La etvortaroj helpas ankaŭ dum la lernado de la aliaj du lingvoj (angla - hungara, litova aŭ germana - pola, ĉina). En la vortostoko kaj aranĝo speguliĝas la lingva bildo de ĉiuj tri lingvoj.

Antaŭaj volumoj de la serio:

Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro. 2002

Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado. 2003.


Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Homa vivo kaj Loĝado 2005

Angla-Esperanta-Litova etvortaro pri Lernado kaj Laboro. 2005

Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado. 2008.







István Szerdahelyi (1924-1987) havas gravan rolon en la historio de interlingvistiko kaj esperantologio. Li dediĉis sian vivon al la esplorado de tiuj ĉi terenoj kaj al ilia prezentado al esperantistoj kaj lingvistoj. Li instituciigis la universitatajn studojn pri esperantologio en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (ELTE). Li verkis multe, ankaŭ diversajn lernolibrojn. Fine de lia vivo li iĝis prezidanto de ILEI, membro de ADE kaj honora membro de UEA.

La libro – jam la 4-a volumo de la serio Interlingvistikaj Studoj – donas superriardon pri la multflanka agado de profesoro Szerdahelyi, ĝi entenas kelkajn liajn artikolojn kiuj ne estas alireblaj, sed estas ankaŭ nuntempe aktualaj. La elekto estas subjektiva kaj determinita ankaŭ de la teknikaj eblecoj.

Ĉi tie reaperas lia ampleksa artikolo Enkonduko en interlingvistikon kun abunda bibliografio (1979). Interlingvistiko okupiĝante pri internacia komunikado kaj la rolo de planlingvoj en tio – kiel tereno de aplikata lingvistiko – rilata ankaŭ al lingvoplanado kaj -politiko estis tiam nova aliro.

La esploroj de Szerdahelyi fokusiĝis al la lingvistikaj aspektoj de Esperanto, i.a. al la morfologia strukturo de Esperanto, kaj kontraŭis la tiaman akademian koncepton pri gramatika karaktero de radikoj (ĝis nun ne reviziitan!), proponis alian aliron (Vorto kaj vortelementoj 1976). Li komencis ankaŭ la semantikan analizon de Esperanto, antaŭe neglektitan kaj ĝis nun ne ellaboritan kio gvidis lin al etimologio (1987), li analizis la pruntoprocezon de Zamenhof de latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj kaj identigis la influon de slavaj lingvoj.

Szerdahelyi estis ĝisosta pedagogo, ŝatata preleganto, verkis lernolibrojn, gvidis la 5-landan eksperimenton por esplori la hipotezon ke Esperanto kiel unua fremda lingvo povas faciligi la lernadon de la sekvaj – ĉefe latinidaj kaj ĝermanaj – lingvoj en la 1970-aj jaroj. Ankaŭ tio atendas daŭrigon kiel pluraj liaj komencitaj esploroj.

**ISBN 978-83-68006-44-5**

**DOI 10.48226/978-83-68006-44-5**